

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA PRESORGANO

DE LA



UNIVERSALA ESPERANTIA  
BIBLIOTEKO

1777

1916

JARO VI<sup>o</sup> : JAN.-FEBR. 1915

# REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO DE "KATALUNA ESPERANTISTO"

ARIBAU, 55 : BARCELONA

<i>Direktoro</i> . . . . .	FRED. PUJULÀ
<i>Redakcia sekretario</i> . . . . .	JOSEP GRAU
<i>Redaktoroj</i> . . . . .	ESTANISLAU PELLICER JOSEP VENTURA ARTUR DOMENECH
<i>Administristo</i> . . . . .	JOSEP SERRAT
<i>Administracia sekretario</i> . . . . .	JOAN AMADES

## KUNLABORANTOJ

Manuel BORDAS (Barcelona). — D-ro Jascinto BREMÓN (Barcelona). — D-ro Joaquim COLL (Barcelona). — Delfí DALMAU (Bahía Blanca. Rep. Argentina). — Josep DOMENECH (Girona). — Gustau GALCERÁN (Vilanova i Geltrú). — A. NOVEJARQUE (Valencia). — Joan ROSALS (Barcelona). — Eulalia ROSELL, Teresa ROSELL (Vilanova i Geltrú).

## KORESPONDANTOJ

B. Nogué (Manlleu). — E. Agudé (Reus). — P. Solanas (Rubi). — P. Costa (Santa Coloma de Farnés). — J. Vidal (Tarragona). — M. Solà (Terrassa). — F. Guitart (Vendrell). — J. Albagés (Vich).



Nia devizo: *Maro estas gataro*

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA

**Katalana Esperantista Federacio**

Asocia sidejo de la K. E. P. : Rambla, 41 ; Sabadell (Katalunio)

Redakcio kaj Administracio de K. E. : Arribau, 55 ; Barcelona

AL LA TUTA ESPERANTISTARO  
 PACAN 1915<sup>an</sup> JARON  
 DEZIRAS EN LA NOMO DE LA  
 KATALUNA ESPERANTISTA  
 FEDERACIO

La Komitato

## Iberia Esperantista Konfederacio

**K**IAM en la Kongreso de Sant Feliu de Guixols estis legata la propono de S-ro Amades, publikigita en nia numero de Majo 1914<sup>a</sup>, celanta etendigi la KATALUNAN ESPERANTISTAN FEDERACION al ĉiuj landoj katalune parolantaj, montriĝis klare la ĝenerala aprobo de la kongresanoj, multaj el kiuj estis aprobintaj per akklamado en la antaŭa Kongreso, Olot 1913<sup>a</sup>, la proponon starigi *superan potencan Komitaton*, kiu kunigante ĉiujn fortojn kaj havante ĉies reprezenton, klopodos por la starigo kaj oficialigo de Esperanto en Iberio.

S-ro Amades konstatante la favoran akcepton faritan al lia propono, diris nur kelkajn vortojn, deklarante ke ĝi celas doni okazon al la membroj de la komisiono elektita en Olot por la starigo de la Iberia Konfederacio, sciigi pri la farita laboro kaj tial petis ilin bonvolu rakonti pri la tasko entreprenita. S-ro Pujulà, konferencinte kun siaj kolegoj en la komisiono, donis la petitajn klarigojn kaj raportis pri la rezultoj de la agado, kiun li — reprezente de la katalunaj komisionanoj, S-roj Prezidanto de K. E. F., Bremón kaj Grau, — faris apud la ceteraj aliregionaj kolegoj, montrante ke la 2<sup>a</sup> rezolucio<sup>1</sup> de la Olot'a Kongreso brile efektiviĝis, danke al la kuraĝo kaj entuziasmo de S-ro Piñó, kiu sukcesis fondi Federacion kunigantan la esperantistojn en la hispanaj provincoj Valencia, Castellón, Alicante kaj Teruel. Li diris, ke la tasko de la katalunaj komisionanoj estis multe malpli aktiva, ol tiu de la ceteraj kolegoj, ĉar la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO jam de longe ekzistas kaj estas preta kunligi kun la fonditaj aŭ fondotaj ĝeneralaj asocioj en Iberio, por konduki la aferon ĝis atingi la celon de la Konfederacio. Se en aliaj regionoj, krom Valencio kaj Katalunujo, — aldonis S-ro Pujulà, — Federacioj ne estis fonditaj, tio dependas ne de manko de entuziasmo aŭ de malaprobo je la ideo, sed de nesufiĉa disvastiĝo de nia ideo en ilia teritorio; tamen la semoj fruktiĝos, ĉar bonaj samideanoj promesis labori por kontribui al la starigo de ĝenerala organizacio por la tuta ŝtato.

La proponinto, aŭskultinte la klarigojn donitajn, kiuj lin plene

1. La Kongreso vidus kun ĝojo la starigon de similaj al la nia Federacioj en la ceteraj partoj de Iberio kaj ilian kunagadon en granda Konfederacio, kiu respektante ĉies liberecon, laboros efike kaj unukore por la antaŭe diritaj celoj.

kontentigas, retiris la proponon, kaj la Kongreso per aplaŭdado al S-roj Pujulà kaj Amades montris kun kiom da simpatio la katalunaj samideanoj rigardas la klopodojn de la aliregionaj kunbatalantoj plivastigi kaj fortigi ĝeneralan organizacion, kiu reprezentos la tutan Iberlandan esperantistaron.

Ke la semoj jetitaj ne falis sur malfekundan teron, montras klare al ni la sekvanta komunikaĵo, kiun la Komitato de la K. E. F. ricevis de *Frateco*, esperanta societo de Zaragoza.

«En ordinara komitata kunsido de tiu ĉi Societo, okazinta en la proksima pasinta monato, oni decidis laŭ la propono de S-ro Prezidanto subskribata, adresi sin al la Kataluna Esperantista Federacio proponante, ke ĝi kunvoku la unuan Esperantistan Nacian Kongreson en Barcelona, koincidante kun la Internacia Ekspozicio de Elektraj Industrioj.

Je la sama tempo oni povus ankaŭ prepari Internacian Esperantistan Semajnon per kiu solenigi la projektotajn kunvenojn kaj ekskursojn.

En la okazo esti akceptita la ideo, kiun plezurege ni submetas al la ekzameno kaj aprobo de tiu Federacio, vi povas esti certa pri nia plej entuziasma kunhelpado. — Zaragoza, 12<sup>a</sup> Novembro 1914. — *Benigno de Luna.*»

Ankaŭ el Andaluzio venas al ni kuraĝiga voĉo de la Hispana Societo p. p. Esperanto, kiu ĵus publikigis cirkuleron subskribitan de ties prezidanto kaj sekretario, S-roj Trinidad Soriano kaj Carlos Martínez, en kiu post klarigo pri la situacio de la Hispana Societo, oni diras la jenajn frazojn:

«Jam dum la regiona kataluna kongreso de Olot kelkaj el niaj pioniroj komprenis ke la ago de H. S. ne alvenis ĉie, kaj tial, ĝi ne povis plenumi dece siajn taskojn. Ili pripensis, ke se ni estus organizitaj, kiel en Francujo kaj aliaj landoj, *per regionaj federacioj grupaj*, kaj *poste kunfederigitaj per nacia komitato*, kiu unuigas ĉiujn, la ago de la regiona komitato estus pli efika kaj facila ĉe la diversaj urboj kaj eĉ vilaĝoj de ĝia proksima enlando. La grupanoj kotizus nur por la regiona komitato kaj tiu ĉi pagus al centra nacia komitato la pli-malpli grandan onon, kiun nova regularo difinus laŭ la tasko, kiun ĝi devus plenumi.

La bondeziro estas evidenta. La rezultatoj jam ne estas tiel klaraj. Estas multaj regionoj en Hispanujo, kie Esperanto ankoraŭ ne sukcesis, aŭ kie ĝi ne atingis sufiĉan nombron da propaganditoj. Kiel ili kunigos perajojn por propagandi en siaj regionoj, ĝuste kie tion oni plej bezonas?

Tamen estas nepre necese ne daŭrigi brakkrucigite. Niaj samideanoj el kataluna regiono jam de longe estas kunigitaj per Fede-

racio. La valencianoj ankaŭ, de la pasinta jaro sukcesis federaciigi la orientajn provincojn Castellón, Valencia, Alicante kaj Teruel.

Eble en aliaj regionoj, kie oni parolas enlandajn specialajn lingvojn (oni scias ke tio unuigas homojn) estus pli-malpli facile federaciigi niajn samideanojn; sed ni povas certigi ke, en Andaluzio, ni ne trovis decan emon, kiam ni disvastigis la ideon.

Per la jena cirkulero ni proponas al ĉiuj niaj hispanaj samideanoj ke ili pripensu la aferon kaj ili komuniku al ni sian opinion. Ni atendos iliajn respondojn dum kelkaj monatoj, kaj en Majo ni jam agos laŭ iliaj esprimitaj deziroj.

La transskribitaj dokumentoj lasas al ni nenian dubon, ke la ideo starigi Iberian Esperantistan Konfederacion, estas ĝuste konsciata kaj bone ŝatata en la tuta lando; mankas nur kelkaj formalajoj inter la diversaj organizacioj por konkludi definitive la starigon de la supera komitato, kiu devos zorgi pri la ĝeneralaj komunaj entreprenoj kaj unuigi la aŭtonomie kondukatajn laborojn de ĉiu el la Federacioj aliĝintaj. La KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO estos tre ĝoja, se ĝi povas alporti sian helpon al la efektivigo de la I. E. K., kiu nuntempe estas la dezirata celo de tre multaj, eble de ĉiuj, esperantistoj de la Iberiaj landoj.

KATALUNA ESPERANTISTO, ĝia presorgano, malfermas siajn paĝojn al ĉiuj samideanoj, kiuj volos per sugestio de projektoj, iniciativoj k. t. p., kontribui al la bona tasko de la Komisiono por starigo de la Iberia Esperantista Konfederacio, kies neceseco fariĝas kun ĉiu tago pli sentebla. La cirkonstancoj de la nuna momento, ŝajne malfavoraj instigas nin obstine laboradi; la forestanta paco sentigas pli forte ol iam siajn bonojn, kiujn oni nun povas nur bedaŭri; la deziro ilin denove akiri ĝermas en ĉiuj koroj; en tiuj de niaj samideanoj, kiujn la terura ŝtormo forglutis en sin, tiu deziro floras, viviĝas, pligrandiĝas kun ĉiu momento; ni devas fari, ke tiu deziro efektiviĝu; kiam Paco rebrilos sur la malluma tero, kiom granda estos nia feliĉo, se ni per la helpo kaj ekzemplo de nia organizaĵo povas kontribui al la rekonstruo de l' disfalintaj frataj organizoj, celantaj, kiel la nia, starigon sur la mondo de eterna fruktodonanta Paco!

Se ni havis la bonan ŝancon resti flanke de l' milito treninta post si la rezultatojn de longjara peza laborado, ni repagu al la postvivontoj de l' granda dronado, proponante al ili ripozadon en la trankvila haveno de nia anaro. Por tio ni pligrandigu ĝin: ju pli granda ĝi estos, des pli grava estos la efiko de nia ekzemplo, des pli rapide la esperantistaro resaniĝos el la kruela sangado, kiun ĝi nun suferas. Kiam la ŝipo simbolo de nia idealo albordeĝos al la sopirata bordo — nia celo — oni premios nian firmecon: nur danke al la kvieto,

de nia rifuĝejo, ĝi estos elsaviĝinta el la perejo, nur danke al nia trankvilo kaj kuraĝo meze de la furioza ventego, nia samideanaro estos restinta sur la bona vojo.

Ni ricevos tiam kun fiero la plej grandan premion : la sinceran dankon de ĉiuj noblaj, de ĉiuj bonaj koroj.

Samideanoj, denove al laboro! La Iberia Esperantista Konfederacio estos firma apogilo de la resaniĝanta Esperantismo!

Unueco estas forto! Potenco *maro estas* simple *gitaro* : ĉiu laboru!

JOSEP GRAU



## EL NIA V<sup>a</sup> KONGRESO

La ekzamenoj anoncitaj okazis ĉe la Urbodomo je la horoj fiksitaj en la programo de la Kongreso. Aspiris al la diplomo de profesoro la konataj esperantistoj S-roj Josep Ventura, el Terrassa kaj Lleonart Renom, el Barcelona. Post la brilaj ekzercoj ili ambaŭ ricevis la diplomon laŭ unuanima decido de la ekzamena tribunalo, kiun konsistigis S-roj Pujulà, Gili kaj Grau, diplomitaj profesoroj de K. E. F.

— La Organiza Komitato eldonis specialan serion de koloraj kartoj kun bildoj el la kongresurbo kaj ĉirkaŭaĵo, kiujn la kongresanoj volonte aĉetis; sekvinda ekzemplo por la venontaj kongresoj.



Aperos en la proksima numero

EPIZODO DE MAGDALENO

AMIKINO DE BELTALIULINO

el *La Ben Plantada*, de Xenius, tradukita de

D-ro BREMÓN



**Markanto'**DEVIZO : *Mi scias nur, ke mi nenion scias*

GÖTHE

En la martrankvilo, en la marsilent'  
 ĉio lum', viv', estas;  
 nek folio morta dancas kun la vent'  
 nek flor' velka restas.

Kiam mev' flugante tra la spac' sen fin'  
 en l' altaĵ' perdiĝas,  
 amepante venas ĝia kunulin'  
 kaj tuj reforiĝas.

Pro la longa iro ne haltas sen pov'  
 ondo lacigita,  
 nek vespere venas ree ventet-blov',  
 de l' maten' pelita.

Kaj potenc-resona, en ĉiu moment',  
 la viv-himno estas...  
 Eĉ folion mortan trenas ne la vent',  
 nek flor' velka restas.

APELES MESTRES

*Tradukis* JOSÉ VENTURA

## La Pariza Kongreso

**T**UJ post la anonco ke la Deka Kongreso de Esperanto okazos en la granda urbo Parizo, ĉiuj esperantistoj de la tuta mondo sin pretigis ĉeesti.

Kiel ĉiuj amikoj de Esperanto, mi konsideris la sukceson de nia Kongreso kiel la definitivan triumfon de nia granda idealo, kaj ankaŭ, kiel multaj aliaj samideanoj mi tuj enskribiĝis en la vicoj de ĉeestontoj en nia plej grava kunveno. Kaj ju pli la dato de la Kongreso estis proksima, des pli niaj pretigoj estis gravaj, niaj entuziasmo kaj konfido pri la sukceso de nia Kongreso estis grandaj. Plivigliĝis nian esperon la Oficiala Organo de la Deka, kiu alvenis en niajn manojn regule ĉiumonate, kun novaĵoj pri la sukceso antaŭvidita. La listo de la kongresanoj pli kaj pli grandiĝis kaj la entuziasmo por nia ideo estis ja kuraĝiga, sed, la lastaj tagoj antaŭ nia kongresfesto portis al niaj koroj novaĵojn tute malkuraĝigajn; la ĵurnaloj antaŭvidis la eblecon de milito inter la Eŭropaj landoj.

Fine venis tiu tiel sopirita dato : nia forveturo al Parizo. Kune kun ĝi venis gravaj sciigoj kiuj jam certigas ke la Eŭropa milito estas ne nur ebla, sed bedaŭrinde reala; la telegramoj kiuj unue parolis tiel konfuze, jam anoncas la realiĝon de tiu tiel grandega milito, pri kiu ni ĉiuj tiom da fojoj aŭdis paroli. Tamen nia entuziasmo, kaj la dubo ke en tiu fojo, kiel en aliaj, tiuj informoj estus nur alarmigaj, kaj ke tiu tiom preparolita eŭropa milito pro ĝia senlima graveco eble ne okazos, kuraĝigis nin forveturi, konfidante je nia idealo kaj nia devo al la sukceso de la X<sup>a</sup> kaj de Esperanto. Ni ne dubis, ni ne povis dubi pri la sukceso de Kongreso kies organizado estis tiel lerte preparita. Kaj ni foriris...

La lastan tagon de Julio karavano de pli ol 50 katalunaj samideanoj forveturis al la Kongresurbo. La plej granda parto el la forveturintoj estis junuloj, kiuj ne volis nek povis pensi pri la gravaj cirkonstancoj kiuj okazas en nia Kontinento; ili estis gajaj, ŝercemaj, ridemaj je la diritaj spritaĵoj. Dume nia vagonaro rapide marŝis... antaŭen... ĉiam antaŭen... La vojaĝo estis plej feliĉa, kaj ni estis ofte demanditaj pri la kialo de nia vojaĝo karavane. Kial, oni demandis nin, en tiuj teruraj momentoj vi riskas fari viziton al la urbo Parizo? Ni informis ilin, ke nia vojaĝo estas nur paca kaj ni estas pacamantoj.

Ni aŭdis kelkfoje la vortojn en tiuj momentoj filozofa : utopio.

Tamen fratigan kaj pacan idealon ni vidis super la malaltaj homaj bataloj kaj konsideris vere utopio la eblon de fratiga milito en tiuj tagoj, antaŭ la espero de la fina venko por la fratigo de l'homaro. Ne, ni ne timis pri la okazontaĵoj!

Ni atingis fine Parizon, kaj denove niaj duboj komenciĝis kaj de tiu momento ni kredis ja pri la ebleco de gravega milito; la novaĵoj ricevitaj el kelkaj Eŭropaj landoj estis ke la Rusa, Serba, Aŭstria kaj Germana kancelieroj ne interkonsentis kaj ke la milito inter ili estis jam deklarita. Niaj samideanoj el tiuj landoj ne povos ĉeesti. Ni vizitis la Akceptejon de la Kongreso kie oni donis al ni la plej malgajajn sciigojn kaj tiam eĉ la plej optimistaj jam elreviĝis el tiu sonĝo de kiu ni ne volis vekigi. Ni salutis kelkajn amikojn hispanajn, katalunajn kaj eksterlandajn samideanojn, kiuj kiel ni riskis entrepreni la vojaĝon, sin oferante al sia ideo. Kaj la nokton mem de nia alveno, mobilizado estis deklarita en Francujo por la morgaŭa tago 2.<sup>a</sup> de Aŭgusto.

Ni vidis tiam la malsukceson de la Kongreso. Nia disreviĝo estis pli granda ĉar ni esperis la Kongreson kun tiom da konfido, kaj ni ekvidis en unu momento niajn iluziojn disfalintaj, tiuj iluzioj vivintaj en niaj koroj dum tiom da tempo. La sekvanta tago de nia alveno, Parizo estis grandega amasbruo, la parizanoj estis kvazaŭ frenezaj pro entuziasmo, kaj kontrastis al tiu bruo la paco de nia idealo. Kiam ni kunvenis en la Granda Palaco Gaumont, kiam ni, malgajaj, alvenis unu post la alia en tiun Palacon, avide demandadis sciigojn pri la gravega momento kiun trairas la Eŭropa Kontinento. La malferma kunsido, kiun ni tiel multe esperis, kaj kiun ni imagis tiel plensukcesa, reale montris al ni kiel malgaja estas la vivado. La nombro da samideanoj ĉeestantaj estis ja granda, sed ĉiuj elmontris en la vizaĝo signon de malgajeco. La granda halo de la Kongresejo, arte kaj bele aranĝita, ankaŭ kiel la personoj ŝajnis malgaja, — tiu halo kiu devis enteni esperantistojn el la tuta mondo dum momentoj de frateco. La flagoj de ĉiuj nacioj kunligitaj per nia esperanta standardo ŝajnis al mi kvazaŭ sarkasmo.

Malfermis kaj fermis la kunsidojn de la Kongreso ĝia Sekretario, kiu per emociitaj vortoj esprimis ke la kongreso ne povos okazi. El ĉiuj lipoj eliris konfuzaj vortoj kontraŭ la kaŭzintoj de la milito, ĉiuj koroj batis sub la sama influo. Kaj post tio la Kongreso finis siajn senfruktajn taskojn; tiu granda kaj grava festego, de kiu ni esperis tiom da bonaj fruktoj por nia afero, estis finita.

Post tio, venkinte milon da malfacilaĵoj ĉiuj revenis, post sepo da tagoj vane perditaj, hejmen, kun la koro premita, sen esperoj kaj iluzioj. Malbenata estu la milito!

JOAN GILI NORTA



## Novaj redaktoroj

**D**EPOST tiu momento S-roj Josep Ventura kaj Artur Domenech plenumos la taskon de redaktoroj de KATALUNA ESPERANTISTO. Ili ambaŭ estas bone konataj : S-ro Ventura, malnova esperantisto perfekte konanta nian lingvon, multfoje premiita en niaj Floraj Ludoj, portas al la Redakcio de nia gazeto la valoran helpon de sia firma konstanteco. S-ro Artur Domenech, nova samideano, gajninto de la premio Universitat en la pasinta jaro, kronita per la Natura Floro en la Floraj Ludoj de Sant Feliu de Guíxols, portas al ni sian kuraĝan entuziasmon kaj sian fidon en nia triumfo. Ili ambaŭ estas energiaj, inteligentaj, laboremaj : ŝatindaj kvalitoj garantiantaj ilian bonan taskon.

S-ro Pellicer konservos sian postenon kaj plenumos la oficon de sekretario de redakcio, ĉar S-ro Grau ricevis de la Komitato de la K. E. F. la honoran komision direkti la oficialan organon de la Federacio dum la bedaŭrinda forestado de S-ro Pujulà, la kara Direktoro. Ili ĉiuj, en la komenco de la peza tasko supera al iliaj fortoj, esprimas sian esperon je la indulgo de la legantoj, kiuj certe sentos en KATALUNA ESPERANTISTO la mankon de la sperta gvidado de S-ro Pujulà. Ili tamen akceptis la redaktorajn oficojn, certaj ke la bonaj amikoj, kiuj promesis sian kunlaboradon, senpezigos per sia helpo la respondecon de ilia tasko.

Al ĉiuj, legantoj kaj kunlaborantoj, proponas sincere sian antaŭdankon.

LA REDAKCIO

## ENLANDA MOVADO

Manko de spaco malhelpas la raportadon pri ĉiuj lastaj okazintaĵoj per kaj por Esperanto en nia lando. Tamen ni klopodos resumi per mallongaj raportetoj la sciigojn, kiujn pri la plej gravaj el ili ni ricevis, promesante ke de la venontaj numeroj la informoj estos kiel eble plej ampleksaj, kaj esperante ke niaj korespondantoj rapidos sendi al ni siajn raportojn pri esperanta movado en siaj urboj, por ke la sciigoj ne rezultu malnovaĵoj.

**BARCELONA.** — El la festaro, kiun la *Barcelona Esperantista Societo* organizis en pasinta Aprilo, ni ne raportis ankoraŭ pri la sekvantaj festoj.

La 18<sup>aa</sup> de Aprilo okazis ĉe *Barcelona Stelo* solena balo, tre sukcesa. La 23<sup>aa</sup> de sama monato estis faritaj ĉe *Semo* paroladoj kun lumbildoj pri la okazintaj Universalaj Kongresoj de Esperanto; oratoroj estis S-roj Sabadell, Pujulà, Rosals, Coll, Mattes, Bremón, Urbez kaj Grau. Pri Parizo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo paroladis S-ro Pujulà la 30<sup>aa</sup> de Aprilo, kaj prezentis grandan nombron da bildoj, kiuj tre plaĉis. Ambaŭ paroladvesperoj havis grandan sukceson. Intertempe, la 26<sup>aa</sup>, okazis la ekskurso al Vallvidrera, kiun malhelpis la pluva vetero; tamen 20 gesamideanoj sufiĉe agrable faris la ekskurson.

— Ĉe la fino de la kurso 1913<sup>a</sup>-1914<sup>a</sup>, kiun D-ro Joaquim Coll faris en la Barcelona Universitato okazis, kiel kutime, la ekzamenoj, per kiuj la multaj lernantoj montris la profiton, kiun ili eltiris el la klaraj lecionoj donitaj de la profesoro. En la konkurso spĉiala por la premio Universitat (100 ptoj.) estis laŭreato S-ro A. Domenech, kiu ricevis multajn gratulojn, kiel ankaŭ D-ro Coll pro la bona rezultato de la kurso.

— *Barcelona Stelo* okazigis en sia sidejo la 5<sup>aa</sup> de Decembro esperantistan vesperfeston. Amatora societo «L'Auba» prezentis la katalunan teatraĵon «Cura de moro», kaj la esperantistoj ludis tre korekte la verkon «Amors esperantistes» kiun S-ro Gili adaptis al la kataluna lingvo. Estis tre aplaŭdata pro sia perfekta rolludo S-ro Viñas kaj oni varme aplaŭdis la ceterajn partoprenintojn, speciale F-inojn Navas kaj Rey. Balo finis la tre agrablan feston, kiun amase ĉeestis la esperantistoj barcelonaj.

— La 7<sup>ma</sup> de Novembro *Ĉiam Antaŭen* malfermis novan kurson per propaganda festo, ĉe kiu S-ro Grau paroladis pri la temo «Esperanto kontraŭ la milito».

— *Paco kaj Amo* malfermis ankaŭ novan kurson la 23<sup>an</sup> de Januaro 1915<sup>a</sup>. Okaze de tio S-ro Grau faris paroladon pri «Esperanto kiel kultura faktoro».

— La barcelonaj esperantistoj organizis honore de la gajninto de la Natura Floro en la Floraj Ludoj de St. Feliu de Guŝxols, S-ro Artur Domenech, lunĉon, kiu okazis en la sidejo de «Barcelona Stelo» la 24<sup>an</sup> de Julio kun ĉeesto de 60 gesamideanoj, kiuj volis montri al nia bona amiko sian estimon kaj simpatian.

La feston prezidis S-ro Domenech, al kiu esprimis sian gratulon S-roj Rey, en nomo de *Barcelona Stelo*, Serrat, de la K. E. F., Guinart kaj Pailez, de la *Respublikana societo* de la V<sup>a</sup> distrikto, Bordas de *Semo*, Renom de *Ĉiam Antaŭen*, Viñals, Iduarte de B. S., F-ino Rey en nomo de la fraŭlinoj kaj S-ro Grau, kiel sekretario de la Floraj Ludoj.

Al ĉiuj respondis S-ro Domenech per elokventa, sincera parolo, dankante ĉiujn. Balo finis la feston.

**TARRAGONA.** — La 11<sup>an</sup> aprilo okazis la solena malfermo de la esperanta Ekspozicio aranĝita de *Tarragono Esperanta* kaj de la ĵus naskita grupo *Tarragono Katolika* kun ĉeesto de lia Moŝto S-ro Arĥiepiskopo D-ro Antolin López Peláez, lia Urbestra Moŝto S-ro Prat, komitato de urbkonsilantoj konsistanta el S-roj Salvadó, Rimbau, Massó, Soler Cañellas kaj Solé Granell; Moŝto S-ro Provincestro, Moŝto S-ro Direktoro de la Normala Lernejo de Instruistoj kaj aliaj Aŭtoritatuloj, kaj ĉiuj fraŭlinoj kaj samideanoj de *T. E.* Post saluto kaj prezentado de ĉiuj gesamideanoj farita de S-ro Agustí, prezidanto de *T. E.*, Moŝto S-ro Arĥiepiskopo elparolis esperante la jenajn vortojn «Mi malfermas la Ekspozicion», kaj ĉiuj Aŭtoritatuloj vizitis ĝin gvidataj de ĉiuj geanoj de *T. E.* kaj *T. K.* kiuj tute afable klarigis al ili detale la demandojn faritajn pri Esperanto kaj la Ekspozicio, en kiu oni povis admiri belegan kolekton de kelkaj miloj de poŝtkartoj el ĉiuj nacioj kaj landoj de la mondo, redaktitaj esperante, libroj, broŝuroj, revuoj, gazetoj, fotografajoj k. t. p. En ĉefa loko oni vidis belan vitroŝrankon prezentitan de la firmo *León Ferraté e Hijos y Comp.*, fabrikantoj de la bongusta *Likvoro Esperanto*, kiu tiun tagon aperis unuafoje al la disvendado; S-ro Ferraté invitis S-ron Arĥiepiskopon, S-ron Urbestron, kaj ceteraj aŭtoritatuloj kiuj prezidas, trinki ĝin, kion ili faris plezurege post la lunĉo per kiu la organiza komitato regalis ilin.

Moŝto S-ro Arĥiepiskopo multe entuziasmiĝis pri Esperanto kaj multe laŭdis ĝin, demandante kelkajn sciigojn pri nia sankta kaj homarama afero kaj treege rekomendis ĝin al la katolikoj kaj fine promesis lerni ĝin kaj paroladi por Esperanto kaj ĝia internacia graveco en la Senato (Alta Hispana Ĉambro). Fotografisto impresis kliŝaĵon de la ĉeestantoj, kiuj finis la feston kantante «La Espero'n».

Tiu esperanta Ekspozicio estis tre grava kaj vizitata de niaj samurbanoj kaj ankaŭ de multnombraj samideanoj de aliaj urboj; inter ili ni rememoras: S-ro Rosals kaj edzino el Barcelono; Pastro Joan Ortega S. J. el la Observejo de l' Ebro; S-ro Pau Llopart Galimany, Sekretario de la Urbeŝtaro de Querol; Pastro Josep M.<sup>a</sup> Dalmau, Ĉef-paroĥestro de Falset; S-ro Manuel Monguió el grupo *Supren* de Barcelono; S-ro Ramón Sedó el Capsanes; kaj S-ro Joan Ferreté, Prezidanto de la Ekskursiva fako del «Centre de Lecturas» de Reus kaj multnombraj partoprenintoj de la III<sup>a</sup> Kataluna Ekskursiva Kongreso. La Ekspozicio estis fermita la 16<sup>da</sup> aprilo.

*Veturila blankkolora festo* (Coso blanco). — *Tarragono Esperanta* faris uzon el la okazo de la veturila blankkolora festo okazinta en tiu ĉi urbo la Paskan dimanĉon, por propagandi nian amatan idealon kaj tial prezentis belegan kaleŝon kun formo de rava korbo, tute konstruita per blankaj paperaj krizantemoj kaj ornamita de verdaj kvinpintaj floraj steloj. Tiu riĉa krizantema korbo estis okupita — kvazaŭ belega bonodora bukedo de brilaj kaj delikataj floroj — de niaj ĝentilaj kaj ĉarmaj esperantistinoj, Fraŭlinoj Pepita García, Teresa Balart, Lola kaj Filomena Sentís, Anita Gornals kaj Mercedes Dols.

La Juĝantaro donis al la kaleŝo prezentita de T. E. la duan premion kiu estas estiminda kaj arta objekto.

Nian plej koran gratulon al samideano S-ro Pau Huecas, aŭtoro de la projekto kaj al la Tarragonesperantanoj por la gajnita premio. *Korespondanto.\**

**MOLINS DE REI.** — La 26<sup>da</sup> de Aprilo de 1914, kelkaj anoj de «Juventud Católica» starigis ĉe tiu Societo (str. Sant Miquel, 14) esperantistan grupon nomatan *Stelanoj*. Kiel solenigon de la fondo de tiu grupo oni organizis ekskurson al ruiniĝinta kastelo Ciuró, al Santa Creu d'Olorde kaj al Vallvidrera. En Santa Creu, post la solena beno de la standardo de la grupo, faris belan paroladon la prezidanto, P-tro Narciso Pomés, kaj dum la ekskurso, gajigita per kantadoj de nia himno *La Espero*, oni disdonis diversajn propagandajn foliojn. Ni aŭguras al la nova grupo, kiu tiel lerte kaj entuziasme komencis semii en Molins de Rei, baldaŭan fruktoplenan rikoltadon.

**SABADELL.** — *Esperanta Semo*, kiel ĉiam laboradas nuntempe klarigante kurson de lingvo internacia, ĉiujn mardojn kaj vendredojn vespere.

S-ro Carles Valdeperas malnova ano de *Esperanta Semo*, al kiu oni ŝuldas plejparte la penetron de Esperanto en rondojn pure laboristajn el Sabadell, mortis.

Al liaj malĝojaj edzino kaj gefiloj ni esprimas niajn kondolencojn; bedaŭrante ankaŭ lian perdon nome de nia Federacio, kies li estis membro.

**RUBÍ.** — La 24<sup>aa</sup> de Majo la grupo *Esperanta Burĝono* ricevis la viziton de la grupo el Sabadell *Aplach Esperanta Grupo*, kiam tiu-ĉi revenis de sia ekskurso al Papiol. La 12<sup>aa</sup> de junio okazis ĝenerala kunveno en kiu oni pritraktis kaj unuanime aprobis la projekton pri la ŝanĝo de la sidejo de la grupo.

**BARBARÀ DEL VALLÈS : La katalunaj katolikaj esperantistoj.** — La 20<sup>aa</sup> de decembro, la *Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj* interkonsente kun la societoj *Esperanta Nesto* kaj *Katolika Stelo* organizis oficialan feston dediĉitan al Virgulino de l' Espero.

Ni tre bedaŭras, ke malsufiĉo de spaco malpermesas al ni raporti tiel amplekse, kiel ni dezirus, tiun gravan feston. Tamen ni ne povas lasi senmencie la ĉefajn partojn el ĝi konsistintajn el Solena Meso, majstre kantita de la Sabadell'a orkestro «Fatxendes», kun ĉeesto de la urbestro prezidento de la urbestro, dum kiu predikis per Esperanto, elokvente kaj majstre, P-tro Anĝelo Garriga, Arĥiparofiestro de Sabadell, malnova, preskaŭ nekonata esperantisto, kiu elmontris sin, lertega konanto de nia lingvo; el procesio ĉirkaŭ la preĝejo kun latinaj kaj esperantaj kantoj religiaj, el popolaj dancoj, el frata kumango kun ĉeesto de ĉirkaŭ 30 samideanoj kaj entuziasmaj tostoj, kaj el noktokunveno en sidejo de *Katolika Stelo* dum kiu oni plenumis programon de muzik-literatura festo, kun varmaj aplaudadoj de amasa ĉeestantaro.

**VICH.** — Ankaŭ la Vik'aj katolikaj esperantistoj festis kun granda sukceso, la 20<sup>aa</sup> de Decembro 1914, sian patroninon la Virgulinon de l' Espero.

Solena Meso en preĝejo Sant Felip Neri kun esperanta majstra prediko de D-ro Joaquim Coll, profesoro de Esperanto en la Barcelona Universitato, kaj literatura festo en societo «Círcol Literari» prezidita de portreto de D-ro L. L. Zamenhof, belguste ornamita per

branĉetoj de olivarbo estis la ĉefaj okazintaĵoj de tiu festo, kiu rezultis plena sukceso por esperantismo kaj por siaj organizintoj.

Unu el niaj redaktoroj revenis ĵus el Vilanova i Geltrú, kie li konferencis kun la kuraĝaj gesamideanoj de *Laboro Esperanta*. En la sekvonta numero ni donos detalojn pri la preparaj laboroj de la Kongreso.

Ni povas malfermi niajn esperojn al kuraĝiga optimismo.—K. E.

Lastaj sciigoj pri nia kara pioniro, S-ro Pujulà, estas tre bonaj. Li restis post lastaj bataloj senvunda kaj sana. Kun plezuro ni tion komunikas al niaj legantoj.



## El la esperantaj gazetoj

### MILITO!

Post la apero de nia lasta numero, eksplodis kvazaŭ el blua ĉielo la plej terura politika fulmotondro, kiun iam la mondo spertis. Tuta Eŭropo subite konvulsiiĝis pro milita agado, kiu nun ŝancelas la fundamenton mem de nia civilizacio, ne nur en la landoj, kie furioze bataladas la armeoj, sed ankaŭ en landoj malproksimaj de la milita scenejo. Priskribi la nedireblan mizeron de multaj milionoj el niaj samehomaj estaĵoj, ni nek devas, nek volas, nek povas. Ĉiuj legantoj scias, ke la tuta mondo ŝajne frenezas; ĉie regas sufero, teruro, malĝojo, multaloke eĉ la plej nigra malespero, kaj ruino.

Meze de la tumulto, ni kaptu laŭ nia povo kelkajn momentojn por racia pripensado. Ni serioze demandu al niaj animoj, kia spirita sintenado estas la plej konforma al la sana prudento de ni, kiuj en pli feliĉaj tempoj nin nomis Esperantistoj, kiuj ankoraŭ kuraĝas sopiri al la fina venko de la bono kaj la interhoma amo.

Unue ni devas memori, ke la popolo de tiu aŭ alia lando tute ne estas responda pri la malamikaj agoj de sia lando. Ankaŭ ne la soldato, kiu celas vin per pafilo aŭ trapikas vin per lanco, tion faras pro malamo: ni ĉiuj estas eroj de kruela, sensenta maŝino, la militarisma sistemo, kiu al neniu alportas ian veran bonon, sed kiu sennombrajn milionojn da bonanimaj kaj senkulpaĵaj homoj en ĉiuj landoj dispremas kaj ruinigas. Tiun abomenan maŝinon ni lasis kreski ĉirkaŭ ni en tempoj pacaĵ; kaj nun ĝi senkompatе disŝiras nin sendistinge, ĉu tiun sorton ni meritis aŭ ne. *Ĉiu individuo el ni estas iagrade responda pri la ekzisto de la nuna terura stato de aferoj.* Plej facile estus, por kvietigi niajn konsciencojn, diri, ke ni individue estas

nur viktimoj de malbenita sistemo, kaj kulpigi pri la peko kelkajn ambiciulojn. Tamen pli honeste, pli kuraĝe estos, ke ĉiu homo, kiu vere malamas la malbonon, humile konfesu, ke li mem estis ĝis nun konsentanto pri kondiĉoj, kiuj nepre devis kaŭzi la nunan ĉiebruantan krimegon, kaj ke li solene promesu al sia animo, ke tuj de nun li studos senantaŭjuĝe kaj senegoisme la verajn kaŭzojn, kiuj necesigis kaj subtenis la nunajn cirkonstancojn, kaj, trovinte la solvon, li aliĝos tutkore al ĉiu nacia aŭ internacia movado, kiu celas frakasi la kapon de tiu ĉi Moloho.

Pri difinitaj planoj diskuti ne devas Esperantista ĵurnalo. Kiel Esperantistoj nia devo nur estas propagandi lingvon, kiu verŝajne estas destinita kiel grava rimedo al la sopirata interkonsento kaj interkompreno tutmonda. Tamen kiel homoj prudentaj, ĉiu laŭ sia kapablo penadu ĉiam kaj ĉie helpi al ĉiu influo tendencanta al la mortigo de militado, al amo je ĉio aminda al malamo kontraŭ malameco ĉiaspeca.

*The British Esperantist*, Septembro 1914

## LA MILITO

Milito, terura milito de l' popoloj, eksplodis tra la mondo kaj ekskuis la tutan terglobon. La principoj, testamentitaj de kristanismo kaj humanismo, la alta idearo de la moderna kulturo. — ĉio estas forgesita kaj nur la tintado de l' mortigiloj estas aŭdata. Oni jam detruis Lieĝon, Luvenon kaj ruinigo minacis al la mondurbo Parizo. La centroj de nia civilizacio ruiniĝas.

Tamen kun hela espero rigardu ni la estontecon. La nuna milito, ĝi mem, abomenigos kaj senkapigos la hidron de l' militarismo. Ni esperu, ke ĝi nebligis la situacion, kiam unu regno stimulas la tutan mondon armigi kaj senĉese pretigi por la milito. Ni esperu, ke nova, pli natura, stato estos fiksita por longe. Paco konstanta, paco eterna, ni kreu, alvenos... Simile al infano, ĝi estas nun akuŝata kun doloroj.

Kaj nun? Nun ĉiu plenumu sian devon... La konscienco de l' rusaj samideanoj estas pura. Ne Ruslando deklaris la militon... Ruslando sin defendas. Sendanĝerigi sian ekzistadon, — jen estas la sola deziro.

Kaj nia Esperanto? Ĉu estas timeble, ke ĝi dronos en la maro de l' sango? Ne, certe ne! La nuna milito interalie montros, kiom necesa estas lingvo internacia por faciligi la rilatojn sub la standardo de Ruĝa Kruco ne sole kun la malamiko vundita, sed eĉ kun la soldato de armeo amika, batalanta flanko-ĉe-flanko.

Tre longe flui la sango ne povas. La milito estos likvidita kaj dum la Paco ekregonta sur la Tero nia ideo refloros kun la aliaj ideoj de l' civilizacio renovigita. — K.

*La Ondo de Esperanto*, Septembro 1914

Completament agens an aquesta qüestió, playent-nos de les enemistats entre *samideanoj*, i deixant-ne la responsabilitat a son autor, publiquem la següent lletra que no poguérem incloure en el passat número, per a complir l'oferiment fet a *Tarragono Esperanta*. Amb aquesta publicació entenem deixar cloca la discussió pública en nostres planes, i preguem als bons amics de Reus i Tarragona que procurin inspirar sos actes en un sà criteri esperantista, perquè sobre l'oblit dels mutus agravis puguin reprendre ses amicals relacions.—K. E.

Senyor Director de KATALUNA ESPERANTISTO. — Barcelona

Distingit senyor meu : Contestant a la carta que publicà el K. E. de maig últim, pàgines 79 i 80, firmada per E. Aguadé, i sols per a coneixement dels federats que no assistiren al Congrés de Sant Feliu, crec un deure manifestar:

1.<sup>a</sup> Que el Reglament que presentà *Tarragono Esperanta* sols era provisional, i amb ell constava que per a pertènixer a la Lliga no es pagaria quota.

2.<sup>a</sup> Que a la reunió de grups del dia 11 de janer hi assistiren representants de grups que no existeixen, lo que vareig provar en el Congrés.

3.<sup>a</sup> Que els de Reus acapararen els càrrecs de la Directiva de la per ells anomenada Lliga; i

4.<sup>a</sup> Que T. E. no hi està de fet adherida, puix que en aquella reunió el senyor Viñas, delegat de T. E., no va fer constar la seva aprovació firmant els estatuts ni cap acta en que es fés constar així; i fins suposant que el senyor Viñas hagués firmat estatuts i acta, com després s'ha demostrat que no existeixen ni han existit mai alguns dels grups allí representats (conforme vareig fer veure ben clarament en el Congrés de Sant Feliu, quedant-ne tot-hom plenament convenut), són, doncs, il·legals els acords presos.

Passem per alt lo de la perpetuïtat de tres càrrecs dels sis que en efecte es compon la suposada Lliga, lo que és contrari a l'esperit i finalitat de l'Esperanto.

El senyor Aguadé, després de tot lo ocorregut, tenia el deure precís d'assitir al Congrés de Sant Feliu, i per cap motiu podia faltar-hi ell o algú de Reus, i d'aquesta manera, haurien pogut contestar els càrrecs fonamentats que va fer-los-hi T. E. Com els de *Tarragono Esperanta* procuren sempre evitar escàndols, no han perdut el temps fent publicar articlets en cap periòdic com han fet els de Reus, i, únicament, publiquen la present en K. E. donant per acabada tota discussió, i ens alegrarem que la suposada Lliga progressi per al bé de l'Esperanto.

Mercès, senyor Director, i mani a son afectíssim s. s., q. l. e. l. m.

Per *Tarragono Esperanta*

Tarragona, 5 de juliol 1914

DOMENEC OBIOL

# KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

## KOMITATO

<i>Prezidanto</i>	. .	Gaietà BALSELLS.	. .	Barcelona
<i>Vicprezidanto</i>	. .	Gustau GALCERÀN	. .	Vilanova i Geltrú
<i>Sekretario.</i>	. .	Josep VENTURA	. .	Terrassa
<i>Vicsekretarioj</i>	. .	Josep BUYÉ . . . .	. .	Barcelona
		Lleonart RENOM	. .	Barcelona
<i>Kasisto</i>	. . . .	Joan PIFERRER	. .	Sabadell
<i>Administristo</i>	. .	Josep SERRAT	. . . .	Barcelona

---

---

La KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO  
disdonas senpage al siaj membroj la gazeton  
KATALUNA ESPERANTISTO. Jarkotizo  
kostas : Enlande, 3 pesetoj. Eksterlande, 2 Sm.  
Pli altaj kotizoj estas kun danko akceptataj

# Reglament de la Federació Catalana d'Esperantistes

*Article primer.* — Queda constituïda amb el nom de «Federació Catalana d'Esperantistes» la federació d'esperantistes en terres de llengua catalana.

*Art. segon.* — L'objecte de la «F. C. d'E.» es l'unió de tots els esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, per als fins de la representació aconsellada en la reunió general del V Congrés Internacional d'Esperanto a Barcelona, i per donar compliment a tots els acords i consells, que afectin als esperantistes en col·lectivitat, provinents dels Congressos Internacionals o dels nuclis directores de la llengua del Dr. L. L. Zamenhof.

*Art. tercer.* — Per al millor compliment de l'article anterior, la «F. C. d'E.» publicarà una revista gratis per als federats, l'organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior publicat pel cos de redacció i previa acceptació del Comitè Directiu.

*Art. quart.* — La «F. C. d'E.» consistirà únicament de membres individuals, que contribuirán al seu sosteniment amb la quota mínima de TRES ptes. anyals pagades per endavant.

No obstant, tota societat o grup podrà entrar a la «Federació» amb els mateixos drets i atribucions que'ls membres individuals i llurs membres podrán pagar les quotes per mensualitats. Per a aquest fi els Presidents s'entendrán amb el Caixer-administrador directament.

Els Presidents dels grups adherits formarán un Consell Consultiu de la «Federació», an el qual podrà dirigir-se el President de la mateixa per conèixer la seva opinió en els casos en que ho cregui convenient. El Consell informarà mensualment al Comitè de la «Federació», sobre afers esperantistes, fixant especial atenció es lo que fóra de desitjar per a la millor marca de la «Federació» i de la propaganda esperantista.

*Art. quint.* — La «F. C. d'E.» serà regida per un Comitè Directiu compost de President, Vice-president, Caixer-administrador de la revista, Vice-caixer-administrador, Secretari i Vice-secretari.

Aquest Comitè serà censor de la revista. El càrrec de Caixer-administrador serà permanent. El que'l desempeñi continuarà en el càrrec fins a ordre de la Junta que farà ratificar pel pròxim Congrés.

*Art. sisè.* — Els federats de cada localitat elegiran un delegat que tindrà a son càrrec: recollir les quotes dels federats, fer les comunicacions necessaries per als efectes de l'article segon i demés assumptes del règim de la «F. C. d'E.» i ésser l'intermediari entre'l Comitè Directiu i els seus representants.

Els delegats podrán retenir-se, si ho creuen convenient, en concepte de despeses, un 5 per 100 de les quotes que cobrin.

*Art. setè.* — El Comitè de la «F. C. d'E.» cridarà almenys una vegada l'any, en diferent localitat, durant la primavera i en dia festiu, a tots els seus federats, en Assemblea o Congrés general, en el qual, previa ordre del dia, se donarà compte als assistents dels treballs i gestions fets pel referit Comitè Directiu durant son exercici, s'acordarà el lloc on hagi de celebrar-se el vinent Congrés o Assemblea, se nomenaràn els individus que hagin de formar el Comitè per al següent exercici, i es discutirán les proposicions que hagin sigut presentades abans de la sortida del número de la revista anunciant el Congrés o Assemblea, i incloses en l'ordre del dia.

*Art. vuitè.* — El Comitè estarà facultat per crear les seccions que cregui més convenientes per a la prosperitat de la «F. C. d'E.» i de l'Esperanto; les Juntes de les quals serán resoludes per cada Comitè entrant.

Serà President nat de cada secció un individu del Comitè designat per aquest.

*Art. nouè.* — Tots els acords de les Assemblees i Congressos serán presos per majoria absoluta de vots dels socis assistents.

*Art. desè.* — Les esmenes que vulguin fer-se en aquest Reglament haurán de presentar-se en temps convenient per ésser incloses a l'ordre del dia i publicades en llur totalitat, car únicament podrán ésser discutides i aprovades en les Assemblees o Congressos generals.

*Art. onze.* — La llengua oficial serà l'Esperanto, podent ésser usada la catalana en les Assemblees.

*Art. dotzè.* — En cas de dissolució previ acord de la «F. C. d'E.», els fons existents, o que resultin de la liquidació, passarán a la «Centra Oficejo», domiciliada a París, per a la propagació de l'Esperanto.

*Article transitori.* — La «F. C. d'E.» serà domiciliada a Sabadell, carrer de Gracia, 12.

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA PRESORGANO

DE LA



JARO VI<sup>a</sup> : MARTO-APRILLO 1915

3-4

## REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO DE "KATALUNA ESPERANTISTO"

ARIBAU, 55 : BARCELONA

<i>Direktoro.</i>	FRED. PUJULÀ
<i>Redakcia sekretario</i>	JOSEP GRAU
<i>Redaktoroj</i>	ESTANISLAU PELLICER JOSEP VENTURA ARTUR DOMENECH
<i>Administristo</i>	JOSEP SERRAT
<i>Administracia sekretario</i>	JOAN AMADES

### KUNLABORANTOJ

Manuel BORDAS (Barcelona). — D-ro Jascinto BREMÓN (Barcelona). — D-ro Joaquim COLL (Barcelona). — Delfi DALMAU (Bahía Blanca. Rep. Argentina). — Josep DOMENECH (Girona). — Gustau GALCERÁN (Vilanova i Geltrú). — A. NOVEJARQUE (Valencia). — Joan ROSALS (Barcelona). — Eulalia ROSELL, Teresa ROSELL (Vilanova i Geltrú).

### KORESPONDANTOJ

B. Nogué (*Manlleu*). — E. Aguadé (*Reus*). — P. Solanas (*Rubi*). — P. Costa (*Santa Coloma de Farnés*). — J. Vidal (*Tarragona*). — M. Solà (*Terrassa*). — E. Guitart (*Vendrell*). — J. Albagés (*Vich*).



Nia devizo: *Maro estas gularo*

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA  
**Katalana Esperantista Federacio**

Asocia sidejo de la E. E. F.: Rambla, 41 : Sabadell (Katalunujo)  
Redakcio kaj Administracio de E. E.: Arribas, 55 : Barcelona

## Neŭtrala

**F**EBRUARA numero de «Esperanto» entenas artikolon de S-ro Cart, kiun ni kun surprizo legis. Li pritraktas per ĝi iun el la aferoj, kiuj dum bedaŭrinde tre longa tempo apartigis nian samideanaron per malplaĉa, senutila lukto. Ni bedaŭras, ke li tion faris. La afero pri internacia organizado de la esperantistoj, nesolvita malgraŭ amaso de artikoloj kaj eĉ broŝuroj, estas diskutebla nur kiam ĉiuj samideanoj povos ĝin diskuti. En la nuna momento, kiam la plej multaj el niaj samcelanoj ne povas atenti al la diskutado, estas danĝere retuŝi eĉ flanke tiun demandon, kiel faras S-ro Cart.

«Esperable estas, ke nun, dank' al la severa, maldolĉa leciono de la milito, ĉiuj komprenos, ke, se ni volas havi ian komunan esperantistan Centrejon, tiu ĉi povas ekzisti nur en neŭtrala lando», jen kia estas la resume de la aludita artikolo, je kiu ni ne estas konformaj. La forto de la argumentado de S-ro Cart kuŝas nur en la vorto *neŭtrala*; ĉu post la tempo kiam montriĝis, ke *neceseco rajtigas por rompo de traktatoj*, ni povas ankoraŭ kredi pri *neŭtralaj* landoj? Ĉu Belgujo ne estus konsiderita kiel tia, se oni estus intencinta antaŭ la milito starigi en ĝi tiun Centrejon preparolitan? Ĉu Svisujo, en kiu, laŭ opinio de S-ro Cart, devas resti la Centrejo, estos ĉiam neŭtrala? Kio tion kredigas? Se en la cirkonstancoj hodiaŭaj estas necese, ke Genevo plenumu la rolon de centro de esperantismo, bone ke ĝi tion faru, kun

danko ni ĉiuj tion vidos; sed de tio ĝis proponi, ke ĝi restu definitive kiel Centrejo, estas granda diferenco, des pli multe ĉar ekzistas alia centrejo, la pariza Esperantista Centra Oficejo, kiu bone plenumis la rolon de tia. Ĉu oni — aŭ S-ro Cart — ne povos prokrasti sian inviton, kvietigi sian energiecon konsideri la Oficejon de U. E. A. kiel centrejon de la tuta Esperantistaro, *almenaŭ* ĝis tiu tempo, kiam la esperantistoj sin trovos en la povo libere juĝi pri tio?

Ni kredas, ke la solvo ne tiel urĝas, ke ni estu devigataj alpreni ĝin jam nun. Ni supozas — la Komitato de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO kaj la Redakcio de ĝia presorgano — ke je nia peto «Esperanto» ne plu tuŝos tiun demandon de la internacia organizado, *almenaŭ* ĝis kiam la esperantistaro de l' militantaj nacioj povos konscii pri ĝi. Se tio ne okazos, ni plej energie protestos, kaj ni estos inklinaj kredi, ke se ne jaluzeco, ĉemo konduki al sia muelejo la ĉies akvono, inspiras la agadon de kelkaj pioniroj.

Ni tre ĝojus, ke ni ne devus perdi nian tempon kaj malŝpari niajn fortojn per diskutado, kiam la malfortikeco de nia movado postulas de ni ĉiun oferon, speciale tiun je niaj vidpunktoj, kiuj povas ĝeni la harmonion inter ĉiuj samideanoj. Tial ni mallonge parolas.

JOSEF GRAU



En la proksima numero aperos leginda recenzo de

S-RO FRED. PUJULÀ pri

**A DÈLE KAMM**

de PAUL SEIPPEL

Traduco esperanta de RENÉ DE SAUSSURE



## Epizodo de Magdaleno

### AMIKINO DE BELTALIULINO

**N**UN venas la festo de la Virgulino de Aŭgusto, kaj tiam la tuta tero estas matura. Magdaleno, pretigu vian korpon por dancadi, ĉar la tempoj estas ankaŭ maturaj, kaj de la branĉo de la estonto, falos rekte mezen de la rondo de via danco, tiu orita frukto plena el parfumoj, kiun vi nomas fianĉo.

Fianĉo estas la plena heleco de la ĉieloj fariĝinta rigardo, kaj la plena senco de la mondo fariĝinta lipharo. Fianĉo estas io forta kiel la vino, kaj dolĉa kiel la sukera kuko, kiun oni vendas en la butikoj. Fianĉo venas, rigardas, diras malgrandan vorton nur, kaj jam la tuta via eta vivo fariĝas dependa kaj tremanta, kiel araneaĵo en arbaro subtenata nur per unu branĉo, kaj pri kiu ni ne scias ĉu ĝi restos tie ankoraŭ post minuto. Fianĉo estas iu, kiu dancas, sed ne multe. Li venis por la festo kaj neniu el la vilaĝo estis lin vidinta ankoraŭ. Li venis tute sola, per veturilo, kun valizo el felo kaj nikelo kie estas gravuritaj liaj komencaj nomliteroj. Li estas amiko de junuloj, kiujn vi ja certe konas. Kaj unue ŝajnas ke li iras kun ili ĉien, ŝerci kaj moki pri tio kaj alia. Vi, knabinoj, lin ekvidis pasantan, kaj oni ne scias kiu rakontis al la aliaj la mirindan historion. Li estas nomita *Pons i Serra*<sup>1</sup> li estas nomita *Ignasi de Fuster*, li estas nomita *Solé i Solà*, aŭ li estas nomita simple *Ludoviko*. La literoj de tiuj nomoj ŝajnas skribitaj per diamantoj rozaj, sur juvelo el kosta plateno, aŭ desegnitaj ĉe la nokto per raketoj, steloj kaj helaj artfajraĵoj. Mankas al li unu jaro por fini la karieron. Kiam mankas unu jaro por fini la karieron, la vivo larĝiĝas antaŭ la okuloj kvazaŭ diorama en vasta amfiteatro. Suno el oro brilas sur la frunto de junulo, al kiu mankas unu jaro por esti el la Fakultato, kiu tinkturas al li el ruĝkoloro eĉ la subon de l'oreloj. Lia sango kuras triumfanta, sed kun perfekta reguleco. Li povas eniri, rigardi ĉirkaŭen, eksidi kaj suprenigi antaŭ la eksido la du kanalojn de sia pantalono. Li surportas sur la blanka ŝuo ŝtrumpetojn violkolorajn, kun nigraj floroj, kaj rigardi ilin estas io netrankviliĝanta, kiel peko. Ankaŭ li surportas ĉe la butontruo floron, eble dona-

1. Vulgaraĵ nomoj. (R. de l' T.)

citan de virino. Li eltiras jurnalon el sia poŝo, bruligas cigaredon, kaj tiel povus pasigi horojn kaj horojn, fumante kaj legante sed, jen, subite lia destino lin puŝas. Li stariĝas, akompanata de siaj amikoj, kaj ekiras al vi, fraŭlino. Li haltas, povus residiĝi, povus preni alian vojon. Sed ne; iras antaŭen, antaŭen, antaŭeniras al vi, antaŭen iras ĝis vi. Kaj nun liaj amikoj diras al vi lian nomon kaj nun estas neokupita seĝo apud vi. Jen li sidiĝas, kaj vi demandas lin, tuta tremante, ĉu estas tiu ĉi la unua fojo, ke li estis tie ĉi.

Brilu astroj de l' ĉielo, brilu helegaj lampoj de l' dancejo : skuiĝu ventumiloj, kvazaŭ la aplaŭdoj de amaso : odoru pli forte, bukedoj pretigitaj sur la tablo por la *Danco de Floroj!* La junulo sidadas apud vi, kaj li ne foriras, ĉiam parolanta. Vi ne bone scias, kiamaniere via ventumilo estas nun en lia mano, li ventumas sin kaj vi sentas kiel de li al vi alvenas viaodoro. Kaj vi ekdivenas, ke same kiel li fariĝis mastro de viaodoro, li fariĝis mastro de via tuta vivo. Kiam li estas dancinta kun vi, neniu alia invitas vin al danco, alproksimiĝas. Nun vi fermas la okulojn kaj pensas, ke staras kontraŭ vi ĉiuj viroj kaj virinoj, kaj ke vi riskas danĝeron kaj estas li via defendanto; via patro kaj patrino ĵus mortis kaj vi ne havas timon, ĉar li estas kun vi. Fianĉo altiras ĉiun forton kaj disponas je ĉiu forto. Fianĉo estas la propra espero parolanta apud la orelo kaj li havas du brakojn ekster vi. Li estas la ĝojo de la sango, kaj la sorĉisto havanta la ŝlosilon de ĉiu printempo kaj somero venontaj. La fianĉoj al kiuj mankas unu jaro por fini la karieron, povas edziĝi post du jaroj. Dume ili donas ĉiutage novan certajon kiel plia kuseno. Kaj oni estas feliĉa, oni estas fiera, oni estas distrita kaj revema, kaj oni pensas pri la bela ĉemizo, kiun oni devas ornamati, kaj pri la gajeco de la etaĝoj nove meblitaj, kie la spegulo-ŝrankoj povas surprizi ankoraŭ meze de l' mallumo, ĉe eniro en ĉambron nekonitan ankoraŭ, sed kiu ricevis jam la plej grandan sekreton de la vivo.

Nun estas la Virgulino de Aŭgusto, kiam la tuta tero estas matura. La Virgulino de Aŭgusto estas kiel bela arbo, kaj al la knabino dancanta ĉe sia piedo, ĝi lasas fali belan fianĉon, meze de la rondo de sia danco.

El *La Ben Plantada*, de XENIUS

Kun permeso de la aŭtoro tradukis D-ro JASCINTO BREMÓN

**Plendo'**DEVIZO : *Salix Babylonica*

Pluveroj falas! La funebra urno  
Kovriĝas per petaloj de viburno;  
Ĉio ploras.

La kliniĝanta branĉo de saliko  
Tuŝetas, kiel manoj de amiko;  
Ĝi honoras.

El la printempa tero lekanteto  
Trunketon sian levas kun rideto  
Kaj ekfloras;

Sed mi, pri feliĉeco jam pasinta,  
Kaj pri la Amo de la kor' mortinta  
Rememoras!

CLARENCE BICKNELL

---

1: Premiita en la IV<sup>a</sup> Literatura Konkursu de la K. E. F.

La KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO  
disdonas senpage al siaj membroj la gazeton  
KATALUNA ESPERANTISTO. Jarkotizo  
kostas : Enlande, 3 pesetoj. Eksterlande, 2 Sm.  
Pli altaj kotizoj estas kun danko akceptataj

VI<sup>a</sup> Kongreso de la K. E. F.

**E**N la fino de l' somero, kiam la organizantoj de la Kongreso devis entrepreni sian taskon, la Komitato de la K. E. F. ricevis de la esperantistoj de Vilanova i Geltrú leteron, per kiu ili esprimis sian opinion pri la nekonveneco okazigi la Kongreson, atentinte al la nebona ĝenerala situacio en la tuta lando kaj speciale en la kongresurbo. La Komitato, same opiniante, decidis prokrasti la Kongreson ĝis pli oportuna tempo.

Tagon post tago, de tie kaj de aliloke, venis poste sciigoj, ke la materia situacio ŝajne pliboniĝas kaj ke la premanta nebulo de pesimismo, kiu kovris ĉiun koron, komencas disŝirigi: la gefederacianoj ekdeziras repreni la esperantistan agadon, kaj pensas jam pri nia Kongreso. Jen la kaŭzo, kial la Komitato de la K. E. F. decidante singardeme konduki la aferon, sendis al Vilanova i Geltrú rajtigitan delegiton (unu el niaj redaktoroj), kiu interkonsentis kun la entuziasmaj kun-KEF-anoj pri organizo kaj okazigo de nia jara festo.

La Kongreso verŝajne povos nur okazi en Oktobro, pro diversaj kaŭzoj: kelkaj ĝeneralaj — bezono de tempo por propagando, pretigo de la kongresaj festoj, organizo de ekspozicio, preparo de la Floraj Ludoj, k. s.; aliaj specialaj — kutimoj en la urbo de l' Kongreso, k. t. p. En tiu monato ne kunestas du festotagoj, kio povos malhelpi, sed la Organiza Komitato solvis bone la aferon, aranĝante ĝin tiamaniere ke ĉio havos lokon kiel kutime. Pri tio ni donos klarigojn per nia venonta numero: ni povas hodiaŭ antaŭsciigi, ke dum la Kongreso okazos koncerto kaj balo, propaganda ekspozicio ĉe Ateneo, kiu eble speciale regalos la kongresanojn, Floraj Ludoj, vizitoj, k. t. p., k. t. p. Jam nun la salonoj, kie la diversaj festoj okazos, estas afable ceditaj al la Organiza Komitato, kaj ĉiuj asocioj en Vilanova promesis sian helpon al la Kongreso, kiun ili deziras plej sukcesplena.

Tiuj sciigoj certigas niajn amikojn, ke nia VI<sup>a</sup> estos tute simila al siaj antaŭuloj, kion aliparte esperigas la nomoj de la organizaj komitatanoj, kiuj akceptis jene la oficojn. *Prezidanto*: S-ro Josep Escofet; *vicprezidanto*: S-ro Francisco Suñé; *sekretario*: S-ro Gustau Galcerán; *vicsekretario*: S-ro Daniel Martí; *financisto*: S-ro Magi Soler; *gemembroj*: F-inoj Teresa Rosell, Eulalia Rosell; S-roj Manuel Más, Laureà Codina, Jaume Fort, Pere Pascual. Komisionoj por logado, ekskursoj, progando, k. c. estas elektotaj.

Por fini ni vokas: pretigu vian ĉeeston, amikoj! La VI<sup>a</sup> Kongreso de la K. E. F. hele okazos!

## V<sup>al</sup> Floraj Ludoj de la Kataluna Esperantista Federacio

La esperantistajn verkistojn la Komitato de la V<sup>al</sup> Floraj Ludoj salutas kaj invitas partopreni en la Konkurso laŭ la jenaj reguloj.

### ORDINARAJ TEMOJ

#### Originalaj tekstoj

- I. Al la plej bona originala versaĵo kantanta je *Amo*,
  - II. Al la plej bona originala *am*a verko en prozo,
- estos aljuĝataj premioj, konsistantaj el bela diplomo kaj unu ekzemplero de la arte ilustrita verko *Roda el món i torna al Born*.

#### Tradukitaj tekstoj

Bela diplomo kaj unu ekzemplero de la monumenta eldono de la fama kataluna poemo *L'Atlàntida* estos aljuĝataj al la aŭtoroj

- I. De la plej bona traduko de la jena versaĵo:

#### EL RELLOTGE DE SOL

Les hores tenebroses,  
les hores embolrades  
són només pels humans : per tu és el dia,  
i del dia les hores solejades,  
les hores triomfals i lluminoses  
en que esclata exultant la Poesia.

La pedra des d'on cantes, l'han colrada  
l'arna del temps que res del món detura,  
la pluja i la ventada,  
els raixims del cap-vespre i de l'aubada.  
Fins veure-hi se'm figura,

fressejant en ta rústiga patina,  
 cremors acariciants, rojors confoses  
 de perfums i alenades xardoroses,  
 de frescs d'ala d'auccell i de boirina,  
 de tot lo que en ton viure et petoneja  
 i a petons te consum!... I al veure't ara  
 mut sota el núvol que ton front ombreja,  
 m'ets consemblant : té humanitat ta cara.

M'ets consemblant i et beso  
 d'aquí baix amb els ulls... Foscors de pena  
 hi ha en ta color marcida...

Mes tens la noble excelsitut serena  
 de l'ànima escollida,  
 d'esquisitats feisosa,  
 que viu a quatre vents la vida plena  
 reclosa en son sagrari, i desdenyosa  
 de l'hora esmortuïda,  
 de l'hora que no canta lluminosa  
 amb la llengua de foc que encén la vida!  
 Allavors triumpfes! Allavors  
 t'enlaïres com un símbol! Ta sageta  
 sorgeix de l'ombra assenyalant les hores  
 amb geste imperatiu de ratlla dreta,  
 i somriu i flameges i t'arbores  
 de cara al sol, mentres ton ferro canta  
 la paraula de llum, la gran, la santa,  
 la paraula feconda del Poeta!

De tes rojors cremantes,  
 del verdejar de tes negres confoses,  
 el sol ne treu vellums de gemmes foscs  
 al gresol de besades fumejantes...  
 I així enjoiat, gloriosament, dius l'hora  
 digna d'èsser cantada!...

la que la nit enyora,  
 la que l'esprit daleix, la somniada  
 com expressió vivent, vibrant, palpable  
 d'aquella altra!... de l'hora beneïda  
 en que un sol de Bellesa encén la vida  
 i li ensenya a parlar de lo Inefable!

MAGÍ MORERA I GALICIA

La eminenta poeto afable permesis la tradukon.

## II. De la plej bona traduko de la jena prozaĵo:

## AGONIA

— Jo, en els meus temps de xicot, n'havia conegut un, de metge, que ho curava tot. Mai havia deixat morir cap malalt. Ell ara fos aci, pobra Carmeta! Prou n'eixiria, d'aquesta! Mes ara raí, és mort: poc li vaga de dur el consol a les families, com solia! Si l'haguésseu vist davant per davant d'un malalt, de qualsevol llei de mal que fos, ell pla s'hi encaparrava! Se fumia an el capçal del llit amb el dit a la rumiadora, i, rumia que ruminarás, escorcollava d'ací d'allà per dintre el front tota la ciencia, i al cap de poca estona se treia una llapidera llarga de la butxaca, i haguéreu vist com escrivia depressa... depressa...

— Sí que en devia saber!

— De tot sabia. Això sí: tot lo que tenia de lletra li mancava de paraula. Era eixat com la mula que se'm va morir per Pasquïetes, que feia, feia i res deia. Dones ell, escriu que t'escriu, però d'una mena de manera que tu, que has anat a estudi, noi Guiu, poc hi hagueres entès gota, perquè tot escrit de la seva mà, tras, tras, com qui no fes res, era fet exprés per a ésser llegit per l'apotecari i per ningú més. Ho tens entès?

— Poc e dic res, home!

— Dones quan el remei havia arribat a la casa, ja podieu dir que era oli en un llum: el malalt curat. Mes ell, per a lo que era més entès, era per a curar les malalties de cap.

— La migranya, potser?

— Fuig, home! Sempre serás el mateix, estimba-matxos! Vull dir els que están tocats del mal de la bogeria, que tots n'hem conegut: els *locus*, vatja! Ell agafava a l'infeliç que patia de rampells o de llunes, que pel cas tot es ú, encara que fos un dels que están apoderats d'aquella mena de manies que no es poden aguantar a les cases; l'agafava, veu 'lic, se'l posava, apretant-li fort el cap, entre els genolls, se treia uns ganivets i estisores, i haguéreu vist que li aixecava la closca, butxaquejava un xic per dintre, tornava a tancar, cosia la pell, cop de benes, unguents i desfiles, vuit dies de llit, i a treballar al terço, curat per tota la vida sempre més.

Tots quatre traginers s'anaven acostant ells amb ells com per a comunicar-se escalfor. El fanal que penjava del sostre donava una llum esmortuïda, poblant la gran quadra d'ombres extravagants. Damunt la taula, el joc de cartes, que ni s'havia tocat, i al voltant s'hi estaven els homes embolicats amb llurs mantes amb tot i el baf de l'establa. Afóra nevava, i el fret semblava traspuar per les parets. Els quatre homes no trobaven gust aquella nit en estar callats i ajagats, i enraonaven, enraonaven, com volent matar més depressa unes hores llargues de passar. La noia de l'hostaler s'estava acabant per moments; i si els homes s'ensopegaven a callar una estona, s'adonaven més dels sorolls del bestiar, els cops de pots o el mastegar d'algún cavall; instintivament escoltaven ben fi i els semblava que sentien el caure flonjo dels berrallons de neu afóra,

i adintre la casa, aldamunt, l'anar i venir de passes, i, parant ment, algú arribava a percebre el bleix seguit i anguniós de la que poques setmanes abans era galán noia i que ara sols per un fil s'arrapava a la vida. En les estones de quietut, més d'un mirava a la porta esperant veure comparèixer l'hostaler d'un instant a l'altre dient-los, sense passar el llindar, que tot s'havia acabat.

Per això tots procuraven que els silencis fossin ben curts i es posaven a conversar; però no els acudien sinó coses de malalties i desgracies.

— I com va ésser que va morir aquest gran metge?

— No ho sé pas ben bé del cert, perquè jo, per coses que no n'heu de fer res, vaig deixar de córrer aquell país. Però sé ben del cert que anava pel camí de patir del mateix mal que curava. Me recorda prou que un dia, anant jo d'Amer a Santa Pau (prou ho havia sentit a dir, mes poc ho crevia), vaig ésser present a la cosa més estranya que mai som vist. Anava, donses, com vos dic, de Amer a Santa Pau, i feia una nit no gaire millor que aqueixa; a una casa de les Ansies tenia contractats uns garrins i dues saques de trumfes (me recorda com si fos ara, i això que han passat un feix d'anys), quan a l'endinsar-me amb els matxos en el bosc me veig l'euga normanda del metge estacada a un suro, amb aquella planta que tenia, que prou la vaig endevinar; la tenia tant presenta a la memoria, que l'haguera coneguda anc que fos en mig de la fira de Sant Miquel. M'atúruc, m'atúruc, i em veig al davant al metge, que es rebotia per terra i s'estellava el cap contra les aulines, talment que aparentava un esperitat. Jo, de veure un home tant sabent d'aquella conformació, me feia com una pena... Mes encara vaig gosar-li dir : «—¡Què redimontri fa aquí, senyor metge? Que no veu que s'esberlarà el cap!» I ell aleshores va parar en sec de fer coses estranyes, va mirar-me amb ulls tristos que feien respecte i que jo mateix, que aleshores era jove i fadrí, sentia mitja por; me va semblar com que'm malmirés per haver-lo destorbat d'alguna feina que an ell li vingués a gust; i, encara com si el sentís, «—Ah, Bieló!—me va dir.—Si aixís com obro el dels altres pogués obrir-me el meu, de cap, per a saber què hi tinc adins que em dona tant martiri!»

El vell va parar una estoná, fins que va saltar en Llebre, un traginer de mitja edat.

— Vatja, Bieló : sou un home d'experiencia; però no en crec gaire res de lo que heu dit. Jo no hi estic per metges. Veieu? Bé en deuen haver pujat més d'un parell a veure la Carmeta. Jo estic més pel saludador que hi ha a Girona, que no hi ha res que no endevini i que ha fet unes cures... bony!... que cap metge pot posar-se-li a la sola de la sabata.

— Calma, calma, Llebre! Sempre seràs més animal que els que tu menes. No és hora de picar a la taula ni de moure fressa.

— Doncs, alt o baix, us dic que jo no hi estic; i, si ho dic, ja sé el per què,—dela en Llebre amb posat de toçut. — També en som tingut jo a casa, de metges, i mai he vist que estessin segurs de lo que han de fer : per això els diuen *diabós*, perquè sempre dubten.

— I que n'ets de moçol! Té raó : ja ho som sentit a dir. ¿No era el metge de Castellfullit que et va fer menjar paper?

— I ben nèt! Qualsevol s'hi podia trobar. Ell va dir, la dòna també hi era,

que me receptaria uns paperets. I, doncs, què havia de fer? Quan van venir de cà l'apotecari, la dòna me'ls dòna i jo me'ls menjo. No diu que s'ha de fer tot lo que manen? Però, val dir-ho, amb tot i que eren ben plegadets, prebony, que costaven d'empassar! Sort que la dòna m'anava donant brou, i patint van poder devallar fins a la panxa. L'altre dia que ve el metge, quan jo em queixava de que la medecina seva no feia de bon pendre, ell riu que riu, i s'ha cuidat d'esbombar-ho per tot el poble, jo ho sé! I, doncs, què havia de fer? De llavors ençà que no en vull aconductar cap més, de metge.

— Ni per a la dòna tampoc? I com la tens la dòna, Lliebre? Com li va aquell mal d'ulls? Ja és ben lletja, com hei ha món, la teva dòna!

— Sempre li van saquejant els ulls, sobretot l'esquerre, tant que jo li dic que potser se li podreix un quelcom adins del cap, i ella encara s'enfada més.

— I que n'ets de beneit!

— Vatja, vatja, no tant com molts altres! Ja ho dieu massa sovint això, Bieló. Jo us puc ben assegurar que si la dòna se'm morís, que Déu o el diable se me l'emportés, no m'hi amolnaria tant com l'hostaler amb lo de sa filla. Ja us juro que no fóra tant ximple!

Els altres reien i felen callar an en Lliebre, perquè no era per comparar la seva dòna, tant lletja, amb la Carmeta, tant jove, agradosa i maca.

Va obrir-se la porta del catrer, i, al mateix temps que una ratxa de fret, va entrar un jove ben plantat, que tot seriós va espolsar-se la neu de la manta i de la barretina, i amb terratrèmol d'esclips va acostar-se an els traginers, preguntant:

— Com segueix?

— Noí, malament; es qüestió d'hores, sembla. Ja m'ho havien dit l'altre camí que tu li duies afició a la Carmeta. A fe que, per lo que havia esbrinat, ella també et portava llel.

— Portava, ja dieu.

I el jove va quedar-se mut i formal, apoiat amb un colze en un cantó de la taula.

En Lliebre va trencar el silenci:

— Quina nit! Ni pelç llops!

— Llops, dius? Potser no n'has vist cap, tu que en parles.

— No som trobat mai el llop, però air vaig trobar una serp que em va fer mitja basarda. No era gaire lluny del bosc de cà Tey, que de sobte se'm va presentar tant grossa com era, gruixuda com la cuixa. Li anava a etgegar un cop de vara, però...

Un que no havia encara badat boca va fer:

— Si tant gruixuda era, no podia ésser altra que la del lliri groc. No tens un lliri groc aci al cap?

•

L'hostaler en persona va presentar-se al llindar de la porta interior. Era la visió que els homes esperaven que apareixeria d'un moment a l'altre. Sense moure's del marc de la porta va dir:

— Tot s'ha acabat!

Ni escoltant bé ja no se sentia el bleix de l'agonitzant. Afèra nevava més i més ferm, amb perfidiosa constancia; la neu s'anava apilotant en els carrers, que semblava que s'inflessin, com volent emmurallar l'antic hostal, on acabava de finir la noia fresca i alegra que cridava a tot vianant.

Els quatre traginers varen posar-se drets, i el jove, seriós i contrariat, sense que una paraula li acudís als llavis, condensant tota l'ànima en un gesto, se va llevar la barretina i la va rebotre per terra.

JAUME MASSÓ TORRENTS

La konata verkisto volonte konsentis la tradukon.

Inspiron al ĉiuj por la ĝloro de nia Literaturo!

D-ro JOSEP CASANOVAS. — GUSTAU GALCERÁN. — ESTANISLAU PELLICER. — JOSEP ROSSELLÓ. — ALFONS SABADELL. — JOSEP VENTURA.

Barcelona, Marto 1915<sup>a</sup>

## NOTOJ

- I. Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar premiitaj verkoj la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti Reĝinon de la Festo.
- II. La Festo de la V<sup>a</sup> Floraj Ludoj okazos en Vilanova i Geltrú dum la VI<sup>a</sup> Kongreso de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO.
- III. Al la manuskriptoj, — kiuj devas esti ricevitaĵoj antaŭ la 20<sup>a</sup> de Aŭgusto 1915<sup>a</sup> en la administracio de la K. E. F. (S-ro Josep Serrat, str. Aribau 55, Barcelona) — oni devas aldoni devizon, kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomon kaj adreson de la verkinto.
- IV. Manuskriptoj ne estos resendataj, eĉ se ili alvenis post la datolimo por akcepto de verkoj.
- V. La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniu konkurso.
- VI. La Juĝintaro publikigos la verdikton per KATALUNA ESPERANTISTO kaj la barcelona gazetaro.
- VII. En la teksto de KATALUNA ESPERANTISTO aperadas listo de eksterordinaraj premioj kaj temoj.

## EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. De ATENEO DE VILANOVA I GELTRÚ : *Esperanta gvidlibro de Vilanova kaj ĉirkaŭaĵo, koncize kaj klare redaktita, taŭga por turismo*. PREMIO : 50 pesetoj (20 Sm.).
- II. De LABORO ESPERANTA (Vilanova i Geltrú) : *Bona traduko de la verko «A la lunas kaj de la ses unuaj strofoj de la versaĵo «La Independencia de la Poesias» de Manuel de Cabanyes*. PREMIO : 10 volumoj broŝuritaj el la verkaro de D-ro Zamenhof; aŭ 50 pesetoj, se al la tradukoj oni aldonas mallongan bibliografian kritikon pri la Poeto.
- III. De CENTRO DEMOCRÁTICO FEDERALISTA (Vilanova i Geltrú): *Bona traduko de la artikolo «El Sistema Federal» de Pi i Margall*. PREMIO : Artajo.

La tekstojn de la tradukotaj verkoj havigos, laŭ peto, al la verkistoj la Redakcio de KATALUNA ESPERANTISTO.

Aliaj temoj kaj premioj estas promesitaj; pri ili ni sciigos per venonta numero de K. E.



L'Administració agrairà moltíssim a tots els federats que li comuniquin immediatament qualsevol deficiencia que notin en l'organització, perquè sigui possible esmenar-la tot seguit.

Amb el mateix fi de perfeccionar el funcionament de l'Administració, es prega a tots els delegats que es prenguin la petita molestia de contestar com més aviat millor totes les comunicacions administratives, especialment l'última que se'ls ha enviat.

## Bohemaj gastoj inter la katalunaj esperantistoj

**N**IA «Dekas», preparita kun tiom da diligenteco, estas, bedaŭrinde, funebra kanto kompare al la solenaj festoj, kiujn prezentis al ni la antaŭaj kongresoj. Partropreninte preskaŭ ĉiujn, mi neniel volis cedi antaŭ la malhelpaĵoj, kiujn subite kreis la danĝera situacio en Aŭstrio.

Antaŭ fino de Julio, tuj kiam la mobilizo estis proklamita kaj kiam estis anoncote, ke la duan tagon estos forironta la lasta vagonaro kontraŭ okcidento, ne meditante longe, mi uzis tiun ĉi solan okazon por nepre atingi Parizon ĝustatempe. Post nelonga haltigo en Germanujo, kie oni tuj estis sin preparanta por mobilizado de la armeo, mi alvenis en Parizon unu tagon antaŭ malfermo de la kongreso. Sed el la kvar mil aliĝintoj apenaŭ dekono tie ĉeestis. La plejparto estis resendita de la landlimo, kaj kiu atingis Parizon, tuj revenis per la plej proksima vagonaro. Krom samideanoj el Britujo kaj Hispanujo oni preskaŭ ne renkontis alilandajn. Inter la gastoj admirantaj la zorge preparitan ekspozicion kaj la halon de Gaumont-palaco mi trovis grupeton da sep geamikoj bohemiaj, kiuj estis loĝintaj jam de pli longa tempo en Francujo. Ni decidigis — ne povinte plu trovi vagonaron, kiu transportus nin hejmen — resti en Parizo laŭ ebleco plej longe. Danke favorajn cirkonstancojn ni ricevis permeson loĝi tie pli longe ol unu monaton, ĝis tiu momento, kiam la germanaj aeroplanoj faris la vivon tie danĝera. Unu akcidento kaŭzita per germana bombo, kies atestantoj ni estis, rapidigis nian forveturon.

Ne estis malfacile elekti, kien ni forkuru : inter la malmultaj landoj, kiuj sin prezentis al ni, estis taŭga sole unu, Hispanujo; ĉi tien logis nin la suno kaj precipe la scio pri la vigla movado esperantista, kiu donis al mi kelke da amikoj jam ĉe okazo de la V Kongreso. Post pluaj kvar tagoj, dum kiuj ni klopodis ricevi veturbiletojn, ni fine sidigas en vagonaron — ni forlasas malrapide Francujon.<sup>1</sup>

Tri monatoj pasis jam de la momento, kiam traglitinte el sub la peza kodo de novaj militordonoj en Hispanujon, ni travivas libertempon devigan kaj ne tro multe fortostreĉantan. La lastaj impresoj

1. El manuskripto preparita por *Casopis Ĉeskych Esperantistů*.

kun kiuj ni estis forlasantaj Parizon, fiksiĝos por ĉiam en nian animon : apud ni en la vagono, ĉie en la stacidomoj, ĉie, kien ni rigardis — nur vunditoj. Dekoj da vagonaroj plenaj de ili preterveturis la nian dum la unua tago. Jen haltas unu sur flanka relvojo en la kamparo kaj tra lumitaj fenestroj ni vidas la senlacaĵn membrojn de la Ruĝa Kruco, kies sinoferemaj manoj klopodas mildigi dolorojn de la vunditoj; jen kortuŝanta bildo prezentigas al niaj okuloj sur ĉiuj peronoj : la atendejoj plenegaj de grave vunditaj, senmove kuŝantaj soldatoj, la trotuaroj okupitaj de sennombraj, pene treniĝantaj herooj de sia devo. Ilia difektita vestaĵo montras, kiom ili devis suferi; kaj iliaj okuloj, ho, la okuloj! Tiujn senbriligis la rigardo en vizaĝon de la Morto. Vane mi serĉis en ili reflekon de tiu entuziasmo, pri kiu ĉiam skribis la gazetoj. La propra vundo doloras plej multe kaj seninteresiĝas la homon. Neparolemaj, lacegaj, ili apatie sidis aŭ kuŝis sur la tero kaj nur iu el ili rakontis al rondeto de ĉirkaŭstarantoj la teruron, kies atestanto li estis. Kelkaj stacidomoj restis dum la alveturo de nia vagonaro fermitaj, atente gardataj; kaŝitaj antaŭ ĉies rigardo. Kaj mem en la plej sudaj urboj de Francujo, kie nenio memorigis pri la samtempa milito, la transportado de vunditoj ĉiam trudis al ni la penson pri krueleco de la devo — esti soldato.

Sidiĝinte en la hispanan vagonaron kaj ekaŭdinte muzikon, en kiu rebrilis gaja animo, ni forspiris libere — ni estis jam ekster danĝero esti kaptitaj kiel malamikoj. En la stacidomo de Barcelono nin salutis tie deĵoranta urba gvardiano, kiu sciante Esperanton, faris por ni interpretiston ĉe la serĉado de loĝejo. Tiu ĉi neatendita renkontiĝo pruvis al ni ke ni estas en urbo, kie nia helpa lingvo firme enradikiĝis. Kaj pri tio ni konvinkiĝis ankoraŭ multfoje.

La restado en Barcelono, kie nia konsulo etendis super ni flugilojn de la ŝtata aglo, kvanĉam tre agrabligita per amika akcepto ĉe samideanoj, estis pli longa ol ĝi meritis, konsiderante la manieron de nia definitiva loĝigo. Post unusemajna ĝuado de promenadoj kaj marbanado, nia karavano disiris : la konsulo resendis per vaporŝipo la kvar fraŭlinojn (instruistinojn<sup>1</sup>), kiuj post kelktaga marvojaĝo al Genova revenis sukcese hejmen en Bohemujon kaj Moravion. Baldaŭ post tio forlasis nin s-ro instruisto Hodek, malsaneta pro la malvarmo; kun kuracista atesto en la poŝo kaj doloroj en maleolo ankaŭ li revenis samvoje kaj ĝustatempe antaŭ malfermo de lernejo. La lasta, s-ro Eichler, kiu pasigis en Barcelono du monatojn, ne estis plu tiom

1. Fraŭlinoj Záhlická kaj Eichlerová el Pisek, Minariková kaj Yanašková el Bystrice-Host.

feliĉa : lia ŝipo, same kiel kelke da aliaj, provintaj transporti el Hispanujo vivan kontrabanton, estis sur la maro kaptita de franca krozŝipo kaj la pasaĝeroj, Aŭstrianoj kaj Germanoj, fariĝis sencere monie kaptitoj.

La restintaj du karavananoj, ne povinte reveni hejmen, ekloĝis do sur la germana ŝipo «Düsseldorf», kiu ankrostaris en la haveno. Neniu el la preskaŭ duonmilo da hoteloj, kiujn mi estis vizitinta iam dum la vojaĝoj, havis tiom da maloportunaĵoj, kiel tiu ĉi fiera giganto, taŭga bonege por transportadi el Aŭstralio barelojn, kestojn aŭ sakojn, sed samgrade maltaŭga por esti loĝego de du aŭ tri centoj da homoj. Ĉe granda plimulto de ili restos la bonfaranta Helpa Societo, zorginta pri ĉiuj alvenintoj, en memoro eterna; sed mi dubas, ĉu la societo sukcesis aĉeti per tiu unu peseto, elspezata por taga vivtenado de ĉiu zorgato, ankaŭ lian bonan opinion.

Specialan mencion meritas la ĉiutaga koncerto, kiu komenciĝis frumatene kaj daŭris ĝis vespero : kelke da laboristoj, provizitaj per pezaj marteloj, forfrapadis la ruston de sur la tuta fera surfaco de la ŝipo, longa 250 paŝojn! Kiam oni matene vin vekas per tia nervoŝira bruo, vi certe opinias esti ekdormintaj en la interno mem de vekhorloĝo. Oni ne tro aludu kvaliton de la pogrande kuirataj, regule ripetiĝantaj manĝaĵoj. Kiu neniam elmontris malkontenton, estis la fiŝoj; ili povus plej bone rakonti pri la kulinara sperteco de la kuiristo, se ili ne estus mutaj; sekve mi juras, ke lia arto nenie trovos laŭtan aprobon. En la miksospeca societo, kies anoj kunvenis el tuta Ameriko, Hispanujo kaj Portugalujo, oni povis almenaŭ fari studojn pri la verdire brutala konduto de la ŝipanoj, kiuj almontradis reciproke tre malmulte da kolega estimo. De tempo al tempo alternis la nombro de la siploĝantoj : kelkaj centoj da ili estis forekspeditaj, kiel mi pli supre diris — en la francan kaptitecon!!

Inter la kunloĝantoj de nia «naĝanta hotelo» mi trovis kun mia amiko Cimr novan boheman kunulon, s-ron H. Maras, kiu ellernis Esperanton dum nia pli malfrua komuna vojaĝado, ĉar tiam li havis pli ol sufiĉe da okazo vidi ĝian praktikan utilecon.

En Barcelono, kiun ni elektis kiel nian rifuĝejon, ni esperis trovi per helpo de Esperanto konsilantojn. Kaj vere : apenaŭ ni estis vizitintaj niajn amikojn konatajn de post la antaŭaj kongresoj, s-ojn Rosals kaj Sabadell, ni havis la plezuron trovi tuj dekojn da novaj, kiuj klopodis esti al ni ĉiel utilaj. Tiamaniere la restado en tiu ĉi bela apudmara urbo fariĝis por ni agrabla pasigo de tempo. La vetero estis en la komenco agrabla kaj ni faris ĉiutage promenojn : tra la vivoplenaj «Ramblas», en la parkon kun zoologia ĝardeno, al la marbanejo,

sur la montojn Monjuich kaj Tibidabo k. t. p. Speciale ni ŝatis la permeson vizitadi laŭplaĉe la kunvenejon de la societo *Espero Kataluna*. Ne estas bezone aldoni, ke ni uzadis la rajton plenmezure; la ofte aŭditan inviton «ĉi tie vi estas hejme» ni plenumadis do verŝence. Agrable estas trovi tian gastaman ĉambron, kie la esperanta legajo kaj la okazo renkonti ĉiam samideanojn memorigas en alta grado je amikoj en la hejma Esperanto-oficejo malgraŭ la mil-kilometra distanco.

Kelkafoje ni estis gastoj en la sidejo de societo *Paco kaj Amo*, alian fojon, kondukataj de s-ro Grau, kiu de la unua renkontiĝo elmontradis al ni sian danke uzatan servemon, ni vizitis lecionon en sidejo de *Barcelona Stelo*.

La tempo pasadis rapide, sed tamen ni povis ĝin profituzi plej oportune por vidi ĉion belan, kion Barcelona prezentas: kaj multe da rimarkindaĵoj ni vidis! Speciale mi citu la artiste ornamitan palacon de «Orfeo Català» kaj la salonojn de «Centre Excursionista», kiujn ni vizitis akompanate de S-ro Rosals.

Kiam ni trovis, ke nia restado en Hispanujo estos longa — la milito pli kaj pli komplikigadis — ni decidigis fari ekskurson tra Katalunujo. Ricevinte de S-ro Bremón rekomendan leteron, ni ekiris al Sabadell — nia unua haltejo. Apenaŭ ni vizitis la Esperanto-oficejon de S-ro Piferrer, tuj ni troviĝis ĉirkaŭitaj de aro da amikoj, kiuj invitis nin afable en siajn kunvenejojn. La unuan vesperon ni pasigis en la gastemaj ĉambroj de societoj *Semo* kaj *Aplech*. La duan tagon amike nin akceptis samideanoj en Terrassa, kies vasta kunveno estis ankoraŭ pli malfrue, celo de niaj vizitoj. Agrable ni estis surprizitaj de la rimarkinda kvanto da esperantaĵoj elmontrataj en la magazena fenestro de S-ro Casanovas: inter ili ni trovis multe da kartoj el Bohemujo, senditaj de niaj konatoj. Ni konvinkigis, ke nia nacio estas tre bone konata inter la katalunaj Esperantistoj.

Dum unu plua semajno ni ripozis en la monaĥejo de Montserrat, kies ĉirkaŭaĵoj ni multe ŝatis traŭradi pro ĝia vere mirbela rokaro. Ĉe revena vojaĝo al Barcelono ni haltis, akompanataj de amikoj el Terrassa, en Rubí ĉe S-ro Segarra, tie ni refoje havis la plezuron saluti multe da novaj samideanoj en ilia kunveno, kiuj nin tre afable akceptis. Fine, refoje akompanataj, ni vizitis la societon en Molins de Rey, kies prezidanto s-ro pastro Pomés ĉiel elmontris al ni sian servemon.

Nia rondvojaĝo tra Katalunujo havigis al ni multe da amikoj: gesinjoroj Torruella, Puig, Costa, Juliá, Ratés, Sola, Chaler, Oller, Ventura, Garriga kaj multe, multe de aliaj ofte estos de ni rememortaj.

Ne estas eble parkere skribi ĉiujn nomojn de amikoj, kies servoj donis al ni tiom da okazo konvinkiĝi pri la admirinda gastamo kataluna kaj pri la enradikiĝo de Esperanto en ilia lando. La ekskurso nin kontentigis tiom pli multe, ĉar en *ĉiuj* lokoj ni estis akceptitaj kun neatendita sincereco, kiu nin — mi devas diri — eĉ tiom surprizadis, ke ni ofte hezitis profiti la invitojn elkore prezentatajn. Ĉio vidinda, kio en alia okazo sendube restus de ni nerimarkita kaj eĉ nealirebla, estis antaŭ ni malfermita: jen fabrikoj, tie faka lernejo, artista kolekto, rimarkindaj konstruaĵoj, nacia amuzaĵo, k. t. p.

Kun tute novaj impresoj ni revenis en Barcelonon. La katalunaj samideanoj, kies perfekta scio de Esperanto pruvas ilian amon al la genia verko de Zamenhof, gajnis en ni amikojn, kiuj citos iliajn nomojn kaj la organizon kiel modelon ĉie kie ni predikos pri Esperanto.

Dum nia forestado ekfuriozis en Barcelono la tifa epidemio kaj ni kortuŝite aŭdis pri la perdoj, kiujn ĝi kaŭzis jam en vicoj de niaj konatoj: ankaŭ la karmemora edzino de S-ro Rosals, kiu la unua tiom afable nin akceptis post nia alveturo el Francujo, forlasis por ĉiam siajn karajn. —

La epidemio ne estas facile venkebla; mem inter la ŝipanoj aperas jam simptomoj de la danĝera malsano — ni fine decidiĝas forlasi Barcelonon kaj veturi suden, kie ankaŭ la temperaturo pli favoros nian someran vestaĵon surmetitan por kelktaga ekskurso Parizon sed neniel por kelkmonata turista vojaĝo tra la tuta Hispanujo, kiun ni nun estas entreprenontaj.

ED. KUHL



## BIBLIOGRAFIO

TUTMONDA JARLIBRO ESPERANTISTA. — Esperantista jaro 1913-1914. (Korektita ĝis la 15<sup>a</sup> de Aŭgusto 1913). Prezo Fr. 3.50 (Sm. 1.40) Paris. Esperantista Centra Oficejo. 51, rue de Clichy. 1913.

Bonega libro, kiu enhavas krom la adresaron, kies utilo ne bezonas esti rakontata al la esperantistoj, la Fundamentajn Dokumentojn de nia organizaĵo, kiuj devas esti konitaj de ĉiu bona samideano. Helpi al la perfektigo de tiu libro estas ĉies devo.

KONFESO. Milka Pogačić. Kun la permeso de l' aŭtorino el la kroata lingvo tradukis Antonija Jozićic. — Propra eldono. Prezo Sm. 0.500; afrankita : Sm. 0.600. — Kostajnica (Kroatujo) 1913.

Sinjoro Mavro Špicer el Zagret estas tre prava en sia antaŭparolo al tiu bela verko. Por sia peno, la tradukintino meritas laŭdon kaj dankon de ni ĉiuj. Ni dankas ke ŝi konigis al ni tiun interesan verkon de potenca artistino. Ni laŭdas ŝian tradukon, kiun ni senhezite rekomendas.

Estas tre kurioze rimarki kelkajn erarojn, kiuj estas nekompreneblaj apud la belaĵoj de la stilo de la tradukintino. Mi supozas ne erari, certigante ke la kulpo apartenas al la enlandaj gramatikoj kaj vortaroj, kaj mi estas certa ke fraŭlino Jozićic, kiu tre bone *sentas* nian lingvon, korektos ilin por dua eldono.

Helpe al la korektado mi montras tiujn erarojn, kiuj rilatas la vortaron.

absolvi medicinon (paĝo 8), absolvadi la lernejon (p. 63), (en senco : akiri diplomon, fini lernadon), postuli satisfakcion (p. 15), fantastajn fabelojn (p. 23), enkatengita (p. 81), malriĉulo (p. 35) kaj malriĉa Julieto! (p. 73) (en sencoj : malfeliĉulo, malfeliĉo).

En paĝoj 10, 14, 38, 54, 59, 60, 63, 65, troviĝas ne korekta uzado de *ĝis*, ĝenerale pro nenecesa uzado de *ne* post *ĝi*. Ekz : *ĝis* ilin ne haltigis, (anst. *ĝis* «kiam» ilin haltigis). *Ĝis* unu vesperon ŝi ne atendis, (anst. *ĝis* «kiam» ŝi, unu vesperon ne atendis). *Ĝis* mi ne decidis vojaĝi (anst. *ĝis* «kiam» mi decidis vojaĝi). Ne forgesis tion *ĝis*vive (anst. *ĝismorte?*) k. t. p.

TRAVIVAĴOJ DE RO. ŜO. (Prezo Sm. 0.750.)

Sinjoro Richard Sharpe, nia tre konata kaj distinginda samideano eldonis rakonton de siaj multenombraj vojaĝoj kaj disvendas ĝin profite de la blinduloj. Tio sola jam instigus nin al la aĉeto, se krom tio, la verko ne estus bone verkita kiel ĝi estas. La amantoj de vojaĝaj priskriboj certe multe ĝuos legante ĝin.

*Rimarkoj.* En la fino de la verko, nia respektinda amiko Sinjoro Sharpe, donas kelkajn gramatikajn konsilojn. Sinjoro Sharpe pardonos certe min, se mi ne aprobas tiun mikson de literaturaĵoj kaj gramatikaĵoj en sama libro, kaj se ni ne opinias la konsilojn necesaj. Konsili ke oni ne devas diri *ambaŭ mi, manko da, elekti tu la verdan aŭ la ruĝan*, k. t. p. aspektas kiel ŝerco, kvazaŭ oni konsilus ke por dece manĝi ĉe manĝotablo oni ne devas enmeti la manĝaĵojn en la

nazon, nek preni ilin per la pinto de la pluvombrelo. Tiuj konsiloj bonaj en gramatikoj estas ofendaj por la leganto de literaturaĵo, kaj izolita verkisto ne devas instrui al persono, kiu aĉetas libron por ĝui literaturon, ne por ricevi lecionon. Jam sufiĉis al ni, ke la Oficiala Gazeto tedis nin per similaj infanaĵoj sub la kontrolo de E. L. A. Ni ne rajtos plendi poste, se neniu aĉetas librojn aŭ neniu abonas la Gazeton de niaj Institucioj. Librojn kaj tiun gazeton aĉetas la personoj, kiuj jam konas la lingvon aŭ kredas koni ĝin. Oni ne rajtas fari al ili unuagradan kurson.

Aliflanke, ne ĉiu konsilo estas sekvida. Ekzemple, tiu pri prepozicio *ĉe*. Kelkaj esperantistoj metis al si en la kapon, ke oni ne rajtas uzi akuzativon post *ĉe*. La rezonoj estas la jenaj : 1) Doktoro Zamenhof neniam uzis akuzativon post *ĝi*. 2) *ĉe* ne havas sencon de direkto.

Al la unua ni devas respondi, ke *ĝi* ne estas argumento. Mi rimarkas, ke ĉar la Majstro diras «mi iros al via domo» kaj ne uzas *ĉe* en la frazo, estus tre mirakle ke li povu uzi akuzativon post vorto kiu en la frazo ne troviĝas. Al la dua mi respondas, ke *ĝi* estas absurda. Oni scias tuj de la unua leciono post la varbiĝo, ke oni ne uzas akuzativon post *al* kaj *ĝis*, tial ke ili jam enhavas sencon de direkto; kaj ke la akuzativo post prepozicio taŭgas por aldoni tiun sencon al la prepozicioj, kiuj ne enhavas ĝin. Sekve... Sekve, kun la pardono de nia kara samideano, ni uzos akuzativon post *ĉe* ĉiam, kiam ni deziras montri movon, *ĝis* kiam oni ŝanĝos la Fundamenton. Kaj oni povos kritiki la sencon,<sup>1</sup> kiun ni donos al la vorto *ĉe*, sed ne la akuzativon uzitan post *ĝi*.

ESPERANTO. NOTIONS COMPLEMENTAIRES. par Th. Cart et Em. Robert. — Prezo : fr. 0.40. — Presa Esp. Societo. Paris.

La verko kompletigas la *Notions Elémentaires* kaj Bildaro de la samaj aŭtoroj. Ĝi atente studas la specialajn malfacilaĵojn, kiujn franco povas renkonti en la lernado de nia lingvo.

TAMEN

1. Tamen oni ne povos kritiki, se oni uzas *ĝin* en senco de franca *chez*. «Kion, al la diablo, tiu sentaŭgulo faris ĉe mi?» (*George Dandin*, Zamenhof). Sekve, se oni *faras ĉe iu*, oni povas *iri ĉe iu*, kaj oni devas diri *iri ĉe iun*, se la irado ne okazas en la loko mem, sed de ekster la loko al la loko.

## ENLANDA MOVADO

Nia bona amiko, S-ro Mensa, suferis la perdon de sia patro kaj de sia filino, kiuj mortis antaŭ nelonge.

Gesinjorojn Mensa, la kuraĝaj gesamideanoj, ni kondolencas sincere, sentante kiel propran ilian ĉagrenon.

Nia kara pioniro, S-ro Pujulà, restas for de la batalkampo por la unua fojo post sep monatoj da militado. Ni tre ĝojus, se en simila situacio li povus resti ĝis la fino de tiu ĉi sangoriverojn verŝanta lukto.

**TERRASSA.** — La 1<sup>ma</sup> de Oktobro oni malfermis la ĉiujarajn kursojn por fraŭlinoj, por viroj, kiuj estas ankoraŭ sufiĉe sukcesaj; por konigi la malfermon de la kursoj oni disdonis en la urbo tri mil propagandajn foliojn, per kiuj oni historias la esperantajn okazintaĵojn de la jaro 1914<sup>a</sup>.

En la sama monato ni havis la plezuron gastigi tri bohemiajn samideanojn, S-roj Ed. Kuhl, V. Cimr kaj Maràs, kiuj restis kelke da tagoj en nia urbo; S-ro Kuhl faris antaŭ la esperantistoj interesan paroladon per simpla, de ĉiuj komprenebla Esperanto; li parolis pri multe da teknikaj kaj sciencaj aferoj: senfadena telegrafo, impresigo de fonografaj platoj per la lumo, fakaj nomoj de teksarto, unurela vagonaro, kaj kun tio li enĝovis kelke da spritaĵoj kiuj bonege amuzis la ĉeestantojn. Post kelke da tagoj ni akompanis niajn amikojn al Rubí; en la nomo de ĉiuj samideanoj el Terrassa mi esprimas al ili korajn dankojn por ilia afabla vizito.

La dimanĉon 23<sup>a</sup> de Novembro, S-ro M. Solà faris en la grupo prelegon en Esperanto pri la «Vegetala Reprodukto»; li parolis pri la kvar verticeloj de la floro, la poleno, la ovosfero, la ovujo, la fekundigo kaj la frukto: la prelego estis pli interesa danke al la desegnoj, kiujn sur la tabulo verkis S-ro J. Bassó.

La 6<sup>ma</sup> de Decembro S-ro J. Figueras faris belan prelegon pri «La Teksaj Fibroj»; per bona Esperanto li parolis pri la lanaj fibroj, iliaj skvamoj, la feltrado, la kotonaj fibroj, kotona silko, asbesto, k. c.; ankaŭ la parolado estis ilustrata de bonaj desegnoj, kiuj prezentis bil-

dojn de diversaj fibroj per la mikroskopo kaj diversajn aparatojn uzatajn en la teksa industrio.

La 13<sup>aa</sup> de Decembro oni disdonis la premiojn el Konkurso organizita inter la anoj de *Lumon*; post parolado de S-ro J. Ventura, la sekretario legis la raporton kaj ricevis premiojn : S-roj V. Bufi kaj J. Casanovas; subpremiojn : S-roj J. Chaler kaj V. Alavedra; kiel premiojn oni donacis du silkajn portretojn de D-ro Zamenhof kaj librojn el nia esperanta verkaro.

La 27<sup>aa</sup> de Decembro okazis ĝenerala kunveno de la grupo por elekti la Komitaton por la nova jaro; estas elektitaj : S-ro V. Alavedra, *prezidanto*; A. Soldevila, *kasisto*; J. Girona, *arĥivisto*; J. Bassó, Ll. Martí, J. Chaler, *voldonantoj* kaj M. Solà *sekretario*. Oni decidis ankaŭ dissendi al ĉiuj publikaj bibliotekoj kaj legejoj el nia urbo, ĉiujn broŝurojn, gvidfoliojn, propagandilojn k. c. aperantajn en nia lingvo. — *La Korespondanto*.



## El la esperantaj gazetoj

### ALVOKO AL USONAJ<sup>1</sup> ESPERANTISTOJ

La Eŭropa milito estas terurega sortbato kaj malhelpo kontraŭ nia sankta afero. Inter la usona samideanaro ekzistas sendube multe da timkoruloj kaj seniniciativuloj, kiuj en la nuna krizo pensos, aŭ jam estas pensintaj : «Ho ve! La esperantismo perdiĝos; la eŭropaj samideanoj estas grandnombre devigataj militservi, kaj aroj da ili mortas. Kaj la milito mem estas gravega indiko ke la jarlongaj klopodoj de la tutmonda esperantistaro ne faris impreson sur la registaroj rilate al la paccelo. Bedaŭreginde, tre, tre! Sed mi ne havas la povon plibonigi la aferon; ni usonaj esperantistoj nur povas atendi senmove la eventualan rezulton. La movado sendispute ricevos malantaŭenpuŝon de kelkaj jardekoj, sed kion ni povas fari? Tute, tute nenion. Plie, la afero ne koncernas pri nia ĉiutaga nutrado aŭ bon-sano; tial mi min ne plu ĝenas pri ĝi». Jen la pensoj de la ŝanceliĝuloj, la plasmokruruloj.

Permesu ke mi diru al vi, karaj enlandaj samideanoj, ke ni povas fari multe, ja multege! Se tuta Eŭropo estas en tumulto kaj bruo, ĉiu povas senpene kompreni ke tio grave difektos nian aferon tie. La movado konfuziĝos, multe da diversaj grupoj tie, post kiam levigos la

1. Tiun alvokon al *katalunaj* esperantistoj ni volonte subskribas. — K. E.

pulvnuĵoj, sin trovas nur tri aŭ kvar. Konsiderinte tiujn ĉi malĝojajn kaj preskaŭ senesperigajn faktojn, ĉiu vera Esperantisto en Usono tuj eksentos la neceson multe plifortikigi, kaj mi eĉ povas diri, plejperfektigi la usonan organizaĵon. Ĉiu devas sin senti kiel varbulon, kaj varbi novajn rekrutojn, por ke, spite la teruran malpligandigon de nia anarlisto en Eŭropo, la tutmonda Esperantistaro ĉiam konservadu preskaŭ la saman nombron de anoj. La alvoko estas al vi, kara samideano; ne lasu la laboron al via kunulo, al via frato, aŭ al la grupo en la proksima urbo. Vi mem devus esti vigla varbanto. Se vi en la pasinta tempo ne multe klopodis pri la kreskado de la Esperanto-movado, komencu nun. Ne estas tro malfrue! Male, la tempo estas ĝuste matura, La sankta afero bezonas vian helpon! Se ĉiu Esperantisto en Usono altiros nur unu personon al la movado, nia nombro duobligos. Pri-pensadu tion! Kaj multaj el ni facile povas gajni tri aŭ kvar novajn membrojn. La propagando jam ne estas malfacila, dank' al la granda reklamo kiun donis al nia afero la Chicago Kongreso, kaj la ĉiamaperantaj artikoloj en la tagjurnaloj kaj naciaj gazetoj, ĉiuj konas kelkajn faktojn pri nia lingvo, kaj jam ekzistas en la pensoj de multaj neesperantistoj, firma kaj tutelogika bazo sur kiu oni povas starigi argumenton. Eble estos necese ke vi alparolu tri personojn senrezulte, kaj la kvara aliĝos. Se nur la kvina aŭ la sesa aliĝos, eĉ tiam ne senkuraĝigu, ĉar via laboro estas riĉe rekompencita. Se vi estas izolita Esperantisto eble la sola en via urbeto, ne dormadu ĝis kiam vi estos stariginta almenaŭ grupeton. En la granda urbo Cincinnati mi laboris senĉese dum du jaroj sen ia rezultato Sed mi povis atendi; mi laboris kaj atendis. Nun ni havas sufiĉe kontentigan grupon tie ĉi, kaj mia laboro estas grandmaniere rekompencata. Tio ne signifas ke ni nun permesas al ni ripozon sur la laŭtroj! Tute ne. «Ĉiam laboradu» estas nia devizo. Ne forgesu ke «En unueco troviĝas fortco». Se vi havas grupeton de tri aŭ kvar anoj, kiuj laboras kune harmonie, ĉu tio ne superas laŭ graveco la individuajn klopodojn de iu el ili? La respondojn vi scias. Se vi jam estas grupano, proponu la enkondukon de nova kaj energia propagandagado.

Same kiel la tuta mondo sin turnas al Usono kaj atendas de ĝi packonservadon kaj pacocon en la nuna grava militkrizo, tiel same pensas la Eŭropaj samideanoj pri ni rilate al nia lingvo; tiel same tiuj atendas de ni la konservadon kaj la DISVASTIGON de nia ideo.

JOS. E. SIEGEL

Prez., «The Cinti. Esperanto Society»

## OFICIALA PARTO

La 22<sup>na</sup> Novembro havis lokon en la Popola Enciklopedia Ateneo kunsido, kiun ĉeestis el la Komitato de K. E. F., S-roj Balsells, Serrat, Buyé kaj Ventura, kaj laŭdece invititaj, S-roj Amades, Gili, Bordas, Pastro Coll, Grau, D-ro Bremón kaj Solá. Re prezentis S-ron Codorniu, S-ro Balcells, S-ron Rosals kaj Pastron Planas, Pastro Coll kaj S-ron Rey, S-ro Gili.

S-ro Balcells klariginte kial la Komitato decidis inviti al la kunsido estimindajn samideanojn, legas du senkulpigajn komunikajojn: unu de S-ro Galceràn kaj alia de S-ro Horta.

S-ro Serrat esprimas kiel li povis sciigi pri la financa stato de la K. E. F. kaj rimarkigas, ke ne povas daŭri kiel ĝis nun la enspezo de kotizoj, tial, estas necese granda interna reorganizado por ke oni povu garanti la aperon de K. E. Krom tio li plendas ke multaj federacianoj ne pagis ankoraŭ sian kotizaĵon, pro kio ĝis nun ne povis publikigi nia gazeto.

S-ro Balcells, konstatinte ke estas urĝa afero publikigi plu almenaŭ unu numeron de K. E. en la jaro 1914<sup>a</sup> por ke la federacianoj ne suspektu pri morto de nia organizaĵo, proponas laŭ iniciativo de S-ro Codorniu, starigi monokolekton inter la kunsidantoj, kiun oni aprobas kaj kies rezultato jam aperis en K. E. de Decembro.

Oni decidas pri la jaro 1915<sup>a</sup>, kiel eble plej regule aperigi la gazeton, ne pligrandigi la jarkotizon al la federacianoj kaj klopodi pri aligo al la K. E. F. de novaj sed pagantaj membroj.

Pri la kunsido de prezidantoj de aliĝintaj grupoj, laŭ diras la 4<sup>a</sup> regulo el la Regularo, decidiĝas ĝin ne okazigi, tial ke multaj el ili ne ĉeestus, despli nun pro la aktualaj cirkonstancoj.

Kaŭze de propono pri translokigo de la sidejo de K. E. F. de Sabadell al Barcelono, S-ro Serrat estas komisiita studi tiun aferon kaj prezenti planon ĉu efektive tio konvenas.

Oni akceptas proponon de S-ro Grau rilate al tio ke la K. E. F. publikigu la prokraston de okazigo de la proksima Kongreso en Vilanova, pro la malfavoraj nuntempaj cirkonstancoj, kiuj malpermesas organizi ĝin en la necesa antaŭtempo. — *La Sekretario*, JOSEF VENTURA.



## KORESPONDADO

S-ro E. A. Reus. — Ni ricevis vian leteron. Bonvolu sciigi nin pri la adreso de *Priorata Stelo*.

Ĉiu membro de la *Kataluna Esperantista Federacio*, aŭ aboninto al **KATALUNA ESPERANTISTO** rajtos dufoje dum la jaro publikigi en la gazeto krom sia nomo kaj adreso **10 VORTOJN** por peti korespondadon, interŝanĝojn de kolektaĵoj, informojn k. t. p. aŭ sciigi ŝanĝon de adreso



\*\*\*\*\*

D-RO J. BREMÓN

**RADIOJ X**

Casp, 66 : Barcelona

\*\*\*\*\*

Leterpapero kaj kovertoj kun verda surskribo **★** eldonitaj **Esperanto** de *Ĉiam Antaŭen* (Xifré, 25. Barcelona-S. M.) estas malkare vendataj. 5 paperfolioj kaj 5 kovertoj : **10 centimojn.** Samideanoj, aĉetu ilin.

S-ro Josep Grau, Clarís, 72, Barcelona, serĉas komanditulon, por la ekspluato de novaj elektraĵ aferoj



**PROPAGANDAJ MARKOJ  
DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO**

Estas vendataj po **1 cent.** ĉiu. Por la grupoj aĉetantaj pli ol mil estas farata rabato da **25 %.**

**HELPU AL LA K. E. F. PER AĈETADO DE ĜIAJ MARKOJ**

## AL ĈIUJ FEDERACIANOJ

Subtenu per senlaca klopodado la esperantistan movadon en via urbo

Legu almenaŭ unu esperantan gazeton, kiu vigligos vian entuziasmon

Klopodu akurate pagi vian kotizon al la K. E. F. Ĝi liveros al vi la gazeton

### KATALUNA ESPERANTISTO

Plialtigu laŭpove vian kotizon, por ke via Federacio havu potencan vivon

Alvarbu por la K. E. F. almenaŭ unu novan samideanon ĉiujare

Preparu vin por la VI<sup>a</sup> Kongreso de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA PRESORGANO

DE LA



JARO VI<sup>a</sup> : MAJO 1915

# REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO DE "KATALUNA ESPERANTISTO"

ARIBAU, 55 : BARCELONA

<i>Direktoro</i> . . . . .	FRED. PUJULÀ
<i>Redakcia sekretario</i> . . . . .	JOSEP GRAU
<i>Redaktoroj</i> , . . . . .	ESTANISLAU PELLICER JOSEP VENTURA ARTUR DOMENECH
<i>Administristo</i> . . . . .	JOSEP SERRAT
<i>Administracia sekretario</i> . . . . .	JOAN AMADES

## KUNLABORANTOJ

Manuel BORDAS (Barcelona). — D-ro Jascinto BREMÓN (Barcelona). — D-ro Joaquim COLL (Barcelona). — Delfi DALMAU (Bahía Blanca, Rep. Argentina). — Josep DOMENECH (Girona). — Gustau GALCERÁN (Vilanova i Geltrú). — Joan GILI (Barcelona). — A. NOVEJARQUE (Valencia). — Joan ROSALS (Barcelona). — Eulalia ROSELL, Teresa ROSELL (Vilanova i Geltrú).

## KORESPONDANTOJ

B. Nogué (Manlleu). — E. Aguadé (Reus). — P. Solanas (Rubí). — P. Costa (Santa Coloma de Farnés). — J. Vidal (Tarragona). — M. Solà (Terrassa). — F. Guitart (Vendrell). — J. Albagés (Vich).

Nia devizo: *Mare estas gataro*

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA  
**Kataluna Esperantista Federacio**

Asocia sidejo de la K. E. F.: Rambla, 41 : Sabadell (Katalunujo)  
Redakcio kaj Administracio de K. E. : Arbon, 55 : Barcelona

## Post la Granda Milito

### ALVOKO AL LA DIPLOMATOJ

**T**ERURA milito ekkaptis nun preskaŭ la tutan Eŭropon. Kiam finiĝos la grandamasa reciproka buĉado, kiu tiel forte malhonoras la civilizitan mondon, kunvenos la diplomatoj kaj penos reordigi la rilatojn inter la popoloj. Al vi, al tiuj estontaj reordigantoj, mi nun min turnas.

Kiam vi kunvenos post la plej ekstermanta milito, kiun iam konis la historio, vi havos antaŭ vi eksterordinare grandan kaj gravan taskon. De vi dependos, ĉu la mondo havu de nun fortikan pacon por tre longa tempo kaj eble por ĉiam, aŭ ĉu ni havu nur kelktempan silenton, kiun baldaŭ denove interrompos diversaj eksplodoj de intergentaj bataloj aŭ eĉ novaj militoj. Pripensu do frutempe kaj tre zorge vian taskon, ĉar nun, kiam por via laboro estas oferitaj multaj centmiloj da homaj vivoj kaj milionoj da tre malfacile akiritaj homaj bonstatoj, vi havos sur vi tre grandan moralan respondecon. Zorgu do, ke via laboro ne estu sencela kaj senfrukta kaj ke post la fino de viaj laboroj la homaro povu diri: ni ne vane elportis la grandegajn kaj terurajn oferojn.

Ĉu vi komencos simple referadi kaj flikadi la karton de Eŭropo? Ĉu vi simple decidus, ke la terpeco A devas aparteni al la gento X kaj

la terpeco B al la gento Y? Estas vero, ke tiam laboron vi devos fari sed ĝi devas esti nur negrava *parto* de viaj laboroj; gardu vin, ke la referado de la karto ne fariĝu la tuta *esenco* de viaj laboroj, ĉar tiam viaj laboroj restus tute senvaloraj kaj la grandegaj sangaj oferoj, kiujn la homaro elportis, restus vanaj.

Kiom ajn vi volos kontentigi la popolojn, kiom ajn justaj vi penos esti kontraŭ diversaj gentoj, vi nenion atingos per referado de la karto, ĉar ĉiu ŝajna justeco koncerne unu genton estos samtempe maljusteco koncerne alian genton. La nuna tempo ne estas simila al la tempo antikva : sur ĉiu disputebla peco da tero laboris kaj verŝis sian sangon ne *unu* gento, sed ankaŭ *aliaj* gentoj; kaj se vi decidis, ke tiu aŭ alia terpeco devas aparteni al tiu aŭ alia gento, vi ne sole ne faros agon justan sed vi ankaŭ ne forigos sur tiu terpeco la kaŭzon de estonta batalado. La «iberigo», kiun vi donos al tiu aŭ alia terpeco, estos nur sofismo, ĉar ĝi signifos nur, ke al tiu aŭ alia gento vi donos la rajton esti sur tiu terpeco mastroj super homoj de aliaj gentoj, kiuj ankaŭ tie naskiĝis, laboris kaj suferis kaj havas koncerne sian patrujon la samajn naturajn rajtojn, kiujn ĉiu infano havas koncerne sian patrinon. Estas vero ke tiu gento, kiun vi privilegias, entuziasme krios : «Vivu la diplomatoj» kaj se tiu gento sur la koncerna terpeco prezentos la plimulton, ĝi per teroro silentigos la aliajn, kaj ĉiuj gazetoj en la mondo diros, ke «la tuta loĝantaro de la terpeco A sentas sin tre feliĉa»... Sed tio estos mensogo, simpla mensogo, kiun la mondo ne komprenos nur pro tio ke la ĝemado de la terore silentigitaj prematoj, de homoj, kiuj en sia patrujo fariĝis «fremduloj», ne venos al ĝiaj oreloj.

Trasdonante ian terpecon al la homoj de tiu aŭ alia gento, vi ĉiam faros maljustaĵon kontraŭ aliaj homoj, kiuj havas la samajn naturajn rajtojn koncerne tiun terpecon. La sola efektive justa decido, kiun vi povas fari, estas : laŭte proklami kiel oficialan, firme interkonsentitan kaj plene garantiitan decidon de ĉiuj Eŭropaj regnoj la sekvantan elemente naturan, sed ĝis nun bedaŭrinde ne observatan principon : **ĈIU LANDO MORALE KAJ MATERIALE PLENE EGALRAJTE APARTENAS AL ĈIUJ SIAJ FILOJ.**

Tio estas, ke en sia privata vivo ĉiu civitano en ĉiu regno, havas plenan rajton paroli tiun lingvon aŭ dialekton, kiun li volas, kaj konfesi tiun religion, kiun li volas; ke se en la institucioj publikaj estas uzata unu sola regna aŭ loka lingvo, tio estas nur poroportuneca cedo de la malplimulto al la plimulto, sed ne humiliga tributo de gentoj mastrataj al gento mastranta. Ĉar la gentaj nomoj, kiujn portos ankoraŭ multaj regnoj kaj provincoj, estas la ĉefa kaŭzo, pro kiu la lo-

ĝantoj de unu supozata deveno rigardas sin kiel mastrojn super la loĝantoj de alia supozata deveno, tial ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti ne la nomon de ia gento, sed nur nomon neŭtrale-geografian.

Plej bone estus, se anstataŭ diversaj grandaj kaj malgrandaj Eŭropaj regnoj ni havus iam proporcie kaj geografie aranĝitajn Unuigitajn Ŝtatojn de Eŭropo. Sed se nun estas ankoraŭ tro frue, por paroli pri tio, oni devas almenaŭ per oficiala kaj interkonsentita akcepto de la supre dirita principo forigi tiun grandegan malbonon, tiun senfinan fonton de konstantaj bataloj, kiun prezentas la identigado de lando kun gento.

Kiam la supre dirita principo estos oficiale fiksita per garantiita decido de ĉiuj Eŭropaj regnoj, tiam malaperos la ĉefa kaŭzo de militoj kaj de konstanta reciproka timado kaj senfina armigado, ĉar tiam oni jam neniam kaj nenie, povos diri, ke «la patrujo estas en danĝero». Oni scias ja tre bone, ke la vortoj «patrujo en danĝero» ne signifas, ke iu volas deŝiri parton de nia patrujo kaj ĵeti ĝin en la maron, aŭ ke iu volas rabi por si la havon de ĝiaj loĝantoj, sed plej ordinare tiuj vortoj signifas simple : «Minacas danĝero, ke sur ia terpeco, kie ĝis nun *mia* gento estis mastro kaj aliaj homoj estis nur pli aŭ malpli tolerataj, morgaŭ eble *alia* gento fariĝos mastro kaj mia gento estos nur tolerata».

Kiam en la tuta Eŭropo regos politika justeco *absoluta*, t.e. natura, ĉie kaj por ĉiuj egala, kiam en ĉiu lando ĉiuj loĝantoj estos morale kaj materiale plene egalrajtaj, kiam la landoj ne portos plu gentajn nomojn, kiam la regna lingvo ne havos plu karakteron genteŝovinisman kaj humiligan kaj ne ekzistos plu gentoj-mastroj kaj gentoj-servantoj — tiam ne ekzistos plu kaŭzo por intergentaj militoj; tiam ĉiu homo povos sidi tute trankvile en sia natura, sole vera kaj sincere amata patrujo, li ne bezonos plu timi, ke iu povas «ŝorpreni» ĝin de li, kaj li ne bezonos reveni pri forpreno de la patrujo de aliaj homoj.

Mi scias tre bone, ke la malamo inter la gentoj ne malaperos *subite*, en unu tago, kian ajn aranĝon la diplomatoj farus, sed por tio poste laboros jam personoj *privataj*, per predikado, edukado, alkutimigado, k.t.p.; de vi, diplomatoj, ni atendas nur, ke vi donu al ni la *eblo*n tion fari. Reciproka malamo inter la diversaj gentoj de la homaro ne estas io natura, kiel ne estus natura ia reciproka malamo inter la diversaj familioj de unu gento : la malamon kaŭzas nur — krom la facile forigebla reciproka nekomprendado kaj nekonado — la ekzistado de gentoj premantaj kaj gentoj premataj, la blinda egoismo, fiereco kaj kalumniemeco de la unuaj, la natura reagemeco de la lastaj. Estas facile interfratigi homojn liberajn kaj egalrajtajn,

sed estas nefareble interfratigi homojn el kiuj unuj rigardas sin kiel rajtajn mastrojn super la aliaj.

Se vi eĉ farus nenion alian, *se vi nur forigus la gentajn nomojn de la landoj* (afere tre facile farebla), vi jam farus per tio agon eksterordinare gravan, vi kreus novan eron en la historio de Eŭropo. Ĉar en lando kun neŭtrala nomo la tute natura plena egalrajteco de ĉiuj ĝiaj loĝantoj pli aŭ malpli frue nepre estos atingita, sed en lando kun nomo genta la egalrajteco neniam estos plena kaj daŭra, ĉar la malfeliĉa nomo ne sole kvazaŭ pravigos la plej malnoblajn intergentajn maljustaĵojn en la diversgentaj landoj de la orienta Eŭropo, sed eĉ en landoj pli civilizitaj ĝi ĉiam konfuzos la kapojn eĉ de la plej honestaj civitanoj, subtenante en ili ĉiam la opinion kaj senton, ke la lando apartenas nur al tiu gento, kies nomon ĝi portas, kaj ĉiuj aliaj gentoj estas en ĝi nur fremduloj. Eĉ ĉe la plej bona volo la civitanoj de tiu lando ne povas alkitimiĝi al la ideo, ke ili ĉiuj prezentas unu nacion, ĉar por tia nacio simple ne ekzistas *vorto*, kaj, demandite pri tio, al kiu popolo li apartenas, la loĝanto de tia lando pro manko de tiu vorto estas *devigata* nomi ian *genton*; kaj ĉi tiu devigata konstanta alkalkulado sin al ia speciala gento anstataŭ al la komuna nacio de la lando forte subtenas la gentan ŝovinismon kaj malpacon inter la samlandanoj...

Resumante ĉion, kion mi diris, mi ripetas:

Kiam post la fino de la milito kunvenos la diplomatoj, ili povos fari ŝanĝojn en la karto de Eŭropo; sed tio ne devas esti ilia *ĉefa* laboro. Ilia ĉefa laboro devas esti: starigi en la nomo kaj sub la garantio de siaj registaroj pli-malpli la sekvantajn leĝojn:

1. Ĉiu regno apartenas morale kaj materiale al ĉiuj siaj naturaj kaj naturigitaj loĝantoj, kian ajn lingvon, religion aŭ supozatan devenon ili havas; neniu gento en la regno devas havi pli grandajn aŭ pli malgrandajn rajton aŭ deojn ol la aliaj gentoj.

2. Ĉiu regnanto havas plenan rajton uzi tiun lingvon aŭ dialekton kiun li volas, kaj konfesi tiun religion, kiun li volas. Nur en la institucioj publikaj, kiuj ne estas destinitaj speciale por unu gento, devas esti uzata tiu lingvo, kiu per komuna interkonsento de la regnantoj estas akceptita kiel lingvo regna. En tiuj publikaj institucioj, kiuj havas karakteron speciale lokan, anstataŭ la regna lingvo povas esti uzata alia lingvo, se ne malpli ol 9/10 de la urbanoj donis por ĝi sian konsenton. Sed la lingvo regna aŭ urba devas esti rigardata ne kiel humiliga tributo, kiun ŝuldas gentoj mastrataj al gento mastranta, sed nur kiel propravola poroportuneca cedo de la malplimulto al la plimulto.

3. Pro ĉiuj maljustaĵoj, farataj en ia regno, la registaro de tiu regno estas responda antaŭ Konstanta Tut-Eŭropa Tribunalo, starigita per interkonsento de ĉiuj Eŭropaj regnoj.

4. Ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti ne la nomon de ia gento, sed nur nomon neŭtrale-geografian, akceptitan per komuna interkonsento de ĉiuj regnoj.

Sinjoroj, diplomatoj! Post la terura eksterma milito, kiu starigis la homaron pli malalten ol la plej savaĝaj bestoj, Eŭropo atendas de vi pacon. Ĝi atendas ne kelktempan interpaciĝon, sed pacon konstantan, kiu sola konvenas al civilizita homa raso. Sed memoru, memoru, memoru, ke la sola rimedo, por atingi tian pacon, estas: forigi unu fojon por ĉiam la *ĉefan kaŭzon* de la militoj, la barbaran restaĵon el la plej antikva antaŭcivilizacia tempo, la *regadon de unusaj gentoj super aliaj gentoj*.

D-RO L. L. ZAMENHOF



## Monkolekto por la eldono de Kataluna Esperantisto

	Antaŭa sumo.	112 Pesetoj
S-ro Fred. Pujulà .....	10	»
S-ro Delfi Dalmau .....	10	»
	Entute. . .	132 Pesetoj

Tiujn tre malproksimajn de ni karajn amikojn ni speciale dankas por ilia granda helpemo.

### PRESERARO

En la dua verso de la versaĵo de S-ro C. Bicknell aperinta en lasta numero de KATALUNA ESPERANTISTO vorton *viburno* oni devas legi *laburno*. Ni petas la respektindan aŭtoron afable senkulpigui, ke ne-vola senzorgo makulis lian tre belan verkon.

**Amo kaj Naturo<sup>1</sup>**

DEVIZO : *«E vidi una leggiadra  
donna e bella su l'erba...»*

Sentema la flor' malfermiĝis hodiaŭ  
pro l' kiso printempa de l' sun' helebria;  
sentema la kor' reverdiĝas nun ankaŭ  
pro la varma via  
fajrplena rigard', elfluanta el amo,  
karulino mia.

Naturo kaj Amo, misteraj emblemoj,  
mi ĉiam rimarkas vin kune en dia  
kuneco. Vidante Naturon, aperas  
l' amo idilia  
de mia spirito, al vi dediĉita,  
karulino mia.

Korojoj imitas la vangojn el rozo;  
en via okulo vivplena, magia  
la bluo ĉiela reflektas ameme;  
kaj blankek' lilia  
enviis koloron de via karn' pura,  
karulino mia.

La ĉarma tagiĝ' dubebblanka, ruĝiĝa,  
nur estas ja via vizaĝo gracia,  
per gesto naiva al mi ridetanta,  
kiam melodia  
la voĉo resonas per triloj kaj kveroj,  
karulino mia.

La ritmaj ekstremoj, laŭ ondoj de l' maro,  
de l' oraj grentrunkoj en son' harmonia,  
imitas laŭtakte la kordiasolon  
de la brusto via,  
kaj vian spiradon, odora bloveto,  
karulino mia.

1. Unua mencio en la IV<sup>a</sup> Literatura Konkurso de la K. E. F.

En tagoj sensunaj, misteraj kaj plenaj  
 je nigrantaŭsentoj aŭ febr' nostalgia  
 de land' ideala, malgaje sopiras  
     vi melankolia;  
 sed tamen vi ridas al blonda suneto,  
     karulino mia.

Tiele tuj kiam la nigraj fantomoj  
 de l' nokto eliras en ar' fantazia,  
 kaj svenas funebre la tag' en kvazaŭa  
     spasmo agonias,  
 mi tiam vin sonĝas terure mortanta,  
     karulino mia.

Sed je l' sunleviĝo esperoplenega,  
 vi tuj reviviĝas triumfa, gracia,  
 glorapoteoze brilanta, la frunto  
     alta, imperia,  
 jetante pluvegon el am' kaj feliĉo,  
     karulino mia.

JOSEP ROSSELLÓ



APEROS EN LA PROKSIMA NUMERO

## LA HONTULINO

EL RAIMÓN CASELLAS, TRADUKO

DE S. RO MARIÀN SOLÀ

Premiita en la IV<sup>a</sup> Floraj Ludoj de la K. E. F.



## VI<sup>a</sup> Kongreso de la K. E. F.

**N**t diriĝ en nia lasta numero, ke la detalojn pri la organizataj kongresfestoj ni donos per tiu ĉi. Hodiaŭ ni tre ĝoje plenumas nian promeson, ĉar la preparaj laboroj de nia VI<sup>a</sup> Kataluna Kongreso bone marŝas kaj aŭguras belan sukceson.

La Kongreso okazos en oktobraj tagoj; difinitan daton oni ankoraŭ ne elektis; tion pli malfrue oni faros, kiam la cirkonstancoj permesos. Malfermo de la Kongreso post la akcepto oficiala, salutado de la delegitoj kaj vino de honoro dediĉita de la Vilanova-Ateneo al la esperantistoj okazos unu sabaton post la 9<sup>a</sup> vespere. Tiuhore oni povas esti alvenintaj al Vilanova, ĉar tion ebligas la alveturo de vagonaroj de ĉiuj direktoj. Dimanĉe matene, krom la kunveno kaj diservo, kiun organizas la Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj okazos labora kunsido de 9<sup>a</sup> ĝis 13<sup>a</sup> koroj.

Oficiala festeno okazos poste, kiam la okulvitruloj estos farintaj la iĝintan kutima neseriozan kuntrinkon, kaj posttagmeze havos lokon la Festo de la Floraj Ludoj, post kiu okazos mallonga ferma kunsido en alia salono. Nokte solena balo kunigos la kongresanojn; kaj la sekvontan tagon, laboran lundon, oni faros, krom la ekzamenoj por profesoroj kaj lernantoj, vizitojn al la tre interesaj Muzeo-Biblioteko Balaguer kaj Industria Lernejo. Fine, lunde posttagmeze oni povos fari neoficialan viziton al la bela, apuda urbo Sitges.

La societoj Ateneo, Orfeo Vilanoví, Foment, Centre Catòlic kaj Centro Democrático Federalista cedos afable siajn belajn sidejojn, en kiuj ni okazigos la diversajn festojn. Ĉiuj societoj apogos la Kongreson, al kies sukceso promesis ankaŭ sian kunlaboron la vilanovaj aŭtoritatuloj kaj ĉiuj deputitoj el la distrikto, kiuj proponis temojn kaj premiojn por la Literatura Konkurso.

Eble okazos ankaŭ koncerto kaj aliaj amuzoj, nun en organizo. En la Ateneo certe estos multe vizitata kaj bone afikos la granda Ekspozicio, kiun niaj amikoj el *Laboro Esperanta* jam preparas kaj por kiu ili petas la helpon de ĉiuj samideanoj. Ĉiaspecaj esperantaĵoj estos montrataj kaj kompletigos per faktoj la argumentojn de la pioniroj, kiuj faros en Vilanova serion de paroladoj por disvastigi la konojn pri nia lingvo.

Resume, la Organiza Komitato de nia VI<sup>a</sup> antaŭvidis jam ĉiujn detalojn kaj komencis aktivan preparan laboron, kiu ĝis nun renkontis feliĉe nenian baron. La Organiza Komitato esperas, ke la aranĝo farita por solvi la problemon : okazigi Kongreson en nur unu festa tago, plaĉos al nia samideanaro, kaj ke ĝi, pro la malkaraj kaj facilaj rimedoj ĉeesti, faros la Kongreson en Vilanova unu el la plej brilaj festoj de paco okazintaj en nia lando kaj inter la esperantistaro.

## V<sup>aj</sup> Floraj Ludoj de la Kataluna Esperantista Federacio

### EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- IV. De LIA URBESTRA MOŝTO, de Vilanova i Geltrú : *Traduko en prozo de la komedio de F. de S. Vidal «Una noia com un sol»*. PREMIO : 50 pesetoj (20 Sm.).
- V. De LIA MOŝTO S-RO JOSEF BERTRÁN I MUSITU, parlamenta deputito : *Lalivola temo*. PREMIO : Arta objekto.
- VI. De LIA MOŝTO S-RO EDUARD MICÓ, provinca deputito : *Lalivola temo*. PREMIO : Arta objekto.
- VII. De LIA MOŝTO S-RO ANTONI JANSANA, provinca deputito : *Verheto pri «Esperanto kaj Militego»*. PREMIO : Arta objekto.
- VIII. De LIA MOŝTO S-RO JOSEF M.<sup>a</sup> BASSOLS, provinca deputito : *Lalivola temo*. PREMIO : Arta objekto.
- IX. De LIA MOŝTO S-RO PAU ALEGRE BATET, provinca deputito : *Lalivola temo*. PREMIO : Arta objekto.
- X. De «BIBLIOTECA-MUSEO BALAGUER», de Vilanova i Geltrú : *Traduko de la versaĵo de Victor Balaguer «Un jorn de maig»*. PREMIO : 22 volumoj binditaj el la verkoj de tiu fama historiisto.
- XI. De SEMO (A. E. P.), de Barcelona : *Traduko de la versaĵo «Nit de sango de Jacinto Verdaguer»*. PREMIO : 25 pesetoj (10 Sm.).

Anstataŭ la verkon «A la luna» de Manuel de Cabanyes, la aspirantoj al la premio de LABORO ESPERANTA povas traduki la verkon de sama aŭtoro «A...».

La tekstojn de la tradukotaj verkoj havigos, laŭ peto, al la verkistoj la Redakcio de KATALUNA ESPERANTISTO.

## BIBLIOGRAFIO

ADELE KAMM, de Paul Sejppel. Traduco Esperanta de René de Saussure. (El franca lingvo, kun permeso de l' aŭtoro.) Prezo 3 fr. (1.20 Sm.) — Libristo Kündig, Cortaterie, 11. Genevo. — Tiun verkon ni ricevis kun la jena:

AL LA MEMBROJ DE LA AKADEMIO ESPERANTISTA. Cirkulero de S-ro R. de Saussure demandanta:

1. *Ĉu reformo de la alfabeto Zamenhofs estas reformo de la lingvo Esperanto?*

2. *Ĉu gazetoj aŭ libroj skribitaj en pure Zamenhofs lingvo, per reformita alfabeto, estas konsiderotaj kiel Esperantaĵoj recenziindaj de la Esp. gazetoj kaj akceptindaj en Esp. ekspozicioj?*

«Adèle Kamm» estas publikigita de S-ro de Saussure por pruvi per sufiĉe longa teksto la taŭgecon de nova alfabeto, kaj ĝin li submetas al siaj kolegoj de la Akademio kaj de la Lingva Komitato.

La Esperanto, kiun S-ro de Saussure uzis por ĝi, estas fundamenta, kaj la stilo tiel bela, ke oni sin sentus inklina fari konsiderojn nur pri ili, se la ĉefa celo de la verko ne estus sufiĉe grava por dediĉi al ĝi la tutan atenton.

La alfabeto reformo, kiun proponas nia Akademiano estas la jena: Profiti la rajton fundamentan uzi digramojn *ch, gh, sh* anstataŭ supersignitaj *ĉ, ĝ, ŝ*. Anstataŭ literon *j* per digramo *zh*, literon *k* per *c*, literon *c* per *ç*, literon *h* per *k*, kunmetaĵojn *ca, cz* per *x*. Mi ne pridiskutos ĝin, ĉar S-ro R. de S. ne proponas ĝin kiel definitivan. Eble post longa studado sub la inteligenta kontrolo de nia eminenta samideano oni fine anstataŭos denove *zh* per *j*, kaj *j* per *y*, *c* per *z*, *z* per *s*, *s* per *ss*. Eble oni revenos pli malpli frue al la klasika alfabeto, kaj tiom da laboro kaj mono elpezitaj ne estos senutilaj, tial ke ili taŭgos por montri, ke ni eraris kaj por pli firme konvinki nin pri la boneco de niaj nunaj grafikaĵoj. Mi konfesas tamen, ke la akcentitaj literoj malhelpas en nia lando la propagandon de Esperanto, ke la uzado de nia lingvo per skribmaŝinoj, telegrafoj, presejoj, k. t. p. estas embarasata de tiuj literoj, kaj ke vole-ne-vole, ni devas en multaj okazoj uzi la fundamentajn anstataŭantajn digramojn.

Litero *j* estas por ni kaŭzo de mokoĵ, ĉar ĉiu hispano ĝin elparolas *h*

kaj ĉiu kataluno<sup>1</sup> ĵ, el kio rezultas sovaĝa elparolo de niaj vortoj. Mi petas, tamen, ke oni venu aŭdi kiel niaj samlandanoj elparolas la germanajn nomojn *Schwartz*, *Schneider*, aŭ la pli simplan anglan *The Daily News* (Te dajli nebs). Kompreneble, angloj kaj germanoj ne celas propagandi siajn lingvojn (ĉu certe ne?) kaj la demando estas ne la sama por ili, kiel por ni esperantistoj.

Akceptante do la necesecon de reformo, ne diskutante ĝin, ni devas tamen studi ĝian eblecon kaj ĝian sciencecon.

1) *Ebleco*. Sen ia ajn dubo, *teorie* la reformo estas ebla. S-ro R. de S. jam pruvis tion,<sup>2</sup> kaj pruve de sia argumentado li honoris min per cito de teksto, kiun mi publikigis en la n.<sup>o</sup> de Marto 1913 de *K. E.* pri la ortografia reformo de la kataluna lingvo. Ĉar lingvo ne estas natura frukto, sed produktaĵo de la homa konsento, esprimita parole per klara volo aŭ silente per la kutimo, la homo povas ŝanĝi, aliformigi, reformi la skribitan kaj la parolatan lingvon, kaj tiu povo montriĝas evidente, kiam oni donas nomojn al la novaj instrumentoj.

Sed la lingvo ne estas uzata nur de kleraj, logikemaj, sciencaj cedemaj, klarvidantaj personoj. Malkleraj, nelogikaj, nesciaj, malcedemaj, blindaj homoj ankaŭ uzas ĝin. Tial unuavide oni komprenas ke la parolata lingvo estas nefacile reformebla, ĉar ĉe tiuj lastaj personoj la rutino estas pli potenco ol la saĝo... Kaj, ho ve! ili estas la plimultaj!

Sed kun la *skribita* lingvo, okazas nuntempe same, ĉar ĉiu homo scias skribi, kaj eĉ unu el la nunaj sociaj malbonoj venas de tio, ke sub la skribsciado plej ofte sin kaŝas la plej terura malspriteco kaj manko de intelekto. En antikvaj epokoj, kiam la skribado estis apanaĝo de la kleruloj, ortografia reformo estis afero facila. Sed nun...! Nia lando pruvis la praktikan neeblecon, ĉar la proponita reformo... estas tute ne alprenita de la plimulto... nek de la verkistoj mem. Ĉiu presejo, ĉiu eldonejo konservas la antikvajn formojn, kvankam ne logikajn, nur pro personaj vidpunktoj aŭ malametoj, nur pro individuaj konsideroj... Kial, nu, la reformo en aliaj landoj? Ĉu katalunoj estas apartaj homoj ĉe kiuj ne estas ebla tio, kio estas ebla ĉe aliaj? Ne; ne tie kuŝas la kaŭzo, sed en tio, ke la kataluna nacia volo ne havas al sia servo glavon aŭ knuton por trudi sian deziron. En ĉiu lando, kie reformo prosperis, ĝi prosperis dank' al perforto de la Ŝtato. Ankoraŭ nun oni monpunas ĉe ni komercistojn, kiuj ne kalkulas laŭ decimala sistema kaj vendas po ulnoj, uncoj, k. t. p. Afiŝoj de la aŭtoritatoj pendas en ĉiu butikoj. Tamen, oni ne devas tiom multe puni,

1. Kompreneble, kiuj ne konas esperantan prononcon.

2. *Lingvo Cosmopolita*. N-oj 7, 8, 9 (1913).

kiel dum la enkonduko de la sistemo. La ĝendarmo estas efika. Por la homamantoj, tio estas ploriga, sed reala fakto... Donu al mi la povon de Ŝtato, ĝiajn armeojn, ĝiajn fiskistojn kaj pedelojn. Post unu jaro mi promesas ke ĉiu homo ne nur *akceptos* ĉiun reformon en nia lingvo (se la reformo estas saĝa) sed ankaŭ ili parolos kaj uzos Esperanton. Nun mi estas ridinda frenezulo idealisto; tiam mi estus glora historia persono, eĉ se trudante Esperanton mi katenus nian majstron.

Ĉar en Esperantujo ni ne havas *regan trudpolencon*, mi estas certa, ke eĉ se ni ĉiuj lingvokomitatoj funkcias gilotinon antaŭ la pordo de nia hejmo, la plej saĝa reformo nur konfuzon alportos al nia movado. Ĉu malgraŭ ĉio dirita oni malhelpis la senĉesan aperadon de verkoj de samideanoj, kiuj en sia lingvo mem apenaŭ kuraĝus skribi leteron? Kiu malhelpos, ke malgraŭ akcepto kaj trudo de Akademio oni daŭru skribante laŭ la fundamenta alfabeto?

Ĉu oni rajtos deklari ilin malhelpantoj de la lingvo?

Ĉu oni povos admoni ilin, kiel kontraŭstarantojn al la disciplino? Ĉu ili ne argumentos favore al sia agado, montrante la ekzemplon de S-ro R. de S. mem, kiu kvankam Akademiano ne obeas la fundamenton? Ĉu oni devos esti pli papista ol la Papo? Kvankam mi aprobus ilian agadon, ne mi kontraŭstarus ilian rajton. Ni havus ne unu, sed du, tri, mil ortografiojn, kaj, kio estas pli grava, ni pravigus ĉiun proponinton!

2) *Scienceco*. Mi akceptas sen diskuto ke la nuna ortografia ne estas scienca. Sed mi demandas: Ĉu la sinjoro, kiu ĉe la angulo de la strato vendas ŝinkon podetale aŭ pogrande, ne fariĝis ankoraŭ esperantisto, ĉar lia skribmaŝino ne posedas cirkumfleksan akcenton taŭgan por la ĉefaj literoj? Ĉu *nur* pro tiu kaŭzo ekzistas sciencistoj kiuj rifuzas lerni la lingvon? Kion oni opinias pri matematikistoj, kiuj ne lernas algebron, se oni ĝin skribus per gotikaj literoj? Mi ne dubas pri la manko de scienceco de nia alfabeto, sed mi havas dubon pri la argumento de la ŝinkisto kaj pri la saĝo de la scienculo, kiu ne scias ke *neniu scienco estis perfekta de la homenciĝo*, kaj rifuzas lerni internacian lingvon, tial ke tiu aŭ alia detalo ne plaĉas al li.

Ĉu estas necese konkludi? Ĉu estas necese respondi al la demandoj de S-ro R. de S. per demando pri la utileco de liaj demandoj?

FRED. PUJOLÀ

## ENLANDA MOVADO

Du bonaj samideanoj barcelonaj mortis antaŭ nelonge. S-roj Josep Mauri kaj Pompeu Molgosa forlasis en hela juneco siajn karajn.

Al la familioj de niaj bedaŭrindaj kunfederacianoj ni prezentas sinceran kondolencon.

Kaj ni partoprenas en la ĝojo de niaj kunKEFanoj S-roj Bremón, lingvokomitatano, kaj Beltri, kasisto de *Barcelona Stelo*, kiuj por la unua fojo estas patroj.

Gesinjorojn Bremón ni kore gratulas pro la naskiĝo de ilia filo Joan, kaj ges-rojn Beltri ankaŭ pro la naskiĝo de filineto.

Ke ili ĉiuj multajn jarojn vivu!

— S-ro Pujulà, kiu la pasintan monaton reiris al la batalejo, restas laŭ lastericevitaj sciigoj tute sana. Daŭran similan staton ni deziras al la kara amiko.

**BARCELONA.** — La 28<sup>ma</sup> de Februaro la gegrupanoj de *Barcelona Stelo* faris tre agrablan ekskurson al Pedralbes, por adiaŭti sian kun-societanon S-ron Joan Gili, kiu la 10<sup>ma</sup> de Marto forveturis Centra-Amerikon kiel vojaĝa komizo. La ekskurso finiĝis ĉe «la Serafina» kie la ekskursantoj estis regalataj per bongustaj laktaĵoj kaj frandaĵoj.

S-ro Gili estis kore adiaŭtita de ĉiuj kamaradoj, kiuj deziris al li plej bonan vojaĝon.

— S-ro Josep Guixà, nia entuziasma samideano, revenis inter nin el Madrido, kie li restis dum du jaroj. Li estu bonveninta.

**OLOT.** — Per ĝenerala kunsido okazinta la 14<sup>ma</sup> de la pasinta Februaro, la jena Komitato estis elektita por la nuna jaro.

*Prezidanto*, S-ro Josep María Garganta; *Vic-prezidanto*, F-ino María Escubós; *Sekretario*, S-ro Manel Prat; *Vic-sekretario*, F-ino Roseta Llosas; *Kasisto*, F-ino Concepció Vayreda; *Bibliotekisto*, S-ro Candi Agustí; *Membroj*, S-ro Josep Boix, S-ro Camilo Trias.

**FALSET.** — Antaŭ nelonge okazis en tiu ĉi vilaĝo la I<sup>a</sup> Kongreso de la *Esperanta Tarragon-Provinca Ligo*, kiu atingis grandan sukceson.

Ĉe la urbestro okazis oficiala akcepto; per ĝi la Urbestro Moŝto proponis ĉian kunhelpon al la kongresanoj.

Posttagmeze en la granda teatro *La Artesana* okazis la sola kunsido de la Kongreso. Prezidis la Urbestra Moŝto kaj paroladis: la Prezidanto de l' Ligo pri ĝeneralaj aferoj; la Sekretario-Kasisto pri la tagordo kaj financa stato; S-ro E. Aguadé i Parés pri aldono al la Regularo; S-ro Ramón Pallejá pri «Lingvo esperanta, tre facilas», S-ro Joan Martorell, pri «Praktikaj esperantaĵoj»; S-ro Castellví legis temon de S-ro Joan Molas, pri «Agado de l' Ligo en nia provinco», F-no Asunción Llorens pri «Esperanto, tre utilas», S-ro E. Aguadé, pri «Gravco de nia agado», D-ro Joaquím Coll, pri «Esperanto en la sociologio». Fine S-ro Aguadé proponas al la Kongreso nomu unuanime Prezidanto kaj Sekretario, respektive, S-ron Jozefo Pamies Martorell, Paroĥestro de Argentera, kaj S-ron Joan Aragonés. Unuanime estis akceptite.

S-ro Pamies salutas korege siajn prezidotojn kaj fine S-ro Dalmau, Paroĥestro el Falset, kaj nuna Vicprezidanto de l' Ligo fermas la kunsidon post dankemaj vortoj. Dum kelkaj minutoj la kongresanoj starante kantis *La Esperon* pianluditan de F-no Maria Sentís.

Poste la gesamideanoj de *Espero Priorata* regalis majeste la geesperantistojn eksterurbajn ĝis la oka horo, je kiu momento bedaŭrinde unuj kaj aliaj korsentis la adiaŭon, kiu estis nepra pro fino de l' tago kaj marŝo de la vagonaro. Tamen kelkaj restis en Falset ĝis la venonta tago por ĉeesti la teatron dum la nokto.

**REUS.** — La nova Komitato de *Esperanta Tarragon-Provinca Ligo* konsistiĝis tiel: *Prezidanto*, S-ro Jozefo Pamies (Argentera); *Vicprezidanto*, S-ro Francesc Guitart, (Vendrell); *Konsulo*, S-ro Enric Aguadé i Parés (Reus); *Konsulino*, F-no Teresa Estela Brunet (Reus); *Konsilanto*, S-ro Joan Molas (Tarragona) kaj *Sekretario-Kasisto*, S-ro Joan Aragonés (Argentera).

— La Estraro de *Nova Semo* por la nuna jaro estis laŭ sekvas: *Prezidanto*, S-ro Enric Aguadé i Parés; *Vicprezidanto*, S-ro Nil Alsina; *I Voĉdonanto*, F-no Teresa Barrufet i Puig; *II Voĉdonanto*, F-no Jozefino Felip; *Bibliotekistino*, F-no Teresa Estela; *Vicbibliotekistino*, F-no Jozefino Anguera; *Kasisto*, S-ro Francesc Simó; *Sekretario*, S-ro Joaquím García; *Vicsekretario*, S-ro Jako Vilalta kaj *Konsilantoj*, S-roj Petro Aguadé kaj Antono Clivillés.

La ekskursiva fako de *Nova Semo* baldaŭ havos pretaj la lastajn detalojn por la aranĝo de ekskurso kun la geesperantistoj de *Espero Priorata*. — *Delegito*.

**MIERAS.** — Dum la paskaj festoj loĝis ĉe tiu vilaĝo Mieras S-ro Joakimo Costa Furtiá, P-ro de K. E. F. prezidanto de *Studenta Juneco* kiu tiel entuziasmigis la gejunulojn ke la venontan someron dum kiu li loĝos ankaŭ ĉi tie, ni sub lia sperta gvidado grupiĝos. Kiom povas entuziasmo! Se mi konas iomete Esperanton mi devas lin danki. Bonvolu enmeti tiun ĉi sciigon ĉe K. E. kaj akceptu sinceran saluton de la *Delegito*.

**VENDRELL.** — El la esperanta rubriko de la kataluna gazeto *El Baix Penadès*, kiu aperas en tiu urbo ni ĉerpas la sciigon, ke la 15<sup>a</sup> de Aprilo komenciĝis ĉe la grupo *Frateco* nova kurso de Esperanto por fraŭlinoj. Ĝi okazas lunde, merkrede kaj vendrede.

La numero de la 17<sup>a</sup> de Aprilo el la citita gazeto entenis grandan folion instigantan al la lernado de nia lingvo. Bona propagando.



## El la esperantaj gazetoj

### LA MILITO KAJ ESPERANTO

Ĉiu bone scias, ke milito haltigas progresadon de kultura vivo. La bonegan ilustradon de tiu fakto ni trovas en la libro de Berta von Suttner : «For la batalilojn».<sup>1</sup> Jen kion ŝi skribas pri la kultura stato de Aŭstrio, dum ĝia milito kontraŭ Italujo en la jaro 1859:

«Survoje mi eniris libro-kaj artajvendejon, por aĉeti novan karton de Supra Italujo, la mia estis jam tute truita per la flagpingloj. Ĉeestis krom mi ankaŭ aliaj aĉetantoj. Ĉiuj postulis kartojn, skemojn kaj tiuspecajn objektojn. Nun estis mia vico.

«— Ĉu vi ankaŭ deziras militscenejojn?» demandis la librovendisto. «— Vi divenis.» «— Ne estas malfacile. Oni aĉetas preskaŭ nenion alian.»

Li alportis la dezirataĵon, kaj dum li enpaperigis la karton por mi li diris al sinjoro, staranta apud mi: «— Vidu, s-ro profesoro, nun malprosperas tiuj, kiuj verkas literaturajn kaj sciencajn librojn, aŭ ilin eldonas — neniu ilin mendas. Dum la daŭro de la milito neniu interesiĝas pri la intelekta vivo. Estas malbona periodo por la verkistoj kaj libristoj.»

Por priskribi la nunan staton de ĉiuj militantaj nacioj venkantaĵ kaj venkataĵ, ni ne bezonas elpensi novajn vortojn, novajn frazojn novajn bildojn! Sufiĉas forstreki la jaron 1859 kaj skribi la jaron 1914.

1. Tiu libro aperis en Esperanta traduko nelonge antaŭ la nuna milito.

La krizo ne preteriris ankaŭ la esperantistan vivon. La esperantistoj, kiuj estas alvokitaj al la milito, jam ne povas labori por Esperanto. Kaj la nealvokitaj esperantistoj tiom entuziasmiĝis pro la milito ke ili legas nur sciigojn pri la bataloj, aĉetas diversajn militkartojn kaj tute forgesis pri la ordinara kultura laboro.

Sur siaj postenoj restis nur malmultaj esperantistoj. Ili streĉas ĉiujn siajn fortojn, por ke ne falu kaj ne ruiniĝu la komencitaj, sed ne finitaj konstruaĵoj. Ili pacience daŭrigas sian laboron. Sed iliaj fortoj ne estas senfinaj.

Do, ni alvokas : *rememoru pri via kultura laboro, rememoru pri via Esperantista devo.*

Pri diversaj institucioj de la milito zorgas milionoj da personoj, ilin subtenas miliardoj da mono. En tute alia situacio estas niaj institucioj. Estante tre junaj, ili bezonas seninterrompan subtenon. Sen helpo ili povas pereĝi. Ne lasu ilin solaj. Ili funkciu, kiel funkcias la regnaj, zemstvaj kaj urbaj institucioj. Per serioza rilato al nia afero ni montru, ke ĝi ne estas amuzilo aŭ ludilo. Ni restu sur niaj postenoj. — A. S.

*La Ondo de Esperanto*, Oktobro 1914



Ens permetem fer als nostres diligents delegats dues peticions necessaries per al bon funcionament de la K. E. F.

1.<sup>a</sup> Remetin a l'Administració les matrius de les *membrokartoj* que cobrin, les quals servirán per a establir la llista de noms, o sigui el *nomaro* de la K. E. F., que no ha pogut realitzar-se pel costum de molts dels nostres delegats de no especificar els noms, sinó sols la quantitat, dels federats de llurs poblacions.

2.<sup>a</sup> Trametin a l'Administració tota queixa que tinguin els federats causada per alguna deficiencia, que pugui escapar al bon zel dels encarregats de vetllar per la bona marxa de la K. E. F.

Per endavant, mercès als nostres bons amics que, com de costum, complaurán nostres peticions.

## KORESPONDADO

Mi ricevis el Belgujo interesan artikolon en Esperanto, kiun pro speciala peto de ĝia aŭtoro ni ne publikigis en KATALUNA ESPERANTISTO. Traduko kataluna aperis en «El Poble Català», de Barcelona. Mi klopodos atingi de la aŭtoro la permeson publikigi ĝin esperante, por ke niaj legantoj ĝuu ĝian tre belan stilon. — J. G.

S-ro A. Mosella. Ni ricevis vian kotizon. — S-ro R. R. Mieras. Via kotizo certe venos pere de S-ro J. C. — S-ro. E. A. Reus. Dankon por via letero, kiun parte notis la Administristo. — S-ro J. A. Barcelona. Jes, amiko, ekster la esperantista kampo, ĉiu el ni rajtas, niaopinie devas, propagandi kaj subteni siajn ideojn.

Ĉiu membro de la *Kataluna Esperantista Federacio*, aŭ aboninto al KATALUNA ESPERANTISTO rajtos dufoje dum la jaro publikigi en la gazeto krom sia nomo kaj adreso IO VORTOJN por peti korespondadon, interŝanĝojn de kolektaĵoj, informojn k. t. p. aŭ sciigi ŝanĝon de adreso

S-RO JOSEP VENTURA, Galileu, 165, pral., 1.<sup>a</sup> : Terrassa; deziras kolekti ĉiulandajn popolokantojn kun aŭ sen esperanta teksto. Tincle, li ŝanĝe sendos tiom da katalunaj, kiom da alilandaj li estos antaŭe ricevinta



D-RO J. BREMÓN  
**RADIOJ X**  
Casp, 66 : Barcelona



Leterpapero kaj kovertoj kun verda surskribo **★ Esperanto** eldonitaj de *Ĉiam Antaŭen* (Xifré, 25, Barcelona-S. M.) estas malkare vendataj. 5 paperfolioj kaj 5 kovertoj : 10 centimojn. Samideanoj, aĉetu ilin.

S-ro Josep Grau, Clarís, 72, Barcelona, serĉas komanditilon, por la ekspluato de novaj elektraĵ aferoj

F-ino L. Briggs, West Lea, Armley, Leeds, Anglujo, deziras trovi korespondantojn por junaj fraŭlino kaj sinjoro

**PROPAGANDAJ MARKOJ  
DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO**

Estas vendataj po 1 cent. ĉiu. Por la grupoj aĉetantaj pli ol mil estas farata rabato da 25 %.

HELPU AL LA K. E. F. PER AĈETADO DE ĜIAJ MARKOJ

## AL ĈIUJ FEDERACIANOJ

Subtenu per senlaca klopodado la esperantistan movadon en via urbo

Legu almenaŭ unu esperantan gazeton, kiu vigligos vian entuziasmon

Klopodu akurate pagi vian kotizon al la K. E. F. Ĝi liveros al vi la gazeton

**KATALUNA ESPERANTISTO**

Plialtigu laŭpove vian kotizon, por ke via Federacio havu potencon vivon

Alvarbu por la K. E. F. almenaŭ unu novan samideanon ĉiujare

Preparu vin por la VI<sup>a</sup> Kongreso de la **KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO**

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA PRESORGANO

DE LA



JARO VI<sup>a</sup> : JUNIO 1915

# REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO DE "KATALUNA ESPERANTISTO"

ARIBAU, 55 : BARCELONA

<i>Direktoro</i> . . . . .	FRED. PUJULÀ
<i>Redakcia sekretario</i> . . . . .	JOSEP GRAU
<i>Redaktoroj</i> . . . . .	ESTANISLAU PELLICER JOSEP VENTURA ARTUR DOMENECH
<i>Administristo</i> . . . . .	JOSEP SERRAT
<i>Administracia sekretario</i> . . . . .	JOAN AMADES

## KUNLABORANTOJ

Manuel BORDAS (Barcelona). — D-ro Jascinto BREMÓN (Barcelona). — D-ro Joaquim COLL (Barcelona). — Delfi DALMAU (Bahía Blanca. Rep. Argentina). — Josep DOMENECH (Girona). — Gustau GALCERÁN (Vilanova i Geltrú). — Joan GILI (Barcelona). — A. NOVEJARQUE (Valencia). — Joan ROSALS (Barcelona). — Eulalia ROSELL, Teresa ROSELL (Vilanova i Geltrú).

## KORESPONDANTOJ

B. Nogué (*Manlleu*). — E. Aguadé (*Reus*). — P. Solanas (*Rubí*). — P. Costa (*Santa Coloma de Farnés*). — J. Vidal (*Tarragona*). — M. Solà (*Terrassa*). — F. Guitart (*Vendrell*). — J. Albagés (*Vich*).

Nia devizo: *Moro gilaro galara*

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA  
Kataluna Esperantista Federacio

Asocia sidejo de la K. E. F. : Rambla, 41 : Sabadell (Katalunio)  
Redakcio kaj Administracio de K. E. : Arbon, 55 : Barcelono

## Nia tasko

**A**L ni, esperantistoj, kutimintaj konsideri nian tutan samideanaron, kiel veran frataron, kaj interligintaj amike nian koron kun anoj de ambaŭ bandoj el la nacioj en milito, ĝia eksplodo subita kaj neantaŭvidebla kaŭzis fortan moralan ekdubon.

En la unuaj momentoj, kiam el la nigraj nubegoj la unua fulmotondro eliĝis, ĉiu el ni, sincere sentanta nian *esperon*, demandis al si mem serioze, ĉu li povas, ne apostatante nian pacaman ideon, konservi saman home fratan simpatian por individuoj de ambaŭ militantaj partioj, kaj el la unuaj konkludoj ŝajne alprenindaj elkontrastis certe la ideon, tamen malĝusta kaj erara, ke nia porpaca idealo, ke nia porpaca agado montriĝis utopia kaj senfrukta, kaj ke oni povas pro tio aljuĝi sian simpatian al nur unu el la intermilitantaj popoloj.

Ni ja ne estis kapablaj en la komenco, konscii ke la definitiva argumento mankanta al pacifistoj estas la terura grandega milito; kaj nur iom post iom, kiam la bruado de l' bataloj estis potencita de kelkaj serenaj voĉoj, ni konvinkiĝis, ke la milito kaŭzanta senfinajn mizerojn al la tuta homaro konvertos al pacifismo per la potenca argumento egoismo eĉ la malnoblajn animojn, kiuj estis antaŭe kapablaj ne deziregi pacon, ĉar neniam ankoraŭ milito malutilis al ili. Tiam, kompreninte ke la triumfo de nia pacema idealo povos esti

des pli multe garantiata, ju pli terura milito per si mem estos (kaj tio ne signifas, ke mi persone opinias, ke milito devas esti kiel eble plej kruela), ĉiu, konsiderinte kaj solvinte siaplaĉe la etikan problemon, kia estas esence milito, aligis sian simpatian al unu aŭ al la alia militanto kaj, funde, akceptis la jam neeviteblan, kruelan fakton.

Komprenoble, nacieco, privata koncepto pri honordevo, politikaj, sociaj aŭ religiaj sentoj de ĉiu persono influis la aljuĝon, kaj la unua por la anoj de la nacioj batalantaj fariĝis la ĉefa, natura, decida devo. Serve de tiu nacia devo ĉiu esperantisto de militanta lando klopodis utiligi nian lingvon por efiki favore al sia patrujo per ĉiuj diversaj rimedoj, kaj tial per leteroj, broŝuroj, libroj, flugfolioj oni metis Esperanton al la servo de privata celo, ne komuna al ĉiuj adeptoj de la esperantista idealo.

Tia kvazaŭapologio de milito, aŭ de unu aparta militafero, estis esence neagrabla al nia samideanaro, tiel same ĉu ĝi venas de unu aŭ de alia flanko, kaj oni devis tial, publike rememori, ke estas interkonsentite ke nia lingvo, kiel viva lingvo, taŭgas por ĉio, kaj ke oni laŭ solena, de ĉiuj akceptata deklaro, nomas esperantisto tiun, kiu uzas nian lingvon, *por kin ajn celo* li tion faras.

Efektive, ni rekonas tiun rajton. Sed oni tamen permesos al ni, idealistoj, kiuj ankoraŭ kredas ebla fratecon almenaŭ interindividuan, kiu produktos pli-malpli frue interpopolan pacon, kiu ĵus montriĝis bedaŭrinde tiel facile rompebla, — ke ni eldiru nian ĉagrenon, vidi ke tiu sama Esperanto, kiu estis, kaj estas por ni, simbolo de plej granda, nobla sento, estu pli efika nuntempe en la rolo de granda, utila lingvo, ol en tiu de sankta, nobla semanto de amo kaj frateco. Kaj tiu ĉagreno, ĝenerale, kvankam iajfoje senkonscie, sentata, estis la ĉefa kaŭzo, ke oni trovis neagrabla uzadon de Esperanto, tamen logikan kaj naturan, ĉe propagando pri milito.

Kaj jen aperas, el longa konsiderado pri ĉio skizita, nia konvinko, ke la prefera tasko por la estonteco, kiun ni esperantistoj devos plenumi, estas simple : «Klopodi ke post la milito, kiam malamoj ŝajne eternaj dispartigos la homojn, nia lingvo disvastiĝu kaj enradikiĝu en la mondon, kvankam samtempe, *pli forte kiel fratiga sento, kiel alta idealo porpaca, ol kiel utila, senanima rimedo por interkompreniĝoj.*»

Tiamaniere ni servos lastaloke, krom al moralaj, ankaŭ al materialaj interesoj de la Homaro.

## La Hontulino<sup>1</sup>

DEVIZO : *Enconĝita*

**E**N tiuj ombraj valoj, eterne vualitaj de nebuloj de mistero, nenia okazo pli stranga ol tiu de Ursulino.

Virino matura ŝi estis kaj pli alta ol poplo... tamen neniam iu vidis ŝin mangantan.

Ĉu tagmeze, ĉu vespere, kiam la servistoj de la Farmodomo kolektiĝis ĉirkaŭ la fuma kameno, ŝi trovis la manieron forŝoviĝi. Ĉe la mangohoro, ŝi prenis delikate sian telerekon kaj malrapide elglitis al malhela angulo, sur la ŝtupojn de la korto aŭ al la pasejo de la sojlo, kvazaŭ ŝi intencus malbonagon. Ŝi profitis por forŝтелиĝi la komencon de la mango, kiam ĉiuj geservistoj englutis dentobroge la unuajn kuleraĵojn. Sufiĉe okupitaj ili estis tiam, por atenti pri io alia... kaj ŝi tiam pasis silente kaj milde kiel nubopeco, irante fandiĝi en sia kaŝejo.

Tiel singarde ŝi foriĝis de la ĉies rigardo, ke preskaŭ neniam iu rimarkis tion. Kaj se hazarde iu vidis ĝin, eĉ ne priatentis, pro kutimo. Oni parolis pri tio, kelkafoje, nur kiam ĉeestis ĵus dungita servisto, miranta pri la strangaĵo.

Iun vesperon, je la horo de l' mango, arbohakisto loĝanta de tre malmultaj tagoj en la Farmodomo, demandis kun miro:

— Kial tiel agas, tiu virino?

— Tial ke ŝi hontas, ke oni vidu ŝin...

— Ke oni vidu ŝin mangantan?...

— Jes... — oni respondis al li, ridetante.

— Nu! Ĝi estas tre stranga, tio-ĉi. Se tio estus antaŭ la gemastroj, kompreneble! Jen! mi neniel povis alkutimiĝi, satmanĝi antaŭ ili... Mi ne scias kial... Sed ĝi kaŭzas al mi ian ĉagrenon, ian timon... Ŝajnas ke mi hontas, malkvietiĝas, kvazaŭ mi malrespektus ilin, ĝuante kiam ili ĝuas... Mi trovas ke ĝi estas signo de malspriteco, de maldiligento por servisto... Sed, ĉi-tie en la kuirejo... ĉe ni, estas malsame... Ĉu ne?

— Tion scias plej bone klarigi la paŝtisto... — ekdiris knabino, per buŝo plena. — Li diros ĝin al vi, se li volas...

1. Premiita en la IV<sup>o</sup> Floraj Ludoj de la K. E. F.

Kaj ĉiuj rigardoj de viroj kaj virinoj fiksiĝis sur la maljunulon, kiu ĝis tiam ne estis levinta la kapon nek malferminta la lipojn. Kvazaŭ li vekigis el malvigleco promedita, la paŝtisto levis sian kapon tute plenan de sulkoj, tute vestitan de blankaj haroj, kaj eldiris ĉi-tiujn vortojn:

— Mi pensas ke tio estas ia honto. Tion, kion Ursulino faras, mi jam vidis ĉe aliaj virinoj... Oni sin kaŝas por vesti kaj malvesti sin. Ni ne volas esti tiaj, kiel la bestetoj de Dio, montrantaj ĉe taga humo la malvirtemojn kaj la ĝojojn de la karno. Manĝado estas por la mortuloj, korpa plezuro, kaj montri la plezuron estas honta afero... Tial ekzistas sanktaj animoj, kiuj tion kaŝas je la rigardo de similuloj... Se ili povus seniĝi je la buŝa plezuro... eble ili senigus sin je ĝi. Sed manĝado estas vivordono kaj ĉar naskiĝinta estaĵo ne povas seniĝi je ĝi, ili almenaŭ apartigas ĝin el la mondanaj okuloj kiel mizeraĵon. Ĉar homa mizeraĵo eble estas por Ursulino tio, kio estas ĝojo por la ceteraj kaj por ne ofendi ilin, ŝi celas enterigi en la solecon tiajn hontojn.

La servistoj de la Farmodomo restis revemaj, kvazaŭ ili malfacile komprenis la vortojn de la paŝtisto.

Sed, fine, la knabino de la buŝo plena aldonis, viŝante siajn lipojn per la mandorso:

— Se vi sciuz, kiom ni suferis, kiam ŝi ekmalsaniĝis antaŭ unu jaro, vi certe mirus. La lito ŝajnis al ŝi tro komforta por ke ŝi ripozu, kaj nek pete nek riproĉe oni tie povis kuŝigi ŝin. Fine ni decidigis ŝin dirante ke la mastrino tion ordonis. Sed tiam venis la manio pri la mango, ĉar... mangajon ŝi neniel volis. Tial ke ŝi ne povis nemanĝi antaŭ ni, ŝi diris ke ĝi ne plaĉas al ŝi... \*— Sed manĝu, nulu \*— Ne, ne... \* Kaj ŝi metis sian kapon sub la kovrotukon. Fine ni vidis, ke ni ne povas venki ŝian honton, kaj tiam ni metis la teleron apud la liton kaj lasis ŝin sola dum kelka tempo. Se la malsato tro turmentis ŝin, kiam ni revenis, ni trovis la teleron malplena kaj la kapon kovrita per la litotuko, kvazaŭ ŝi faris malbonagon.

Kaj, kiam la knabino ankoraŭ ne estis fininta tiujn-ĉi vortojn, Ursulino eliris el sia kaŝejo, senpeze, silentema, kun sia malplena telereto duone kovrita per pinto de sia antaŭtuko. Ĉiuj rigardis ŝin. Kaj sentante sur si la rigardojn, la malfeliĉa Ursulino sendube konis ke oni parolas pri ŝi, ĉar ŝi ruĝiĝis kiel koĉenilo kaj mallevis la okulojn, hontinte.

RAIMÓN CASELLAS

Tradukis MARIAN SOLÀ

**Ĉu vi konas...?**<sup>1</sup>DEVIZO : *Mortinto*

Ĉu vi konas la dezirojn  
la sennomajn, senmezurajn,  
Kiuj sensprigitas virojn  
kaj virinojn ĉastajn, purajn?

Ĉu vi konas la dezirojn  
la similajn al noktuoj  
Fantomecaj, — la delirojn  
svarmflugantajn kiel gruoj?

Ĉu somerajn noktojn konas  
vi, dum kiuj vageraras  
Vi sub arboj, kiuj sonas  
kaj al vi la vojon baras?

Ĉu pasioj jam pikmordis  
vian koron — ĝis la sveno —  
Ke ĝi fortosena tordis  
sin en prema la kateno?

Ĉu mortigi vi deziris  
vin per viaj propraj manoj,  
Ĉar doloroj vin disŝiris  
kiel iloj de Satanoj?

Ĉu furioj nekonitaj  
pelis vin de lok' al loko,  
Ĉu pro larmoj neploritaj  
vin minacis la sufoko?

Ĉu vi kuŝis senkonscie  
pro dolora sopiremo,  
Dum el brusto agonie  
ŝiris sin singulta ĝemo?

Ĉu vi en la vejnoj sentis  
sangon bolan kiel flamo:  
Tiam ankaŭ vin turmentis  
kiel min : Soif' je Amo.

† KARL FRANKE

1. Dua mencio en la IV<sup>o</sup> Floraj Ludoj de K. E. F.

## VI<sup>a</sup> Kongreso de la K. E. F.

**M**ALMULTON ni povas hodiaŭ diri al niaj legantoj pri nia Kongreso, ĉar ĉiujn detalojn pri ĝi ni donis jam en la pasinta numero de KATALUNA ESPERANTISTO. Ni povas nur diri ke la Organiza Komitato konstante laboras, preparante la festojn kaj klopodante interesigi al nia afero la enloĝantojn de la kongresurbo, kiuj montriĝas tre favoraj, kiel atestas bone la helpo donita de la aŭtoritatuloj, distingindaj personoj kaj societoj al niaj Floraj Ludoj kaj tiu promesita por nia Kongreso.

Kelkaj federaciaĵoj esprimis al ni sian ĝojon pri la aranĝo de la Kongreso, ĉar ĝi estas tia, kiu plene alkonformiĝas al la cirkonstancoj de la nuna momento. Tiu aranĝo faciligas la ĉeestadon precipe al tiuj, kiuj disponas nur je la festotago, en kiu okazos la ĉefaĵoj de la Kongreso.

Resume ni diras, transskribante ĉi tien la esprimon de multaj samideanoj : La Kongreso en Vilanova montros la resaniĝon de la reformiĝanta Federacio kaj la komencon de vigla tasko propaganda en- kaj eksterlanda.

Ni konfidu : la afero marŝas bone!



## V<sup>aj</sup> Floraj Ludoj de la Kataluna Esperantista Federacio

### EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- XII. De S-ro JOAN AMADES : *Al la plej bona propaganda broŝuro por katalunoj, simila al la franca ruĝa broŝuro*. PREMIO : 50 libroj kaj broŝuroj en Esperanto. (Ties liston havigos la Redakcio de KATALUNA ESPERANTISTO.)
- XIII. De KATALUNA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ : *Originala aŭ tradukita broŝuro 15-50 paĝa, pri porkatolika afero*. PREMIO : Senpaga jarabono al Kataluna Katoliko kaj Artaĵo. — La rajton presigi la broŝuron en la daŭro de unu jaro, estas rezervata al la K. L. de K. E.

## Dekunua Universala Kongreso de Esperanto

*San Francisko (Kalifornio). 22-29 Aŭgusto 1915*

### DUA CIRKULERO

La *Dek-unua Universala Kongreso de Esperanto* okazos en San Francisko. Tuj post la apero de nia Unua Cirkulero, venis de Edinburgo la informo, ke la *Dek-unua* ne povos tie okazi. Samtempe la Konstanta Komitato de la Kongresoj en Parizo sciigis al ni, ke, interkonsente kun Edinburgo, oni akceptas nian proponon, okazigi la *Dek-unuan* en San Francisko je la datoj anoncitaj por la Tutpacifika Esperanta Kongreso, kiu sekve de tio estas nuligata.

Nia Kongreso do ricevis la oficialan titolon: *Dek-unua Universala Kongreso de Esperanto*, kaj niaj komitatoj, helpataj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, kaj de la Edinburgaj samideanoj, jam entreprenis kun pliigita entuziasmo la necesajn preparojn por nia grava jarfesto.

Sentante la honoron, kiun ni havos per gastigo de la *Dek-unua*, ni estas ree eklaborintaj, por ke nia kongreso bone meritu sian gravan lokon inter la imponantaj Universalaj Kongresoj de nia movado. La afabla kunlaboro de niaj pli spertaj eksterlandaj samideanoj certigas, ke sukceso kronos niajn laborojn.

Kora Bonveno, gefratoj, vin atendas en San Francisko!

### LA KOMITATO

La adreso de la Kongreso estas simple: *Esperanto Kongreso*, San Francisko.



*El la unua cirkulero ni transskribas:*

La planoj por la Tutpacifika Esperanta Kongreso rapide progresas kaj estas evidente ke niaj samideanoj preparas feston, kiu restos longe en la memoro de la partoprenantoj. Neniam ĝis nun okazis esperanta Kongreso inter tiom da allogaĵoj. Kalifornio mem, kun siaj mondkonataj mirindaĵoj, sufiĉas por venigi ĉiujare multajn milojn da

plezurserĉantoj. Nia klimato estas plej modera kaj agrabla dum la tuta jaro; kaj nun, aldone al tio ĉi-tio, okazas la plej imponanta universala ekspozicio.

La kotizaĵo de la Tutpacifika Esperanta Kongreso estas 10 Sm. Ni rekomendas aliĝi kiel eble plej frue, por ke niaj aranĝoj ne estu malhelpataj. Helpkongresaj kartoj kostas 5 Sm. kaj rajtigas ricevi ĉiujn eldonaĵojn de la Kongreso, la oficialan simbolon, la programojn de la kunsidoj, kaj seriojn da kongresaj kaj San Franciskaj markoj kaj poŝtkartoj kun esperanta teksto.\*



Pri mia artikolo «Neŭtrala» aperinta en nia numero de Marto-Aprilo, mi ricevis kelkajn aprobaĵajn opiniojn, kiujn mi tutkore dankas. Ankaŭ S-ron Cart mi dankas, ke li ne reparolos pri la aludita afero, ĝis kiam nia tuta samideanaro povos eldiri sian opinion, ĉar, kiel diras unu el la korespondantoj, *«ne estas konvene nun, dum la kanonoj parolas sur la batalkampoj kaj dum pli ol unu esperantisto sur ambaŭ flankoj mortas kiel heroo, denove komenci malagrablan diskuton pri la malnova afero. Sed post la milito oni ne silentu pri la opinio de S-ro Cart»*.

J. G.

En la proksima numero ni komencos la publikigon de

## Belulino kaj la Besto

TEATRAĴETO POR LA INFANOJ

Originale verkita de F-ino **Louise Briggs**

PREMIITA EN LA IV<sup>a</sup> FLORAJ LUDOJ DE LA K. E. F.

## BIBLIOGRAFIO

**KARAKTERO**, laŭ J. M. Van Stipriaan Luiscius, advokato en Hago. Tria plivastigita kaj plibonigita eldono, tradukita laŭ la 8<sup>a</sup> eldono de l'Nederlanda originalo. Prezo : 0'52 fl. - 0'2 Sm. Librejo Espero. Hago.

Jen ŝatinda libreto verkita per flua Esperanto, kies multaj eldonoj atestas pri ĝia valoro. Nia opinio pri ĝi estis dirata, kiam nia TAMEN recenzis la unuan kaj duan eldonojn. Kelkaj makuletoj estis korektitaj en la tria eldono, kin per tio fariĝis pli multe interesa ol la antaŭaj.

**CARLO BOURLET**. Paris. Grupo Esperantista, 51, rue de Clichy. 1914. Prezo : 0'75 fr.

La Grupo Esperantista de Paris decidis eldoni broŝuron kun biografio de Carlo Bourlet, ĝia bedaŭrinda Prezidinto, por ke ĝi estu memorigilo pri liaj belaj kvalitoj. Ni legis kun korprema ĉagreno la memorlibreton. Ni relegis ĝin ankoraŭ kelkajn fojojn. Kaj ĝin ni relegos, kiam nia kuraĝo ekŝanceliĝos, por ricevi ekzemplon de firma konstanteco. Rekomendinda legaĵo ankaŭ por ĉiuj samideanoj!

**LA TAGIGO!** Kanto Esperantista. Originale verkita de A. Grabowski. Muziko de Baranski. Dua preso laŭ permeso de l' aŭtoro. 1915. Eldono de J. L. Bruijn. Hago. Prezo : Sm. 0'125.

La inspiroplena versaĵo de Grabowski estis talente enmuzikigita por kantado. Certe ĝi tiamaniere fariĝos nia dua himno.

**FUNDAMENTAJ DOKUMENTOJ** pri la Oficialaj Institucioj de Esperanto. 1914. Paris. Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy. Prezo : 0'25 fr.

**NAUA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.** (Bern, 24-31 Aŭgusto 1913). Paris. Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy. Prezo : 3 fr.

**ESTATUTOS del Ateneo Esperantista de Bahía Blanca** (Rep. Argentina), broŝuro en Esperanto kaj kastila lingvo.

ALGUNOS HECHOS Y VERDADES QUE DEBEN SER CONOCIDOS. Delfi I. Dalmau, Ateneo Esperantista, str. 19 de Mayo, 151. Bahía Blanca (Argentina). Prezo 0'20 Sm.

Nia tre kara Dalmau, nia kataluna samideano, kiu trans la maro daŭrigas la intenan propagandon, kiu ĉe ni tiel helpis al la disvastigo de nia lingvo, verkis per hispana lingvo la plej simplan, energian, kaj konvinkan broŝuron de propagando, kiun ni legis. Koncize li elcitas fakton post fakto favoran al nia lingvo kaj oni sentas, ke li de la komenco ĉizas bele kaj lerte la ĉenon de faktoj kaj veroj, kiujn ĉe la fino de ĉi broŝuro kaptas vin kaj .... konvinkas. Mi pensas, ke kontraŭesperantisto konscia aŭ senkonscia, kiu legis tiun broŝuron nepovas konservi trankvilecon en konscienco, se li ne klopodis lerni nian lingvon. La ordigado de la faktoj kaj la simpla energieco per kiuj ili estas montritaj invitas al reŝegado, ĉar la verko estas kvazaŭ sintezo de ĉiuj argumentoj por nia kara lingvo. Mi kredas tiel, ke miaj propagandistoj salutos la aperon de tiu broŝuro kun vera ĝojo, ĉar ĝi simpligos tre multe ilian taskon.

Por montri la verecon de miaj asertoj mi transskribos nur la jenan paragrafon :

«Hemos de defender el esperanto, malgrado estar de su lado la ciencia y la razón, porque la vanidad humana y la pedantería intelectual crean prejuicios en quienes carecen de nociones, y los labios profanos profieren juicios desfavorables — ¡poco importa sean falsos cuando falta conocimiento de causa! — para substituir o justificar la propia ignorancia; juicios generalmente tanto más funestos cuanto más fuerte es la inteligencia desconocedora del esperanto, que los dicta.»

Al nia amiko Dalmau plej koran gratulon. Li havigis al ni juvelon.

BATALO DE SENLIS. Dijon. Imprimerie Darantière, 13 rue Paul Cabet. 1915. Prezo ne montrata.

Panegira verko pri la morto de franca leŭtenanto Fauvart Bastoul, konata esperantista verkisto, fervora kaj eminenta samideano, filo de gesinjoroj Fauvart Bastoul, kies esperantisteco estas tiel alte ŝatata. La legado de tiu libro kunsentigas de ni la doloron kaj ĉagrenon de la gepatroj, kies sola konsolo povas esti la penso, ke ilia amata filo mortis heroe en la plenumo de sia devo.

ALDONO AL LA TUTMONDA JARLIBRO ESPERANTISTA 1913-1914. Paris. Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy.

**LA VERO PRI LA MILITO.** Oficiala dokumentaro esperantigita el germana lingvo. Prezo 50 Pf. Komisia eldono Esperanto-Centrale, Dresden. A. 1.

**UNUA RAPORTO** prezentita al Sinjoro Ĉef-ministro de la Franca Respubliko, de la Kopuisono starigita por konstati la agojn faritajn de la malamiko malrespekte al la leĝoj de la popolrajto. Kun antaŭparolo de Tristan Bernard. Eldono de la Komitato «Por Francujo, per Esperanto».

**KJON PENSAS NEUTRALULOJ PRI LA MILITO.** — **PRI LA BELGA NEUTRALECO,** flugfolioj eldonitaj de la Komitato «Por Francujo, per Esperanto».

Tiuj kvar presaĵoj, du broŝuroj kaj du flugfolioj, verkitaj per korekta Esperanto, fariĝos plej interesaj por kontroli kelkajn nun dubajn aferojn, kiam la milito estos finita. Tiam, ili ankaŭ tre bone taŭgos por montri ke Esperanto, kiel lingvo, estas kapabla esti uzata por tre diversaj celoj.

**INTERNACIA BULTENO,** duonmonata informilo pri la Milito. Administracio : Internationale Korrespondenz Argus, Berlin S 59.

Esperanta bulteno, rakontanta laŭ germana vidpunkto per korekta lingvo okazintaĵojn el la milito.

**BULLETIN D'INFORMATION ESPÉRANTISTE** publié par un Comité d'Amis de l'Esperanto. Red. et Adm. 51, rue de Clichy, Paris.

Eldono en franca lingvo de la «Informa Bulteno», kiu aperis kiel suplemento al la «Oficiala Gazeto». Ĝi favoras la francan vidpunkton pri la milito.

**BULLETIN OFFICIEL** de la Société Française pour la Propagation de l'Esperanto. Secretariat : 33, rue Lacépède, Paris.

Anstataŭ «La Movado» organo de la S. F. p. p. E. aperas tiu Bulteno france verkitaj, kiu raportas pri la esperantista movado en Francujo.

MALGRAŬ

## ENLANDA MOVADO

S-ro Pujulà, kiu restadas sur la pafinio en Francujo, sendis al ni en la lastaj tagoj interesajn sciigojn pri sia sano per bonhumora, esperoplena letero. Li esperas, ke li povos ĉeesti nian Kongreson en Vilanova. Nenecese diri, kiom ĝoje ni vidos la efektivigon de la espero de nia tre kara amiko.

**BARCELONA.** — Unu el niaj redaktoroj, interkonsente kun la Komitato de la K. E. F. klopodis atingi de la direktanta komitato de la Barcelonaj Skoltoj (*boy-scouts*) la malfermon de kurso de Esperanto, kiu okazis la 19<sup>ma</sup> de Majo pasinta en la sidejo de tiu Asocio. Klarigas ĝin nia kunredaktoro S-ro Arturo Domenech kun ĉeesto de ĉirkaŭ trideko da entuziasmaj lernantoj.

Ne bezone estas konstati la gravecon de ĉi-tiu novaĵo, ĉar ĉiuj konas tiun simpatian institucion, kies celo tiel analogia estas kun tiu nia (ĝi ja celas, kiel ni, interhoman pacon) kaj kies disvastiĝo, kiel tiu nia, pli kaj pli tiel progresas en multaj diversaj landoj. Tamen ni devas rimarkigi la grandan profiton, kiun signifas por nia afero la oficiala akcepto de Esperanto en organizaĵo *freskaŭ oficiala* en nia lando, ĉar tio estas pruvo de proksima definitiva venko eĉ en tute oficialaj sferoj.

Ni esperas, pli bone, ni estas tute konvinkitaj, ke plena sukceso kronos la laboron de nia amiko S-ro Domenech kaj ke baldaŭ la imitinda ekzemplo de la barcelonaj skoltoj estos imitita de alilandaj samaj organizaĵoj per la efiko de la esperanta korespondado, kiun sendube, starigos niaj junaj novaj samideanoj post ne longe kun la ceteraj skoltaj grupoj en la tuta mondo.

Niajn gratulojn al nove varbitaj esperantistoj, ĉefe al S-ro Cò kies klopodoj tiel helpis la oficialigon de Esperanto en la barcelona skoltaro, kaj niajn kuraĝigojn al S-ro Domenech, komisiito de K. E. F. kiel instruisto por la nova kurso.

— Publikaj ekzamenoj de ambaŭgradaj kursoj de Esperanto, kiujn D-ro Pastro Coll gvidis en la Universitato, okazis la 1<sup>ma</sup> kaj 2<sup>ma</sup> de Junio. Pri ili kaj pri la konkurso por la premio «Universitato» ni raportos per la venonta numero.

— La festo, kiun la grupo *Barcelona Stelo* okazigis la 22<sup>ma</sup> de majo en sia sidejo, havis tre bonan sukceson. La gegrupanoj F-inoj

M. Grau, M. Rey kaj C. Navas, S-roj J. Guixà, D. Delclòs, P. Trull kaj J. Viñas ludis tre bone la spritan katalunan esperantan komedion «Vivu Esperanto» kiun la ĉeestantoj multe aplaŭdis. Oni ankaŭ prezentis la konvinkan teatraĵon «La Renkonto» speciale aranĝitan, kiun ludis F-inoj A. kaj C. Leonor, kaj S-roj Ledergerber, Vannier, kaj Coca. Ĉiujn aktorojn, kies amatora ludado estis tre laŭdata, oni multe aplaŭdis. La fraŭlinoj partoprenintaj en la prezentado ricevis belan bukedon, atestantan la simpatian kaj dankon de la grupo al la belaj helpantinoj.

Oni montris publike la ĝeneralan simpatian al niaj kamaradoj J. Delclòs kaj J. Guixà, kiuj post longa forrestado revenis inter nin, per dokumento subskribita de ĉiuj grupanoj kaj amikoj, kiun donis al li solene la prezidanto de la grupo.

Poste okazis balo, kiu finis gaje la agrablan feston, kiun briligis per sia beleco multenombraj fraŭlinoj, kies nomojn ni ne citas por ne riski bedaŭrindajn forgesojn. Tial ankaŭ ni ne citas nomojn de samideanoj ĉeestantaj, inter kiuj estis multaj pioniroj kaj fervoruloj.

— En societo *Paco kaj Amo* estis malfermata al publiko dum pasinta Majo, ekspozicio pri grafikaj artoj; ĝi estis rezultato de interŝanĝo kun fremdaj tipografiistaj samideanoj, pri metiaj aferoj.

La organizinto, S-ro P. Brunet, volis montri la taŭgecon de Esperanto, koncerne la metiojn; tial, en la inaŭgura festo li klarigis tion per parolado, kiun oni presigos por disdonadi kiel propagandilon. Tiu ekspozicio estis multe vizitata kaj laŭdata. Nian gratulon.

**BARBARÀ DEL VALLÈS.** — *Esperanta Nesto* kunvenis la 18<sup>aa</sup> de marto por elekto de la Komitato; estis elektitaj post unuanima voĉdonado : *Prezidanto* : S-ro Josep Planas, Pastro; *Vic-prezidanto* : S-ro Joan Arnella M&S; *Kasisto* : S-ro Salvador Arnella; *Sekretario* : M. del Pilar Puigbonet; *Konsilantoj* : F-ino Enriqueta Soler Viladrich kaj Antonia Renom Padró.

**GIRONA.** — *Esperantista festeno.* — La 25<sup>aa</sup> de Aprilo la ĝeronaj esperantistoj solene festadis la adiaĵon de la famkonata pioniro, S-ro Jozefo Domènech, ĵus gradita kapitano, kiaokaze li forlasis Ĝeronon por transloĝigi al Reus.

*Ĝerona Espero*, kies sekretario kaj profesoro senlaca li estis, organizis je lia honoro sukcesan festenon, invitante ĉiujn grupojn de la Ĝerona Provinco, kiuj alsendis reprezentanton aŭ aliĝon. Ankaŭ la ĉiutaga loka preso havis reprezentantojn.

Kvardek-unu kunmangantoj, inter kiuj distingigis krom S-ino

Domènech, la ĝentilaj kaj belaj esperantistaj fraŭlinoj Maymí, Moner, Barber, Bernades, Casademont, Moré kaj Bescós, gaje, babile kaj kun enviebla apetito ekspedadis la bongustajn kaj sufiĉegajn manĝ-trinkaĵojn, servitajn de nia samideano S-ro Moré ĉe la Hotelo de l' Komercio.

Kiam oni enverŝis la ĉampanon, korskentaj tostoj estis elparolataj de S-roj Ferrer, P. Costa, Feliu el Anglés, J. Costa, Gomez kaj P-tro Casanovas, Prezidanto de *Ĝerona Espero*. S-ro Domènech per elokventaj esperantaj vortoj dankegis la regalantojn kaj adiaŭdiris ilin, konstatante sian simpatian por la ĝeronanoj kaj precipe por la esperantistoj, kun kiuj li gustumis tiel longtempe la korajn sentojn, naskitajn de la uzado kaj propagando de tiu fratiga internacia lingvo, kiu nun bedaŭre suferas eklipson pro la malbenita monda milito. Li finis per vivoj al Ĝerono kaj al D-ro Zamenhof, kaj ĉiuj kunmanĝintoj stare kronadis la feston per ĥorkanto de la *Espero*.

Senpere en la ĝardeno de l' Hotelo la festena grupo estis fotografita.

Je la 6<sup>a</sup> vespere kunvenis en la grupsidejo de *Ĝerona Espero* multaj gesamideanoj por malkovri belan portreton de S-ro Domènech kiu restos prezidanta la lernan fakon de la belega salono, por inspiri varmon kaj lernemon al ĉiuj ĝisnunaj disĉiploj kaj por allogi novajn studentojn.

Post kormova paroladeto de S-ro Prezidanto kaj dankesprimado de nia estimata kaj bedaŭrata profesoro, finiĝis la festo per rekanto de la *Espero* kaj koraj vivoj.

La ĝeronaj esperantistoj pere de KATALUNA ESPERANTISTO reesprimas sian bedaŭregon kaj dezirojn de ĉiamdaŭra feliĉeco, kune kun lia estiminda edzino, al S-ro Domènech, senlaca kaj vere neanstataŭebla samideano, kiu povas esti konsiderata kiel instruisto de la preskaŭ tuta ĝerona esperantistaro. — *Ĝeronano*.

**TARRAGONA.** — Pri parolado farita de la prezidanto de *Frateco* de Zaragoza, S-ro Benigno de Luna, ni publikigos raporton en la venonta numero.

**TERRASSA.** — Dum la Karnavalaj Festoj ĉiujare pli sukcesaj estis organizata bela kavalkado, en kiu partoprenis kelkaj el niaj samideanoj per ornamita veturilo; prezentigis bona okazo por propagando kaj tial estis disdonitaj dum la traveturado 100 katalunaj ŝlosiloj kaj du mil folioj «Tot l'Esperanto en una fulla konvene aranĝitaj».

— La 14<sup>ma</sup> de Marto, je la sesa vespere, S-ro J. Bassó faris interesan prelegon pri la romepokaj preĝejoj de Egara, kiun plezure aŭskultis niaj gegrupanoj; klarigajn desegnojn verkis li mem sur la tabulo.

— Estas malfermita nova konkurso de tradukado por la anoj de *Lumon*. — *La Korespondanto*.

**VALENCIA.** — La «Federación Esperantista Levantina», kies sidejo translokiĝis al str. Mar, n.º 23, elektis en kunsido la 16<sup>ma</sup> de Majo la jenan Komitaton.

*Prezidanto* : S-ro Andres Piñó, advokato (Colón, 34, Valencia). *Vicprezidantino* : S-ino Dolores Batllés de Eced (Teruel). *Sekretario* : S-ro Armando G. Echevarría (Jerusalem, 29, Valencia). *Vicsekretario* : S-ro Fernando Soler Valls (Enguera). *Kasisto* : S-ro Manuel Millás Sagreras. *Reprezentantoj* : S-roj Ricardo Codorniu (Murcia), J. Aguilar Blanch (Valencia), Domingo Talens (Alcoy), Alfredo Saralegui (Almería), Rafael Pardo (Castellón de la Plana). *Kontisto* : Francisco Esteve (el la grupo *Antaŭen*).

Tiu komitato havis la afablecon sendi al la Prezidanto de la K. E. F. varman saluton. Ni deziras al la F. E. L. plej fruktoportan longan vivadon por la bono de nia lingvo. Kuraĝe antaŭen, karaj gefratoj!



## ADMINISTRACIAJ AFEROJ

Ĉiuj federacianoj kontentige respondis al la klopodoj faritaj de la Administracio de la K. E. F. por reorganizi la funkciadon de la *Asocio* kaj garantiĝi la regulan aperadon de ĝia presorgano. Pro tio la Administristo esprimas ĉi tie sian plej koran dankon al ĉiuj helpemaj kunfederacianoj.

Sed oni ne pensu, pro tio dirita, ke ĉiuj aferoj restas solvitaj, kaj ke oni jam povas nezorgi pri ili. Kontraŭe ni opinias; ĉar nun, kiam ĉio bone marŝas, oni devas plej multe atenti por eviti halton subitan kaj danĝeran. Tial la Administracio kuraĝas fari la sekvan-tajn petojn.

*Al la izolitaj federacianoj* : Klopodu alvarbi al nia ideo almenaŭ unu personon en via urbo aŭ vilaĝo. Li fariĝos via kunulo kaj vi povos pli facile konservi la flamon de entuziasmo, kiun vi varmigos certe per legado de nia gazeto KATALUNA ESPERANTISTO.

*Al la federacianoj de urboj, kie grupo ekzistas* : Ĉestu kiel eble plej konstante la grupajn kursojn kaj kunvenojn. Penu aligi al la K. E. F. viajn kamaradojn, kiuj tiamaniere kontribuos al la prospero de nia ideo.

*Al la delegitoj* : Afable ricevu kaj transdiru al la Administracio ĉiun plendon faritan de federaciano. Estos plezuro por la Administracio, komplezi ĝin. Kolektu akurate la kotizaĵojn kaj sendu ilin al la Administracio, str. Aribau, 55 : Barcelona, kiel eble plej baldaŭ por ke la taskoj de la Federacio estu oportune plenumitaj.

*Al ĉiuj* : Certe vi sentas vin ĝojaj, kiam vi ricevas ĉiun numeron de nia gazeto. Certe vi estas fieraj, kiam vi povas ĝin montri al neesperantisto por lin konvinki pri la forto de nia movado. Certe vi elĉerpas plezuron el la legado de la verkoj en nia gazeto aperantaj, kiujn ĝia Redakcio klopodas fari ĉiujfoje pli interesaj. Certe via esperantista sento plifortiĝas, ĝuante la festojn kaj solenaĵojn de niaj Kongresoj. Certe vi interesiĝas al la Esperantistaj Floraj Ludoj, kiuj dum la kongresoj okazas.

Ĉio ĉi-tio estas subtenata nur per la kotizaĵoj, kiujn vi pagas. Se vi pagas ilin malfrue vi nevole malhelpetas la sukceson de nia laboro.

Klopodu do pagi kiel eble plej baldaŭ vian kotizaĵon al la delegito en via urbo, aŭ rekte al la Administracio de la K. E. F. str. Aribau, 55 : Barcelona per poŝtmandato (*Giro postal*) aŭ per poŝtmarkoj. Se vi bone povas, aldonu al la malgranda jarkotizo da 3 peŝetoj, iun eĉ malgrandan sumon, kiu faciligos la plenumon de la devoj de la K. E. F.

*Al la laboremaj samideanoj* : La Redakcio de KATALUNA ESPERANTISTO bezonas la helpon de amikoj, kiuj volus fariĝi *Korespondantoj*. Ili ricevos rajtigan karton pri sia ofico. Ilia tasko estas, sendi ĉiun monaton raporton *katalune aŭ esperante* al la Redakcio pri la movado en sia urbo.

AL LA ESPERANTAJ GAZETOJ : Bonvolu noti la Administracian adreson : str. Aribau, 55. Barcelona.

JOSEF SERRAT I PARÉS



## KORESPONDADO

S-ro Ro. Ŝo., Torquay. Via ago estas plej laŭdinda, des pli multe en la aktualaj momentoj, kiam la milito malhelpas certe la disvendadon de via ŝatinda libro. Ni gratulas vin tre sincere. — S-ro P. Blanc, Toulon. Dankon por la sciigoj pri niaj Floraj Ludoj aperintaj en *La République du Var*. — S-ro V. Cimr. Dankon por via artikolo, kiu aperos, kiam estos eble.

Ĉiu membro de la *Kataluna Esperantista Federacio*, aŭ aboninto al **KATALUNA ESPERANTISTO** rajtos dufoje dum la jaro publikigi en la gazeto krom sia nomo kaj adreso **IO VORTOJN** por peti korespondadon, interŝanĝojn de kolektaĵoj, informojn k. t. p. aŭ sciigi ŝanĝon de adreso

---

**S-ro Josep Ventura**, Galileu, 165, pral., 1.<sup>a</sup>: Terrassa; deziras kolekti ĉiulandajn popolkantojn kun aŭ sen esperanta teksto. Tiucele, li ŝanĝe sendos tiom da katalunaj, kiom da alilandaj li estos antaŭe ricevinta

---

**F-ino L. Briggs**, West Lea, Armley, Leeds, Anglujo, deziras trovi korespondantojn por junaj fraŭlino kaj sinjoro

---

**Henri Rabaut**, Sergent 4.<sup>e</sup> de ligne, Camp de Harderwyk (Holando) korespondos volonte kun unu kataluna samideano

---

**S-ro Sebastiano Chaler**, Strato S. Mariano, 124 : Terrassa; amike korespondos kun ĉiulandaj gesamideanoj

---

**PROPAGANDAJ MARKOJ  
DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO**

Estas vendataj po 1 cent. ĉiu. Por la grupoj aĉetantaj pli ol mil estas farata rabato da 25 %.

**HELPU AL LA K. E. F. PER AĈETADO DE ĜIAJ MARKOJ**

# KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

ASOCIA SIDEJO : RAMBLA, 41. SABADELL

MINIMUMA JARA KOTIZAJŬO : 3 PESETOJ

La aliĝintoj ricevas senpage la gazeton

**KATALUNA ESPERANTISTO**

kiu aperas kiel eble plej regule, laŭ la regulo 3<sup>a</sup> de la Regularo  
de K. E. F.

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

## KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA PRESORGANO DE LA

**KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO**

Redakcio kaj Administracio : Arribau, 55. Barcelona

SENPAĜA POR LA GEFEDERACIANOJ

JARABONO POR LA CETERAJ SAMIDEANOJ KOSTAS

ENLANDE : 4 PESETOJN

EKSTERLANDE : 2 SPESMILOJN

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA PRESORGANO

DE LA



JARO VI<sup>a</sup> : JULIO 1915

## REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO DE "KATALUNA ESPERANTISTO"

ARIBAU, 55 : BARCELONA

<i>Direktoro</i> . . . . .	FRED. PUJULÀ
<i>Redakcia sekretario</i> . . . . .	JOSEP GRAU
<i>Redaktoroj</i> . . . . .	ESTANISLAU PELLICER JOSEP VENTURA ARTUR DOMENECH
<i>Administristo</i> . . . . .	JOSEP SERRAT
<i>Administracia sekretario</i> . . . . .	JOAN AMADES

### KUNLABORANTOJ

Manuel BORDAS (Barcelona). — D-to Jascinto BREMÓN (Barcelona). — D-to Joaquim COLL (Barcelona). — Delfi DALMAU (Bahía Blanca, Rep. Argentina). — Josep DOMENECH (Reus). — Gustau GALCERÁN (Vilanova i Geltrú). — Joan GILI (Barcelona). — A. NOVEJARQUE (Valencia). — Joan ROSALS (Barcelona). — Eulalia ROSELL, Teresa ROSELL (Vilanova i Geltrú).

### KORESPONDANTOJ

B. Nogué (*Manlleu*). — E. Aguadé (*Reus*). — P. Solanas (*Rubi*). — P. Costa (*Santa Coloma de Farnés*). — J. Vidal (*Tarragona*). — M. Solà (*Terrassa*). — F. Guitart (*Vendrell*). — J. Albagés (*Vich*).

Nia devizo: *Maro estas gularo*

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA  
**Kataluna Esperantista Federacio**

Asocia sidejo de la K. E. F.: Rambla, 41 : Sabadell (Katalunoj)  
Redakcio kaj Administracio de K. E. : Arden, 55 : Barcelona

## Insisto

**K**e la plenumon de la tasko, kiun mi aludis per mia lasta artikolo<sup>1</sup>, oni atingos nur per vigla laborado, mi plene konsciis. Kaj ankaŭ, ke multaj personoj, en kiujn la milito-fakto forte impresis, multe dubos, ke tia tasko povos sukcesi.

Tamen, intence mi ne montris apud la celo la rimedojn por ĝin atingi, nur pro tio, ke mi esperis, ke oni ilin sufiĉe konas por ke mi povu ŝpari superfluan montradon. Hodiaŭ mi reprenas tiun temon por diri, kion laŭ mia opinio devas jam nun fari nia samideanaro, precipe tiu de neŭtralaj landoj; ĉar nur pri tiu punkto ne akordiĝas ĉirkaŭ mi la opinioj.

Bedaŭrinde, ŝajnas ke la esperantistoj de landoj militantaj, kiuj ĝis nun en servo de sia patrujo utiligis nian lingvon por kontraŭbatali la ĝeneralajn asertojn de la malamiko ankaŭ per Esperanto esprimitajn, estas sur la vojo kulpigi je la vereco aŭ malvereco ilia, ne la ĉefajn fontojn, kie la esperantistoj ĉerpis la sciigojn, sed ja la esperantistojn mem, forgesante ke propagandon pri la milita vero ĉiu faris kompreneble laŭ vidpunkto de sia nacio.

Se niaj samideanoj sekvus tiun danĝeran vojon, sur kiun gvidas

1. Vidu numeron 6 (57) de Kataluna Esperantisto.

ilin iaj nemedititaj vortoj de neŭtrallandaj esperantistoj, — kaj ni deziregu, ke tio ne okazul — la rivaleco, malamikeco kaj malamo interŝtataj, kiujn milito kaŭzis, post ĝia fino estus pligrandigitaj ĉe nia anaro per aldono de reciprokaj malamo kaj malŝato inter la esperantistoj de la militintaj ŝtataroj.

Tiu fakto komplikus certe la noblan rolon rezervatan al neŭtraloj, kiuj devas fari ĉiun klopodon mildigi en la koro de samideanoj la home logikajn sentojn de nacia malamo al malamiko, en kiu ili povus konsideri entenataj ankaŭ la esperantistojn. Certe, multaj el tiuj ĉi, mi esperas, havos la belan kapablon humane senti, superstare je la naciaj malamoj, kaj ili bone helpos nian agadon, celantan restarigi en niaj vicoj se ne tiun fratemon deziridan, almenaŭ ŝatindan pacon.

Per tia agado, la plej grava devo, kiun ni nuntempe havas, oni sukcesos fari, kiel mi diris, ke nia lingvo enradikiĝu *pli forte kiel fratiga sento, ol kiel senanima rimedo por interkompreniĝo.*

Sed ĉu ni devas, okupitaj de tiu altsenta laboro, forgesi nian propagandon por diskonigo de la lingvo, aŭ se ni klopodas alvarbi por ĝi novajn partianojn, ilin ni devas allogi per montrado nur de la spiritaj bonoj, kiujn produktas la ideo ne de Esperanto, — simple, lingvo — sed de Esperantismo, homama sento?

Efektive, ne; tiamaniere ni varbus nur la perfektajn spiritojn kapablajn senti tian revon. Kaj ja ni devas ĉiujn alvarbi, eĉ tiun, kiu atentis nur pri la utileco kaj facileco de nia lingvo.

Se pro tiaj kvalitoj homo estas allogita al ĝi, certe li ne plendos kiam li konstatos, ke sian partianaron ĝi noble fervorigas; kaj kiam li en sia koro eksentos la efikon de la pacemo, kiun ĝi en ĝin semis, li ne povos nealigi al tiu alta sento, kiun la lingvo nutras. Ĉar ni devas ne forgesi, ke eĉ kulturitajn spiritojn la uzo de nia lingvo inklinas al pli senpartia juĝado kaj al tolerema ĉekzamenado de aferoj, kiuj ilin en multaj okazoj ne ĝenas, nur tial, ĉar ili estas rekte, sentraduke, vive esprimitaj per lingvo, en kiu oni sentas nenian ŝovinismon.

Jen kial mi pensas, ke nia agado povas plene sukcesi, se oni vigle laboras en la montritaj direktoj.

## Rabaj birdoj

**D**UM mia infanaĝo mi sciavide aŭskultadis la fabelojn. Nia avo estis vera majstro en rakontado, ĉar li sciis bone ravi nian infanan fantaziemon. Sole lia kiso malplaĉis al ni, ĉar lia barbo tiom terure pikis kaj mi pensis ĉiam, ke ĝi estas iu restaĵo de la turmentilo el la mezepoka inkvizicio. Sed tiun ĉi maldolĉan kison ni rezignacie suferis ĉar nia bona avo rekompence rakontis al ni fabelojn pri ensorĉitaj kasteloj, princoj, princinoj, feinoj, drakoj, magiistoj kaj ĉiuspecaj rabobirdoj kaj bestoj.

Foje reveninte hejmen li rakontis al ni pri granda aglo, kiu forportis malgrandan infanon en sian neston kaj donis ĝin al siaj idoj, kiuj la infaneton formangis. La serioza rakontado tuŝis niajn sentemajn korojn kaj, ĉar ni ploris, li elokvente trankviligis nin dirante ke la animeton de la infano forportis belaj anĝeletoj en la ĉielon. Pri la aglo li diris, ke tia raba birdo ne havas prudenton kaj, ke ĝi volis sole satigi sian manĝegeman idaron. Laciĝintaj de aŭskultado ni ekdormis songante pri ensorĉitaj kasteloj, feinoj, k. t. p.

Multe da jaroj jam forpasis de la tempo, kiam la fabelmondo ŝajnis al mi esti konkretaĵo kaj nur malofte mi rememoras pri la bela senzorga junaĝo, pri la infana naiveco kaj facilkredemo. La vivo multe diferencigas de la fabeloj kaj ofte ĝi ŝajnas esti la kontraŭo mem. La ensorĉita kastelo estas hodiaŭ fabriko, en kies mallumaj laborejoj estas ne princoj kaj princinoj, sed laboristoj kaj laboristinoj palvizagaj, kiuj vane atendas la savon aŭ liberigon. Tiujn ĉi liberigos sole la morto.

Tamen la fabelajn monstrojn kaj grandegulojn, kiuj mortigadis kaj formangadis la homojn, superas niaj eltrovaĵoj ĉiurilate. La monstrojn superas niaj kanonoj. Rabobirdoj kaj drakoj ekzistas multe pli teruraj ol la infana fantazio povas pentri. Tiuj ĉi modernaj rabobirdoj estas nomataj aerŝipoj kaj aeroplanoj, monstroj, kiuj ne mangas la homojn sed mortigas ilin. La homoj, kiuj sidas sur tiuj ĉi birdegoj dejetas bombojn kaj aliajn mortigilojn per kiuj ili dissemas morton en ĉiujn flankojn. Ankaŭ mi devis vidi la bonfaremon de tia mildanima monstro.

Unu monaton post eksplodo de la eŭropa milito komencis superflugadi Parizon germanaj aviadistoj kaj dejetadis bombojn.

Iun tagon post la unua vizito de germanaj aviadistoj mi promenis kun kelkaj bohemiaj samideanoj tra la parizaj bulvaroj, kiam ni ekvidis super niaj kapoj la mortosemantan birdon. Ĝi rondflugadis kiel akcipitro super sia rabaĵo kaj jam ĝi ŝajnis transpasi niajn kapojn, kiam subite ni ekaŭdis teruran pafon, kiun sekvis tintado de vitroj el la rompitaĵaj fenestroj. La aviadisto deĵetis bombon, kiu eksplodis malantaŭ la angulo de proksima strato. Ni estis je kvindek metroj de loko kie okazis la malfeliĉo aŭ, pli bone dirite, la krimo. Rapide mi alkuris kaj sub la disiganta fumnubo ni ekvidis terurigan spektaklon.

Sur amaso da frakasita vitro kuŝis kvar sangokovritaj homoj, viroj kaj virinoj. En la ĝemadon de la vunditoj miksiĝis malbenado de alkurintaj homoj, kiuj kun pugnofermitaj manoj minacis la aviadiston, kiu sentime deĵetis ankoraŭ pluajn bombojn kaj forflugis estante certa pri sia bone plenumita devo.

Kia dolĉa kaj ŝatinda devo!

Bedaŭrinde la kulpulojn li ne celis, sole la malfeliĉa popolo devas suferi. Al ĉiu, kiu deziras militon, mi plenkore dezirus similan bombon sur la kapon, ĉar sole tio helpus al la paco.

La aeroplano estis nomata «kolombo» sed mi prefere ĝin nomus «fluganta monstro». Anstataŭ adapti kaj profitigi la flugaparatojn por la bono de la homaro, oni ilin uzas por mortigi homojn kaj ruinigi iliajn loĝejojn. Por la gloro de imperiestroj, reĝoj kaj princoj, por la profito de kelkaj milionuloj, kaj por la patrujo, mortas milionoj da homoj, fluas riveroj da sango, malriĉiĝas milionoj da bienetuloj kaj rompiĝas milionoj da feliĉaj familioj. Kaj por tio ĉio la malsaga kaj nescia popolo krias vivu imperiestro, vivu patrujo!

La homoj, kiuj laŭdire celas la harmonion, eltrovas ĉiuspecajn mortigilojn por krei la pacon. Mi rememoris pri fabeloj el la tempo de nia junaĝo, sed kiom ridindaj aspektas la plej teruraj monstroj el fabelmondo kontraŭ niaj kanonoj, aerŝipoj kaj aeroplanoj.

Vere ni tamen faris progreson danke al nia civilizacio. Milito, perforto, krimo, tio ĉio gvidas al gloro!

Esperantistoj, sole vi povas forigi la militon, ĉar ne povas ekzisti paco sen internacia lingvo.

## Bestoj de lukto

**F**ESTO de paco alproksimiĝis. La koro de ĉiu esperantisto batis. De ĉiu esperata, la granda festo alvenis; ni vidis pli belan ol iam la ĉielon, nia espero ricevis la parfumojn de la plej dolĉa ĝojo, ĉar, fine, en la monda urbo, Parizo, okazos tuj nia plej granda elmontrado.

Ekster la limoj de nia lando; ekster la landoj de la aliaj kaj en la tuta mondo, esperantistoj sentis en siaj koroj la samajn dolĉajn emociojn. Homo havas koron. Esperantisto estas homo. Kaj amaso da samideanoj emociplenaj, gajaj, dolĉaj kaj portantaj en siaj korpoj sentojn la plej delikatajn, marŝas al Parizo, al kunveno de paco, kie ili trovos nur homojn, ne virojn de diversaj gentoj. De la tuta Eŭropo, de ĉiu parto de l' mondo, amikoj de Esperanto marŝas al unu sama celo : Parizon. Sur ĉefaj fervojoj de ĉiuj landoj, vagonaroj kuris tra montoj kaj riveroj, apud lagoj kaj paŝtejoj. En la vagonaroj estis homoj, kies koroj kuris pli ol la vagonaro, en la deziro alveni baldaŭ, tre baldaŭ al kongresurbo, kie ili ricevos emociojn la plej kortuŝantajn...

Subite, decido de l' registaroj de la ĉefaj eŭropaj nacioj jetis al batalado milojn kaj milojn da homoj. Unuj estis surprizitaj en la mezo de la vojo, aliaj mem en la ĉefurbo de nacio en milito, sed, ĉiuj lasis esti homoj kun sentoj delikataj, homoj marŝantaj al festo de bela paco : ili sentis en siaj koroj kreski subite la instinkton de bestoj de lukto kaj nun en la kampo de la granda milito ni trovas centojn kaj milojn da homoj, kiuj iam predikis pri la paco — homojn, — kies ideologio montris klare vojnon lumigitan de l' plej grandaj entuziasmoj kaj esperoj pri kunfratigo, paco kaj amo.

Kiom belaj, kiom ravaj estas la ideoj de l' homoj! Sed, ho ve! ni mem, la homoj, ne povas demeti sur realecon niajn ideojn. Eble, tiuj ideoj, ne apartenas al la reala socia kunvivado de homoj aŭ ni, homoj, ne havas la sufiĉan saĝon por aparteni al la socia ekzistado de tiuj ideoj. Tamen, la saĝon, kiun al ni mankas por aparteni al la realeco de niaj ideoj, ni havas kiam el niaj kapoj ili ŝprucas, kiam niaj koroj ilin akceptas. Ni estas bestoj de lukto, sed bestoj elegantaj, intelektaj, plenaj de scio kaj havantaj en nia korpo koron delikatan, tre delikatan, kiam ĝi sentas dolĉe, sed furiozan, tre furiozan, kiam

ĝi sentas malamon aŭ riproĉon, En tiu lasta kondiĉo, niaj bestaj instinktoj aperas kaj tutajn niajn sciojn ni lasas al la servo de la detruo.

Jen nun, la plej gravaj sciencoj sub la servo de l' milito. Jen esperantistoj, la fratoj, de unu lando mortigantaj esperantistojn de alia lando. Jen, la socialismo droninta en la ondoj de patrolandaj entuziasmoj. Jen, la kastelo de la paco falinta; kaj pafiloj, pafilegoj, sabroj reĝas en Eŭropo.

Ni, esperantistoj de lando neŭtrala, laboru nun pli ol iam, ĉar, kiam la eksterma terura milito finiĝos, ni povos alvenigi ĝis la teroj detruataj ondon de amo, de paco. Kaj ni penu, dume, esti homoj forigintaj el nia korpo la instinkton de bestoj de lukto. Ni ja vidas kiam estas la profitoj de l' milito.

La homoj kaj la mondo multe progresis sed, koncerne al instinkto de bestoj ni estas la samaj: ankoraŭ daŭras, en la fundo de niaj animo kaj spirito, la besteco de nia deveno.

MANUEL BORDAS



## VI<sup>a</sup> Kongreso de la K. E. F.



ni daŭrigas la laborojn de arango de nia VI<sup>a</sup> Kongreso kaj ili estas promesplenaj de bruanta sukceso.

Oni jam faris la petojn de subvencioj al loka urbestro kaj provinca deputitaro, kaj estas tre antaŭenigitaj la preparaj laboroj de Esperanta Ekspozicio kiu sendube estos la plej alloga el ĉiuj kongresaj manifestacioj. Por ĝia plej sukcesa arango ni petas al ĉiu kiu bone povos, ke bonvole sendu al Kongresa Komitato en Vilanovan, ĉiuspecajn esperantaĵojn de li posedatajn.

Ni ne povas ankoraŭ fiksi la buĝetan monsumon por ĉeesti la kongreson. Tamen ni povas certigi ke ĝi ne estos tro kara. Ni ĉirkaŭkalkulas dekkvin pesetojn por barcelonanoj, ĉiujn elspezojn kalkulinte.

Certe ni sciigas ke dum la Kongreso, ni povos ekuzi la oficialan insignon de K. E. F., kiun laŭ iniciativo de D-ro Bremón la Komitato de K. E. F. decidis liveri. Ĝi estas arta butonruo, kun la verda stelo, reproduktaĵo de la marko de nia federacio.

El ĉiuj anguloj de nia lando venas al ni kuraĝigaj voĉoj de entuziasmo por nia VI<sup>a</sup>. Ni pretiĝu, do, por ke ĝi estu inda je la grava okazo kiu prezentigos, se la organizata Iberia Esperantista Konfederacio povos en la soleno de nia kongreso komenci sian vivon kaj sian fruktodonan taskon.

## La tri Mago-Reĝoj<sup>1</sup>

Devizo: *Kiu?*

En sonĝo... dum nokto de l' Epifanio  
 Mi estas en simpla kabano,  
 Timema, sensua kaj sen akompano.  
 Maldolĉe gorgkrias sirnio,  
 Anonc' de malbonoj, sur la pajltegmento.  
 Ekstere fajfegas raŭksone la vento.  
 Tutkovras la teron neĝblanka mantelo.  
 En la volb' de l' ĉielo,  
 Mirbirdo el arĝento,  
 Trembrilas, irante, la Orientstelo.  
 La vento kunportas la meznoktan horon,  
 Sur la horizonto la Reĝoj aperas.  
 Al ili mi oferas  
 Ansoife la koron.

Unue alvenas Melĉoro la Reĝo,  
 — Hararo la lia similas al neĝo, —  
 De li ĉastpasion la homoj ricevas,  
 Spiritan kunigon pri kiu, en preĝo,  
 La virgulin' revas.  
 Sed distre li pasas  
 Majesta, serena,  
 Kaj min preterlasas  
 Kun koro malplena.

Fiere postsekvas la Reĝo Gasparo,  
 — Al flamoj similas ĉe li barb' kaj haro, —  
 La Reĝo de kiu la homoj ricevas  
 Pasion voluptan, pri kiu sin baro  
 Senefike levas.  
 Sed distre li pasas  
 Majesta, serena,  
 Kaj min preterlasas  
 Kun koro malplena.

1. Tria mencio en la IV<sup>a</sup> Floraj Ludoj de K. E. F.

La Reĝ' Baltasaro lastvice alvenas,  
 — El nokto fil' nigra, malgaje mienas, —  
 Al kruc' el ĵaluzoj li najlas amantojn,  
 Al am' senespera la korojn li ĉenas,  
     Li vekas revantojn.  
     Ne distre li pasas,  
     Li haltas serena,  
     Kaj min preterlasas  
     Kun koro tutplena.

TERESA kaj EULALIA ROSELL



## Malsangro

**T**UN matenon estis sonorinta kvarono de la kvina, kaj la stalisto ankoraŭ ne estis malferminta la pordojn de l' ĉevalejo. Sonoris la duono... ankoraŭ ne.

— Eble li endormiĝis, fripono... — grumblis kun furiozo la ĉaristoj.

— Diabla maljunulo! — diris unu. — Ĉu vi ne volas malfermi, je cent demonoj?

— Malsangro! — kriis alia, frapante al la pordoj per ŝtono. — Malfermu, fulmon de Dio!

Sed Malsangro ne respondis vorton, nek donis signojn de vivo.

Tiam unu el la junuloj grimpis tra la fenestro de l' pajlejo kaj post unu salto troviĝis en la ĉevalejo. Post momento malfermiĝis larĝe la pordoj de la stalo kaj eliris la junulo, kriante terurite:

— Malsangro estas mortinta!

— Mortinta?

— Jes, mortinta... Ĉevalo hufobatis lin.

Ĉiuj ĉaristoj enrapidis internen, kaj tie, en angulo, sub erpilo, ili vidis Malsangron, sternitan, sur la sterko, malvarman, glacian, malpuran de pajleroj kaj makulitan de koagulita sango... Iom malproksime, kuŝis ĉevalo kun la ligoŝnuro pendanta ĝis sur la planko...

Ĉiu vidis tuj, kio okazis tie la nokton. Ĉevalo malligiĝis... la

stalisto volis religi ĝin... sed la besto piedbaraktis... per la unua frapo senkonsciigis lin, kaj poste, kvazaŭ ne sata, hufbatis ĝis lin senanimigis.

Ĉiuj ĉaristoj rigardadis la kadavron, enpensaj kaj teruritaj.

Fine, unu rompis la funebran silenton:

— Vi scias, kion mi diras? Ke... li ne povis mortigi alimaniere, la malbonulo...

— Fide al Dio, ja ne! — respondis alia.

— Ne multe, ke li, kiu mortigis la bestojn per turmentoj, mortis sub la hufoj de ĉevalo.

— Estas kvazaŭ revenĝe...

— Malbona fino...

— Nomu ĝin puno de l' infero...

Kaj tra la memoro de tiuj viroj pasadis rememoroj pri la teruraj martirsuferoj, kiujn la stalisto travivigis de la bestoj, kiel ekzekutisto sin amuzanta per la doloroj de l' viktimoj. Ja tiuj viroj estis se necese batemaj kaj eĉ sovaĝaj kaj senanimaj... sed, ne tiom, fulmo! — tiaj ne! kiel tiu sovaĝulo senkompata...

Pro bagatelo, jen vi havis lin, kun la vipo en la aero, — kvazaŭ pikita de vespo, kaj blasfemanta kiel malbona spirito. Kaj jen prenis ĉevalon kaj frapis sur ĝian nazon ĝis sango elfluas, kaj jen bastonis ĝian genuon ĝis rompi al ĝi la krurojn. Aliajn fojojn li torturis ilin trankvile, kun malvarma sango, per krudeleco de pacienca homo.

— Mi, — diris unu el la rondo — fojon vidis lin, kiam li metis al ĉevalino stangon en la oreton, pikante kaj suferigante ŝin...

— Mi, — rediris alia — unu tagon kaptis lin, dum li plenigas per sablo la okulojn al unu ĉevalo!

— Nu, do... forte!

— Nu, do... ke li kondamniĝu pro malbona animo!

— Li ne povis finiĝi alimaniere...

Sed tiam eliris el la rondo maljunulo kaj kun kompata mieno diris:

— Knaboj... eble vi ne diras, kion vi diras, se vi scius la historion pri tiu viro. Eble, vi eĉ havus por li kompaton, se vi konus la malfeliĉojn, kiuj sur li pasis. Mi konis lin junan, bubon preskaŭ... Li ĵus eliris el la Sankta Domo... ĉar, malfeliĉa, li estis bastardo, estis senpatrulo... Li kreskis maldika, malsanema... kaj estante tiel obeema, tiel bona, ĉe l' najbararo de Poblet! li kompatigis ĉiun... Pro kompto

oni instruis lin gvidi ĉaron, tiam dum la konstruoj ĉe Bogatell<sup>1</sup>. La knabo refariĝis,... revekiĝis... fariĝis matura viro... Post kelkaj jaroj, li eĉ enamiĝis de knabino el la «Camp de l'Arpa» kaj edziĝis kun ŝi. Tiu viro ne deziris pli grandan feliĉecon kaj opiniis sin pli feliĉa, ol reĝo... Kiam li vidis sian edzinon graveda, li ne eltenis sian ĝojon. Mi memoras tion, kiel hieraŭan okazon... Tiam ni laboris ĉe la remparoj de Sankta Petro, kiujn oni disfalis. Ŝi, plengraveda, venis ĉiun tagmezon porti al li la manĝon. Ili ambaŭ sidiĝis ĉe ombro de arbo, apud la ĉaro, kaj rigardadis sin mirefiksitaĵ, kvazaŭ neniam estus sin vidintaj. Sed... jen unu tagmezo, kiam plej senzorge ili rigardadis unu la alian, la ĉevalo kiun li mastras, pikita de muŝoj aŭ ial ajn, levas la kruojn kaj svinge hufofrapas la virinon sur la mezo de l' ventro... La virino falis sternite, sen signoj de vivo... Ni ĉiuj alkuris, metas ŝin sur portilon kaj portas kurante hejmen...

— Kaj... ŝi mortis? — demandis la ĉaristoj.

— Mortis. Mortis ŝi... mortis la ido, kiun ŝi portas en la interno... kaj de tiam, ŝia edzo ŝajnis freneza... kaj rigardis ĉevalon, kvazaŭ li vidas la malbonan spiriton.

Ĉiuj ĉaristoj restis enpensiĝe, rigardadante la kadavron ĉe la stalisto.

RAIMÓN CASELLAS

*El kataluna lingvo tradukis JOSEF GRAU*

1. Akvofluo, kiu la urbo kovrigis per arkajo, sub strato.

La Administrantoj de Gazetoj interŝanĝantaj kun la nia, la Institucioj, Asocioj kaj Grupoj, la federacianoj kaj ceteraj esperantistoj estas insiste petataj bonvola adresi ĉion sendotan ĉu al la Kataluna Esperantista Federacio, ĉu al la gazeto Kataluna Esperantisto, laŭ la adreso

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO DE

**KATALUNA ESPERANTISTO**

Aribau, 55 : BARCELONA

## Belulino kaj la Besto<sup>1</sup>

Teatraĵeto por la infanoj

### PERSONARO

PROSPERO, Negocisto.  
 ADELINO }  
 KLARICO } Filinoj de Prospero.  
 BELULINO }  
 RIKARDO, Servisto.  
 LA BESTO (Efektive Princo Karolo).

### AKTO UNUA

Sceno unua. *Salono en la domo de PROSPERO. ADELINO sidas sur apogseĝo, kaj legas romanon. KLARICO kulfas sur hanapo, manĝetante sukeraĵojn.*

KLARICO. — Jam estas preskaŭ la horo por la ekiro de Paĉjo.

ADELINO. — Kredeble. Donu al mi sukeraĵon, mi petas.

KLARICO. — Prebu. Ĉu oni pakis lian valizon.

ADELINO. — Kompreneble. Belulino nepre zorgis pri tio.

KLARICO. — La lastan fojon, li plendis ke li ne havis sufiĉe da naztukoj.

ADELINO. — Ho, li ĉiam plendadas! Aŭ la naztukoj, aŭ la ĉemizoj, aŭ io alia nepre mankas!

KLARICO. — Ĉu ne estus bone, ke vi iru por kontroli ke ĉio estu preta por li?

ADELINO. — Mi estas tro okupata; vi tion faru, se vi kredas ke necese estas.

KLARICO. — Ho, sendube ĉio estas en ordo. Oni povas fidi al Belulino.

(*Eniras PROSPERO, vestita por vojaĝo.*)

PROSPERO. — Nu, miaj karaj, mi tuj estas ekironta.

KLARICO (*starigante*). — Ho, paĉjo, kiel enue estos al ni ĝis via reveno!

ADELINO (*kurante al li*). — Jes, vere! Ni kalkulos ĉiun tagon.

KLARICO. — Ĉiun horon! Ĉiun momenton!

PROSPERO. — Bonaj infanoj! Nu, kian donacon vi deziras, ke mi alportu al vi kiam mi revenos?

KLARICO. — }  
 ADELINO. — } Ho, karega paĉjol

PROSPERO. — Nu do, rapide elektu.

ADELINO. — Ĉu vi alportos ion ajn, kion ni deziras?

PROSPERO. — Mi ja faros tion.

ADELINO. — Mi do elektas diamantan tiaron.

PROSPERO (*jom domagante*). — Ho karega filino! Kaj vi, Klarico?

KLARICO. — Alportu al mi ĉirkaŭkolon el perloj, mi petas, kara Paĉjo.

PROSPERO (*flanken*). — Ho, filino mia, pli karega ol amata! (*Al ili.*) Mi promesas. Sed kie estas mia eta Belulino?

(*Eniras BELULINO, portante valizon kaj ombrelon.*)

BELULINO. — Jen mi estas, Paĉjo. Jen ĉio preta por vi.

1. Premiita en la IV<sup>o</sup> Floraj Ludoj de K. E. F.

PROSPERO. — Kion vi deziras, ke mi alportu al vi, ĉe mia reveno, Belulino mia?

BELULINO. — Alportu al mi ruĝan rozon, Paĉjo kara, mi petas. Trovigas nur blankaj en mia ĝardeno.

PROSPERO (*rapide*). — Tion mi tre ĝoje plenumos. Nu, kie estas Rikardo? Kial li ne estas petata?

BELULINO (*kurante al la pordo*). — Rikardo, Rikardo! (*Eniras RIKARDO.*) Nu, Rikardo, atente aŭskultu min.

RIKARDO. — Jes, fraŭlino.

BELULINO. — Vi devas tre fervore zorgi pri via mastro.

RIKARDO. — Jes, fraŭlino.

BELULINO. — Vi devas fidele obei al li.

RIKARDO. — Jes, fraŭlino.

BELULINO. — Kaj konsoli lin se li estos malĝoja.

RIKARDO (*stabe*). — J-e-s, fraŭlino.

BELULINO. — Kaj protekti lin.

RIKARDO. — Protekti? Kontraŭ kio?

BELULINO. — Kontraŭ ŝtelistoj, rabistoj...

RIKARDO. — Ho-o-o!

BELULINO. — Sovagaĵ bestoj...

RIKARDO. — Ho-o-o! Jes, fraŭlino, mi estas forta kuragulo, mi...

(*Li videble tremas.*)

BELULINO (*ridante*). — Kompatinda Rikardo! Mi nur incitetis vin. Mi estas certa, ke vi noble faros vian devon.

RIKARDO. — Dankon, fraŭlino.

PROSPERO. — Nu, Rikardo, ni foriru. Adiaŭ, miaj infanoj.

(*RIKARDO prenas la valizon kaj foriras.*)

BELULINO. — Mi akompanos vin ĝis la pordego, Paĉjo.

ADELINO. — } Adiaŭ, Paĉjo! Bonan vojaĝon.

KLARICO. — }

(*Eniras PROSPERO kaj BELULINO. ADELINO kaj KLARICO restiĝas.*)

ADELINO. — Jen Paĉjo fine forlasis la ombrelon.

KLARICO. — Kuru post li por doni ĝin, Adelino.

ADELINO. — Ne zorgu! Eble ne pluvos dum lia foresto.

(*Eniras BELULINO, ekvidas la ombrelon, ekhaptas ĝin, kaj forkuras, hriante.*)

BELULINO. — Paĉjo, paĉjo kara. Jen via ombrelilo! (KURTENO.)

Sceno dua. *Vojo ekster la ĝardeno de la BESTO. Ĉe la fono muro, trans kies supro etendiĝas branteto kun kelkaj ruĝaj rozoj. Eniras PROSPERO kaj RIKARDO.*

PROSPERO. — Mi estas tre laca. Ni sidigu por ripozi sub la ombro de tiu ĉi muro.

(*Sidiĝas kaj malĝoje ĝemas.*)

RIKARDO. — Kuraga, sinjoro! Ni preskaŭ atingas la hejmon. Nur unutagan vojaĝon, kaj ni alvenos.

PROSPERO. — Estas ĝuste pro tio, ke mi malĝojas. Malfeliĉa estos tiu alveno.

RIKARDO. — Kial do? Ĉu la negoco ne estis sukcesa?

PROSPERO. — Tute sukcesa.

RIKARDO. — Ĉu vi ne fartas bone?

PROSPERO. — Tute bone.

RIKARDO. — Kio do kaŭzas al vi malĝojon, sinjoro?

PROSPERO. — Antaŭ mia foriro, mi faris promeson al miaj filinoj, — sed, ho ve!

(*Ŝemas la kapon.*)

RIKARDO. — Vi ja diris al mi, ke mi tre zorgu pri la valizo, kiu enhavas diamantojn kaj perlojn por iliaj fraŭlinaj moŝtoj.

PROSPERO. — Diamantoj kaj perloj! Ho, jes; sen tiuj mi tute ne kuragus hejmeniri. Sed ve! ruĝan rozon mi promesis, kaj ruĝan rozon mi ne havas!

RIKARDO. — Ha! ha! ha! Ruĝa rozoj! Bagatelo!

PROSPERO (*kolerege*). — Kanaĵlo, vi mokridas min! Mi rompos mian ombrelon sur via densa kapo.

RIKARDO. — Ho, pardonu, sinjoro! Mi ne komprenis.

PROSPERO (*trankviligante*). — Ne, vi ne komprenas. Nur patro povas kompreni la patrajn sentojn. Neniu krom mi scias, kiel dolore estas al mi malplenumi la deziron de la plej bela, ĉarma, bona filino en la tuta mondo. (*Gemas.*) Kiel bedaŭrinde, ke mi prokrastis la revenon ĝis post la rozosezono! kaj jam vane mi ĉie serĉis nur unu floreton.

RIKARDO. — Jen, sinjoro, rigardu! (*Fingremustrante la muron.*) Ĉu ne ruĝaj rozoj?

PROSPERO. — Ho, ĉieloj kiel ĝojel! Prenu unu, Rikardo. Prenu du, tri, prenu plenanon da ili! (*Ili saltas, saltegas, sed ne povas atingi la rozojn.*)

RIKARDO. — Vef ili pendas tro alte.

PROSPERO. — Mi ja devas akiri! Provu denove, mallertulo!

RIKARDO. — Vane, sinjoro! Se mi povus stari sur io. (*Ĉirkaŭrigardas*) Jen la valizoj!

PROSPERO. — Zorgu pri la diamantoj, friponoj!

RIKARDO (*post plua provo*). — Ne, mi ne povas atingi.

PROSPERO. — Mi staru sur viaj ŝultroj. (*Provas fari tion.*)

RIKARDO. — Ho!

(*Falas teren.* PROSPERO *ambaŭ falas sur la dorson, la piedoj supre.*)

PROSPERO. — Aĉulo! Kial vi ne staris firme?

RIKARDO. — Sinjoro, vi estas tre peza!

PROSPERO. — Mi provu denove! (*Provas. Ambaŭ falas.*) Fleksu la dorson, kanaĵlo! Tuj klinu vin, kaj mi staros sur via dorso.

RIKARDO (*ĝemante fleksas la dorson*). — Rapiĉu do, sinjoro, mi petas!

(*PROSPERO surprizigas sur la dorso de RIKARDO, kaj prenas rozon.*)

LA BESTO (*ekstere blekaŭte*). — Brrrr!

(*RIKARDO eksaltas de tereno, kaj ambaŭ falas teren. Ili surgenuigas, kaj timene ĉirkaŭrigardas.*)

RIKARDO (*balbutante*). — K-k-kio estas tio?

(*La kapo de la BESTO aperas super la muro.*)

LA BESTO. — Brrrr!

RIKARDO. — Ho, ĉieloj!

(*Ekstaras kaj forkuregas.* PROSPERO *levigas, kaj ekkuras, sed haltas por preni la valizon. La BESTO saltas super la muron, kaj ekhaŭtas lin.*)

LA BESTO (*ŝmante PROSPERO*). — Brrrr! Kion vi faras ĉi tie?

PROSPERO (*mirv kaj timv*). — Ho, ĉieloj! Ĝi parolas homan lingvon!

LA BESTO (*ŝmante lin*). — Jes, kaj ankaŭ komprenas. Respondu do. Kion vi faras ĉi tie?

PROSPERO. — Ho, bona S-ro Besto! Mi nur prenis rozon.

LA BESTO. — Miaŭ rozon. Ŝtelistoj Brrrr!

PROSPERO. — Pardonu, Via Besta Moŝto! Mi tute ne sciis, ke ĝi estas la via. Mi nur deziris rozeton por donaci al mia filino.

LA BESTO. — Filino! Vi havas filinon! Kian filinon?

PROSPERO. — Ho, sinjoro, ŝi estas tia bela, bona, ĉarma knabino; kaj ŝi petis ke mi alportu al ŝi rozon.

LA BESTO (*ŝanĝv*). — Bela, bona, ĉarma! Ĉu eble mia ŝanco. Ne, ne, kompreneble ne! (*Al PROSPERO.*) Nu, mi deziras vidi vian filinon. Mi permesos al vi foriri sendifekte, kaj preni la rozon, kondiĉe ke vi ĉi tien sendos la filinon por viziti min.

PROSPERO. — Ho, Via Moŝto, ne mian Belulinon! Mi havas du aliajn filinojn — mi sendos ilin ambaŭ. Unu portas diamantan tiaron, la alia perlan ĉirkaŭkolan, kaj cetere...

LA BESTO. — Brrrr! Belulinon mi postulas. Ŝi restos kun mi tute sendanĝere. Sed venigi ŝin vi ja devas.

PROSPERO. — Kaj se mi rifuzus?

LA BESTO. — Tiookaze mi tuj mortigos vin. Brrrrr!

PROSPERO (*rapide*). — Ho, S-ro Besto, mi promesas. Ĝi estos ĉi tie post... post...

LA BESTO. — Post unu monato! Se ne, mi venos por demandi la kialon. Brrrrr!

PROSPERO (*prenante valizon*). — Certe, certe, sinjoro!

LA BESTO. — Nu, rapide.

PROSPERO. — Adiaŭ, sinjoro!

LA BESTO (*pedŝrapante la teron*). — Iru, iru tuj!

PROSPERO (*lasante fali la ombrelon*). — Certe, sinjoro! Mi iras kiel eble plej rapide.

LA BESTO. — Brrrrr!

PROSPERO. — Ho, ĉieloj! (*Forkuregas.*)

(KURTENO.)

(*Dadros.*)

LOUISE BRIGGS



## V<sup>a</sup> Floraj Ludoj de la Kataluna Esperantista Federacio

### LISTO DE DEVIZOJ DE VERKOJ RICEVITAJ

NUMEROJ : 1, Survoje. — 2, Kaj vin aŭdos kaj vin laŭdos. — 3, Kiel etendita pava vosto. — 4, Floro de malamo. — 5, Indas iri sangopage al la land' de l'idealo.



### OFICIALA PARTO

Kunsido okazis la 21<sup>ma</sup> Februaro ĉe S-ro Prezidanto. En ĝi oni aprobis rajtigi la Administriston de K. E. F., ke li povu starigi novan liston de federacianoj por la nuna jaro, forstrekinte tiujn, kiuj ne pagis la antaŭajn jarkotizojn. Se estonte estos eble enspezi iom el ties sulkdata kvanto, oni konsideros ĝin kiel eksterordinaran enkasajon.

Oni aprobis ankaŭ la decidon kiun pro urĝa bezono private prenis kelkaj komitatanoj pri tio, ke unu el la redaktoroj de K. E. entreprenu vojaĝon al Tarragono kaj Reus por aranĝi aferon pro malbona interkompreniĝo kiu kompromitis la Federacion; ke li revene haltu en Vilanova por ricevi impresojn pri la organizado de la proksima kongreso. S-ro Grau kiu plenumis tiun taskon raportis pri siaj klopodoj faritaj, kaj oni decidis esti lin aŭskultinta kun plezuro.

Krom tio, decidiĝis ke la K. E. F. kompleksos la peton de la skolta societo klopodante trovi profesoron aprobitan, kiu bonvolos malfermi kurson de Esperanto en ĝia sidejo. — *La sekretario* : J. VENTURA.

## ENLANDA MOVADO

**BARCELONA.** — Sub la prezido de kompetentega tribunalo konsistinta el Pastro D-ro Coll, Pastro Planell, D-ro Bremon, S-roj Rosals kaj Grau, kiel fino de la universitataj kursoj, kiujn tiel lerte gvidas Pastro D-ro Coll, okazis solenaj ekzamenoj en nia ĉefa lernejo la tagojn 31<sup>aa</sup> de Majo kaj 1<sup>aa</sup> kaj 2<sup>aa</sup> de Junio pasintajn. Per ili aliafoje montriĝis la bonega laboro de la oficiala katedrano de Esperanto en nia Universitato, ĉar la ekzamenoj, kiuj konsistis el plej malfacilaj ekzercoj de tradukado kaj demandoj pri gramatikaj aferoj, estis vere sukcesaj. Ĉiuj ekzamenitoj respondis trafe kaj saĝe la iafaje ruzajn demandojn, kaj lerte evitis la malfacilaĵojn de la tradukoj.

Jen la kvalifikoj aljuĝitaj:

**UNUA KURSO.** *Supera merito* : S-roj Sebastià Alberich, Enric Alba kaj Josep Guixà. *Alta merito* : Joan Coca. *Merito* : Bernabé Mira, Manuel Ramos kaj Serafi Roma.

**DUA KURSO.** *Supera merito* : S-roj Sebastià Alberich, Artur Domènec, Palmiro Guilleumot, Pere Navas kaj Joan Romeu. *Alta merito* : Francisco Calzada, Elies Cortés, Joan Iduarte kaj Ramón Ribas.

Laŭ ĉiujara kutimo, la 5<sup>aa</sup> de Junio okazis la konkursaj ekzamenoj por la premio «Universitat» de cent pesetoj, kiujn donacas malavare estiminda samideano kiu volas resti en inkognito. Partroprenis en ĝi S-roj Petro Navas, Sebastià Alberich kaj Palmiro Guilleumot kaj post vigla luktado restis triumfantaj S-roj P. Guilleumot kaj S. Alberich al kiuj decidis la juĝantaro interdividi la premion po egalaj partoj. El la unuagradaj kursanoj ricevis premion (1 ekz. de la Krestomatio) S-ro E. Alba.

En tiu sama okazo atingis la titolon de profesoro de K. E. F. S-roj Domenech kaj Guilleumot kiujn ni kore gratulas.

Dezirinde estas ke la oficialaj kursoj de Esperanto en la Barcelona Universitato estu ĉiam pli konkurataj por ke nia afero profitu kiel eble plej multe el la gratulindaj klopodoj de nia simpatia D-ro Coll.

— *Barcelona hejmo de la K. E. F.* La klopodoj faritaj en nia urbo starigi en ĝi kunvenejon, — en kiu ĉiuj esperantistoj povus sin senti hejme, kiu ĉiuj povus viziti je kiu ajn horo, — sukcesis ĉi-tiun fojon, post tiom da provoj, kiuj estis montriĝintaj senvivaj.

En la ĉefa etaĝo de la domo numero 8 de strato Palla, en centra parto de la urbo, restas de post la 1<sup>a</sup> de Junio la *Barcelona hejmo de la K. E. F.*, kiu ĉiuj esperantistoj povas viziti de la 9<sup>a</sup> matene ĝis noktomezo ĉiutage dum tuta jaro. En ĝi troviĝas legosalono, kie la esperantaj gazetoj estas legeblaj kaj ankaŭ en ĝi estas organizata esperanta biblioteko, kiu enkalkulas jam kelkdekojn da libroj; ĝi certe multe kreskos, se niaj samideanoj cedos *prunte* aŭ *donace* ĉiujn

librojn, kiujn ili ne bezonas hejme. Krom tio ĉi estas en la hejmo kafejo je la dispono de la esperantistoj kaj bela sekretario, en kiu oni jam nun starigis internaciajn servojn per Esperanto. En eleganta kunsido-salono havos lokon festoj kaj paroladoj, kiuj tial okazos en konvena ejo kaj la tuta etaĝo tre taŭgas por la celo al kiu ĝi estas destinita.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn, eĉ tiujn nealĝintajn al nia Federacio, viziti la *Barcelonan hejmon* kie ili estos bone akceptataj. Regula kunsido okazas ĉiusabate post la 9<sup>a</sup> vespere; ĉiudimanche posttagmeze kaj la merkredojn vespere tie kunvenas jam multaj samideanoj.

Doninte detalojn pri la starigo de la *hejmo*, ni volas raporti ankaŭ ion pri ĝia organizado, por ke ĉiuj federaciaj sciuj kiamaniere ĝi funkciadas.

Oni scias, ke jam de longe estis ĝenerala la deziro posedi tian kunvenejon, kio ne efektiviĝis pro manko de bona ĉiurilate loko. Kiam tiu ĉi estis trovita, oni kunvokis kelkajn sindonemajn samideanojn al kunsido, en kiu ili decidis ne starigi por la okazo novan societon por eviti superfluaĵajn komplikajojn. La *hejmo* estas subtenata de aro da personoj bonvolaj, kiuj pagas ĉiumonate difinitan kotizajon al la Administristo de la K. E. F., kun la kondiĉo ke la monon apartenantan al la Federacio neniel oni povos uzi por pagi luprezon aŭ kion ajn de la *hejmo*. Kompreneble, la fakto ke tiu subtenantaro povas ne plu pagi kaj tial malaperigi la hejmon ne rajtigas la federaciajn plendi, ĉar ili ja nenion pagis por ĝi. Tamen, ni pensas, ke tiu okazo ne prezentigos.

Kiam la afero estis tute preta, en la kunsido, kiun la Komitato de la K. E. F. faris la 30<sup>ma</sup> de Majo, oni proponis al ĝi en nomo de la subtenantoj la starigitan kunvenejon, petante samtempe, ke la Federacio permesu la uzadon de sia nomo por la nova *hejmo*. Kompreneble la Komitato kun danko akceptis la veran malavaran donacon kaj esprimis la deziron ke la proksima kongreso sankciu la aferon.

Ni ĝoju, do, ĉar ni atingis fine nian revon, havi belan esperanto-hejmon! Samideanoj, ĉeestu ofte en ĝi! Aliurbanoj, ne forgesu kiam vi vizitos Barcelonon viziti ankaŭ la hejmon! Amikoj barcelonaj, helpu subteni ĝin! Kaj tiel ĉiuj efektive antaŭen puŝos nian aferon en la kataluna ĉefurbo.

— La *Barcelona Hejmo de la K. E. F.* organizis servon por komercistoj kaj publiko, celanta la plifaciligon per Esperanto de la rilatoj inter ĉiuj landoj kaj la nia. Pri tiu servo la enurbaj gazetoj anoncis diversloje, kaj ĝin uzis jam kelkaj personoj kun sukceso. Ni petas niajn amikojn, ke ili diskonigu la novaĵon.

**PALAFRUGELL.** — La 1<sup>ma</sup> de la pasinta Majo la ĉi-tiea societo *Paco kaj Amo* malfermis novan kurson, al kiu ĉeestas aro da junuloj se ne tiel nombra kiel ni deziras, tamen tre lernema kaj plena de fervora entuziasmo, de kiu multe esperas la disvolviĝo de nia celo en nia urbo.

Ĉiu membro de la *Kataluna Esperantista Federacio*, aŭ aboninto al **KATALUNA ESPERANTISTO**, rajtos dufoje dum la jaro publikigi en la gazeto krom sia nomo kaj adreso **10 VORTOJN** por peti korespondadon, interŝanĝojn de kolektaĵoj, informojn k. t. p. aŭ sciigi ŝanĝon de adreso

**S-ro Henri Rabaut**, Sergent 4.<sup>o</sup> de ligne, Camp de Harderwyk (Holando) korespondos volonte kun unu kataluna samideano

**S-ro Sebastiano Chaler**, strato S. Mariano, 124 : Terrassa; amike korespondos kun ĉiulandaj gesamideanoj

**S-ro Pompilio Tomás**, strato Marqués del Duero, 88, Barcelona, deziras korespondadi kun ĉiulandaj gesamideanoj

**S-ro Petro Navas**, strato Cruz de los Canteros, 12, 3<sup>a</sup> - 2<sup>a</sup>, Barcelona, deziras korespondadi kun ĉiulandaj gesamideanoj

**S-ro Joan Coca**, strato Esmeralda, 15, 4<sup>a</sup> - 1<sup>a</sup>, Barcelona, deziras korespondadi kun ĉiulandaj gesamideanoj

La Administracio de la K. E. F. decidis krei  
takon de komerca reklamo sur la koverto de  
Kataluna Esperantisto. Ĝi rekompencos la samidea-  
nojn, kiuj havigos al ĝi anoncojn de firmaoj, pro-  
duktaĵoj, k. t. p. Prezaron petu de S-ro Admi-  
nistristo de la K. E. F., str. Aribau, 55, Barcelona

## **KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO**

ASOCIA SIDEJO : RAMBLA, 41. — SABADELL

MINIMUMA JARA KOTIZAJO : 3 PESETOJ

LA ALIGINTOJ RICEVAS SENPAGE LA GAZETON

## **KATALUNA ESPERANTISTO**

kiu aperas kiel eble plej regule, laŭ la regulo

3<sup>a</sup> de la Regularo de K. E. F.



## **KATALUNA ESPERANTISTO**

OFICIALA PRESORGANO DE LA

**KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO**

Redakcio kaj Administracio : Aribau, 55. Barcelona

SENPAGE POR LA GEFEDERACIANOJ

JARABONO POR LA CETERAJ SAMIDEANOJ KOSTAS

ENLANDE : 4 pesetojn. — EKSTERLANDE : 2 spesmilojn

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA PRESORGANO

DE LA



JARO VI<sup>a</sup> : AŬGUSTO 1915

## REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO DE "KATALUNA ESPERANTISTO"

ARIBAU, 55 : BARCELONA

<i>Direktoro</i> . . . . .	FRED. PUJULÀ
<i>Redakcia sekretario</i> . . . . .	JOSEP GRAU
<i>Redaktoroj</i> . . . . .	ESTANISLAU PELLICER JOSEP VENTURA ARTUR DOMENECH
<i>Administristo</i> . . . . .	JOSEP SERRAT
<i>Administracia sekretario</i> . . . . .	JOAN AMADES

### KUNLABORANTOJ

Manuel BORDAS (Barcelona). — D-ro Jascinto BREMÓN (Barcelona). — D-ro Joaquim COLL (Barcelona). — Delfi DALMAU (Bahía Blanca. Rep. Argentina). — Josep DOMENECH (Reus). — Gustau GÁLKERÁN (Vilanova i Geltrú). — Joan GILI (Barcelona). — A. NOVEJARQUE (Valencia). — Joan ROSALS (Barcelona). — Eulalia ROSELL, Teresa ROSELL (Vilanova i Geltrú).

### KORESPONDANTOJ

B. Nogué (Manlleu). — E. Aguadé (Reus). — P. Solanas (Rubí). — P. Costa (Santa Coloma de Farnés). — J. Vidal (Tarragona). — M. Solà (Terrassa). — F. Guitart (Vendrell). — J. Albagés (Vich).

Nia devizo: *Maro estas gataro*

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA  
Katalana Esperantista Federacio

Asocio rindejo de la K. E. F. : Rambla, 41 : Sabadell (Katalunujo)  
Redakcio kaj Administracio de K. E. : Arlano, 55 : Barcelona

## Konfederacio

**A**NTAŬ longe S-roj Piñó, Perogordo kaj Pujulá per cirkulero invitis nin al formo de Federacioj por posta formo de Konfederacio en la Iberia Duoninsulo.

Antaŭ ol decidi nin al tio, ni pripensis la aferon kaj konkludis ke ni devas aŭ akcepti la proponon aŭ aliĝi al «Hispana Societo por propagandi Esperanton», se ni ne volas vivi ĉiam izolaj.

Se ĉiuj hispanaj esperantistoj aniĝus al H. S. p. p. E., ĉi tiu bezonus fari gravan reorganizon por rekte interesi ĉiujn anojn kaj tia reorganizo sendube proksimiĝus al tiu de federacioj.

Konsiderinte tiojn, ni formis la Baskan Federacion kaj se ne-baskoj volus aparteni al ĝi ni aliformiĝos en «Nordan Federacion» en harmonio kun la klasigo farita de «Universala Esperanto Asocio».

Nia unua tasko estas havi gazetorganon kiu devos poste esti organo de la Konfederacio.

En «Oficiala Gazeto Esperantista» de Junio 1914, oni enpresigis, kun rekomendo, la dek devigajn al esperantisto malpermesojn laŭ nia germana samideano S-ro Christaller. La sepa diras : «Ne fondu la de vi intencitan gazeton, ĉar da ili ekzistas jam tro multe.»

En Britujo ekzistas unu sola propaganda gazeto, en Germanujo estas ankaŭ unu sola. Hispanujo ne rajtas, por sukcesa propagando,

havi plurajn. Ni devas ne forgesi, ke «Nova Sentos» kaj «Andalucia Gazeto» malaperigis «Suno Hispana»'n kaj sin mem, kaj se iliaj fondintoj estus uzintaj sian monon por subteni «Suno Hispana»'n, ĉi tiu havus ankoraŭ prosperan vivon.

La ekonomio estas kio plej rekomendas la unikan gazeton. La presado de la unua numero kostas ĉiumonate ĉirkaŭ 70 pesetoj kaj ĉiu posta centu kostas 5 pesetojn. Estis epoko, en kiu ekzistis en Hispanujo kvin gazetoj. Supozante ke ĉiu presis 300 numerojn, la papero kaj presado kostis ĉirkaŭ 3,40 pesetoj por jarabono. La sama jarabono kostus 1,16 pesetojn kun unu sola gazeto. Unu gazeto ankaŭ povas pli facile ol multaj havi bonajn artikolojn, ĉar la ĉefredaktoro povos elekti ilin inter multaj.

Nuntempe ekzistas en Hispanujo unu sola gazeto esperantista, kiu vivas eĉ kun la malhelpo de la milito. Ĝi estas subtenata preskaŭ ekskluzive de la Katalunoj. Mi pensas, ke ĉiuj hispanoj devas subteni ĝin.

Oni povas kontraŭopinii per tio ke KATALUNA ESPERANTISTO estas iom verkita en kataluna lingvo, ke la titolo de la gazeto ne taŭgas por ni ĉiuj.

Ambaŭ malkonvenoj estas facile solveblaj kaj mi esperas ke la katalunoj estas pretaj solvi ilin, per la verko de sia gazeto tute en Esperanto kaj per la alinomiĝo, en ĝustatempa epoko, de la gazeto.

Kelkaj tro rigidaj samideanoj eble vidas ankaŭ politikan malhelpon. Mi ne volas paroli pri ĝi; ĉar mi estas certa ke la katalunaj esperantistoj subtenantaj la gazeton apartenas al ĉiuj politikaj ideoj. Esperantisto ankaŭ lokas politikon post Esperanto: ni ne priokupiĝu do pri politiko en ĉi tiu okazo.

Ni ne forgesu ankaŭ, ke ni povas nun veni kun monapogo granda aŭ malgranda al KATALUNA ESPERANTISTO, sed se oni volus krei novan gazeton, oni devas elspezi la tutan koston de la unua momento, kaj pensi pri buĝeto, monofero k. t. p.

VICTOR O. DE ALLENDE

## Federacio

**E**N pasinta Januaro mi malfermis la paĝojn de KATALUNA ESPERANTISTO al ĉiuj samideanoj, kiuj volos per sia helpo plifirmigi la laboron starigi Iberian Esperantistan Konfederacion. Mi hodiaŭ tre ĝojas, ke nia estiminda samideano S-ro Allende, la pioniro de nia lingvo inter la nordanoj, honoris nin per la artikolo, kiun ni publikigas. Se la ĝenerala konsento de niaj federaciaj povas manki al tre malmultaj detaloj, mi estas certa, ke la tuto estas plene aprobata de ĉiuj KEF-anoj, kiuj nun vidas, kiel ekburgonas la frukton-promesantaj floroj, kiujn naskis la semoj jetitaj dum niaj Kongresoj.

Ĉar ne estas mia intenco paroli ĉi tie pri la afero konfederacia, kiun mi pritraktos per la sekvanta numero de K. E., mi atentigos nur niajn legantojn pri la bona efiko de niaj ĉiujaraj kunvenoj, kie el la interŝanĝo de ideoj kaj el la komuniĝo de entuziasmoj, ni ĉiuj ĉerpas kuraĝon por plua laborado kaj konvinkon je la boneco de nia agado.

Ni estas jam nun, antaŭ la Sesa Kongreso de nia Federacio en momento, kiam nia ideo estas forte skuata de la milita ŝtormo. Ni ĉiuj veturas sur ŝipo, kiun la marondoj frapegas, kaj ni, la malmultaj deforantoj apud ĝia direktilo, bezonas pli ol iam, ke la ŝipanoj, kiuj konfidis en niajn manojn la direktadon, lerte manovru apud ni, por konduki ĝis la trankvila haveno tra ĉiuj malkvietoj kaj batoj la fortikan flosaĵon, en kiu ni ĉiuj deponis la simbolon de nia idealo.

Estas necese, ke vĵ ĉiuj, karaj geanoj de nia Federacio, faru ĉiun klopodon kaj eĉ oferon por ĉeesti nian Kongreson en Vilanova, ĉar en ĝin atendas vin ne nur la ordinara tasko, kiun ĉiujare ni plenumas, sed ankaŭ tiu eksterordinara laboro, kiun la cirkonstancoj ŝarĝas sur niajn ŝultrojn. Ni estas en nia kontinento el la malmultaj, kies puran esperantan senton ne kontraŭbatalas la malamaj ekblovoj, — kies amo al tuta homaro ne dronas en sangaj ondoj. Hontinda egoismo estus la nia, se ni lasus ke la fajro de nia entuziasmo, kiun en aliaj landoj kovras la cindro de nepraj bezonoj, estingiĝu tute pro la katastrofo, des pli multe ĉar ni facile povas konservi ĝian ardecon, se ni scias per nia Federacio profiti, el la uragano, la blovojn povantajn plivigligi nian homaman bruladon.

Se milito ŝajne detruis la rezonon de nia paca predikado, ĝi

tamen montras kiom prave ni asertis, ke nia lingvo taŭgas por ĉia helpo. Kaj se ni povas el la pereco savi nur la materian flankon de nia ideo, ni faru tion kurage, ĉar sur ĝi, kiel sur malsupera grundo ni enradikigos fruktoporte la belan arbon de nia alta idealismo.

Ni iru do amase en la Kongreson : se kiam inter ni aperis malŝatindaj, nevivipovaj rivalcentoj, ni sciiis esti sindonaj por ĉeesti feston de nia K. E. F. kaj tie eljuĝi pri vera justeco, nun kiam paco ĉe ni tute regas, ni devas iri al Kongreso por ĝui la ĉarman senton de familia amo inter ni ĉiuj.

Se ni ankoraŭ ne povas rikolti el la kulturitaĵo, ni tamen daŭrigu pli intense la laboron : tiujn, kiuj nun ne povas alhelpi, ni regalos poste per la bongustaj fruktoj rikoltitaj, kaj ni estos ĝojaj ke nia Federacio, unuiginta niajn klopodojn, atingis tiun benindan rezulton.

JOSEF GRAU



## VI<sup>a</sup> Kongreso de la K. E. F.

**L**A dato de la Kongreso estas fiksita : ĝi okazos la 16<sup>aa</sup>, 17<sup>aa</sup> kaj 18<sup>aa</sup> de Oktobro en Vilanova i Geltrú. La provizora programo de la Kongreso aperos en la venonta numero de KATALUNA ESPERANTISTO; ĝin ni skizis jam per nia numero de Majo.

Ĉar la fervojaj rabatbiletoj liveritaj de post sabato tagmeze ĝis sekvanta lundo rezultas pli malkaraj ol la tarifoj, kiujn rabate konsentas la fervojkompanioj por la okazo de Kongresoj, la Komitato ne eldonis rabatkartojn por la vojaĝado al la kongresurbo. La federaciaj povos profite uzi la ordinarajn de sabato ĝis lundo malkarajn biletojn.

De multaj turboj en nia lando ni ricevis sciigojn pri la entuziasmo por nia Kongreso, kiun plej multe sentas tiuj, kiuj, partoprenonte en la X<sup>a</sup> Kongreso en Paris, neĉeestis la pasintan jaron en Sant Feliu de Guixols.

Ni estas certaj, ke nia Sesa havos brilan sukceson, kaj ke ni povos montri per ĝia heleco, ke nia samideanaro ne senkuragiĝis malgraŭ la malfavora momento.

Belulino kaj la Besto<sup>1</sup>

Teatraĵeto por la infanoj

## AKTO UNUA

(Seno)

Sceno tria. La ĝardeno de la Besto. BELULINO sidas penseme sub arbo.

BELULINO. — Jen stranga loko! Kiel bele aspektas la floroj sub la sunradioj! Kiel dolĉaj la fruktoj, kiel grandiozaj la arboj! Kaj ĉio tio ĉi la propraĵo de tiu mirinda Besto! Strange, strange! Ĉu efektive estis nur hieraŭ kiam mi tien ĉi venis, duone mortinta pro teruro, atendante esti tuj mortigita de furioza monstro? Kaj nun, nun mi estas konfuzita, mirigita, jes, — sed jam mi preskaŭ ĉesis timi lin. Al mi li estas tute milda kaj ĝentila. Ho ve! Ĉu mi iam revidos la patron kaj fratinojn? Mi faros mian eblon por komplezi al la Besto, kaj eble li permesos al mi reiri hejmen. Jen li venas!

(Eniras la BESTO.)

LA BESTO. — Brrrr! (BELULINO eksaltas.) Pardonu min, fraŭlino; ne timu. Mi nur volis diri: Bonan matenon!

BELULINO. — Bonan matenon, sinjoro Besto.

(La BESTO sidigas apud si. Si surprizense iomete detiras sin de li. Li tuj levigas, faras kelhajn paŝojn, kaj residigas.)

LA BESTO. — Ĉu vi kantas, Belulino?

BELULINO. — Iomete.

LA BESTO. — Kantu do, mi petas.

BELULINO (tíme). — Mi ne memoras la vortojn, sinjoro.

LA BESTO. — Brrrr!

BELULINO. — Ne bleku, mi petegas! Mi tuj kantas.

LA BESTO. — Pardonu min, fraŭlino. Mi nur volis diri: Komplezu al mi.

BELULINO (Roulon). — Kion kanti? Ion amuzan, mi opinias. (Al li.) Mi kantas kanteton titolitan: «Kial Beto ne ridis». (Kantas vigle kaj sprite.)

Beto al festeto iris.  
Poste ŝi al Panjo diris:  
«Malŝelĉo ekokazis.  
Tre domaĝa estis ĝi.

Ekokazis ĉe la balo  
Al knabino terenfalo.  
La infanoj mokridegis,  
Ĉiuj ili, — nur krom mi!»

«Vi ne ridis tiun falon!  
Diru al mi la kialon.  
Kara Beto ne respondis;  
Tutsilenta restis ŝi.

«Ĉu ne venis ĉi rideto?  
Kial do, kara Beto?»  
Jen la knabineto ilustris:  
«Kiu fals, estis mi!»

LA BESTO (ruliĝante sur la tero). — Ha! ha! ha! ho! ho! ho! hi!

BELULINO (saltante de teruro). — Ho! kompatu min! Kio estas? Kion mi faris?

LA BESTO. — Mi nur ridis.

BELULINO. — Ĉu vere? Ne ridu do, mi petas. Bleku.

LA BESTO (*iom ofendite*). — Kantu denove.

BELULINO (*flanken*). — Kion do? Ne pluan humorajon; mi tute ne povas toleri tiun ridaĉon.

(*Si kantas dolte kaj malĝoje.*)

Malproksime nun vi estas,  
Kara amato!  
Dolorigas mian koron  
Anim-malsato.

Vin revidi mi sopiras;  
Baldaŭ revenu.  
Dum la longa forrestado  
Dio vin benu!

(*Dum ŝi kantas, la BESTO faligas la kapon inter la antaŭpiedoĵojn, kaj fine ploras.*)

BELULINO (*ekrigardinte la BESTON*). — Kio estas, sinjoro? Ĉu vi mokridas min? (*Paŭzo*) Kio okazis? Ĉu estas malbone al vi? (*Alproksimigas al li.*) Kiel? Vi ploras! Ho, ĉielo! kial do? Ne ploru, ne ploru! Ridu, mi petas! (*Surgenuigas apud li, kaj karesas lian kapon.*) Ne ploru, sinjoro Besto. Kial vi ploras?

LA BESTO. — Mi ploras, ĉar via kanto estis tre kortuŝa, kaj ankaŭ pro tio, ke mi estas treege malfeliĉa.

BELULINO. — Ho, mia kompatinda amiko!

LA BESTO. — Belulino, ĉu vi vere kompatas min?

BELULINO. — Tute vere.

LA BESTO. — Ha, anĝelo vi estas, benata anĝelo! Ĉu vi do amas min?

BELULINO. — Nu-nu-mi-e-ble, mi baldaŭ ametos vin.

LA BESTO. — Tiel estu! Ĉion mi faros por vi; kion ajn vi deziras, tion mi plenumos. Esprimu ĉiun volon, kaj estos mia ĝojo kaj plezuro havigi ĝin al vi, por ke via ĉi-tiea restado estu feliĉa.

BELULINO. — Nur unu afero malĝojigas min, sinjoro.

LA BESTO (*tervove*). — Kaj tio estas...

BELULINO. — La foresto de la patro kaj fratinoj.

LA BESTO. — Brrrrr!... Pardonu min, sed kial tio ĝenas vin?

BELULINO. — Ili bezonas min. Ili deziras miajn servojn. Mi estas certa, ke ili estas malfeliĉaj pro manko de mi.

LA BESTO. — Sensescaĵo! Vi ne estas ilia sklavino. Estu gaja! Kantu, dancu, kolektu ŝoseojn, manĝu fruktojn, kaj forgesu la parencojn.

BELULINO. — Tute neeble! La karan hejmon oni ne povas forgesi. Ho, sinjoro! promesu, mi petas, ke post nelonge vi permesos al mi almenaŭ viziti la patron.

LA BESTO. — Ne, ne! Mi volas ne perdi vin.

BELULINO. — Sed mi ja revenus.

LA BESTO. — Nu, do, eble! Se...

BELULINO. — Dankon, dankegon, sinjoro! Nu, kion mi faru por plaĉi al vi?

LA BESTO. — Estu feliĉa! Dancu, dancu, mi petas.

(*BELULINO dancas. La BESTO admire rigardadas ŝin.*) (KURTENO.)

## AKTO DUA

Sceno unua. *La ĝardeno de la BESTO. Li kulas ĝemante sur la tero, proksime de la fono.*

LA BESTO (*parolas malfortike, kun longaj paŭzoj inter la frazoj*). — Ho ve! ve! Belulino mia, kara mia anĝeto! Mi svenas, — mi mortas pro vi! Kiel longa ŝajnas la tempo de via foriro! Unu semajno, — kaj jam estas kvazaŭ jarcento! — Ŝi sopiris vidi la patron. — Ŝi petis, petegis. Fine mi konsentis. Ŝi promesis reveni. Sed kiel oni povus atendi plenumon de tia promeso? Nepre ŝi forrestos. — Ho, se nur ŝi revenus! Se nur, laŭ la magia antaŭdira,

Mi venus, alproksimiĝus, kisus min! Kia ĝoja, kia neatendebla feliĉo! Mi svenas, mi mortas!

(*Gemas kaj falas laŭlonge la teron. Restas senmova. Eniras BELULINO.*)

BELULINO. — Jen denove mi estas en la kara ĝardeno. Strange, ke mi tiel sopiris reveni! La petoj de mia patro, la kisoj de miaj fratinoj neniel povis restigi min. Mi estis altirata kvazaŭ per nevideblaj ŝnuroj al mia kompartinda Besto. Strange, tre strange! Mi ne povis klarigi la aferon al la fratinoj, eĉ ne al mi mem! (*Leviĝas la BESTO.*) Jen li estas! Ĉu li dormas? (*Alproksimiĝas al li.*) Ne, li svenis! Ho, ĉielo! Ĉu li estas mortinta? (*Surgenuiĝas apud li.*) Ho sinjoro! ho, kara mia! kio estas al vi? Jen mi, Belulino! Parolu al mi! Ĉu vi efektive mortis?

LA BESTO (*iom revigliĝante*). — Ne, ankoraŭ ne, sed preskaŭ mi mortis.

BELULINO. — Kial do? Kio okazis?

LA BESTO. — Pro amo al vi mi mortas, Belulino.

BELULINO. — Mi, mi! Ho, karega Besto, ne mortu! Reviviĝu, vivu, vivadu por mi, ĉar mi vin amas!

LA BESTO (*mirige*). — Vi amas-min?

(*BELULINO kisas lin, li taj farigas bela PRINCO, kaj ekstaras.*)

BELULINO (*kviegas mirige*). — Ho, kio okazis? Kiu estas vi?

PRINCO. — Mi estas Princo Karolo de Gajalando, kaj via fidela sindona amanto.

BELULINO. — For de mi, sinjoro! Kie estas mia kara Besto?

PRINCO. — Brrrrr! Karulineto!

BELULINO. — Ĉu vi? Klarigu tion ĉi misteraĵon.

PRINCO. — Eble vi scias, ke la Princo de Gajalando subite malaperis antaŭ kelkaj jaroj.

BELULINO. — Jes, mi bone memoras tion.

PRINCO. — Malbona magiulo transformigis min en beston. Bona feino proklamis, keklam juna, bona, bela fraŭlino venos kaj propravoĉe kisos min, la magiulo estos detruita, kaj mi ricevos denove mian propran formon. Ni do rapidu al la kortego de mia reĝa patro, kiu tre ĝoje akceptos nin, kaj taŭge festos nian gredziĝon. (*Ĉirkaŭprenas lin.*) (*KURTENO.*)

Sceno dua. *Saloneto en domo de PROSPERO. ADELINO kaj KLARICO halsidas ocedante. La lampo aspektas malorda kaj nezorgita. La fratinoj estas negliĝe vestitaj, kun malordigitaj haroj, h. t. p. Eniras rapide PROSPERO en negliĝa vesto.*

PROSPERO. — Mi deziras puran kolumon. Kie estas miaj paraĵ kolumoj? Mi ne povas trovi eĉ unu!

ADELINO. — Demandu al Bel... Ho, mi forgesis! Demandu al Rikardo.

PROSPERO. — Rikardo! la sentaŭgule! nenion li scias! Ho, ke mia kara Belulino estu ĉi tie!

ADELINO. — Jes, efektive.

KLARICO. — Karega Belulino!

PROSPERO. — Kial do vi ne faras vian devon? Jen ĉio malorda! Nenio komforta, nenio pura! Rigardu tion ŝtrumpon!

(*Deskuas la pantoflon. Montras la nudajn piedfingrojn elstarantajn el truo de la ŝtrumpo. ADELINO kaj KLARICO haldas la vizaĝojn per la manoj.*)

ADELINO. — Ho, paĉjo, hontu! Vi ja estas malĝentila.

PROSPERO. — Estas vi, kiu devus honti. Kial vi ne flikas la ŝtrumpoj?

KLARICO. — Kara Belulino tion faris dum sia vizito.

PROSPERO. — Jes, mi scias. Ŝi flikis miajn, kaj viajn, kaj siajn. Sed jam ili denove bezonas flikadon.

ADELINO. — Eble kara Belulino baldaŭ revizitos nin. Ĉu vi ne povas atendi ĝis tiam?

PROSPERO. — Ne, mia karulino ne revenos. Sendube ŝi jam estas mortigita de tiu terura monstro.

KLARICO. — Kial do vi permesis, ke ŝi reiru al li?

ADELINO. — Strange estis, ke ŝajne ŝi efektive deziris reiri al la abomeninda bestaĉo!

RIKARDO. — Sinjoro! Fraŭlinoj! Alvenis kariero, ĉiuj diris, ke lia reĝida mastro, Princo Karolo de Gajalando, alproksimigas por viziti vin.

PROSPERO. —

ADELINO. — { *(eksalte)*. — Kion?

KLARICO. —

PROSPERO. — Princo Karolo! Tiu, kiu perdis antaŭ longe!

RIKARDO. — Ŝajne li jam retroviĝis, ĉar li certe venas ĉi tien kun sia novedzino.

ADELINO. — Novedzino! Ho rapide, paĉjo, vestu vin!

PROSPERO. — Kaj mi eĉ ne havas paron beluson. *(Parfite la negligen vestoj.)* Alportu mian veston, kamaĵo! *(RIKARDO alportas ĉiuj kolpas lin ŝusoj.)* Nu do, eliru por akcepti la vizitantojn, kaj konduku dece.

*(La fratinoj en granda ĥorpe ordigas la tualeton.)*

ADELINO. — Batonuemu mian bluzon malantaŭe, kara Klarico, mi petas.

KLARICO. — Necble. Mi estas tro okupata. Mi ja devas ordigi la harojn.

ADELINO. — Se nur mi sarportus la diamantan tiaron!

KLARICO. — Se nur mi estus lavinta la vizigon hodiaŭ!

*(Eniras RIKARDO, ŝevante de PRINCO kaj BELULINO.)*

RIKARDO. — Iliaj Reĝidaj Moŝtoj la Princo kaj Princino de Gajalando.

*(Ĉiuj riverencas.)*

PROSPERO *(Alvante tre malalte)*. — Via Princa Moŝto faras al mi grandan honoron.

BELULINO *(kurante antaŭen)*. — Ho, Paĉjo, Paĉjo, ĉu vi ne konas min?

PROSPERO. —

ADELINO. — { Belulino!

KLARICO. —

PRINCO. — Nu, ĥoputro, ĉu vi ne konas min?

PROSPERO. — Neniam antaŭe mi havis la honoron vidi vian Princan Moŝton.

PRINCO. — Brrrr! *(RIKARDO falas teren, ADELINO kaj KLARICO kriegas.)*

PROSPERO. — La B-l-l-b-esto!

PRINCO *(dismprezante lin)*. — Antaŭe vi konatiĝis kun Besto kun homa parolpovo, nun vi vidas homon kun besta parolpovo.

BELULINO. — Kaj mi certigas, paĉjo, ke tiu Besto estas la plej aminda kaj milda el ĉiuj Princoj!

PROSPERO. — Tia mirindaĵo preskaŭ senspirigas min.

PRINCO. — Brrrr!

*(PROSPERO tremegas.)*

BELULINO. — Kara patro, kreŭn, ke al mi tiu bleko estas la plej dolĉa muziko en la tuta mondo.

PRINCO. — Karegulineto mia! Brrrrr!

*(KURTENO.)*

*(Fino.)*

LOUISE BRIGGS

La numero septembra de KATALUNA ESPERANTISTO aperos kun prokrasto ĉirkaŭ la 25<sup>a</sup> DE SEPTEMBRO. Ĝi enhavos la Programon de la Kongreso, hortabelojn de vagonaroj, prezaron de hoteloj, kongresinsignon, proponojn prezentitajn, la verdikton de la Floraj Ludoj kaj suplementon kun bildoj de la kongresurbo

**Ĉu en Karcer' ?<sup>1</sup>**

DEVIZO : «*Omnia vincit amor,  
nos et cedamus amori.*»

Virgilius

Ĉu en karcer' fortika estas vi ligita,  
Kaj liberigi vin nur vane penas?  
Aŭskultu! de l' katenoj kaj de l' pord' fermita  
Mi la ŝlosilojn tenas.

Se vin malsato kaj soifo malfortigas;  
De gravaj vundoj vi doloron havas;  
Ne timu! mia medicino resanigas,  
La sangon ĝi forlavas.

Vi tremas pro vojaĝo sur malluma vojo;  
L' estontajn paŝojn vi ne klare vidas;  
Min fidu! forflugadas ombroj de malĝojo  
Se mia lampo gvidas.

Mi sole povas rompi ĉiujn vivkatenojn;  
Al kor' malsana estas mi balzamo;  
Mi al animo senkuraĝa portas benojn,  
Ĉar mi nomiĝas Amo.

CLARENCE BICKNELL



## V<sup>o</sup> Floraj Ludoj de la Kataluna Esperantista Federacio

### LISTO DE DEVIZOJ DE VERKOJ RICEVITAJ

NUMEROJ : 6, Laŭ peto. — 7, Se mi havus forton kaj spiron de vento. — 8, Beleco. — 9, Natura deveno. — 10, Paco kaj kompato. — 11, Ni. — 12, Kie vi estas? — 13, Milito. — 14, En la dubo, ambaŭ. — 15, Printempo, sezono de floroj, Ĝnoma epoko de l' koroj. — 16, Idealismo nin fortigu dum kruela tempo. — 17, Estas tradukado, plej bona ekzercado. — 18, Mallerta pafantulo maltrafos celtabulon. — (*Daŭros.*)

1. Kvara mencio en la IV<sup>o</sup> Floraj Ludoj de K. E. F.

## ENLANDA MOVADO

Antaŭ nelonge ricevita el la batalkampoj letero de S-ro Pujolà sciigas nin, ke li restas kun bona sano. Lin tre ĝojigas la marŝado de la esperantista afero kaj speciale de la K. E. F.

Li petis nin, pro sia okupado, ke ni petu de la multaj samideanoj salutintaj lin per letero, bonvolu senkulpigi tial ke li ne povas private respondi al ĉiu, dankante por la afableco lin saluti.

**BARCELONA.** — En la *Barcelona Hejmo de la K. E. F.* oftigas kun sukceso la kunvenoj, kiujn ĉeestas ĉiufoje kreskanta aŭskultantaro. La 9<sup>ma</sup> de Junio S-ro Josep Grau faris tie paroladon pri la servoj faritaj de nia lingvo dum la Milito; kiun li daŭrigis la 19<sup>ma</sup> per elmontrado de novaj dokumentoj kaj faktoj.

La 3<sup>ma</sup> de Julio S-ro Artur Domenech legis kaj komentariis tradukon en Esperanto de la verko de G. Martinez Sierra «Tú eres la Paz», kaj la 10<sup>ma</sup> S-ro Joan Amades gvidis interesan konversacion pri propagandaj rimedoj alprenindaj.

La 17<sup>ma</sup> de Julio nia germana samideano S-ro Conrad Berghänel paroladis pri «Estanteco kaj estonteco de nia lingvo» esprimante proprajn opiniojn, kun sento vere esperantista.

La 18<sup>ma</sup> je la 5<sup>a</sup> posttagmeze okazis en la festosalono de la *Hejmo* la solena disdono de la diplomoj al la lernintoj de la kurso, kiun gvidas en la Universitato pastro D-ro Coll.

En la prezidejo okupis lokon S-roj Balsells, Renom kaj Buyé el la Komitato de la K. E. F., D-ro J. Coll kaj S-ro J. Grau.

S-ro Balsells, prezidanto de K. E. F. malfermas la feston kaj cedas la prezidon al pastro Coll, kiu legas sian belan paroladon en Esperanto kaj kataluna lingvo. Dankinte speciale la inkognitan samideanon, kiu ĉiujare donacas la premion «Universitat» de cent pesetoj, li pritraktis kelkajn demandojn pri nia lingvo, kaj fine citis la kvalifikaĵojn aljuĝitajn<sup>1</sup> al la kursanoj, kiuj de manoj de S-ro Balsells ricevis la honorajn diplomojn.

S-ro Grau uzis poste la parolon kaj petinte rememoron por tiu kiu en pasintaj jaroj okupis lian lokon en la sama festo, por S-ro Pujol-

1. Ili aperis en la pasinta numero de KATALUNA ESPERANTISTO.

la, pioniro de nia movado en nia lando, parolas pri la tasko farota por plisukcesigi la kursojn, kiujn tiel lerte kondukas en la Barcelona Universitato pastro D-ro Coll.

S-ro Guilleumot, en la nomo de la lernintoj, dankis la klopodojn de sia profesoro kaj esperis, ke la sukceso de la kursoj estos ĉiujare pli granda.

S-ro Balsells deklaris la feston finita, kaj la ĉeestantoj restis en la *Hejmo* babilante ĝoje pri la starigo de tiu bela kunvenejo, kiun ĉiu esperantisto devas subteni per sia morala kaj materiala apogo.

Per venontaj sabatoj promesis sian helpon S-roj Ledergerber sviso, kaj Vannier, franco, kiuj faros paroladojn esperante. Pri ili ni raportos.

— La kurso ĉe la skolta societo bone prosperas, ĉar la nombro da lernantoj kreskis de post la komenco. Nia entuziasma samideano, sinjoro Joan Rosals, donacis al ĉiu ano de la skolta kurso unu ekzempleron de sia utila *Esperanta helpilo por lernantoj*.

— La grupo *Nova Sento* malfermis la 6<sup>an</sup> de Julio kurson de Esperanto, kiu okazas mardojn kaj ĵaŭdojn je la 8<sup>a</sup> vespere.

— *Barcelona Stelo* malfermis en sia sidejo du kursojn, kiuj okazas marde, ĵaŭde kaj sabate, de la 9<sup>a</sup> ĝis la 10<sup>a</sup> vespere. Ilin gvidas: S-ro Guilleumot, la unuan; S-ro Domenech, la duan.

— La «Societo de Altiro de alilandanoj» akceptis interŝanĝi siajn interesajn publicaĵojn kun tiuj de la K. E. F.

Ankaŭ estas farota interŝanĝo kun la publicaĵoj de la «Biblioteca de Catalunya».

**TERRASSA.**— La 29<sup>an</sup> Junio okazis teatra prezentado en la bela scenejo de nia grupo, rolludante diversaj kungrupanoj.

La grupo «Aplec» el Sabadell, anoncis viziton al la nia; la tago estas neankoraŭ fiksita.

S-ro Sebastiano Chaler estas nomita delegito de «U. E. A.» en nia urbo. — *La Korespondanto*.

**GIRONELLA.** — La 30<sup>an</sup> de Majo lasta nia samideano Miquel Guitart faris paroladon pri Esperanto kiel kunigilo de la nacioj, en la Ateneo, kie ĉeestis tre multenombra personaro, kiu aplaudis la parolinton. Sekve de tiu propagando, grupo estas en organizo.

**TARRAGONA.** — La Direkta Komitato de *Tarragono Esperanta* estas elektita jene: *Prezidanto*: S-ro Josep Vidal Ras; *Vic-prezidanto*: F-ino Francisca J. Muntané; *Sekretario*: S-ro Pau Huecas; *Vic-sekre-*

*tariino* : F-ino Josepa García; *Kasisto* : S-ro Domènec Obiol; *Kalkulisto* : S-ro Mariàn Alegret; *Bibliotekhistino*; F-ino Dolors Navarro; *Voĉdonantoj*, S-roj Joan Guasch kaj Manuel Baradat. *Ekskursa Fakoj*. *Prezidanto*, S-ro Tomás Martí; *Vic-prezidanto*, S-ro Daniel Roig; *Sekretario*; S-ro Arturo Alonso. *Propaganda Fakoj*. S-roj Vidal, Roig, Obiol kaj Guasch. *Konsulino de T. E.* en St. Feliu de Guixols : F-ino Isabel Masmijtjà. *Konsulo de T. E.* en Tortosa : S-ro Josepa Argilaga. *Gvidantoj de kursoj* : S-roj J. Vidal Ras kaj Joan Guasch.

— La kara edzino de nia bona amiko S-ro. Domènec Obiol, delegito de K. E. F., naskis belan filon. Niajn gratulojn al ges-roj Obiol.

— La «Ekskursa Fakoj» de T. E. okaze de kelktaga restado inter ni, de nia konsulino en St. Feliu de Guixols, F-ino I. Masmijtjà, organizis por la 14<sup>a</sup> Marto pasinta belan ekskurson al la romepoka akvokonduk-ponto, kiun ĉeestis multenombraj samideanoj. Dum la iro kaj reveno oni multe interbabiladis en nia lingvo.

— S-ro Josep Vidal Ras, Prezidanto de «T. E.» oficisto en la Normala Lernejo de Instruistoj, edziĝis kun F-ino Teresa Balart, esperantistino, el «T. E.» Al la novaj geedzoj ni deziras seninterrompan feliĉon.

— S-ro Benigno de Luna, prezidanto de *Fraternco* de Zaragoza, faris elokventan paroladon la 27<sup>a</sup> Aprilo, en la salono de societo *Tarragono Esperanta*. Per kastila lingvo li komencis paroli pri la origino de Esperanto, ĝia historio ĝis la apero de la esperantaj lernolibroj kaj gazetoj; li daŭrigis pri la disvolviĝo kiun Esperanto akiris pli kaj pli ĝis la aktuala tempo, kaj fine kuraĝigis la aŭdantaron daŭri firme laborante por la atingo de nia nobla idealo. Longaj aplaŭdoj premiis la paroladon de S-ro Luna, post kiuj S-ro Vidal kiel Prezidanto de *Tarragono Esperanta*, transdonis al li por la Zaragozaj gesamideanoj varmajn salutojn de la Tarragonaj, dankis lin por la afabeco kiun li havis akceptante fari tiun paroladon, per kies fakto la grupo inaŭguracias sian novan festalonon kaj rimarkigis ke *Tarragono Esperanta* kiu ĉiam estas preta sekvi belajn iniciativojn por la propagando de nia lingvo, konsideras sin tute honorata gastigi tiel kompetentan samideanon. S-ro Luna subskribis sur la Honora Albumo.

— La kursojn por ambaŭ seksoj, kiujn gvidas S-roj Vidal kaj Guasch en nia grupejo, ĉeestas tiel grandnombraj gelernantoj ke estis necese enkonduki reformojn por la plivastigo de la ĉambroj.

— La ekskursfakanoj de «T. E.» aranĝis serion da ekskursoj por dum la nuna somero. La unua okazis dimanĉon 13<sup>a</sup> Junio al la pentrinda loko de la *Foné den Garrot*. La dua al la *Coves i Font*

del Llorito, la tria al la *Punta de la Mora* kaj la kvara al la *Pineda* kaj *Farola i Port de Salou*. Ĉiuj sukcesis kaj ĉeestis multnombraj samideanoj.

— La 20<sup>aa</sup> de la pasinta junio faris ŝipan ekskurson 550 personoj el *Ateneu Enciclopedic Popular* de Barcelona. Kune kun la ekskursoj venis proksime kvindeko de gesamidea noj kaj multaj ĉarmaj kaj belaj fraŭlinoj.

La esperantistoj kunportante verdan standardon vizitis la loĝejon de *Tarragona Esperanta* kie ni havis la honoron saluti entuziasmajn amikojn el la societoj : *Aplec, Esperanta grupo* kaj *Esperanta Semo* el Sabadell; *Paco kaj Amo, Barcelona Stelo* kaj *Semo* el Barcelona kaj multajn aliajn gesamideanojn.

Post vizito al ĉiuj interesaj konstruaĵoj okazis frata festeno ĉe la *Hotel de Europa*. Dum sia restado la aliurbaj samideanoj vigle propagandis por nia lingvo.

— Nia grupo lünebras pro la morto de F-ino Dolores Navarro, el la Komitato de *T. E.* kiu mortis 21-jara, la 3<sup>aa</sup> de Julio.

La 12<sup>aa</sup> mortis ankaŭ fervora amiko de Esperanto, S-ro J. A. Soler Galtés, direktoro de la Instituto, kies salonon li proponis diversefoje al la esperantistoj, nome por la paroladoj de S-roj Rosals kaj Dalmau. Ili pace ripozu. Al iliaj familioj nian sinceran kondolencon. — *La Korespondanto*.



## ALILANDA MOVADO

### DEKUNUA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

*San Francisco (Kalifornio), 22-29 Aŭgusto 1915*

(*El la tria cirkulero*). La unuan dimanĉon de la Kongreso, Aŭgusto 22<sup>aa</sup>, okazos neformala kunigo de ĉiuj alvenintaj gesamideanoj en la fama «Ora Pordega Parko», kies centoj da hektaroj da tropikaj kaj duontropikaj kreskaĵoj atestas en frapanta maniero la dolĉan klimaton de nia regiono.

La ĝeneralaj kunsidoj de la Kongreso okazos dum la sekvantaj tagoj, de la 23<sup>a</sup> ĝis la 27<sup>a</sup> de Aŭgusto, inkluzive. Okazos ankaŭ la kelkaj kunsidoj de la Oka Kongreso de E.A.N.A. kaj de U.E.A.-delegitoj. Specialaj fakaj kunsidoj estas en preparo, por ke nia kongreso havu kiel eble plej gravan kaj vastan kampon. La ĉefaj kunsidoj okazos en la vesperoj, por ke la kongresanoj havu tempon viziti la Ekspozicion tage.

Unu vespero estos okupata de senprepara oratora konkurso, esperanta komedieto, deklamaĵoj kaj kantoj.

La kongres-insigno estas la plej bela kaj multekosta iam preparita por Esperanta Kongreso. La kongresanoj kaj helpkongresanoj ricevos ĝin senpage, kune kun ĉiuj dokumentoj de la Kongreso, bela gvidlibro tra San Francisco, k. t. p. Aldone al tiuj dokumentoj, la helpkongresanoj ricevos senpage la kolektojn da vidaĵkartoj de San Francisco kaj la Ekspozicio (40 kartoj kun esperanta teksto) kaj provizon da Kongresaj markoj. Oni vidos, ke ĉiuj ricevos plenan valoron por sia kotizaĵo.

La adreso de la Kongreso estas:

### ESPERANTO KONGRESO

SAN FRANCISCO, U. S. A.

## EL ARGENTINA RESPUBLIKO

**BAHIA BLANCA.** — El grava ĵurnalo *El Censor* de tiu amerika urbo ni elprenas kaj resumas la jenan raporton pri esperantaj ekzamenoj okazintaj en la Lernejo n.º 2 kun vere rimarkinda sukceso.

Antaŭ gravaj eminentuloj el Bahia Blanca, inter ili la direktorino de *Instituto Anglo-Español*, sinjorino C. C. de Gonzalez, la direktoro de la Nacia Komercia Lernejo, sinjoro Ricardo Poitevin, D-ro Francisco Cantón, la direktoro de la Lernejo n.º 2, sinjoro Johano C. Cornejo, la lerneja komisiita sekretario, sinjoro Eduardo C. Lerodino, kaj aliaj multaj familioj kaj anoj de Ateneo Esperantista, okazis la ekzamenoj preziditaj de profesoro D. I. Dalmau kaj pastro Marqués ambaŭ eminentaj esperantistoj.

La ekzamenitoj trafe respondis ĉiujn demandojn pri esperanta gramatiko kaj lerte faris tradukaĵojn en kaj el internacia lingvo. Unan premion oni aljuĝis al S-ro Salguero, duan al fraŭlino C. Gonzalez, trian al S-ro Fuentes kaj subpremiojn al S-roj J. A. Ballesteros, J. E. Barquin kaj J. Urretabizkaya. Estas aprobitaj fraŭlinoj J. Fernandez kaj E. Gimenez kaj S-ro S. Sumay. Ĉiuj ricevis sian Diplomon pri lernado.

Post la ekzamenoj S-ro Dalmau faris gratulan paroladon kun vere kleraj rimarkoj pri graveco de Esperanto, de l' morala kaj scienca vidpunktoj, kiuj konvinkis la ĉeestantaron pri la neceseco lerni ĉiuj lingvon tiel belan kaj praktikan, fininte sian parolon per dankoj al lerneja aŭtoritataro de Bahia Blanca por la helpo kaj favoro, kiujn ĝi liveras al instruado de Esperanto.

Parolis ankaŭ pastro Marqués, kiu per elokventaj frazoj laŭdis la lernantojn kaj la profesoron de *Ateneo Esperantista* kaj rimarkigis la grandan influon de Esperanto por scienco kaj por frateco en la homara progreso.

Ni aldonas niajn gratulojn al ĉiuj precipe al nia S-ro Dalmau, kies memoron bone ni konservas.

## PROFESORARO DE LA K. E. F.

La Kongreso de K. E. F. en Sant Feliu de Guixols decidis, ke la diplomitaj profesoroj, sub la helpo kaj kontrolo de la katalunaj lingvokomitatoj, konsistigos pri lingvo spertan korporacion, kiun povos konsulti ĉe lingvaj duboj la Komitato aŭ la membroj de la K. E. F. Jen la nomaro:

LINGVOKOMITATANOJ : D-ro Jascinto Bremón, S-ro Josep Grau, S-ro Fred. Pujulà, S-ro Alfonso Sabadell.

PROFESOROJ AKLAME NOMITAJ DE LA KONGRESOJ : D-ro Jascinto Bremón, S-ro Fred. Pujulà, S-ro Joan Rosals.

PROFESOROJ DIPLOMITAJ POST EKZAMENO : Pastro D-ro Joaquim Coll, S-roj Josep Grau, Enric Aguadé, F-ino Teresa Estela, S-roj Estanislau Pellicer, Joan Campdelacreu, Delfi Dalmáu, Joan Gilí, pastro D-ro Josep Casanovas, S-roj Pere Costa, pastro Francisco Viver, Joaquim Costa, Joan Aulina, Josep Albagés, pastro Josep Planas, Antoni Miquel, Josep Monjonell, Joan Amades, Emili Presas, F-ino Pilar Puigbonet, S-roj Josep Ventura, Leonard Renom, Arturo Domenech, Palmiro Guilleumot.

## KONSERVANTARO DE LA FLORAJ LUDOJ

La suba propono estas prezentita al S-roj D-ro J. Bremón, R. Bricard, G. Chavet, A. Codorniu, D-ro J. Coll, G. Galcerán, J. M.<sup>a</sup> Garganta, F. de Ménil, F. Pujulà, J. Rosals, E. Pellicer, P-tro J. Planas, J. M. Warden, D-ro Leono Zamenhof, nunaj membroj de la Konservantaro por posta prezento al la Kongreso de K. E. F., kiu laŭ la regularo de la konservantaro de la Floraj Ludoj povas decidi pri ĝi.

«Altestimataj kolegoj:

Mi havas la honoron proponi al vi, ke la Konservantaro de la Floraj Ludoj de la K. E. F. decidu submeti al la ekzamenado de la proksima Kongreso en Vilanova i Geltrú la jenan rezolucion:

*La VI<sup>a</sup> Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio, inspirita de la ideoj entenataj en la prezidanta parolado de S-ro Fred. Pujulà en la Festo de la II<sup>a</sup> Literatura Konkurso en Terrassa, alprenas por la okazintaj literaturaj konkursoj de la Federacio la nomon INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ, por kies kronologio, la Floraj Ludoj, kiuj okazis dum la V<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto en Barcelono, estos kalkulataj kiel la unuaj, tiamaniere, ke la ceteraj, okazintaj dum la Kongresoj de la K. E. F., estos laŭorde citataj post tiuj, kiel II<sup>a</sup>, III<sup>a</sup>, IV<sup>a</sup>, V<sup>a</sup> kaj VI<sup>a</sup> Internaciaj Floraj Ludoj.*

Kun plej altaj sentoj restas samideane via Josep Grau, konservanto de l' Floraj Ludoj de la K. E. F.»

## RAPORTO PRI FINANCOJ

La subskribintoj, elektitaj de la V Kongreso en Sant Feliu de Guixols por esplori la demandon pri plibonigo de la financa situacio de la K. E. F., havas la honoron submeti al la aprobo de la VI Kongreso de la Federacio en Vilanova i Geltrú, sian jenan proponon:

Trastudinte la malfacilaĵojn, kiujn la bona funkciado de la Federacio kaj la sekva publikigo de ĝia presorgano, renkontis en la fino de la jaro 1913 kaj de post Julio ĝis Decembro 1914; konsiderinte, ke la subteno de la Esperantistaj Floraj Ludoj kaj de la gazeto *Kataluna Esperantisto* kostas po ĉiu federaciano iom pli ol la kotizaĵo minimuma, kiun la anoj pagas; atentinte, ke jam sindonemaj federacianoj plivalorigas memvole sian jarkotizon; kaj celante fine, eviti en okazoj de eventuala danĝera situacio la ĝenon, kiun povas kaŭzi al la esperantistoj subteni per mondonacoj la ekziston de la Federacio, proponas la raportantoj, ke la Kongreso alprenu la jenajn rezoluciojn:

1<sup>a</sup> La minimuma kotizaĵo de la aliĝintoj al la K. E. F. estos: **4 pesetoj**. Abono, eksterlande, al la K. E. kostos **2,400 Sm.**

2<sup>a</sup> La K. E. F. akceptos prunte en okazoj de bezono garantiajn kotizaĵojn de valoro, kiun fikso la pruntedonantoj, redoneblajn laŭ lote fiksitaj ordo, kiam post jara bilanco restos en kaso sufiĉa sumo por la bezonoj en la unua monato de la sekvonta jaro.

3<sup>a</sup> La Kongreso invitas ĉiujn membrojn de la K. E. F. pruntedoni al ĝi laŭ sia povo, por subteni la eksterordinaran propagandon nuntempe necesan.

1<sup>aa</sup> de Aŭgusto 1915. — *La Raportantoj* : D-ro Joaquim Coll, Josep Grau, Joan Piferrer, Joan Rosals.



La federacianoj, kiuj volos prezenti siajn proponojn al la aprobo de la VI<sup>a</sup> Kongreso de la K. E. F., estas petataj\*alsendi ilin antaŭ la 10<sup>a</sup> de Septembro por ke ili povu aperi en ties numero de KATALUNA ESPERANTISTO, tial ke estos nepre diskutataj nur tiuj proponoj aperintaj, laŭ la regulo 7<sup>a</sup> de la K. E. F.



## KORESPONDADO

«La Verda Standardo» : Ni ricevis *neniun* numeron de via gazeto. Kial? Ni ne povas konjekti. Bonvolu resendi ilin. — A. Sharapov : Pro sia karaktero viaj verketoj ne taŭgas, bedaŭrinde. Ni dankas vin. — Redakcioj de «The British Esperantist» kaj «Esperanto» : Danke ni ricevis viajn sendaĵojn. — S-ro M. S. Terrassa : Ni dankas vian koncizecon.

LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO  
 ELDONIS POR LA PROPAGANDO KELKAJN  
 MILOJN DA MARKOJ, KIUJN MULTAJ SAMI-  
 DEANOJ ANKORAŬ NE KONAS. POR DISKONIGI  
 ILIN KAJ POR INSTIGI NIAJN LEGANTOJN, ILIN  
 AĈETI, NI DONAS HODIAŬ UNU EKZEMPLERON



**PREZO:**

50 markoj . . . . .	50 centimojn
1000 " . . . . .	750 pesetojn

SENDOKOSTON PAGAS LA AĈETANTO

HELPU AL LA TASKO DE LA K. E. F. AĈETANTE ĜIAJN  
 PROPAGANDAJN MARKOJN

Certe vi sentas vin ĝojaj, kiam vi ricevas ĉiun numeron de nia gazeto. Certe vi estas fieraj, kiam vi povas ĝin montri al neesperantisto por lin konvinki pri la forto de nia movado. Certe vi elĉerpas plezuron el la legado de la verkoj en nia gazeto aperantaj, kiujn ĝia Redakcio klopodas fari ĉiufoje pli interesaj. Certe via esperantista sento plifortiĝas, ĝuante la festojn kaj solenaĵojn de niaj Kongresoj. Certe vi interesigas al la Esperantistaj Floraj Ludoj, kiuj dum la kongresoj okazas

Ĉio ĉi-tio estas subtenata nur per  
la kotizaĵoj, kiujn vi pagas. Se vi  
pagas ilin malfrue, vi nevole mal-  
helpetas la sukceson de nia laboro

Klopodu do pagi kiel eble plej baldaŭ vian kotizaĵon al la delegito en via urbo, aŭ rekte al la Administracio de la K. E. F. str. Aribau, 55 : Barcelona, per poŝta ĝiro aŭ per poŝtmarkoj. Se vi bone povas, aldonu al la malgranda jarkotizo da 3 pesetoj iun eĉ malgrandan sumon, kiu faciligos la plenumon de la devoj de la K. E. F.

GEFEDERACIANOJ PAGINTAJ MINIMUNAN 3-PESE-  
TAN KOTIZON RICEVAS SENPAGE LA GAZETON.  
JARABONO POR LA CETERAJ SAMIDEANOJ KOSTAS:  
*Enlande, 4 pesetojn; Eksterlande, 2 spesmilojn*

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA PRESORGANO

DE LA



JARO VI<sup>a</sup> : SEPTEMBRO 1915

KATALUNA ESPERANTISTO



ESPERANTA EKS-POZICIO DE LA  
ATENEO DE VILANOVA I GELTRU



## FAKSIMILOJ

de iuj el la dekkvin markoj propa-  
gandaj eldonitaj okaze de la

### VI Kongreso de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

en Vilanova i Geltrú

de nia entuziasma samideano,  
konata kolektisto, S-ro JOAN  
AMADES.

Tiuj markoj estos vendataj  
profite de la K. E. F. dum la  
Kongreso.

Folio de 15 diversaj markoj  
30 cent.



Nia devizo: *Maro estas gultaro*

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA

**Kataluna Esperantista Federacio**

Asocia sidejo de la K. E. F. : Rambla. 41 : Sabadell (Katalunujo)  
Redakcio kaj Administrado de K. E. : Aribau, 55 : Barcelona

## Konfederacio

**V**ENIS jam la tempo, kiam la semoj teren jetitaj de la Kataluna Kongreso en Olot elstarigas la trunketojn, kiuj fariĝos fruktoplenaj arboj, se ni bone kulturas ilin. Ni estas jam en la okazo efektivi la projekton de Iberia Esperantista Konfederacio : el la interŝanĝo de opinioj, kiun komencis tuj post nia IV<sup>a</sup> S-roj Pujulà, Piñó kaj Perogordo, kiu daŭris la nunan jaron inter S-roj Allende, Inglada, Perogordo, Piñó, Soriano kaj mi en reprezentado de la katalunaj membroj de la Komisiono por Konfederacio, montriĝis klare la celo, kiun ni devas atingi. Kaj mi resumos ĝin jene, por ke la kunfederacianoj dum nia jarkunveno en Vilanova sankciu per sia aprobo la projekton, aŭ enkonduku en ĝin la necesajn ŝanĝojn, por ke ĝi kapablu fariĝi la fundamento de la supera organizaĵo, kies neceseco estas ĝenerale rekonata.

Mi ne insistos pri la bezono de kunagado : ĝin rekonis nia samideanaro dum la Kongreso Olot'a ; ĝin aludis S-ro Piñó per sia cirkulero de la 17 de Majo 1913 kaj ĝin rekonas ĉiuj esperantistoj, kun kiuj mi interŝanĝis opiniojn. Mi estas do certa ke la VI<sup>a</sup> Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio rekonos ankaŭ la bezonon je organizaĵo kunigonta ĉies forton kaj havonta ĉies reprezenton.

Ke tia organizaĵo estus tre efika vidiĝas klare; el la ĵus citita cirkulero mi elĉerpas la frazon : «Se la aludita triumfo (instrui nian

lingvon en la oficialaj universitatoj, lernejoj, k.t.p., hispanaj) estas atingita per la sensignifa klopodo de malmultaj, kiom plimulte povus esti atingita se la Ŝtato devus atenti al la daŭraj petoj de organizita asocio, en kiu pli ol la nombro de ĝiaj anoj, elvidiĝus la kohero de ĝiaj fortoj unuigitaj por peti, se la petitaĵo estas humana kaj justa? Sed, ĉu tiu organizaĵo devas nur, kiel celon, havi la zorgon peti kaj ree peti? Ĉu la efiko de tiu petado ne estus pli granda, se la nombro de la fortoj individuaj kreskus kun ĉiu tago? Ĉu do, kiel celon de la organizaĵo, ni devas fiksi ankaŭ la klopodon kreadi novajn fortojn, novajn entuziasmojn, unuvorte, propagandi?

Al tio respondas la rezolucio de nia IV<sup>a</sup> Kongreso, fiksinta kiel celon de la supera organizacio «la oficialigon kaj starigon de Esperanto», al kiu ni povus aldoni, kvazaŭ interpreto de la vorto «starigo», akceptante kelkajn opiniojn el la interŝanĝitaj, «la disvastigon de Esperanto en la regionoj, kie ĝenerala organizaĵo ne ekzistas». Jen nepra bezono, se oni volas bone prepari ne nur la taskon de la federacioj, sed ĉefe la celon, la «oficialigon de Esperanto», kiu siatempe neniel devas aspekti kiel trudo al kia ajn opinio. Se prosperus al ni atingi de la Ŝtato tiun oficialigon, ni devus eviti la eblan kontraŭstaron de regiono, kie la publika opinio, pro manko de nia propagando, rifuze batalus kontraŭ tia ordono. Tial konkrete, *la celo de la komuna organizaĵo devus esti: starigo, oficialigo de Esperanto, disvastigo, kie ne ekzistas ĝenerala organizacio.*

Tiamaniere federacio sufiĉe forta povus rajte, agante kiel konfederacia membro, zorgi pri propagando en teritorio, kie pro la nuna organizo ĝi ne povas agadi neĝenante la aliajn: en teritorio ne sia, aŭ kie ĝi ne havas anojn. Nun, kiel diras S-ro Soriano en letero de la 14 de Junio nunjara, «estas tre logike, ke neniu priokupas sin pri propagando ekster sia regiona lando», kio ne estus, se la komuna organizaĵo ebligus la interhelpon. Por atingi tiun rezultaton la manieroj proponitaj estas iom diversaj, kaj antaŭ ol pritrakti tiun punkton, mi volas rememorigi, ke la organizantoj de simila asocio devas fiksi al si, kiel normon, la principon, kiun de la unua momento ni ĉiuj akceptis: *Oni devas klopodi aranĝi ĉion tiamaniere, ke en okazo de malsukceso, ĉiuj partoj de la tuto povu repreni sen malhelpoj siajn vivon kaj agadon antaŭajn.*

Se oni ne sukcesus aranĝi tiel la entreprenon, oni riskus ne nur mortigi la ĝeneralan organizaĵon, sed kio estas pli grava, pereigi ankaŭ la apartajn. Terura rezultato, kiun ni devas ĉiel antaŭeviti! Singarde agante, ni pensas ke, ol kunfandiĝo en unu solan, estas pli bona unuigo en aron, en kiu, ĉiu konservante sian liberecon helpus

al la tasko de la ceteraj. Tial ni proponas, ke *la organizacio konsistu nur el membroj kolektivaj, tio estas, el asocioj kunigantaj la samideanojn de regiono aŭ provinco. Individuoj kaj grupoj povus aliĝi pere de la koncernaj federacioj, kiuj tiel reprezentus la tutan samideanaron de sia teritorio.*

Ekzistas en nia lando kvar ĝeneralaj esperantistaj organizaĵoj, nome: Baska Esperanta Federacio, «Federación Esperantista Levantina», Kataluna Esperantista Federacio kaj Hispana Societo por propagandi Esperanton. La tri unuaj havas karakteron regionan, kaj tial ili povas unuigi en Konfederacion sen ia malhelpo. La lasta, t. e. Hispana Societo havis karakteron tutlandan, kiun ĝi nuntempe ne konservas, tial ke en la regionoj, kie federacioj ekzistas, ĝi havas malmulton da membroj, ĉiuokaze superatan de la nombro de la respektivaj federacianaroj. Tial, ni pensas, ke ĝi povus bone esti konsiderata, kiel federacio por la regionoj, kie simila organizo ne ankoraŭ ekzistas, kiel opinias S-ro Inglada kaj mi. Tiu konsidero estas justa, ĉar S-ro Perogordo, kiu anoncis al mi per sia letero de la 27 de Julio 1915 sian intencon fondi Centro-Hispanujan Federacion, diras, ke se tio ne estus ebla, eni kunigus niajn fortojn, kun tiuj de Aragono, Andaluzio aŭ aliaĵe, kio efektive estas la nuna Hispana Societo.

Ĉu la asocioj alkonsentis? Rilate al la K. E. F. mi povas diri ke ĝi entuziasme konsentis en 1913 dum la Kongreso en Olot. La Baska Federacio laŭ letero de S-ro Allende de la 21 de Junio 1915 «diskutis kaj konsentis pri la akcepto en principo de via propono, sed kondiĉe ke la «Levantina Federacio» konsentus». Tiu lasta, pro somersezono, ne prenis ankoraŭ firman decidon, el kiu dependas, kiel estas klare el tio ĵus dirita, la kuniĝo de la Federacioj Baska, Kataluna kaj Valencia. La Hispana Societo kredas, ke ĝi estas la «komuna organiza ligilo» «kontraŭ la nacia registaro kaj kontraŭ la eksterlandaj naciaj societoj, k. t. p.<sup>o</sup>», opinio, kiun ne partoprenas almenaŭ la Kataluna kaj la Baska Federacioj. (Vidu artikolon de S-ro Allende en n.<sup>o</sup> lasta de KATALUNA ESPERANTISTO.) Letero de S-ro Soriano de la 18 de Julio asertas, ke ~~en~~ Hispana Societo povas fariĝi federacioj, kio efektive povas okazi kaj helpi al la sukceso de Konfederacio, sed ĉu la federacioj ekzistantaj, entute kaj aparte pli gravaj ol Hispana Societo, povas utile eniri en ĝin? Tiu konsidero, kaj la estimo de Hispana Societo, kiun ni havas, instigas nin deziri ke ĝi estu kvazaŭ federacio de la regionoj, kie federacio ankoraŭ ne ekzistas, ĉar tiel ĝi povus efike helpi la taskon de supera organizacio. Tia estas la opinio tre respektinda de S-ro Inglada, kiu kredas ke la «Hispana Societo trapasas tre malbonan epokon kaj ke la regiona esperantista movado

en Hispanujo estas tre vigla kaj preskaŭ estas senkompare pli grava. Kial, do, ni rifuzus kredi al tio, se ĝi estas neneigebla fakto? Se Hispana Societo devus dissolviĝi kaj post ĝi naskiĝus tre vivoplena Federacio aŭ alie nomita societo, ĉu tio ne estus granda progreso kaj kaŭzo nur de ĝojo? — Ĉu ni ne devas interkonsenti nur pro la nomo de la aferoj, ne pro ilia fundamenta esenco? Kia kontraŭaĵo status se la celon de la Hispana Societo plenumus pli sukcese alia kun malsama nomo anaro? Ĉu per la nova organizaĵo ni certigas nedisputeblan sukceson de la esperantista movado en nia patrujo? Ni devas, do, sensanceliĝe akcepti kaj iri antaŭen, ĉar restado estas morto kaj progresado, vivo.

Ni ne estas en la okazo, ke Hispana Societo devus dissolviĝi, se eĉ el ĝi formiĝus tiom da federacioj, kiom da regionoj ekzistas en Hispanujo. Ĉu eĉ en tiu cirkonstanco Hispana Societo ne povus reprezenti en la Konfederacio la tutajn de la Federacioj naskitaj de ĝi, tute kiel patrino, kiu zorgas pri siaj filoj? Pro tio, la organizo de Konfederacio povus prezenti al la Hispana Societo *vivigan* rimedon ĉar la ceteraj asocioj certe povus helpi ĝin en ĝia propagando kaj agado tra ĝia vasta lando.

Se teorie la organizo de Konfederacio estas tre facila sur la bazo de federacioj en ĉiuj regionoj, kiel koincide diras en siaj leteroj S-roj Soriano kaj Inglada, kiel diris S-ro Piñó en cirkulero jam citita, fakte tio estas ne efektivebla en la nuna momento. Manieroj tion atingi estas kreado de la mankantaj federacioj aŭ anstataŭigo de ilia ekzisto per la ekzisto de societo-patrino, kies rolon povus havi la Hispana Societo, naskonta la federaciojn regionajn, kiam la propagando kaj agado de la tutlanda samideanaro estus efikintaj.

Mi esperas, ke tiuj argumentoj povos konvinki la pionirojn de niaj asocioj, kaj ke ili konsciaj pri la utileco de sia ago starigos konsente la superan organizaĵon, kiu en la unuaj proponoj (1913) alprenis jam la nomon *Iberia Esperantista Konfederacio*.

Rilate tiun nomon, S-ro Inglada opinias, ke oni povus anstataŭi *Iberia per Hispana*. Ni kredas, ke la ŝanĝo estus negrava, se la Portugala Federacio, kiun oni invitis, ne volus partopreni, kaj se Hispana Societo aliĝus. Se tiu ĉi ne kunlaborus en la organizaĵo ĝenerala, ties nomo devus esti *IBERIA* por eviti la duopan ekŝajnon de *HISPANA* Konfederacio kaj *HISPANA* Societo, kiuj povus aspekti, kiel konkurencantaj unu la alian. *En principo*, do, oni povas alpreni la nomon *IBERIA ESPERANTISTA KONFEDERACIO*.

La federaciaj teritorioj pli prefere ol akorde kun la klasigo de «U. E. A.», kiun S-ro Allende aludis, devus esti konformaj al la divido

laŭ historiaj landoj, kiel opinias S-ro Inglada, kiel la geografiaj nomoj konsilas. Sed pri tio estus pli bone, se la Komitato de I.E.K. difinigus mem la teritoriojn de la federacioj aliĝintaj.

Tiu Komitato, kiu ĉefe klopodus atingi de la Ŝtato ĉiun apogon al nia afero ĉe kongresoj de la federacioj, ĉe rekomendo de nia lingvo por difinitaj karieroj kaj iel ajn simile, kiu difinigus la celon de la kolektiva agado, povus konsisti el la prezidantoj de la federacioj aliĝintaj kaj el unu persono por ĉiu federacio, elektita libere el la federacianaro. Tiamaniere ĉiu federacio havus du el siaj anoj en la Komitato de la I. E. K.

*El la supera Komitato estus Prezidanto ĉiujare, la Prezidanto de la Federacio, en kies lando devus okazi la Kongreso saman jaron kaj Sekretario, la Prezidanto de la Federacio en kies lando okazis la lasta Kongreso. La ceteraj oficoj estus elektitaj de la Komitalanoj per voĉdono, kaj ĉiujare ŝanĝitaj.*

Kompreneble, la Federacioj, en tio ne rilatanta ilian kolektivitan agadon, estus tute liberaj, kaj en sia regiono ili senkontrolle povus agi uzante ĉiujn bonajn rimedojn por propagando.

Por subteni la Konfederacion ĉiu Federacio devus pagi jaran kotizaĵon, proporcion al la bezonoj por la jaro. Tiun kotizaĵon devus fiksi, konsilite de la federaciaj administrantoj, la supera Komitato.

La Konfederacio okazigus ĉiujare Kongreson por pritrakti la ĝeneralajn aferojn. Tiun Kongreson povus partopreni ĉiuj membroj de la aliĝintaj federacioj. Ĝi okazus samtempe kun la Kongreso de unu el la Federacioj, kaj laŭ regula ordo speciale fiksota, por ke ĝi okazu unufojon almenaŭ en ĉiu federacio.

Pri la sidejo de la I. E. K. mi ne montris definitivitan opinionon: koncernantan mi ricevis nur unu, tiun de S-ro Inglada, kiu esperintate la malfacilaĵojn okazintajn en Hispana Societo ĉiufoje kiam transloĝigis la restejo de la Direktanta Komitato, diras, ke oni povus elekti Barcelonon, kie nun estas la apli grava organizaĵo esperantista kaj ĉar ĝi estas la kongresurbo internacia en Hispanujo.

Estas opinio de S-ro Allende, klarigita en lia leginda artikolo aperinta en KATALUNA ESPERANTISTO, ke la Konfederacio devas havi gazetorganon. Pri tio mi ne volas enbrudi mian opinionon, ĉar mi preferas, ke la ceteraj federacioj petu de niaj kion ili juĝus necesa kaj mi klopodos komplezi ilin. La kondiĉon, kiun S-ro Allende petas, ke mi tute verku esperante mian gazeton, mi jam de kelke da numeroj plenumas volonte. Li proponas ankaŭ, ke la gazeto alinomiĝu en ĝustatempa epoko. Pri tio mi povas diri, ke kiam la Konfederacio firme starus, tio povus prezenti nenian malutilon. Tamen, tio povas, almenaŭ dum la nuna

momento, neplene akordiĝi kun la normo fiksita, kaj pli tio speciale nia Kongreso devos decidi, certe komplezante al la deziroj de niaj kolegoj en Konfederacio.

Provizora solvo povus esti la publikigo en KATALUNA ESPERANTISTO de malmultpaĝaj Bultenoj organoj de la Federacioj, simile al tiuj, kiuj aperis antaŭ la milito en «Oficiala Gazeto Esperantista». Ja tio ne signifas, ke ĉiu federacio ne povos posedi sian presorganon, se ĝiaj fortoj tion al ĝi permesus!

Jen estas la tuta projekto: ĝi plene akordiĝas al la ideoj esprimitaj de S-ro Inglada per siaj leteroj kaj al tiuj de la katalunaj membroj de la Komisiono: mi klopodis ke, kiel eble plej multe ĝi estu ankaŭ konforma al la opinioj de la ceteraj prilaborintoj. La tutan projekton devas sankcii, por ke ĝi estu konsiderata kiel spiegulo de la pensmaniero de la katalunaj samideanoj, la VI<sup>a</sup> Kongreso de la K. E. F.

Se la kongresanoj havus la eblon aŭskulti krom tiu de la katalunaj pioniroj, la opinion de la aliregionaj kolegoj, la projekto kun la necesaj ŝanĝoj, hele efektiviĝus. Helpu al tio, karaj fratoj! Vi, la pioniroj de la Baska Esperanta Federacio; vi, la gvidantoj de la «Federación Levantina»; vi, la komitatanoj de la Hispana Societo; vi, direktantoj de la grupoj en Madrid, Zaragoza kaj Mallorca; vi, ĉiuj, amikoj, kiuj interesiĝas kaj klopodas al la venko de Esperanto, venu al ni! Ni atendas vin en niajn brakojn; ni regalos vin per la plej belaj solenoj, kiujn ni scios prepari; ni proponos al vi niajn plej allogajn festojn!

Ni kunigos per plej mildaj ligiloj niajn entuziasmojn, kaj ni ekiros kune sur la vojo al la triumfo!

JOSEF GRAU



## V<sup>o</sup> Floraj Ludoj de la Kataluna Esperantista Federacio

### LISTO DE DEVIZOJ DE VERKOJ RICEVITAJ

NUMEROJ : 19, Libereco sen ordo, ne estas libereco. — 20, Labor omnia vincit. — 21, Tota pulchra es Maria. — 22, Iom. — 23, De unu ĝis alia poluso, Esperantujo. — 24, Esperanto permesas kliši tradukotaĵon. — 25, Anjo. — 26, Per aspera ad astra. — 27, Songo. — 28, Ŝi. — 29, Fors que je ó fors que na. — 30, Amor que movet sol shi altrs lis stels. — 31, Revoj. — 32, Kulipo. — 33, Tra densa mallumo briletas la celo. — 34, Malpura. — 35, For la nuboj. — 36, Aŭtuno. — 37, Paco. — 38, Justeco. — 39, Per laboro, al gloro! — 40, (*Sen devizo*) — 41, Ĉiam Antaŭen. — 42, Do you like this? — 43, Pi y Margall. — 44, Aŭtuno. — 45, Kio estas la vivo sen amo? — 46, Non bis in idem. — 47, Sursum Corda. — 48, Progresamo. — 49, Justeco (*Ricevita post la dato-limo*).

### VERDIKTO

#### ORDINARAJ TEMOJ

##### ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. — *Versaĵo pri Amo*. — Estas aljuĝata la premio al la verko n.º 45 kun devizo «Kio estas la vivo sen Amo?»
- II. — *Prozaĵo pri Amo*. — *Premio*, al la verko n.º 5, devizo «Indas iri sangopage al la land' de l' idealo». — *Subpremio* al la verko n.º 3, devizita «Kiel etendita pava vosto».

##### TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. — *Traduko de «El Rellotge de sol»*. — Oni aljuĝas la premion al la verko n.º 20 devizita «Labor omnia vincit».
- II. — *Traduko de «Agonias»*. — *Premio* al la verko n.º 17, devizo : «Estas tradukado, plej bona ekzercado». — *Unua subpremio* al la verko n.º 7, «Se mi havus forton kaj spiron del' ventos». — *Dua subpremio* al la verko n.º 44, devizo «Aŭtuno», kiu komenciĝas : «En miaj knabotempoj».

La NATURAN FLORON kaj la rajton elekti Reĝinon de la Festo, oni aljuĝas al la verko n.º 20 kun devizo «Labor omnia vincit».

## EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. — *Premio de Ateneo de Vilanova i Geltrú*. — Ne konkursita.
- II. — *Premio de Laboro Esperanta*. — Al la verko n.º 14, «En la dubo, ambaŭ».
- III. — *Premio de Centro Democrático Federalista*. — Al la verko n.º 19, «Libereco sen ordo, ne estas libereco». — *Unua subpremio* al n.º 1, «Survojes». — *Dua subpremio* al n.º 11, «Ni».
- IV. — *Premio de Lia Urbeŝtra Moŝto de Vilanova i Geltrú*. — Ne konkursita.
- V. — *Premio de Lia Moŝto S-ro Josep Bertrán i Musitu*. — Al la verko n.º 26, «Per aspera ad astra».
- VI. — *Premio de Lia Moŝto S-ro Eduard Micó*. — Al la verko n.º 46, «Non bis in idem».
- VII. — *Premio de Lia Moŝto S-ro Antoni Jansana*. — Al la verko n.º 33, «Tra densa mallumo briletas la celos». — *Honora mencio*. Al la verko, ricevita post la datolimo, n.º 49, «Justecos, kiu komenciĝas : «La homoj amas komparojn...»
- VIII. — *Premio de Lia Moŝto S-ro Josep M.ª Bassols*. — Al la verko n.º 23, «De unu ĝis alia poluso, Esperantujos».
- IX. — *Premio de Lia Moŝto S-ro Pau Alegre Batet*. — Al la verko n.º 38, «Justecos, kiu komenciĝas : «Antaŭ jaroj...».
- X. — *Premio de la Biblioteca-Museo Balaguer*. — Al la verko n.º 8, «Belecós». — *Subpremio* al la n.º 2, «Kaj vin aŭdos, kaj vin laŭdos».
- XI. — *Premio de Semo (A. E. P.)*. — Al la verko n.º 4, «Floro de malamos».
- XII. — *Premio de S-ro Joan Amadeu*. — Ne konkursita.
- XIII. — *Premio de Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj*. — Ne konkursita.

Laŭ la regulo 11 de la Regularo de la Konservantaro de Floraj Ludoj, la verkoj premiitaj fariĝas propraĵo de la Konservantaro, kiu zorgos pri ilia publikigo. Permeson por reprodukto oni petu de la Redakcio de KATALUNA ESPERANTISTO.

25 de Septembro 1915. — D-ro Josep CASANOVAS, prezidanto; Gustau GALCERÁN, Josep ROSSELLÓ, Alfonso SABADELL, Josep VENTURA; Estanislau PELLICER, sekretario.

## VI<sup>a</sup> Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Vilanova i Geltrú, 16, 17, 18 Oktobro 1915

**A**PERAS kun tiu ĉi numero suplemento, kiun eldonas la Organiza Komitato, kun kelkaj bildoj el la kongresurbo, kiuj certe vekos en niaj samideanoj la deziron ĉeesti nian VI<sup>aa</sup>, kion oni tre facile povas fari, laŭ la instruoj de la kongresa cirkulero, dissendita en komenco de Septembro al ĉiuj federacianoj.

Okaze, ni ripetas, kiel en ĝi estas dirite, ke estas TRE NECESE ANTAŬANONCI sian partoprenon en la oficiala festeno; alimaniere oni ne povus bone ĝin aranĝi: tial niaj legantoj pardonos, ke ni tiel insistas pri tio. La karto kostos 6 ptojn.

En ĉi tiu numero oni trovos ankaŭ la insignon de kongresano kiun oni devos surporti dum la kongresaj festoj. La insigno de la K. E. F., kiun oni ĵus eldonis vendiĝos dum la Kongreso: ĝi reproduktas kolore la stampon de la Federacio en grandeco tre konvena, kaj tial ke ĝia prezo estas malkara, ni esperas, ke ĉiuj federacianoj volos posedi ĝin.

Ni instigas la kongresanojn aĉeti la markojn propagandajn kaj la esperantajn poŝtkartojn kun bildoj el Vilanova, kiuj estos vendataj profite de la Federacio. La Organiza Komitato rekomendas ankaŭ al ĉiuj esperantistoj, kiuj vojaĝonte al Kongreso trapasos Barcelonon, kunveni en la teta Hejmo de la K. E. F., Palla, 8, de kie multope oni foriros al la Haltejo de la Promenejo de Gracia por forveturi je la 18<sup>h</sup> 33. Helpe al tio, ĉi supre vidiĝas plano pri la situacio de la Hejmo, kiun per ĝi oni povos facile aliri.



Fine, ankoraŭ unu fojon, ni ripetas por ke la Ekspozicio estu tre interesa, nian peton, ke ĉiuj esperantistoj helpu al ĝi sendante esperantaĵojn ĉiuspecajn.

La lastan peton : Venu, ĉeestu, kunlaboru! Esperanto bezonas la helpon de ĉiuj : ke la kataluna samideanaro estu al ĝi la plej fidela! Vivu la helpa lingvo!

### HONORA KOMITATO

Lia Ekscelenca Moŝto, S-ro Enric Prat de la Riba, *prezidanto de la «Mancomunitat de Catalunya» kaj de la «Diputació Provincial de Barcelona»*. *Sinjoraj Moŝtoj* : D. Joan Braquer, *Urbeŝtro*; D. Josep Bertràn i Musitu, *Parlamentita deputito*; D. Pau Alegre, D. Josep M.<sup>a</sup> Bassols, D. Joaquim Jansana, D. Eduard Micó, *Provincaj deputitoj*; D. Rafael Rubió, *Juĝisto*; D. Maximiliano Soler, *Militista komandanto*; D. Jacinto Pugès, *Paroĥestro*; D. Francisco Ferrer, *Prezidanto de l' Museo-Biblioteka Balaguer*; *Prezidantoj de l' «Fomento del Trabajo», «Centro Democrático Federalista», «Centro Católico» kaj «Ateneo»*; D. Josep Soler, *Direktoro de la «Diario de Villanueva y Geltrú»*.

### ORGANIZA KOMITATO

*Prezidanto* : S-ro Josep Escofet; *vicprezidanto*, S-ro Francisco Suñé; *sekretario*, S-ro Gustau Galceràn; *vicsekretario*, S-ro Daniel Martí; *financisto*, S-ro Magi Soler; *gemembroj*; F-inoj Teresa Rosell, Eulalia Rosell; S-roj Manuel Más, Laureà Codina, Jaume Fort, Pere Pascual.

### OFICIALA PROGRAMO

#### Sabato, 16

- 21'30 Akcepto de la kongresanoj ĉe la Urbodomo.\*  
 22<sup>a</sup> Ĉe Ateneo : Malfermo de la Kongreso.  
 Salutado de la delegitoj.  
 Inaŭguro de la Propaganda Ekspozicio per parolado de S-ro Ed. Kühnl.  
 Vino de honoro dediĉita de la Ateneo al la esperantistoj.

#### Dimanĉo, 17

- 8<sup>a</sup> Solena Diservo kun esperanta prediko en urba preĝejo.  
 9<sup>a</sup>-12<sup>a</sup> Kongresa labora kunsido ĉe Ateneo. Tagordo:  
 1, Sekretaria raporto.  
 2, Aprobado de la bilanco de 1914.

3. Financa stato nuntempa.
  4. Diskuto pri financa raporto aperinta en la n.º 8 de KATALUNA ESPERANTISTO.
  5. Pri Barcelona Hejmo de la K. E. F.
  6. Projekto de Iberia Esperantista Konfederacio.
  7. Propono de S-ro Grau pri la Floraj Ludoj.
  8. Pri Esperantista Mutuala Asocio.
  9. Raporto pri kongresa regularo.
  10. Propono de S-ro Solá pri Vortaro.
  11. Propono de S-ro Amades.
  12. Eventualaj petoj kaj proponoj, se tempo sufiĉos.
- 12<sup>a</sup> Ĉe Centre Catòlic : Kunveno de K. L. de Katolikaj Esperantistoj.  
Kunveno de la Konservantaro de la Floraj Ludoj.  
Kunveno de la Esperanta Tarragon-Provinca Ligo.
- 13<sup>a</sup> Oficiala festeno ĉe Foment.
- 16'30 Floraj Ludoj ĉe la Teatro.
- 18'30 Ĉe Centre Federal : Elekto de kongresurbo kaj de Direkta Komitato.  
Fermo de la Kongreso.
- 22<sup>a</sup> Solena balo ĉe Foment.

### Lundo, 18

- 9<sup>a</sup> Ekzamenoj por aspirantoj al la atestoj pri lernado kaj pri profesoreco.
- 10<sup>a</sup> Vizito al la Industria Lernejo.
- 11<sup>a</sup> Vizito al la «Museo-Biblioteka Balaguera».
- 14<sup>a</sup> Postkongresa ekskurso al Sitges kun vizitoj al «Cau Ferrat» kaj «Magicle».

Krom la oficialaj, estos organizataj private de enurbaj societoj, aliaj festoj honore al la kongresanoj.

### PENSIONOJ

RESTORACIO DE LA STACIDOMO : Tagmanĝo aŭ vespermanĝo, 3 pesetoj. — HOTELO «FONDA ESPAÑOLA», Plaça de la Constitució : Manĝo, 2'50 pesetoj; Ĉambro, 1 peseto (rabato por grupoj de gastoj) — HOTELO «FONDA DEL COMERCIO», Strato Padua : Manĝo, 2 ĝis 2'50 pesetoj; Ĉambro, 1 peseto. — HOTELO VILA, Rambla Immaculada. (Filioj : *Restoracio dels Xalets*, marbordo; «*La Gran Peña*», Rambla Principal) : Manĝo 1'50 ĝis 3 pesetoj (rabato por grupoj de gastoj).

BILANCO DE 1914<sup>a</sup>

ENSPEZOJ		Pesetoj
En kaso, restaĵo el 1913 . . . . .		36'65
Kotizaĵoj enspezitaj . . . . .		826
Markoj venditaj . . . . .		31'10
Ekzamenaj matrikuloj . . . . .		18
Donaco por la publikigo de KATALUNA ESPERANTISTO . . . . .		112
	Totale . . . . .	1023'75
ELSPEZOJ		
Por la gazeto . . . . .		750
Ĝeneralaj . . . . .		50'30
Sekretariaj . . . . .		56'20
	Totale . . . . .	856'50
RESUMO		
Enspezoj . . . . .		1023'75
Elspezoj . . . . .		856'50
	Restas en kaso . . . . .	167'25

31 de Decembro 1914. — *La Administristo*, Josep Serrat i Parés.  
*La Kasisto*, Joán Piferrer.

## PROPONOJ

Konsiderante la absolutan mankon de Teknika Kataluna Esperanta Vortaro kaj la bezonon, kiun je ĝi sentas nia vasta kataluna movado, kaj kun la celo pleniĝi tiun mankon, la subskribinto prezentas al la VI<sup>a</sup> Kongreso la suban proponon:

«La Kongreso elektos efektive laboran komisionon, por la studo kaj aranĝo de la Kataluna Esperanta Teknika Vortaro, prenante kiel bazon la vortaron enciklopedian de Verax kaj la ceterajn vortarojn ekzistantajn en Esperanto.» — Terrassa, 4<sup>ma</sup> de Aŭgusto 1915. — MARIAN SOLÁ.

La subskribinto prezentas al la aprobo de la VI<sup>a</sup> Kongreso de la K. E. F. la jenan proponon:

Ke la Federacio klopodu establi en la Socia Muzeo de Barcelona esperantan fakon. Por efektiviĝi tiun proponon la Kongreso devus elekti komisionon, al kies laboro certe helpos la Esperantista Centra Oficejo. — Barcelona, 6<sup>ma</sup> de Septembro 1915. — JOAN AMADES.

**HORTABELO DE VAGONAROJ**

inter Barcelona kaj Vilanova i Geltrú

Forveturo de Barcelona	}	5'26 - 8'44 - 9'20 - 11'47 - 13'00 - 15'23 - 18'33 - 20'01
---------------------------	---	--

Forveturo de la Haltejo	}	5'39 - 8'56 - 9'32 - 12'00 - 13'13 - 15'36 - 18'46 - 20'14
----------------------------	---	--

Alveturo al Vilanova	}	6'56 - 9'53 - 10'50 - 13'00 - 14'22 - 17'03 - 19'46 - 21'37
-------------------------	---	---

Forveturo de Vilanova	}	4'50 - 7'04 - 8'00 - 9'23 - 11'27 - 14'00 - 16'07 - 17'07 - 19'08 - 21'04
--------------------------	---	---

Alveturo al la Haltejo	}	7'02 - 8'34 - 9'00 - 11'12 - 13'13 - 15'00 - 17'28 - 17'59 - 20'23 - 23'35
---------------------------	---	--

Alveturo al Barcelona	}	7'22 - 8'48 - 9'13 - 11'28 - 13'27 - 15'12 - 17'42 - 18'11 - 20'37 - 22'49
--------------------------	---	--

**Pirinea**

En la ĉambro, eta, eta,  
 dormas sole mi dum nokt';  
 en l' ekstero, nigra, nigra,  
 mian dormon gardas mont'.  
 La montaro, alta, alta,  
 kaŝas multe da ĉiel';  
 apudstaras ĝi senmova,  
 mute garda, kun firmec'.  
 Mia revo flugas, flugas,  
 al la val' kaj bord' de l' mar':  
 amo mia min atendas  
 sub ĉiel' en suna flam'.  
 Je rev' mia mi ridetas  
 en dorm' sola, dum la nokt'...  
 En l' ekstero, nigra, nigra,  
 mian dormon gardas mont'.

*Katalane verkis* JOAN MARAGALL

*Tradukis* ESTANISLAU PELLICER

## ENLANDA MOVADO

Nia kara Direktoro, S-ro Pujulà, restas en bona sano. Ni deziras al li plej bonan ŝancon dum la tuta milito.

**BARCELONA.** — La 20<sup>o</sup> de Aŭgusto mortis nia kara samideano S-ro Ramón Solà, malnova esperantisto kaj unu el la fondintoj de la grupo *Ĉiam Antaŭen*. Al la familio de nia bedaŭrata amiko, ni prezentas niajn kondolencojn.

— En la *Barcelona Hejmo de la K. E. F.*, la 24<sup>o</sup> de Julio, S-ro Josep Grau faris disertacion pri Esperanta versfarado. Dum sia tre interesa parolado li klarigis per multenombraj ekzemploj eltiritaj el la plej bonaj esperantaj poetoj la leĝojn, kiuj regas la poezian verkadon en nia lingvo.

La 31<sup>o</sup> de Julio nia svisa samideano S-ro Willy Ledergerber paroladis pri la «Emancipacio de la virinoj»; li daŭrigis sian paroladon la 7<sup>o</sup> de Aŭgusto kaj montris esti farinta longan studadon pri la temo traktita. (Pri la ceteraj kunvenoj ni raportos en proksima numero.)

— Ni havis la honoron saluti dum ilia restado en Barcelono la entuziasman samideanon S-ron Trinidad Soriano, Prezidanton de la Hispana Societo p. p. E. kaj lian distingindan edzinon. Gesinjoroj Soriano afable vizitis kelke da fojoj la B. H. de la K. E. F. kie per sia agrabla konversacio ili pasigis al ni tre bonajn momentojn. Bonan vojaĝon ni deziras al ili.

— La grupo *Ĉiam Antaŭen* organizis feston la 1<sup>o</sup> de Aŭgusto dum kiu oni prezentis la komedion «Vivu Esperanto». Ĝi estis bone ludata de F-inoj Grau, Leonor, Navas kaj S-roj Guixà, Delclós, Cussó kaj Rovira. La festo finiĝis per dancado.

La sama grupo okazigis la 22<sup>o</sup> de Aŭgusto ekskurson al Prat del Llobregat por viziti la stacion de la senfadena telegrafo; tiu ekskurso estis partoprenata de kvindekda samideanoj.

La 1<sup>o</sup> de Septembro la sama grupo vizitis la presejon de la barcelona ĵurnalo «El Día Gráfico», kie oni faris fotografiaĵojn de la vizitantoj; tiu fotografiaĵo aperis en la supredirita ĵurnalo, kio estis bona propagando.

— Oni presigis kaj dissendis al ĉiuj barcelonaĵ kulturaj societoj grandan afiŝon anoncantan la kurson de Esperanto kiun, kiel la antaŭajn jarojn, klarigos D-ro Joaquim Coll en la Universitato.

La saman afiŝon en malgranda formato ni sendas al ĉiu federaciano en tiu ĉi numero; ni petas niajn amikojn bonvolu ĝin sendi al persono, kiu povus interesiĝi pri l' afero.

**MIERAS.** — Malgraŭ la baroj kiujn ni trovis sur nia vojo, ni povas certigi ke nia grupo bone antaŭeniras. Ni ŝuldas tiun sukceson al la ĉiutaga propagando de S-ro Joaquim Costa. De la 1<sup>a</sup> de Aŭgusto okazas

ĉiutage du kursoj de Esperanto, por viroj kaj por virinoj. Ni intencas okazigi esperantistan feston, kiu certe multe helpos la disvastiĝon de nia lingvo en nia vilaĝo. — *La Delegito.*

**TARRAGONA.** — La *Ekskurso fako de Tarragono Esperanta* daŭrigis siajn aranĝitajn ekskursojn por la nuna somero. La kvina okazis al *Reus*, la sesa al *Tamarit* kaj *Ferrán*, la sepa al *Altafulla* kaj la oka al *Constantí*. Nune oni aranĝas gravan ekskurson al *Vilanova* i *Geltrú* okaze de la VI Kongreso de K. E. F. la tagon 17<sup>o</sup> de la venonta Oktobro.

La tarragonaj kongresanoj eliros per la vagonaro de la 6<sup>o</sup>46 matene. Estas multaj la ĉi tieaj samideanoj, kiuj sin enskribas por iri amase al la Kongresurbo inter kiuj estas entuziasmaj samideaninoj. Ankaŭ ĉeestos reprezentantoj de kelkaj grupoj de tiu ĉi provinco.

*Tarragono Esperanta* por faciligi la ĉeeston al tiu ekskurso petis al la fervoja Kompanio M. Z. A. gravan rabaton. Oni povas sin enskribi ĝis la 1<sup>a</sup> tago de la venonta monato.

— Ni ricevis la aĝrablan viziton de niaj diligentaj samideanoj S-roj Henriko Guitart kaj Amades Martorell, prezidanto kaj profesoro respektive de *Fraeco*, el Vendrell. Ili salutis la ĉi tieajn samideanojn kaj parolis tre fervore pri la esperanta movado en nia provinco kaj pri la proksima Kongreso de K. E. F.

— La kara edzino de nia bona amiko S-ro Daniel Roig, Vic-prezidanto de la *Ekskurso fako* de T. E. naskis belan filinon. Niajn gratulojn. — *La Korespondanto.*

**TERRASSA.** — La 18<sup>o</sup> de Julio okazis teatra prezentado, kiu estis granda sukceso.

— La 25<sup>o</sup> de la sama monato je la 6<sup>a</sup> vespere okazis la disdono de premioj de la laste okazinta konkurso; post parolado de S-ro J. Ventura kaj recenzo de la verkoj prezentitaj, la premiitoj S-roj V. Alavedra kaj R. Vergés legis siajn verketojn, kiuj estis tre aplaŭdataj; la premioj estis la libroj «*Travivaĵoj de Ro Ŝos*» kaj «*Portreto*», de Gogol.

— La 8<sup>o</sup> de Aŭgusto nokte okazis denove teatroludado en nia scenejo.

— La grupo *Lumán* interkonsente kun *Aplec* kaj *Katolika Stelo* de Sabadell organizas grandan ekskurson al Ermitejo de Sant Julià; ĝi okazos en la lastaj tagoj de tiu ĉi monato. — *La Korespondanto.*

**VALENCIA.** — Pro la klopodoj de la tiea grupo, estas eldonita en Esperanto la oficiala programo de la Foiro okazinta la 22<sup>o</sup> Julio-2<sup>o</sup> Aŭgusto. Ĝi tre bele aspektas kaj estas prezentita sub kovertoj kun la valencia blazono en kolora reliefo. Gratulojn al la valenciaj esperantistoj pro la bona propagando per ĝi farita.

**VENDRELL.** — La nombro de novaj samideaninoj ĉiutage kreskas, danke al la senlaca propagando de F-ino María Julivert.

Inter la geesperantistoj de nia urbo ekzistas granda entuziasmo por ĉeesti la proksiman VI<sup>o</sup> Kongreson de K. E. F. en Vilanova i Geltrú. — *La Korespondanto.*

**VILANOVA I GELTRÚ.** — Niaj kunlaborantinoj F-inoj Eulalia kaj Teresa Rosell versigis katalune sian premiitan en la IV<sup>a</sup> Floraj Ludoj versaĵon «La Tri Mago-Reĝoj», kiu aperis en la julia numero de KATALUNA ESPERANTISTO.

La katalunan tradukon publikigis la enurba duonmonata revuo «Themis» (kun noto pri la verko esperanta) apud versaĵoj de aliaj tre konataj poetoj. Niajn gratulojn al la karaj samideaninoj por tiu efekta propagando. — K. E.



## OFICIALA PARTO

Kunsidis denove la 30<sup>aa</sup> Majo la Komitato de K. E. F. Kaŭze de propono pri kreo de malkara KEF-a insigno, kiu taŭgos por ĉiu federaciano, ĝi decidis proponi al la fabrikisto, preni sur sin la eldonon, kaj la Federacio laŭbezone petos de li la kvantojn necesajn, kondiĉe ke li ne povos vendi senpere de ĝi iun insignon.

Ĉar jam de longa tempo en Barcelona oni deziregis formi societon kie ĉiuj katalunaj kaj eksterlandaj esperantistoj povus kunfratiĝi, malsukcesinte ĉiuj provoj, nun kelkaj barcelonaj federacianoj vidinte kiom estas bezone por nia Federacio havi hejmon por ĝiaj kunsidoj kaj ceteraj esperantistaj kunvenoj, decidis pagi propravole la lupreton de societejo en la strato Palla, n.º 8, principal, kaj ĝin cedi al la K. E. F. depost la 1<sup>a</sup> Junio, laŭ la kondiĉoj kaj detaloj donitaj en la julia numero de K. E.

La Komitato de K. E. F. ĝoje kaj danke akceptis tiun malavaran oferon kaj decidis ĝin meti en la tagordon de la proksima Kongreso.

Krom tio ĝi decidis: Permesi ke en la ekzamenoj de la kurso Universitat, la ekzameninta tribunalo povu liveri diplomojn de Kapableco kaj Profesoreco laŭ la reguloj kaj kondiĉoj de la K. E. F.

Vidi kun plezuro la laborojn faratajn de la Organiza Komitato de la VI<sup>a</sup> Kongreso.

Rajtigi la Administriston por aranĝi financon aferon inter la KEF-anoj en Sant Feliu de Guíxols kaj la Federacio. — *La sekretario,* JOSEP VENTURA.



## KORESPONDADO

S-ro A. Saralegui, Almería: Ni dankas por afabla letero; ni notis pri abono de Almería Grupo. — S-ro Ed. Kühnl: Ni ricevis vian ŝatindan karton, dankon. — Redakcio de «L'Arc-en-Ciel», Gênevê: Vian gazeton ni rekomendis al unu lingvo-ĵernejo. — S-ro A. Santamaría, Zamora: Ni tuj sendos al vi la petitan insignon. — S-ro M. Solà, Terrassa: Tre interesa, sed netaŭga por la gazeto. Dankon.

**GRAVE** : En kelkaj urboj la Redakcio de K. E. elektis senkonsulte korespondantojn. La personoj, kiuj ricevos la koncernan atestkarton kaj ne povas plenumi tiun rolon, bonvolu ilin resendi al ni. Okaze ni atentigas niajn Korespondantojn, ke la plej grava devo estas

**Akurateco** : Sendu raporton antaŭ la 20<sup>a</sup> de ĉiu monato pri la movado *malgrava* aŭ *grava* en via urbo, *katalune* aŭ *esperante* redaktitan; sed memoru ke

**Koncizeco** estas plej estiminda kvalito. Multaj neĉefaj detaloj interesas nur ĉeestintojn. Raportu do pri ĝenerale interesaj faktoj, forgesante cirkonstancajn detalojn *malgravajn*.

---

Ĉiu membro de la *Kataluna Esperantista Federacio*, aŭ aboninto al **KATALUNA ESPERANTISTO**, rajtos dufoje dum la jaro publikigi en la gazeto krom sia nomo kaj adreso **IO VORTOJN** por peti korespondadon, interŝanĝojn de kolektaĵoj, informojn k. t. p. aŭ sciigi ŝanĝon de adreso

S-ro Manuel Mas, Vilanova i Geltrú, deziras akiri ĉiujn numerojn de *Kataluna Esperantisto* aperintajn dum 1910, 1911 kaj 1912.

S-ro F. Mario Brú, instruisto, Tivissa (Katalunujo), deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun ĉiulandaj gesamideanoj.

S-ro Gualberto Menéndez González, str. Pedro Duro, n.º 4, entre-suelo, Gijón, deziras korespondadi kun ĉiulandaj gesamideanoj letere aŭ poŝtkarte.

S-ro Joaquim Bolós, str. Marián Aguiló, 18, Barcelona, deziras korespondadi kun ĉiulandaj gesamideanoj.

S-ro M. Sorolla Sánchez, str. Tantarantana, 11, 2.º, Barcelona, deziras interŝanĝi esperantajn markojn; ne sendos unue.

S-ro Estanislau Pellicer, havas la plezuron sciigi sian novan adreson, str. Provença, 236, Barcelona.

S-ro Domingo Collet, Iglesia, 8, Vilassar de Mar, havas la plezuron meti sian elektran presejon al la servo de ĉiuj samideanoj.

La Redakcio de **KATALUNA ESPERANTISTO** por kompletigi jar-kolektojn bezonas ekzemplerojn de la gazeto de ĉiuj jaroj krom 1915. Samideanoj kiuj povus ilin cedi, bonvolu turni sin al la Redakcio kun propono pri kondiĉoj.

---

★ ★ ★ ★ ★

NUNTEMPE, PLI OL IAN  
KONTRAŬ ĈIUJ BAROJ  
NIA ENTUZIASMO!

★ ★ ★ ★ ★

# VI KONGRESO DE LA K. E. F.

VILANOVA I GELTRŬ : 16-17-18 OKTOBRO 1915

SAMIDEANOJ,  
ĈEESTU GRANDARE!

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA PRESORGANO

DE LA



JARO VI<sup>a</sup> : OKTOBRO-NOVEMBRO 1915

10-11

# REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO DE "KATALUNA ESPERANTISTO"

== PALLA, 8, PRINCIPAL : BARCELONA ==

*Honora Direktoro* : FRED. PUJULÀ

<i>Dirktoro</i> . . . . .	JOSEP GRAU
<i>Redakcia sekretario</i> . . . . .	ESTANISLAU PELLICER
<i>Redaktoroj</i> . . . . .	ARTUR DOMENECH JOSEP VENTURA
<i>Administristo</i> . . . . .	JOSEP SERRAT
<i>Administracia sekretario</i> . . . . .	JOAN AMADES

## KUNLABORANTOJ

Narcís BOFILL (Palma de Mallorca). — D-ro Jacinto BREMÓN (Barcelona). — D-ro Josep CASANOVAS (Girona). — D-ro Joaquim COLL (Barcelona). — Delfi DALNAU (Bahía Blanca, Rep. Argentina). — Víctor O. DE ALLENDE (Bilbao). — Josep DOMENECH (Reus). — Gustau GALCERÁN (Vilanova i Geltrú). — Joan GILI (Barcelona). — A. NOVEJARQUE (Valencia). — Pastro Josep PLANAS (Barbarà del Vallès). — Joan ROSALS (Barcelona). — Eulalia ROSELL, Teresa ROSELL (Vilanova i Geltrú). — Josep ROSSELLÓ (Sant Joan, Mallorca).

## KORESPONDANTOJ

B. Castells (*Andratx, Mallorca*). — J. Feliu Sureda (*Anglès*). — A. Romagosa (*Arbús del Penadés*). — P. Avellana (*Argelaguer*). — P-tro M. Pamies (*Argenters*). — J. Armengol (*Armentera*). — R. Teixidó (*Badalona*). — J. Aulina (*Banyoles*). — J. Cardona (*Berga*). — F. Rubinat (*Borges Blanques*). — J. Jané (*Catalell*). — F. Barberó (*Flix*). — G. Menéndez (*Gijón*). — A. Mosella (*Igualada*). — B. Nogué (*Masils*). — J. Allagès (*Manresa*). — P. Domenech (*Marçvell*). — R. Riera (*Mieres*). — Ll. Santocana (*Molins de Rei*). — J. Vilà (*Olot*). — F. Sagrera (*Palafugell*). — P-tro Tomás Alsina (*Prades*). — P. Llopart (*Querall*). — E. Aguadé (*Reus*). — P. Solanas (*Rubi*). — R. Martorell (*Sabadell*). — E. Presas (*Sant Feliu de Guixols*). — J. Rosal (*Sant Joan Les Fonts*). — P. Costa (*Santa Coloma de Farnés*). — J. Girona (*Silva del Camp*). — J. Vidal (*Taradonna*). — M. Solà (*Tarassa*). — F. M. Brú (*Tivissa*). — F. Guixart (*Vendell*). — R-do P. Plana (*Ventalló*). — P-tro Antón Ribas (*Vick*). — A. Robreño (*Vilafranca del Penadés*).

Nia devizo: *Maro estas gulfaro*

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

KAJ DE Baska Esperanta Federacio

Redakcio kaj Administracio:

Palla, 8, principal: Barcelona

## Nia Honora Direktoro

**T**RO konfida espero pri la daŭro de la eŭropa milito, kiu fortenas el ni nian amatan pioniron, S-ro Fred. Pujulà, estis la kaŭzo, kial la Direkta Komitato de KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO decidis ne komplezi lian ĝentilan peton, ke oni eksigu lin el la posteno de Direktoro de KATALUNA ESPERANTISTO, kies taskon li ne povas plenumi. La Redakcio de la gazeto, kiu al kutimiĝis sentadi la tertan kaj altvaloran gvidadon de S-ro Pujulà, proponis provizoran solvon por la funkciado de la presorgano de la Federacio, laŭ kiu la gazeto aperis en la intertempo ĝis nia VI<sup>a</sup> Kongreso. Tiu ĉi, rekoninte pro la novaj cirkonstancoj la bezonon forigi de S-ro Pujulà la respondecon de lia bedaŭrinde ne efektiva direktado, decidis komplezi lian peton kaj komisiis min, ke mi prenu la gvidadon de nia gazeto, kun la helpo de miaj kolegoj en Redakcio, ĝis kiam li povos repreni siaĉ lokon en ĝi. Okaze, la Kongreso esprimis per aklamo sian dankon kaj simpatian al nia eminenta samideano, al kiuj la tuta Redakcio aldonas siajn plej varmajn, atendante la okazon, kiun ni deziras plej baldaŭan, kiam S-ro Pujulà, kies paŝojn ni senhezite sekvas, povos denove inter ni repreni sian postenon, ĉe kiu li tiel sperte kaj kompetente laboradis ĉiam por la sukceso de nia ideo.

JOSEF GRAU

## VI<sup>a</sup> Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Vilanova i Geltrú : Oktobro 1915

Sabato 16<sup>a</sup>

### ALVETURO DE LA KONGRESANOJ

**K**UPITAJ per la preparado de la propaganda ekspozicio, per la aranĝoj por akcepti la esperantistojn alveturantajn, per la pretigo de la akcepto farota al la oficiala delegito de lia Moŝto la Ministro de Publika Instruado, kiu estas venonta al la Kongreso, la membroj de ĝia Organiza Komitato nerimarkite alvenis al la sepa vespere, ĥoro kiam devas alveturi al la kongresurbo la Reĝino de la Floraj Ludoj kun sia familio, kiu de Lleida venas honori nian feston. Tiuhore kunvenis en la kajojn de la stacidomo ĉiuj fraŭlinoj, kiuj la morgaŭon akompanos en kortego la Florludan Reĝinon; fratinoj Rosell, niaj poctinoj el Vilanova; la membroj de la Organiza komitato S-roj Soler, Pascual, Mas, Fort, Martí, Escofet kaj ceteraj, apud la ĉeflaborinto nia kara Gustau Galceràn; S-roj Aguadé kaj Domènech el Reus, kun aliaj fruevenintaj, gesinjoroj Mensa, S-roj Artur Casas, Josep Grau kaj aliaj el Barcelono.

La beleco de la atendantaj fraŭlinoj, la entuziasmo de la samideanoj, mallongigis la momentojn, kaj post nemulte grincado de la vagonaj bremsoj miksiĝis al la babilada bruo, atentigante nin pri la alveturo de vagonaro. Tuj desaltiĝis el ĝi Nia Reĝino kune kun la eminenta pocto S-ro Morera i Galicia, fraŭlinoj Maria kaj Josefina Macià kun ilia patro, la parlamenta deputito, kaj multaj aliaj personoj el iliaj familioj. Ilin kore akceptis la atendantoj, kaj estis ĵus finitaj la prezentadoj kaj salutoj, kiam alveturis vagonaro el Barcelono, per kiu vojaĝis, neatendite granda nombro da samideanoj el diversaj urboj katalunaj. Kaj jen estas sur la kajo D-ro Casanovas, el Girona; S-roj Solà, Ventura, Chaler, Figueras kaj multaj aliaj el Terrassa; S-roj Martorell, Costa, Ullar kaj ceteraj el Sabadell; Pastro Planas, el Barbarà del Vallès; D-ro Bremón, sinjoroj Balsells, Serrat, fraŭlino Grau, sinjoroj Amades, Pellicer, Domènech, Torné, Renom, Buyé, Bordas, kaj multege da aliaj el Barcelono. Estus malfacile diri

ĉiujn nomojn de la esperantistoj el la diversaj urboj, kiuj post la flagoj de la grupoj direktis sin al la hoteloj.

Dum la tuta trairado ili altiris la atenton de la loĝantaro, kiu komentariis bone la komencon de la Kongreso. En la elmontrejo de la vendejo de S-ro Sagalés, en centra strato de la urbo, estis ekspoziciataj la premioj de la Floraj Ludoj, kaj niaj samideanoj alvenintaj havis la ĝojon konstati, kiom amase la publiko rigardadis ilin, interesigante pri nia afero. La tuta urbo bruis pro la surprizo gastigi tiel nombrajn kongresanojn, kiuj dume loĝigadis sin kaj pretiĝis vespermanĝi.

### AKCEPTO ĈE LA URBODOMO

Je la naŭa kaj duono, la Urbodomo pleniĝadis per la esperantistoj kaj aŭtoritatuloj, kiuj venis akcepti ilin, kiam alia vagonaro el Barcelona elŭtis en la kongresurbon novan amason da esperantistoj, kiuj tuj sin direktis al la akceptejo.

Tiam, en la kunsidosalono de la Urbkonsilantejo S-ro Braquer, urbestra moŝto, kiun akompanis multaj urbkonsilantoj, S-ro Alegre, provinca deputito, kolonelo Soler, S-ro Crusat, sekretario de la Industria Lernejo kaj multege da altrangaj enurbaj personoj, per varmaj kaj tre sinceraĵoj salutis la kongresanojn, dezirante ke ilia restado en la urbo de li reprezentata estu tre agrabla kaj ke la Kongreso per sia sukcesa laboro antaŭenigu nian movadon laŭ la deziro de la esperantistoj.

D-ro Bremón nome de la aliurbanoj dankis elokvente la urbon, kiu per la vortoj de sia urbestro, antaŭpromesis por nia festo brilan sukceson. La aplaŭdado soninta post la salutado de S-ro Braquer reaŭdiĝis laŭte post la bela parolado de D-ro Bremón.

### EN LA ATENEO. MALFERMA KUNSIDO

Amase sin direktis al la Ateneo ĉiuj kongresanoj, inter kiuj aŭdiĝis ankoraŭ la bruo de salutoj kaj renkontiĝoj inter la laste alvenintaj kaj tiuj pli antaŭe vojaĝintaj. Cetere, tio okazis same la morgaŭon, kiam la vagonaroj, de ĉiuj direktoj venintaj al la kongresurbo, kondukis al ĝi amasojn da samideanoj.

En la salono de la Ateneo, kiun tute plenis la esperantistaro, S-ro Urbestro, apud kiu staris la cititaj aŭtoritatuloj kaj la membroj de la Direkta Komitato de la K. E. F. ripetis siajn vortojn de bondeziro kaj ĝojis, ke la komenco de la Kongreso montras jam kian grandan sukceson ĝi estas atingonta. Meze de laŭta aplaŭdado li deklaras la

Kongreson malfermita nome de lia moŝto la Ministro de Publika Instruado.

Tuj S-ro Balsells, prezidanto de la K. E. F., salute al kiu revigliĝas la aplaŭdoj, legas sian jenan paroladon.

*Sinjoroj:*

Altigita per nemeritita decido de la kvina Kongreso de nia federacio al ĝia prezido, mi devas hodiaŭ plenumante la taskojn proprajn de la ofico, kiun kun danko mi akceptis, diri al vi, kiaj estas la rimedoj, kiujn la Direkta Komitato, kies prezido tiel honoras min, kredas necesaj por la hela kaj edika efektiviĝo de la celo de nia organizacio, al kiu dediĉis siajn fortojn la Komitatoj, kiuj antaŭiris la nunan.

Ekzistas, en la vivo de nia Federacio, senfrukta kaj soleca interspaco, kiu respondas, se oni komparas ĝin al vivo de homa korpo, al tiuj patologiaj situacioj, kiuj senigas la individuon je la eblico plenumi eĉ la plej signifikantan taskon. Mi aludas la tempon, kiu forpasis de nia kvina Kongreso en Sant Feliu de Guixols ĝis la reapero de nia gazeto en fino de l' pasinta jaro. Ne konvene estas, en mia nuna loko, analizi la kaŭzojn, kiuj produktis tiun nenormalaĵon, ĉar kvankam ĝi povas esti askribita al laciĝo de tiuj, kiuj devis subteni la nenigan kaj senfruktan lukton, kiu malhelpis la progreson de nia Federacio dum la jaro mil naŭcent dek kvara, tamen estas vere, ke la situacio de la ekstera medio al niaj iniciativoj ne ŝajnis plej adekvata por ilia disvolviĝo.

Estas diritaj sur la paĝoj de KATALUNA ESPERANTISTO ĉiuj kaŭzoj, kiuj motivigis la prokraston de ĝia publikiĝo, kaj tio ŝparigas de mi insiston pri ili, des pli, tial ke ankaŭ ilin devas preparoli en sia raporto nia kolego sekretario. La fakto estas, sinjoroj, ke kiam tiu ĉi Komitato prenis sur sia la direkton de la K. E. F., estis necese, ĉar ni ne trovis la vojon glata, sed eĉ male, plena de baroj kaj malhelpoj, fiksi jam ĉe la komenco noemon por kondukti kun la firma volo adapti al ĝi la estontan agadon de la Komitato.

Kaj antaŭ la konsola fakto, ke nia lingvo, kiun ni ĉiuj volis meti al servo de la paco, povis ankaŭ en servo de paco bone taŭgi por doŭtigi iaĵn el la teruroj de milito, la Komitato kredis, ke ĉiuj esperantistoj konservos sian fidon kaj entuziasmon, kiel efektive okazis, nenecesigante la klopodon ilin konservadi por nia idealo, kaj eĉ senpezigante la taskon fortikigan de niaj organizacioj per tio donante al ni pli vastan kampon por la propaganda agado kaj disvastiĝo de nia lingvo kaj de la idealo, kiun ĝi nutras en niaj samceletoj.

Konscia pri la ĵus aludita fakto, la Komitato juĝis, ke plej bona rimedo plifortigi tiun entuziasmon kaj la rezultatojn, kiujn ĝi produktas, estas starigi aparte kaj samtempe kun la komuneco de idealo, komuneco de materiaj interesoj povantaj kunigi nin, se iam, kontraŭ mia kredo, niaj esperoj ŝanceliĝus. Al tio respondas, el la multaj kiuj povas pli poste disvolviĝi, la propono solvata de la Kongreso, fondi Mutualan Asocion Esperantistan, kies fundamentojn, inspiritajn de larĝa spirito de solidareco kaj altruismo, ellaboris tiu ĉi Komitato, kiujn certe la Kongreso bone akceptos.

Estas ankaŭ, laŭ opinio de la Komitato, esperiga efektiviĝo la establo en

Barcelono de la Barcelona Hejmo de la K. E. F., kie la Komitato plenumis la laboron por la atingo de la, efektive ne gravaj, rezultatoj atingitaj dum la unua jaro; ĉar, se estas vere, ke en ĝia komenco ne ekzistis ankoraŭ la materiecio de tiu kunveno, la spirito de ĝiaj iniciatintoj ekzistadis jam, sin ĉarmante por laboradi, ĉe la privataj loĝejoj de niaj kolegoj en komitato, por kinj. — kaj tio estas nur mia persona opinio, — prezentis ja veran ĝenon la oftaj kunvenoj, necesaj por restarigi la bonan marŝadon de la Federacio.

Kvankam oni povas konsideri, ke la rezultatoj atingitaj deŝt la starigo de la Hejmo, ne havas grandan transcendecon, mi kredas tamen ke estas juste rekoni la diferencon favoran, kiun oni povas observi, komparante ilin al tiuj efektivigitaj en antaŭaj cirkonstancoj : kaj oni ne vidu en tio ĉi eĉ plej malgrandan kritikon por tiuj, kiuj konsistigis la antaŭajn Komitatojn, sed kontraŭe, la konstato pri bezono de loko, kie estos eble kunveni ĉiuj, kiuj deziras dediĉi al nia ideosian energion. Premio ja sensignifa al la sindona oferemo de tiuj tion farantaj!

Sur tiuj fundamentoj, kaj instruitaj de la atingitaĵoj, ni opinias, ke la propagando por allogi novajn elementojn devas fariĝi la preferata tasko de la Federacio, por kin celo kaj por helpi la dankindan laboron de niaj propagandistoj, estas necese tuj publikigi almenaŭ du beoŝurojn, kiujn oni povas dediĉi, la unuan por pritrakti la grandan nombro de utilegaj servoj faritaj de Esperanto dum la unua jaro de eŭropa milito, kaj la dua povus enteni epitomon de nia lingvo, simila al tiuj, kiuj en aliaj landoj tiel bone efikas per sia majstra elmontrado de la reguloj de nia simpla gramatiko; broŝuroj, en kiuj oni ne malatentos aludi mallonge la servojn, kiujn nia helpa lingvo faras, tiel same ĉe la studo de lingvoj naturaj, kiel ĉe la interligo de ĉiaj rilatoj, kiel ankaŭ ĉe la disvastigo de literaturoj de popoloj, kiel nia, kies lingvon parolas ne granda nombro da homoj.

Fine, estis vera ĝojo por la Komitato, ke dum ĝia agado oni reprenis en formo, kin povas konduki ilin al hela sukceso, la laborojn starigi en nia lando esperantistan superan organizaĵon, rilate kiun, malmulte restas al mi dirota post la vibranta artikolo, kiun al tia afero dediĉis en lasta numero de nia gazeto ĝia direktoro. Krom tiu afero, devos la Kongreso solvi la demandon pri fortigo de nia financo, atentante al la opinio de la raportuloj, kiujn por tio elektis la antaŭa. Estas superflue insistadi plu pri tiuj punktoj, kaj pri tiuj aliaj, kiujn via kompetenteco kaj entuziasmo povas submeti al la kongresa diskutado.

Restas al mi nur, diri al vi kelke da vortoj, ne por peti de vi serenecon en la decidoj kaj diskutoj ilin antaŭirontaj, ĉar tio estas dubi, via ofendante, pri via spirito de larĝa toleremo, naskita de via nobla entuziasmo por nia afero. — sed por atentigi vin ke, dum la kongresa okazo kaj dum la laborado post ĝi plenumota, nia devizo devas esti la starigo de konscia kunagado de ĉiuj membroj de nia asocio por atingi en ĝi la superan garantion pri sukceso de la efektivigo de nia aspiro, ke, inter ni, ĉiuj kaj ĉiu estu utilaj al nia komuna tasko, sed ne necesaj, tiamaniere, ke estu ebla la interŝanĝo kaj anstataŭo de kapabloj, ne nur inter la elementoj nomeblaĵ direktantoj, sed inter tiuj, kiuj, malgraŭ nomi sin direktatoj, tenas sur si, en la aŭtonomio starigitaj asocioj, la superan direktadon.

Aplaŭdoj denove sonas, kaj S-ro Ventura, sekretario, petas la reprezentantojn de grupoj aŭ societoj, ke ili prezentu siajn rajtigilojn kaj alparolu la Kongreson.

Tion faras : S-ro Enric Aguadé, el la *Esperanta Tarragonprovinca Ligo*, el *Priorata Stelo* (Falset), el *Nova Semo* (Reus), kaj el la gazeto «*La Vea del Campa*» (Reus), S-ro Pere Domenech, el *Martorelĵa Stelo* (Martorell), Pastro D-ro Josep Casanovas, el *Ĝeronprovinca Esperantista Ligo*, el *Gerona Espero* kaj el *Studenta Juneco* (Girona), el *Flugila Penso* (Ventalló), kaj el la ĵurnalo «*El Nortes*» (Girona), S-ro Sebastià Chaler, el *Lumon* (Terrassa), S-ro Frederic Mensa, el *Ĉiam Antaŭen* (Barcelona), S-ro Josep Boireu, el *Libera Stelo* (Barcelona), S-ro Artur Domenech, el *Fervojista Stelo* kaj *Barcelona Stelo* (Barcelona), S-ro Josep Domenech, el «*Centro de Lecturas*» de Reus, kaj S-ro Artur Casas Rosales, el *Hispana Societo p.p. Esperanton*.

Alĝas al la Kongreso, per telegramo aŭ telefonaĵo, S-ro Melas (Tarragona), S-ro Kühnl el Praha, en San Sebastián; S-ro San Millán el *Madrida grupo* (Madrid), S-ro Cimr el Praha, en Madrid; *Esperanto kaj Patrujo* (Barcelona) kaj S-ro Soriano el la *Sevilla grupo*.

Per letero alĝas *Esperanta Fervoro* (Mieras); Pastro D-ro Joaquim Coll (Barcelona), *Esperanta Idealo* (Sta. Coloma de Farnés), *Stelanoj* (Molins de Rey), *Esperantista Klubo* (Palma de Mallorca), *Esperanta Burgono* (Rubi), *Vika Esperantistaro* (Vich), *Laboro kaj Kulturo* (Calafell) kaj S-ro Jesús Ramírez, Madrid.

S-ro Galcerán legas leteron de S-ro Kühnl, la eminenta bohema samideano, kiu laŭ la programo devis malfermi la propagandan ekspozicion, per kiu li esprimas sian bedaŭron, ke li ne povas persone ĉeesti. Tial S-ro Balsells deklaras la Ekspozicion malfermita, samtempe anoncanta, ke la kunsido labora akurate komenciĝos morgaŭ je la naŭa.

## EN LA EKSPOZICIO

En la teretaĝo de la Ateneo, kies murojn oni ĵus speciale tapetis, estis instalita la propaganda ekspozicio. Al ĝi iris ĉiuj ĉeestantoj, kiuj devis atendi iom por eniri, tial ke kvankam loko sufiĉas, estas malfacile cirkuli. La ilustraĵoj donas bonan ideon pri tiu bela Ekspozicio, kiun multaj samideanoj opiniis la plej kompleta, kiun oni ĝis nun okazigis en nia lando.

En la unua salono, kiun prezidas busto de nia Majstro, vidigas sur la muroj grandaj belaj esperantaj afiŝoj, diversaj tre interesaj bildoj, kolekto de bildaro esperanta kaj specimenoj de korespondajoj esperantaj el 96 landoj diversaj. Sur la tabloj montriĝas ekzemplero

de ĉiu el la aperantaj gazetoj kaj el ĉirkaŭ ducent diversaj aperintaj; cento da turismaj eldonaĵoj apud multege da komercaj katalogoj en Esperanto, kaj sur unu tablo la esperanta literaturo estas reprezentata per siaj plej valoraj eldonoj, el kiuj «La Biblio», «El Parnaso de Popoloj», «Albrecht Durers», la tuta «Kolekto de La Revuo» kaj aliaj altiris tre grandan atenton.

En la dua salono, en ĉefa loko oni prezentis la servojn de Esperanto dum la milito. Ambaŭflanke de portreto de D-ro Zamenhof, kiun palmoj, laŭro kaj olivobranĉoj simbole ĉirkaŭis, estas elmetitaj la publikaĵoj esperantaj de la batalantaj ŝtatoj, kaj sur tablo apuda vidiĝas ĉiuj pacifismaj dokumentoj apud ekzempleroj de kartoj kaj leteroj en Esperanto cenzuritaj de ĉiuj landoj. Sur la muroj kelkaj miloj da poŝtkartoj ĉiulandaj, multenombra kolekto de fotografaĵoj de grupaj ekskursoj kaj propagandoj kaj aro da afiŝoj kaj reklamiloj kompletigis la efikon de la, sur tablo montrataj, dokumentoj de la V<sup>a</sup> kaj X<sup>a</sup> Universalaj Kongresoj. En la centra tablo, kolekto de ŝlosiloj, gramatikoj kaj vortaroj el ĉirkaŭ 30 diversaj lingvoj allogis la vizitantojn, kiujn mirigis ĉefe kartvel-lingva ŝlosilo per siaj tre belaj skribsignoj. Arbustoj kaj kreskaĵoj kompletigis la ornamon de la salonoj, kiuj tre bele efektis.

Post la vizito, kiun ĉiuj kongresanoj kun la aŭtoritatuloj faris, S-ro Suñé prezidanto de la Ateneo dediĉis al la esperantistoj vinon de honoro. Por la afabla regalo dankis lin S-ro Grau, kies vortojn, same kiel tiujn de la prezidanto de la Ateneo, oni aplaŭdis forte. La malavara luno retenis en la salono longatempе ĉiujn samideanojn, kiuj plenaj de espero pri sukceso komentariis la okazintaĵojn. La neatendita alveno de S-ro Maynar, samideano el Zaragoza, urbkonsilanto-sindiko de la tiea urbestro helpis ankoraŭ la bruadon de la ĉies entuziasmo, kiu tamen iom post iom silentiĝadis ĉe la disiroj kaj eĝis morgaŭ-adiaĵoj. «Estis jam du horoj postnoktomeze kiam tio okazis.

### Dimanĉo, 17<sup>a</sup>

Diskoniĝis tra la urbo sciigo pri la sukcesa komenciĝo de la Kongreso, kio efikis bone. Helpis al tio la alvenado de multaj grupoj da samideanoj kaj la svarmado tra la urbo, jam de frua mateno, de multaj verdstelanoj.

Je la 8<sup>a</sup> en la paroĥia preĝejo okazis diservo por la katolikoj, dum kiu estis farota esperanta prediko. Tamen pro lastmomentaj malfacilaĵoj tio ne povis efektiviĝi kaj la ĉeestantoj, precipe neesperantistoj, bedaŭris, ke la anoncita prediko en helpa lingvo ne estis farita.

## LABORA KUNSIDO

Je la naŭa akurate komenĉiĝas en la Ateneo la labora kunsido. En la preda loko vidiĝas belaj standardoj de la grupoj. Pro foresto de sinjoroj prezidanto kaj vicprezidanto de la Federacio, kiuj iris al la stacidomo atendi kun la Urbestraro kaj altrangularo la alvenon de la delegito de la Ministro de Publika Instruado, prezidas S-ro Grau, kaj agas kiel sekretario kaj vicesekretario tiuj de la K. E. F., S-roj Ventura kaj Buyé.

Oni aprobas unuanime la bilancon de 1914 publikigitan en KATALUNA ESPERANTISTO.

Salute alparolas la Kongreson, ĵus venintaj al ĝi, S-roj Jaume Marcé, el *Fratesco* (Vendrell) kaj Joaquim Bolós, el *Nova Sento* (Barcelona). Aliĝas la fondinto de *Laboro Esperanta* (Vilanova), kiu, blindiĝinte, esprimas sin per Braille-akribado.

S-ro Ventura legas kiel sekretario sian raporton por la intertempo 1914-1915. Ĝi estas bela dokumento flue verkita, per kiu li elcitas ne nur la projektojn sed la efektivaĵojn atingitaĵojn, kiuj instigas la kongresanaron varme aplaŭdi. Juĝu pri tio ĉiu necesinto, per la jenaj linioj ĉerpitaj el la raporto de S-ro Ventura.

«La Skolta Societo en Barcelono petis al la Federacio profesoron por malfermi kurson de Esperanto en ĝia sidejo. Ni tuj trovis unu, kiu akceptis tion fari, kaj la kurso komenciĝis kaj finiĝis kun granda sukceso.

Iniciativo, kiu ni ĉerpis pri kreo de mallara insigno de la K. E. F., fariĝis jam fakto, kaj tiun insignon nun oni povas vendi je malalta prezo.

Estis granda ĝojo por ĉi tiu Komitato, kiam kelkaj malavaraĵoj esperantistoj barcelonaj oferis propeavole loĝejon al la K. E. F., kompreninte la bezonon, kiu ĝi havas je ĝi por siaj kunvenoj kaj ceteraj aferoj ĝin koncernantaj, kaj ni akceptis tulkore kaj danke tiun proponon kun la kondiĉoj, kiujn oni prezentis al ni, ke la loĝejo estos nomata BARCELONA HEJMO de la K. E. F., ke en ĝi povos ĉesti ĉiuj esperantistoj kaj ke la Administracio de la K. E. F. estos tiu de la Hejmo. Nia decido estis meti tiun aferon al la konsidero de la hodiaŭa Kongreso.

Jam antaŭ longa tempo ni komencis ĉiunonatan dissendon de numeroj de nia organo, kompreneble senpagan, kiu daŭras ĝis nun kiel propagando kun la intenco interesi eksterkatalunajn samideanojn kaj aliri al nia organizaĵo novajn aliĝojn aŭ abonojn por la KATALUNA ESPERANTISTO.

Ni eldonis ĉirklerojn por ebligi, ke novaj federaciaĵoj eniru en la K. E. F., kaj ni ĵus komencis privatan propagandon inter la iamaj esperantistoj por denove ilin konduki apud nin kaj al la aktiva tasko por nia afero. Ni establis la interŝanĝon kun la Biblioteko de Katalunujo, en kies legejo troviĝas nia gazeto; kun la Societo por altiro de Ailandanoj; kun la Komitato por Pedagogia Esplo, rado de la *Mancomunitat de Catalunya*, en kies gazeto «Kajeroj pri instruado» oni anoncas pri nia gazeto, liverante al ni per tio la rimedon alveni sciigojn

pri nia movado al ĉiuj instruistoj en Katalunujo; kaj kun la Barcelona Ateneo (al kies Komitato ni tion petis kaj ni kredas, ke la peto estas akceptota).

Tuj post la enlekigo de la Barcelona Hejmo, la K. E. F. fondis internaciajn servojn interkonsente kun U. E. A., kiuj povas doni kaj donas jam bonajn rezultatojn. La kurso de Esperanto en la Barcelona Universitato, nunjare ni multe propagandis per afiŝoj kaj prospektoj kaj ni atingis kelkajna enskribiĝojna krom la ordinaraĵna.

Perfektigon en la administraciaĵna servoj de la K. E. F. ĉiuj federacionoj efektive povis konstati, kiel ekzemple la novaj banderoloj de la gazeto, la presitaj adresoj sur ĝi, k. t. p., k. t. p.

Oni disdonis esperantajna ŝlosilojn kun folio enmetita, kiu parolas pri la K. E. F. kaj pri ĝi na gazeto kiel ankaŭ pri la Barcelona Hejmo kaj ĝi na bonaj servoj al la samideanoj.

La K. E. F., kies celo estas kunigi ĉiujna esperantistojna de kataluna lingvo, sentas la mankon de la kvin grupoj, kiuj restas for de ĝi, kaj tial, lastatempe la Komitato sendis komunikajona invitantaĵona ilin aliĝi al la Federacio kaj kontribui per ĉiuj siaj fortoj al la kunagado por Esperanto. La K. E. F. etendas al ili la brakojna preta ilin ame alpreni al sia koro kaj plifortiĝi per la novaj entuziasmo kaj fervoro, kiujna ili povas alporti al ĝi.

Resume, kvankam la nombro da laboroj, kiun ni faris ne estas multa, tial ke ni devis antaŭ ol ĉio alia efektiviĝi la fortaĵna reorganizadon en la K. E. F., tamen ĝi estas tre fruktoporta kaj ni estas feliĉaj, ke ni povis atingi por ĝi la fortilkan bazon de vivo, kiun bezonas ĉiu organizaĵo destinita plenkreski kaj esti la bastiono de unu granda afero.

JOSER VENTURA

S-ro Serrat, administristo, klarigas pri la ekonomia situacio de la K. E. F., bedaŭrante, ke ankoraŭ ŝuldas multaj grupoj kaj membroj siajn kotizaĵojna de antaŭaj jaroj. Li diras ke de komenco de 1915 oni senkompate forstrekos de niaj vicoj ĉiujna nehelpantojn, kaj petas, ke oni klopodu eviti la malfacilaĵojna, kiujna nepago de la kotizo faras por la bona irado de nia asocio.

S-ro Gran proponas ke la kongresanoj subskribu dokumenton sendotan al S-ro Pujulà esprimante al li sian simpatian, kio estos radio de espero kaj konsolo en la mallumo, kiu lin ĉirkaŭnas. La ovacio soninta post tiuj vortoj bone montris, kiom sincere oni bedaŭras la foreston de S-ro Pujulà, nia kara pioniro.

La Kongreso aprobas propono de S-ro Amades la establona en la Barcelona Socia Muzeo de esperanta instalaĵo propaganda.

S-ro Solà atentigas per flua esperanta parolo pri sia propono por verkado de kompleta kataluna vortaro. La Kongreso konfidas tiun taskon al la Profesoraro de la K. E. F., kiu devos sub la kontrolo de la katalunaj lingvokomitataĵoj zorgadi pri tiu afero.

En tiu momento eniras en la salonon la ekscelenca sinjoro Mariano Batllés Bertrán de Lis, kiu reprezente de lia Moŝto la Ministro de Publika Instruado venas al nia Kongreso. Akompanas lin la aŭtoritataĵoj sub prezido de la Urbes-

tro, reprezentantoj de la Industria Lernejo kaj la Komitato de la K. E. F. La kongresanaro starigas kaj laŭtigas longa ovacio. Post prezentadoj kaj komplimentoj, S-ro Grau per esperanta paroladeto salutas la eminentan delegiton en nomo de la Kongreso.

S-ro Batllés respondas kastile, mirante pri la komprenebleco kaj sonoreco de nia lingvo, salutante la urbon kaj speciale la Kongreson, kies taskojn li venas malfermi en nomo de la Ministro. Grandaj aplaŭdoj.

S-ro Grau respondas al li katalune, kaj dankinte liajn afablajn vortojn, petas lin transdoni al la Ministro ne protokolatan, malvarman raporton, sed la konstatojn pri la tasko de la esperantistoj, kiuj ne nur Esperanton disvastigas tra la lando, sed ankaŭ kulturon ĝeneralan, pro tio meritate pli multe la oficialan apogon.

La kongresanoj starante resonigas la salomon per nova aplaŭdado kaj la reprezentanto de la Ministro forlasas la kongresejon kaj akompanate de la aŭtoritatoj kaj de la prezidanto de K. E. F., S-ro Balseis, vizitas tre detale la propagandan ekspozicion.

Dume, la Kongreso reprenas sian taskon sub prezido de S-ro Galcerán, vic-prezidanto de K. E. F.

Post legado de la financa raporto aperinta en n.<sup>o</sup> 8 de K. E., S-ro Grau, kiel membro de la komisiono elektita, parolas pri ĝi. Post interveno de S-roj Boedas, Pellicer, Serrat kaj Ledergerber oni aprobas la unuan paragrafon, altigante ĝis 4 pesetoj la ĉiujaran kotizajon por entlandanoj, kaj ĝis 2,400 Sm. por alilandanoj.

La duan paragrafon S-ro Grau aliformigas, proponante la starigon de garantia kapitalo milpeseta, kiun libere subskribos ĉiu federaciiano. Petas klarigojn pri tio D-ro Bremón, kaj S-ro Grau ilin donas, dirante ke la garantia kapitalo estos elpezata proporcie al la eblo, ne verŝajna, deficito, kiu povas iam esti en bilanco. S-roj Mensa, Pellicer, Serrat, Bremón kaj Grau parolas pri tiu projekto kaj fine la Kongreso unuanime sankcias la starigon de la garantia milpeseta kapitalo, kiun, instigitaj de S-ro Serrat, subskribas jam multaj ĉeestantoj.

Prezidas denove S-ro Grau, kiu, esperante, raportas pri la tasko de la kataluna komisiono por starigo de Iberia Esperantista Konfederacio. La Kongreso aprobas aklame, kiel esprimo ĝusta de siaj sentoj kaj opinioj la artikolon pri tiu temo verkitan de S-ro Grau; tiu ĉi kore dankas, kaj petas la Kongreson komplezi la peton de la Madrid'a grupo, ke oni alprenu la nomon Hispana por la Konfederacio, ĉar tiamaniere, ĝi apogos kaj defendos ties starigon. Per laŭta aplaŭdado la Kongreso akceptas la nomon Hispana por la Konfederacio.

S-ro Grau legas leteron de S-ro Allende, kiu en reprezento de la *Baŝa Esperanta Federacio* proponas jaran kotizon de 200 pesetoj por subteni la gazeton KATALUNA ESPERANTISTO, se tiu ĉi fariĝas organo de la B. E. F. Grandaj aplaŭdoj akceptas la proponon, kiun oni decidas danki per telegramo. Laŭ la deziro esprimita de S-ro Allende kaj akorde kun la opinio de la K. E. F. la Kongreso alprenas jenan rezolucion.

«KATALUNA ESPERANTISTO akceptas en la nuna momento esti eventuala organo de la Konfederacio, ne ŝanĝante la nomon de la gazeto, ĉar la Baskoj, kiuj nune subvencias ĝin, ne postulas tion. Kiam la Federacioj konfederitaj opinias necesa la publikigon de definitiva organo de la Konfederacio, la K. E. F. pagos proporcie aŭ laŭ la regularo por la subteno de la gazeto, kaj en tiu momento KATALUNA ESPERANTISTO refariĝos ekskluziva organo de la Katalunoj».

S-ro Arturo Casas, delegito de *Hispana Societo p.p. Esperanton* en Barcelono, legas la opinion pri Konfederacio senditan al li de H. S. Ĝi estas kontraŭa al la starigo de Konfederacio ĝenerala, ĉar H. S. pretendas tian rolon. S-ro Grau prezentas kontraŭargumentojn, kiujn oni aprobas, kaj la Kongreso, atentinte al la leteroj de la *Baska Esperanta Federacio*, de la *Madrida grupo*, de *Libera Homo* (Madrid), kies grupon aliĝon oni legas, kaj de la grupo *Fratesco* de Zaragoza, en kies nomo S-ro Maynar varme parolas; fidante je la bonvolo kaj entuziasmo de ĉiuj konsciaj samideanoj kaj precipe de S-roj Allende, Perogordo, Piñó, Inglada, Maynar kaj ceteraj, unuanime per akklamo de la kongresanoj, kiuj starigas en tiu solena momento, deklaras sian volon subteni la tuj starigotan HISPANA ESPERANTISTA KONFEDERACIO'n.

En la salono, kiu plipleniĝis ankoraŭ post la alveno de la multaj samideanoj veturintaj en sama vagonaro kun la reprezentanto de la Ministro, aŭdiĝas bruaĉo entuziasma pro la grava decido alprenita, kiun ĉiu opinias plej favora por la efika propagando tra la tuta Hispanujo. Kiam la komentarioj mallaŭtigas, oni represas la diskutadon.

Estas aprobita propono de S-ro Grau pri la Floraj Ludoj, kun la ŝanĝo petita de S-ro Pellicer konservi la saman ordnumeradon ĝisnunan.

La prezidanto parolas pri la utilo, kiun povus liveri al la K. E. F. la starigo en ĝi, kiel sendependa fako, de «Mutuala Esp. Asocio». La Kongreso aprobinte tiun nomon, konfidis la starigon de tia fako al S-roj Balsells, Bremón kaj Serrat.

Estas legata komunikaĵo de *Espero Kataluna*, kiu aliĝas al la Konfederacio. La Kongreso decidis pruvi per aplaŭdo la deziron de la K. E. F., ke tiu societo reuniru en nian organizacion; S-roj Sabadell kaj Rosals, influaj membroj el *Espero Kataluna*, esprimas ke ili deziras ankaŭ, ke tio fariĝu tre baldaŭ.

S-ro Serrat en nomo de la subtenantoj de la Barcelona Hejmo diras, ke ili metas al la dispozo de la K. E. F. la loĝejon kaj proponas, kaj estas aprobita, ke la socia sidejo translokigu de Sabadell al Barcelona, en la Barcelonan Hejmon, ĉar tio plifaciligos la servojn de la K. E. F.

Pri la raporto pri Kongresa Regularo, S-ro Grau rimarkigas, ke Pastro Coll promesis preni sur sia ĝian redakton kaj ĉar li ne povas ĉeesti, li ne prezentis ĝin. La Komitato opinias ke la Organiza Komitato devas submeti al ĝia aprobo siajn iniciativojn pri la aranĝo de la Kongreso. Oni decidis ke la Komitato de K. E. F. redaktu tiun Regularon kaj ĝin publikigu sur la paĝoj de K. E.

S-ro Mensa rememorigas la proponon, kiun li faris antaŭ du jaroj rilate la esperantistajn vizitojn al la lernejoj, kaj li estas petata entrepreni tiujn vizitojn serĉinte kunhelpantojn. S-ro Serrat proponas sin al tio.

D-ro Bremón demandas pri la publikigo de la Kataluna Antologio, por

kies celo la Federacio petis subvencio de la «Mancomunitat de Catalunya». Oni klarigas al li, ke ne estas nun espereble, ke ni povos ĝin atingi de tiu Instituto; tamen aliparte la K. E. F. atingis de ĝi la interŝanĝon kun la Biblioteko de Katalunujo, la anonco de nia gazeto sur tiu ĝia «Kajeroj pri instruado» ktp. Oni lasas la interesigon pri tiu afero al la bonvolo de la Komitato de la K. E. F.

S-ro Serrat petas, ke la Kongreso elektu efektivan direktoron por nia presorgano, tial ke S-ro Pujulá forestas kaj eble ankoraŭ longe li devos foresti. Oni decidis nomis S-roon Pujulá honora direktoro kaj konfidi al S-ro Grau la direktadon efektivan de la organo de K. E. F.

S-ro Grau dankas la Kongreson kaj esperas, ke li povos redoni sian postenon al S-ro Pujulá, kiam tiu ĉi povos repreni apud ni sian kunlaboradon en nia tasko.

S-ro Maras, bohema samideano, salutas la Kongreson propranome kaj en reprezento de siaj samnaciuloj S-roj Kūhnl kaj Cimr. Sonas aplaŭdado, kaj la prezidanto fermas la kunsidon je la 12.30.

## FAKAJ KUNVENOJ

De la KONSERVANTARO DE LA FLORAJ LUDOJ. — Ĝi okazas en la sekretario de la Ateneo. Oni elektis la Jugentaron por la venontaj Floraj Ludoj, kiu konsistas el la jenaj gesinjoroj.

S-ro Vicente Inglada Ova, *prezidanto*; S-ro Josep Ventura Freixas, *sekretario*; F-inoj Eulalia Rosell, Teresa Rosell, S-roj D-ro Josep M.\* Terricabras kaj José Perogordo, *membroj*.

De la ESPERANTA TARRAGONPROVINCA LIGO. — Kiel estas anoncite, ĝi havis lokon en la Biblioteko de la Ateneo. Oni elektis la estraron de la Ligo por la venonta jaro. Ĝi konsistas el S-roj Josep Pamies, pastro (Argentera), *prezidanto*; J. Julivert (Vendrell), Enric Aguadé kaj F-ino Teresa Estela (Reus), Joan Molas (Tarragona) kaj Joan Aragonés (Argentera). Oni decidis okazigi la III<sup>a</sup> kunvenon de E. T.-P. L. en Reus.

De la KATALUNA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ. — Ĝi havis lokon en la «Círcol Catòlic» sub la prezido de ties prezidanto. La ĉeestantoj estis pli ol 60.

## OFICIALA FESTENO

Je la unua posttagmeze kolektiĝis en la festosalono de la societo «Fomentos», kie oni aranĝis la tablojn por la festeno, ĉirkaŭ naŭdek kunmanĝantoj. La aspekto de la salono estis tre bela. En la prezida tablo apud S-ro Batllés Bertrán de Lis, delegito oficiala de la Ministro, kiu prezidis, sidis S-roj Braquer, urbestro; kolonelo Soler; Morgades, urbkonsilanto kaj prezidanto de «Centro Democrático Federalista»; Crusat, sekretario de la Industria Lernejo; Brunet, prezidanto de «Fomentos»; Ventosa Almirall, prezidanto de «Círculo Catòlico»; Bal-

sells, prezidanto de K. E. F.; Alegre, provinca deputito; Macià, parlamentito deputito; Morera i Galicia, la eminenta poeto; Grau, direktoro de K. E.; Suñé, prezidanto de «Ateneo» kaj Pujol, sekretario de la Urbeŝtaro. La menuo konsistis el : Almangaĵoj diversaj, rizo milane, bovidaĵo kun fungoj, fritita merlango, rostita kokido, desertoj, dolĉaĵoj kaj fruktoj, kafe.

Ĉe la ĉampano, per kiu la Urbeŝtaro regalis la kunmangaĵantojn, komencis la toŝtojn D-ro Bremón, kiu parolis esperante, kiel ankaŭ S-roj Ledergerber, ŝviso, kaj Maras, bohemo; S-ro Domenech legis originalan versan toŝton kaj S-ro Pellicer la versaĵon de fratinoj Rosell «Vi kial ne venas?»; S-ro Maynar kastile toŝtis kaj ricevis grandegajn aplaŭdojn. S-ro Grau legis siajn tradukojn «Sarkistinoj» el Morera i Galicia kaj «Rigarde al mar» el Maragall. S-ro Braquer, urbeŝtro, montris sin entuziasma por nia ideo kaj fine S-ro Batllés promesis sendi al Sinjoro Ministro plej favoran raporton pri nia tasko kaj pri la ideo por kiu ni laboras. Nenece estas rakonti kiom da aplaŭdoj sonis post ĉiuj toŝtoj, kiujn venis aŭskulti multege da esperantistoj kaj enurbanoj.

S-ro Batllés Bertrán de Lis, kiu devis nepre forveturi antaŭ la Floraj Ludoj, vizitis la teatron, kie ili estas okazontaj, kaj admiris tie la belajn premiojn, bedaŭrante, ke li nepovas resti inter ni dum tiu soleno, kaj akompanate de S-ro Balsells kaj de kelkaj urbkonsilantoj foriris al la stacidomo.



EN PROKSIMA NUMERO

Raporto pri la

## **XI Univerŝala Kongreso de Esperanto** en San Francisco de California

Ordinaraj temoj kaj premioj de la

### **VI<sup>a</sup> Internaciaj Floraj Ludoj**



## V<sup>a</sup> Internaciaj Floraj Ludoj

**F**STAS malfacile klarigi la ĉarmon de nia festo de Floraj Ludoj, kiu el ĉiuj solenoj de niaj Kongresoj kontrastas per sia heleco kaj allogo. En la nuna okazo, al la scivolemo por nia lingva soleno, kuniĝis intereso por la festo en ĝia formo ekstera, ĉar Vilanova, malsimile al plej multaj urboj katalunaj, neniam okazigis tian feston de Beleco kaj Amo, ĉar unu simila festo okazinta tie antaŭ tridek jaroj forviŝigis jam el memoro de la malmultaj ĝin ĉeestintaj. Tial do, ne strange ke, malgraŭ pluvo, jam antaŭ la kvara posttagmeze la plej distingindaj familioj iris okupi la loĝiojn kaj la kongresanoj plenigis la parteron. Cetera publiko amasiĝis en la restaĵo de la salono de teatro «El Bosques», kie la festo devis komenci je la kvara kaj duono. Tre belaj fraŭlinoj kaj sinjorinoj kun riĉaj tualetoj, multe da sinjoroj en ceremonia vesto donis aspekton de grava soleno, kiaj kutime estas la festoj de Floraj Ludoj.

Je la fiksita horo, eniris en la teatron S-ro Urbestro, deputitoj Alegre kaj Macià, kolonelo Soler, S-ro Morera i Galicia, S-roj Morgades, Ventosa kaj ceteraj urbkonsilantoj, sekvataj de la membroj de la Juĝintaro kaj Konservantaro de la Floraj Ludoj, S-roj Bremón, Casanovas, Pellicer, Ventura, Sabadell, Balsells, Rosals, kaj aliaj. La aŭtoritatuloj sidiĝis maldekstre kaj la Juĝintaro dekstre de la trono pretigita por ŝia Reĝina Moŝto.

Fariĝas silento kaj la Urbestro S-ro Braquer prononcas la frazon: La festo komenciĝas. D-ro Casanovas, prezidanto de la Juĝintaro, donas la parolon al la Sekretario S-ro Pellicer, kiu antaŭiras al tribuneno kaj eklegas sian raporton.

### *Gesinjoroj:*

Neniam mia koro batis tiel forte kiel la nunan jaron, en la malfermo de la festo de niaj Floraj Ludoj. Nia festo estas kiel oazo de prezio en la dezerto de la ĉiutaga vivo, sed en antaŭaj jaroj, ni jetis kaj disjetis konstante la semojn de nia pacema idealo, kaj ni vidis, kun la sama fiera plezuro kiel tiu de kulturisto antaŭ la hela florado de la burĝonigintaj semoj, la disvastigon de nia lingvo ĉiam pli grandigantan en ĉiuj landoj, en ĉiuj kontinentoj. Kaj tio estis ankaŭ por ni vera poezio.

Turnu hodiaŭ la rigardon ĉien; viaj okuloj vidos nur sangajn ruĝojn, la Homaron sin mortigantan, la fratecajn idealojn ŝanceliĝantajn, la sciencajn progresojn al la servo de la spirito de detruo. Kia spektaklo por ni homoj, por ni esperantistoj!

Meze de tiu frenezo, estas konsole vidi, kiel aro da homoj kunvenas en Kongreson de Paco kaj Harmonio, en Kongreson kie forestas la malamo, kaj nia emocio grandiĝas ankoraŭ, idam ni vidas ke la plej bela festo, la juvelo de la Kongreso, estas festo parolanta al niaj plej altaj sentoj, estas festo de Beleco kaj de Amo; festo de Poezio.

Sed ne nur ni, restantaj flanko de tiu malpaco, konservas alta nian standardon; kiel neĝe blankaj kolombinoj simboloj de paco, forflugintaj el la bruego de l' batalado, alvenis en niajn manojn verkoj de alilanduloj, kies patrujoj estas suferantaj pro la milito. Se en tiuj batalantaj landoj, kie milito regas ĉiujn kaj ĉion, troviĝas samideanoj, kiuj ne nur pensas al nia esperanta idealo sed ankaŭ al Beleco, prezentu al vi, katalunaj samideanoj, kiel grava fariĝas nia nuna posteno en nia internacia movado, kaj kun kia firmeco ni devas konservi la sanktan fajron de nia entuziasmo.

Kaj nun, enirante en la Regnon de Poezio, ni suprenlevu nian animon kaj, forgesante dum kelkaj momentoj la homajn mizerojn, ni tiuj proklamu la nomon de la poeto, kiu en tia nobla luktado gajnis la premion de honoro kaj ĝentileco kaj tiun de nia Reĝina Moŝto.

Gesinjoroj : la poeto laŭreata per la Natura Floro estas S-ro **Josep Grau Casas**, el Barcelona.

Li proponas la Naturan Floron kiel sceptron al F-ino **Julia de Andrés i Morera**. Samideanoj : Ni respektu riverencu antaŭ ŝia alta trono; ni ŝin entuziasme aklamu kiel Reĝinon de nia ama festo.

La laŭreato, solutita per varma aplaŭdado, iras ricevi de manoj de la Prezidanto la Naturan Floron, bela orkideo kun verda rubando kun oraj literoj, kaj foriras el la salono proponi ĝin al la ĉarma Reĝino.

Post kelkaj momentoj rebruas la aplaŭdoj : eniras Ŝia Reĝina Moŝto kun la brilanta Kortego de Amo, kiun konsistigis fraŭlinoj **María Macià**, **Josefina Macià**, **Juanita Piazza**, **Elvira Viñals**, **Teresa Escofet**, **Carme Gumà**, **María Castany**, **Antonia Ricart**, **Montserrat Ventosa**, **Delfina Pascual** kaj **Encarnació Pascual**, kiujn akompanis brako ĉe brako la poeto premiita kaj distingindaj samideanoj.

La belecon de ĉiuj fraŭlinoj pliravigis ankoraŭ la tre elegantaj vestoj de klaraj nuancoj kaj ĉefe la blankaj mantiloj, kiujn ili ĉiuj paradis. La ruĝo de la dianto, per kiuj niaj korteganinoj ornamis siajn korsaĵojn, estis vere pala apud la rozkoloro de vizaĝoj kaj la ruĝo de lipoj. Bela kaj ĉarma ĉiu el ili estis, sed la ravo de la bukedo da belajoj, kiun ili kune formis, estas supera al kia ajn komparo: ĝi estis plej granda ornamo de nia festo.

La ovacio de la ĉeestantoj, kiu salutis la eniron de la Reĝino kaj de ŝia hela sekvantaro, mallaŭtigas iom post iom kaj la sekretario reprenas la legadon de la raporto.

*Reĝina Moŝto,*

*Reĝina Kortego:*

Mi ne povas daŭrigi mian paroladon, ne esprimante al vi la ĝojon, kiu via alta prezido kaŭzas en la koro de ĉiu samideano. La aplaŭdojn, per kiuj oni akceptis vin, bonvolu juĝi kiel malgrandan oferon, kiel palan rebelon de tiu nia sento.

*Ekscelencaj sinjoroj,*

*Sinjorinoj,*

*Sinjoroj:*


La ofico per kies elekto la Konservantaro de la Floraj Ludoj honoris min, permesis al mi konstati la fervoran entuziasmon, kiu prezidas niajn katalunajn samideanojn, kiuj verkis kaj sendis al mi por esploro sufiĉe grandan nombron da verkoj, kies ĝenerala valoro tute sukcesigis la konkurson; sed bedaŭrinde kelkaj, certe malmultaj, vidigas ke iliaj aŭtoroj ne kapablas verki literaturaĵojn, aliaj iom pli nombraj, montras esperantistojn bone konantajn la lingvon, sed kiuj malmulte scias pri la leĝoj, kiujn postulas versfarado. Ĉiokaze, tiuj verkoj estas frukto de aplaŭdinda laboro kaj iliaj aŭtoroj, studante kaj precipe legante niajn bonajn verkistojn, povos atingi sian celon en tago pli-malpli proksima.

Ni ankaŭ konstatas en tiuj Floraj Ludoj la malgravan nombron ricevitajn da bonaj originalaj versaĵoj. Sed tio estis kompensata per la belaj versaj tradukoj, kiujn ni ricevis; mi devas rimarkigi, ke en antaŭaj jaroj oni ne povis aljuĝi multajn premiojn difinitajn por traduko de versaj verkoj; tio ne okazis nun kaj estas unu el la faktoj pli esperigaj de la nuna konkurso.

La Naturan Floron, premio, kiu estas aljuĝata al la plej bona teksto el la kvar premiitaj verkoj en la ordinaraĵoj temoj, laŭ la noto I de la alvoko, oni unuanime donis al la verko n.º 20 devizita *Labor omnia vincit*, bona traduko de «El Rellote de Sol» de la poeto Magí Morera i Galicia, tial ke ĝia merito superas tion de la aliaj premiitaj verkoj. La tradukinto, kiu montras koni profunde la lingvon kaj uzi ĝin en plej facila maniero, ĉiam konservas similan ritmon al tiu de la originalo kaj uzis en sia verko grandan riĉecon de rimoj, kiu estas komparebla al tiu de la kataluna verko. Kiam postulo de la rimo devigis la verkiston anstataŭi per aliaj metaforojn de la originalo, li sciis eltrovi aliajn samvalorajn.

Da tradukojna plie ni ricevis konkurantajn al tiu temo, sed ili ne estas sufiĉe korektaj. Aŭtoro de la traduko premiita estas S-ro **Josep Grau Casas**.

Atenda silento fariĝas post tiuj vortoj. S-ro Grau kortuŝe legas sian tradukon, kiun oni aŭskultas plej atente.



**L**A horoj mallumhavaĵ,  
la horoj malsereĵ  
estas nur por la Hom' : por vi, gracio  
de l' tago kaj de l' horoj sunoplenaj,  
de la horoj triumfaj, lumeravaĵ,  
kiam helas ĝojante Poezio.

La ŝton', kie vi kantas, pro sufero  
je temp' bruniĝis, kiu daŭre agas  
per pluv' kaj ventvetero,  
per rosoj de tagiĝo kaj vespero.

Eĉ vidi, mi imagas,  
ke svarmas sur neglata la tabulo  
karena brulardec', ruĝaĵoj ĉarmaj  
de parfum' kaj elspiroj flame varmaj,  
de frotoj de flugil' kaj de nebulo,  
de ĉio dum vivado via kisanta  
kaj konsumanta vin!... Kaj kiam restas  
vi muta sub la nub' sur frunt' ombranta,  
vi min similas, — kaj vi homa estas.

Vi min similas! Kissas  
mi vin per la rigard'!... Malhel' ĉagrena  
en via larm' ekzistas...

Sed en vi restas superec' serena  
de l'animo hardita,  
noblaĵojn dezirema,

vivanta ĉe ventar' per vivo plena  
en plejsankteĵ' ŝlosite, mallatema  
je hor' senfortigita,  
je hor', kiu ne kantas, lumetrema,  
per fajra laŭg', pro kiu viv' bruliĝas!...  
Kaj vi tiam triumfas!... Kaj altigas  
tiam kiel simbol'!... Montrilo via  
eligas el la omb' kaj signon metas  
sur horojn ordongeste, rektlinia...  
kaj flamas, kaj ardiĝas, kaj ridetas  
vi kontraŭ sun', dum kantas via fero  
vorton plenan de lum', de grand', de vero  
per parolo fekunde poezia.

El via ruĝ' brulanta,  
el viaĵo kaj nigrec' malklarsaj,  
ekbrilojn ĉerpas sun' de gemoj karaĵ  
fanditaj pro la varm' de kis' flamanta.

Kaj vi tiel la horon glorie diras  
indan esti kantata!...

je kiu nokt' sopiras,  
kiam volas spirit' : la hor' revata  
kiel esprimo vibra, perceptebla,  
de la horo benata, kiam skuas  
suno vivon de Hom' kaj lin instruas  
belparoli pri Ĉio Nedirebla...

*Originale verkis* MAOI MORERA I GALICIA

*El kataluna lingvo tradukis* JOSEF GRAU CASAS



Ĉe la fino aŭtigas granda aplaŭdego kaj oni petas por honorigi la ĉeestantan aŭtoron, S-ro Morera i Galicia, ke oni legu la katalunan originalon, kion faras S-ro Grau, vekante novan ovacion al la aŭtoro kaj tradukinto.

Ok verkojn ni ricevis por la ordinara temo, versaĵo pri amo; ilia ĝenerala valoro ne estas tre granda.

En la verkoj n.<sup>o</sup> 15 kaj 25 la konsonanco uzigas al la aŭtoroj troajn suflisajn rimojn kaj iafaje vortojn, kiuj malbone efektas pro sia ne adekvata, tro elasta figura senco; pro sama kaŭzo ĉe la verko n.<sup>o</sup> 16 estas forigataj adjektivaj kaj akuzativaj finiĝoj. Mi preparolas pri tiuj verkoj, ĉar ŝajne iliaj aŭtoroj post serioza studo de la esperanta poezio estos kapablaj verki bonajn versaĵojn en nia lingvo.

Altris do, la atenton de la Juĝantaro nur la verko n.<sup>o</sup> 45 kun devizo *Kio estas la vivo sen amo?* kaj oni aljuĝis al ĝi la premion. Ĝi estas poezio verkita en *versadeĥoj*, hispana versa formo en kiu ĉiu *versadeĥo* havas nur du rimojn, kies versoj estas oksilabaj. Tiu formo estas hodiaŭ malmulte uzata, eble pro sia malmulta simpleco, malgraŭ kio la aŭtoro bone sukcesis; la tria strofo estas vere rimarkinda. Ĝia aŭtoro estas S-ro **Artur Domenech Mas**, el Barcelona.

La ricevitaj prozaĵoj pritraktantaj Amon havas valoron pli atentindan; la Juĝantaro elektis du el ili, n.<sup>o</sup> 5 devizita *Judas iri sangopage al la land' de l' idealo* kaj n.<sup>o</sup> 3 kun devizo *Kiel etendiĝita pava vosto*, kiel la plej bonajn. Rezultato de la opinioj de la juĝantoj estis aljuĝi la premion al la unua citita, tial ke ĝia temo estas pli persone pritraktita kaj la aŭtoro scias elvoki ĉarman vizion bele pentritan, kvalito kiu ne aperas en la laste citita; en ili ambaŭ estas samvalora la eleganteco de la stilo. Aŭtoro de la verko premiita esta S-ro **Miquel de Sa Côt**.

Estas difinita subpremio al la alia verko, kies aŭtoro estas ankaŭ S-ro **Miquel de Sa Côt**.

Multajn tradukojn de «*Agonias*», la rakonto de Jaume Massó i Torrents, ni ricevis kaj kvankam eĉ en la malplej bona oni povus trovi frazojn rimarkinde bone tradukitajn kaj en la plej bona, aliajn neĝustajn tradukojn, la Juĝantaro opinias ke la verko n.<sup>o</sup> 17 devizo *Estas tradukado, plej bona ŝercado*, verkita per flua stilo, estas la plej ĝusta traduko kaj aljuĝas al ĝi la premion. Ĝia aŭtoro estas S-ro **Artur Torné Turull**, el Barcelona.

Unua subpremio estas difinita al la verko n.<sup>o</sup> 7 devizo *Se havus mi forton kaj spiron de l' vento*, kies aŭtoro estas S-ro Marián Solà Montserrat, el Terrassa.

Dua subpremio, al la verko n.<sup>o</sup> 44 devizita *A ŝtuno*, kiu komenciĝas «En miaj knabotempoj...» Estas ĝiaj aŭtoroj S-roj Pere Navas kaj Palmiro Guilleumot, el Barcelona.

*Eksterordinaraj temoj.* La temo proponita de l' «Ateneo» de Vilanova i Geltrú, «*Esperanta gvidlibro de Vilanova kaj ĉirkaŭaĵo*», estas malfeliĉe nekonsursita.

Por la temo, kiun proponis *Laboro Esperanta* de Vilanova i Geltrú, verki mallongan bibliografian kritikon kaj traduki el la verkaro de Manuel de Cabanyes la verkon «A...» kaj fragmenton de «La Independencia de la Poesias», ni ricevis

unu verkon indan je la premio; ĝi estas la n.º 14 devizita *En la duob ambau*. Pligrandigas la meriton de la verko la fakto, ke la tradukinto prezentis ankaŭ bonan tradukon de alia versaĵo same titolita «A...». La mallonga bibliografio akompananta la tradukaĵojn estas tre interesa kaj ĝi enhavas tradukon de kelkaj strofoj el la plej karakterizaj de Cabanyes. Aŭtoro S-ro **Josep Grau Casas**.

Estas proponita premio de la «Centro Democrático Federalista» de Vilanova i Geltrú al la plej bona traduko de la artikolo «El Sistema Federal» de Pi i Margall kaj diversajn bonajn tradukojn ni ricevis konkurantajn al tiu premio.

La Juĝantaro premiis la verkon n.º 19 devizita *Liberaco sen ordo, ne estas liberaco*, kies aŭtoro konservas preskaŭ la samajn vortojn kaj frazojn de la originalo. Verkita de S-ro **Artur Torné Turull**.

Unuan subpremion la Juĝantaro aljuĝis al la verko n.º 1 devizita *Suavejo*, en kiu estas konservata tre bone la senco de la originalo, sed la vortoj ne tiel fidele korespondas. Estas aŭtoro S-ro **Marián Solá Montserrat**.

Estas ankaŭ distinginda kaj ricevas duan subpremion la n.º 11, devizo *Ni*, kies aŭtoro estas S-roj **Daniel Martí, Manuel Mas, Pere Pascual kaj Magí Soler**, el Vilanova i Geltrú.

La temo proponita de Lia Urbeŝtra Moŝto, S-ro **Joan Braquer**, traduko en prozo de la komedio de F. de S. Vidal «Una noia com un sol» restis nekonskursita.

Grandan nombron da verkoj celis la premiojn difinitajn por laŭvolaj temoj. Traesplorigite la verkojn, la Juĝantaro decidis ilin premi jene:

Premio de Lia Moŝto S-ro **Josep Bertrán i Musitu** al la verko n.º 26 kun devizo *Per aspera ad astra*, originala rakonto, verkita per flua stilo, kiu agrable konservas la atenton kaj scivolemon de la leganto. Ĝia aŭtoro estas: S-ro **Bruno Migliorini**, el Venezia (Italujo).

Premio de Lia Moŝto S-ro **Eduard Micó** al la verko n.º 46 devizita *Non bis in idem*, belaj strofoj laŭ la hispana formo nomata *sekvililjoj*; ĝi estas sepversa strofo, kiun konsistigas verskaro, kies dua kaj kvara versoj estas kvinsilabaj kaj asonancas; la unua kaj tria, sepsilabaj kaj senrimaj, kaj verŝtrie kun la unua kaj tria versoj kvinsilabaj ankaŭ duonrimantaj kaj la dua verso sepsilaba, senrima.

Permesu al mi, okaze, diri nun kelkajn vortojn pri la asonanca rimo. En Esperanto estas sentata la malriĉeco de perfektaj rimoj kaj tial, bonaj tre konataj poetoj proponis kaj uzis la radikajn rimojn, en kiuj nur rimas la radikoj, ne la finaĵoj, sed ili ofte ŝajnas kvazaŭ nerimoj, kiel *geus-ventos*.

Tial ke la klareco de la esperantaj vokaloj permesas aŭdi senkonfuzo ilian saman sonon, kiel en la kastila kaj kataluna lingvoj, kial ne enkonduki en la poezion esperantan la asonanon aŭ duonrimon, tio estas, la vokala rimo? Al ĉiuj esperantistaj poetoj sed precipe al la hispanaj mi adresas la demandojn, kvankam mi devas konstati ke kelkaj, inter kiuj S-ro **Inglada**, jam ĝin uzis.

La aŭtoro de la verko premiita estas S-ro **Artur Domenech Mas**.

Premio de Lia Moŝto S-ro **Josep M.º Bassols** al la verko n.º 23, *De unu ĝis alia paluso, Esperantujo*, ĉarma ama rakonto kies korekteco faras ĝin tre ŝatinda. Aŭtoro S-ro **Francesco Pizzi**, el Venezia (Italujo).

Premio de Lia Moŝto S-ro Pau Alegre Batet al verko n.º 38 kun devizo *Justeco*, komenciganta «Antaŭ jaroj...» Kvankam la Juĝantaro ne estas konforma kun la ideoj entenataj de tiu verko, tamen konsiderinte ĝin kiel sciencan traktaton pri tre interesa temo, oni aljuĝas al ĝi la premion, kiel rekompenco al ĝia aŭtoro pro la longa studo, kiun li faris, kaj en la celo stimuli la inklinton al beletristika de la sciencaj traktatoj formo, kvankam en la verko studata ĝi ne estas ie tute perfekta. Estas ĝia aŭtoro S-ro **Willy Ledergerber**, el Zurich (Svisujo).

Celantan la premiojn por laŭvolaj tensoj ni ricevis la verkon n.º 42, tre premiindan sed jam premiltan en alia esperanta konkurso kaj tial eksigita en la nunaj Floraj Ludoj; ankaŭ la Juĝantaro eksigis la verkon n.º 34 pro la modececo de la temo pritraktita.

Unu verko celis la premion proponitan de Lia Moŝto S-ro Antoni Jansana por la temo: Esperanto kaj Militigo. Tial ke tiu verko, n.º 33 devizo *Tra deusa malflamo bruligas la celo*, estas interesa kaj verkita per korekta Esperanto, ĝi ricevas la premion. Aŭtoro S-ro **Umberto Toschi Porrini**, el Bologna (Italujo).

Post la datolimo por la akcepto de verkoj, ni ricevis alian pri la sama temo; la bela stilo kaj la grandnombraj detaloj, kiujn tiu verko enhavas, multe valorigas ĝin kaj bone montras la nunajn statojn kaj rolon de nia lingvo. Konsiderinte tiujn cirkonstancojn kaj kvalitojn, la Juĝantaro aljuĝas al ĝi Honoran Mencion. Estas ĝia aŭtoro S-ino **Marie Hankel**, el Dresden (Germanujo).

La premio de la «Biblioteka-Museo Balaguer» al la plej bona traduko de la versaĵo de Victor Balaguer «Un jorn de maig» estas aljuĝata al la verko n.º 8 devizita *Belaco*, bela traduko, kiu konservas rimon kaj ritmon de la originalo, verkita de S-ro **Marián Solá Montserrat**.

Ricevas subpremion la verko n.º 2, *Kaj vin aŭdos, kaj vin laŭdos*, ankaŭ tre bela traduko kun simila rimo de l' originalo, sed ne konservanta ĝian ritmon. Estas aŭtoro S-ro **Armengol Cavaller**, el Barcelona.

Estis proponata premio de *Sesmo* (A. E. P.) de Barcelona, al bona traduko de la poezio «Nit de Sang» de Jacinto Verdaguer. Ĉefa malfacilaĵo en la traduko de tiu versaĵo, konsistas en la sama alternu duonrimo, kiun en la tuta verko uzas la aŭtoro. La tradukinto, verkinta la n.º 4 kun devizo *Floro de malamo*, sciis venki tre bone tiun malfacilaĵon kaj al ĝia verko oni aljuĝas la premion. La aŭtoro estas S-ro **Josep Grau Casas**.

La temo proponita de S-ro Joan Amades, «Propaganda broŝuro por katalunoj, simila al la franca *vaga broŝuro*» kaj tiu proponita de la *Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj*, «Originala aŭ tradukita broŝuro pri pekatoj alia afero» restis bedaŭrinde nekonkursitaj.

Jen, sinjoroj, la fruktoj kiujn la arbo de niaj Floraj Ludoj donis la nunan jaron al la esperanta literaturo. Malgraŭ la malfavoraj cirkonstancoj, kiujn ni trapasas, alvenis, kiel estas dirite, diversaj verkoj el eksterlando. Ni dankas do, la esperantistajn gazetojn kaj la enlandajn ĵurnalojn publikigintajn la verdikton, kiuj per la diskonigo de nia konkurso tiel sukcesigis ĝin; ni dankas la verkistojn, ĉiujn sendistinge, ĉar ili per sia nobla laborado pligravigis kaj plifortigis nian literaturon, animo de ĉiu lingvo; ni dankas vin, karaĵ samideanoj, kiuj per laŭtaj aplaŭdoj akceptis la laureatojn, el kies verkoj estas al vi donita la unua ekgas-

tumo; al vi niar dankon, donacintoj de premioj, kiuj tiel malavare helpis nian laboron kaj ankaŭ al vi aŭtoritataj moŝtoj, kiuj per via ĉesto donis al nia festo tiel solenan karakteron.

Kiajn vortojn uzi por danki vin, ĉarma Reĝina Moŝto, ĝentilaj kortegaminoj? Miaj malriĉaj paroloj ne indas esti aldiritaj al vi, simbolo de la Beleco kaj la Poezio. Ĝi estas per nia koro kaj ne per niaj lipoj, kiel ni esprimas al vi nian profundan dankon por esti preziditaj de vi, ĝentilaj, ravaj fraŭlinoj.

Kaj nun samideanoj verkistoj, al vi ĉiuj, sed precipe al la katalunaj esperantistoj mi volas insiste, fervore peti, ke en la venontaj VI<sup>a</sup> Floraj Ludoj, vi konkuru per grava nombro da verkoj, grava pro la kvanto kaj kvalito, por ke kiam estos skribata la Historio de Esperanto tra la nunaj tempoj, oni povu diri ke ni laŭ niaj fortoj ne nur konservis kaj celis plifortikigi niajn instituciojn, sed laboris kun la samaj antaŭaj entuziasmo kaj fido, por doni kelkajn humilajn florojn al la lingvo de nia amo, por alporti kelkajn sablerojn al la estonta grandioza monumento de nia Literaturo.

ESTANISLAU PELLICER

Unu post alia la aŭtoroj premiitaj iris ricevi de manoj de la Reĝino siajn premiojn meze de la aplaŭdoj de la ĉeestantaro. La versaĵoj originalaj aŭ tradukitaj estis laŭte legataj, kaj meritis varman aplaŭdadon, kiu ankaŭ sonis longatempe; kiam la sekretario finis sian raporton. Tuj starigas D-ro Casanovas, kaj per elparolo sonora kaj milda legas sian jenan prezidantan paroladon.

*Reĝina Moŝto.*

*Ĝentilaj kortegaminoj.*

*Respektindaj Aŭtoritatuloj.*

*Sinjorinoj kaj Sinjoroj:*

Se mi scius plekti girlandon de belkoloraj floroj por kroni ĉi tiun feston de Amo kaj Poezio, se mi povus vin regali per delikataj esprimoj de Literaturo; se al vi ĉiuj, Majesta Reĝino, Belaj Princinoj kaj gesinjoraj moŝtoj, mi povus oferedoni la belajn bukedeĝn de la esperanta ĝardeno, nun mi ne bedaŭrus esti envicigita en ĉi-tiu prezida posteno, kvar fojojn antaŭe gardestarata de bravegaj pioniroj, kies nomoj, ĉie famaj, insiste ĉhas en miaj oreloj, kvazaŭ mi sentus ilian spiriton vagantan tra ĉi-tiu teatra enaero.

Konsciigante pri ilia kompetenteco, pri ilia hela inteligento, pri ilia belstila verkado kaj dirmaniero, mi min sentas devigata petegi de vi, honorindaj moŝtoj, pardonon kaj bonvolemon: pardonon, por la kulpa komplezemo de miaj tro afablaj kunjugintaj kolegoj, kiuj tiele min honorigis, forrabante al vi la ĝuon de majstraj literaruraĵoj, al kiuj vi estas kutimintaj de la antaŭaj Floraj Ludoj; bonvolemon, por mi, kiu vole nevole devas ĝeni vin per legado de sensuka kaj enuiga prozaĵo. Nur pro obeemo, nur pro la amo al nia karesita idealo povis rompiĝi mia rezisto al tiela honoro. Tial mi konfide kalkulas je via atento dum kelkaj minutoj, dum la mallonga efektivigo de mia tasko.

La unusaj pafegoj de la terura milito, kiu senkompatе buĉadas la malfeliĉan homaron, kvazaŭ per ensorĉa arto disigis nian X<sup>an</sup> Universalan Kongreson, kiam estis pretigitaj la lastaj klopodoj por atingi fine nian ravan idealon. Kiam ni jam ektuŝis per la mano la pordon de la pacaj regionoj, ĉio subite disigiĝis, ĉio kiel nebulo elfandiĝis pro eksplodado de tiu-ĉi vulkano de malamoj. Se la «Gaumont Palazzo» estus disfalinta ruine sur la esperantistaron tie kunvenantan, ne estus estinta tiel kruela la bato, kiu trafis la koron de nia Esperantujo. La spektro de la morto aperis tuj minacanta kun sia avidega faldilo meze de la eŭropa ĉielo, kaj timiga krizo invadis niajn esperantajn vicojn, tiel same kiel la aliajn fakojn de la homa aktiveco; ĉar ili, naskitaj de la amo, nur kreskas kaj disvolviĝas sub la beninda ombro de la paco.

Feliĉe, kiam subite elkrevis la popoloj sekve de la katastrofa militego, nia Esperantujo estis jam nealmilitebla fortikaĵo. Bonŝance, tiu arbo estis jam dika kaj firme enradikita, kaj la skuegoj de la milita uragano nur povis deŝiri kelkajn el ĝiaj folioj kaj branĉetoj. Ĉi-tio ja garantias al ni ĝian fortikan reberĝonadon, kiam, post tiu infera vintro de la milito, ekbrilos denove la ĉielarko de la paco sur la firmamento de la printempe vestita homaro.

La grandaj sociaj institucioj nur fariĝis vere grandaj kaj fortikaj post sia elpruvo kaj purigo en la fando de kontraŭeco. La starigo de l' kristanismo, la plej grava kaj vasta el ĉiuj, estas samtempe la plej admirinda celo de ĉiuspecaj kontraŭstaroj. Ĉiuj sociaj organizaĵoj tra la epokoj de la Historio, nur akiris sian firmecon per konstanta rezisto al tiaj batadoj...

Tion ja al ni instruas la Naturo mem. La grenkreskaĵoj kaj la arboj nur ekvivas kiam ilia semo estas suferinta porvivan krizon, detruigon, putriĝon interne de la sulkaj; sed tiam ili ĝermas kaj enradikiĝas, naskante gradece trunkon, branĉaron, foliojn, florojn kaj poste riĉan fruktaron. La granda esperantista institucio ne devas esti escepto de tiu unuforma kaj konstanta natura leĝo. Ĝi devas elpruvi sian viglecon, sian vivoforton.

Nu, sinjoroj, la vigleco de nia Esperantismo estas ja evidente elmontrita. Eble multaj pensas ke Esperanto estas rifuĝinta en neŭtralajn landojn. Sed ili tute malpravas; ĉar eĉ en la almitantaj nacioj oni publikigas revuojn, bultenojn kaj aliajn esperantaĵojn, uzante tiun idiomon por konatigi al la neŭtraloj la respektivajn rajtojn, laŭ sia patruja vidpunkto. Kaj estas rimarkinde ke el ĉiuj primilitaj skribaĵoj, la esperante verkitaĵ multo distingigiĝas pro sia mildeco kaj respektemo. Esperanto estas lingvo, kiu ne enkarniĝis al ia aparta gentaro, kaj pro tio ĝi ne akiris la viruson de malamoj, kiuj malpacigas popolojn kontraŭ popoloj.

Sed jen estas la plej palpebla kaj nekontraŭstarebla elpruvo de ĝia konkreta rajto stari en la rango de la civilizitaj lingvoj. Nia patra lando, kiu malfermis la vojon al la nobligo de nia kataluna idiomo per la kantoj de l' poetoj en literaturaj festoj de Amo kaj Beleco, sciis konduki majstre la internacian lingvon al plena sukceso. La Kongresoj de nia KATALUNA FEDERACIO kun siaj Floraj Ludoj estas kvazaŭ kampodomoj kun vastaj semejoj, kiuj naskas en ĉiu regiono kulturita abundan fruktaron de amo, paco kaj konkordo.

Ankaŭ niaj Floraj Ludoj estas efika injekto de esperantista vivo en la

maŝnan korpon socian de la homaro; ili estas nuntempe kiel belaj rozuj meze de preskaŭ elvelkita ĝardeno; ili estas gardestarejo de nia kara Esperantujo.

Tial ke Esperanto alproprigas al si la plej satindajn elementojn kaj ecojn de la naturaj lingvoj, oni flaras en la esperanta ĝardeno la aromojn kaj parfumojn de la lando, kie ĝi estas kulturita. Jen pro kio en Esperantujo reviviĝas niaj plej famaj literaturistoj. Rememoru la originalan poezion, kiu meritis la Naturan Floron en la esperantistaj Florludoj de Olot. En la trezorejon de la esperanta literaturo enmetis novan brilegan juvelon la distingindaj poetoj el ĉi-tiu nobla kaj gastema urbo, fratinoj Teresa kaj Eulalia Rossell, pere de kiuj reviviĝis, por riĉigi la esperantan beletristikon, la de viaj avoj samtempulo, al vi vere familia kaj de ĉiuj admirita poeto, filo ankaŭ de tiu-ĉi progresema urbo; la alsonita «Pindaro de Katalunujo»; «Poeto de poetoj» laŭ angla kritikisto; poeto de la vero, de la sincereco kaj de la spirita viroco; Poeto de la paco kaj de la justeco; la famkonata aŭtoro de *Preludios de mi ĉira*, la tiel junaĝe mortinta poeto S-ro Manuel de Cabanyes.

Laŭ diro de eleganta verkisto, Cabanyes estis kristana kavaliro armita per la kasko kaj la antikva kiraso, kiu alcelis liberigi el la tiraneco de la mensogo kaj malvirto la Belecon, fratino de la Vero. Li aperis kvazaŭ soleca geniulo, libera kaj originala en siaj temoj, pensoj kaj kunligado de ideoj. En la jaro 1833<sup>\*</sup> S-ro Manuel Jozefo Quintana salutis lin, kiel fondinton de la klasika skolo en Katalunujo.

Okaze de la premiita poezio de fratinoj Rossell, esperantista poeto<sup>1</sup> verkis esperante alian belan poezion kun la sama ritmo kaj rimo, kian li ĝentile dediĉis al la katalunoj, kiuj pere de la laŭdindaj poetoj el Vilanova elvekis la muzon de nia bedaŭrata Cabanyes, kaj alkondukis ĝin al la esperanta Parnaso.

Mi rimarkas ke mi fariĝas tre longa, kaj neniel mi volas vin tedi. Sed antaŭ ol fini mian humilan taskon, mi devas danki je la nomo de la Juĝinta komitato la honorindan Reĝinon kun ŝiaj akompanantinoj, kiuj alportis la gravan helpon de sia juneco, ĉarmo kaj beleco al nia kvina literatura konkurso; la indogajn aŭtoritatojn, kies apogo sindona antaŭcertigis tiunĉi belan sukceson; la poetojn kaj verkistojn partoprenintajn en la konkurso, premiitajn kaj nepremiitajn, kiuj ne nur sentigis al ni la ĝuon de esperanta beletristiko, sed ankaŭ aperigis elfloradon de novaj baldaŭ estontaj triumfoj.

Dankon al la organizintoj de tiu-ĉi sukcesa festego. Dankon ankaŭ al vi ĉiuj, kiuj per via tiel grandara alesto prezentigas al tiu-ĉi salono la aspekton de la plej gravaj soĉenaĵoj. Malgraŭ ke la plejmulto el vi ne konas la gramatikon de la internacia lingvo, tamen vi ĉiuj estas animitaj de ĝia spirito, kaj, kiel mi, sentas la varmon de nia idealo. Gratulon al vi, afablaj laletanoj, loĝantoj de tiu-ĉi gastema urbo, kiu senĉese spiradas la blovojn de kulturo, progreso kaj civilizacio de la latina maro. La historia Laleta, la moderna Vilanova estas patrio de eminentuloj, lulilo de la tie fama kaj glora Cabanyes, zorgema gastantino kaj kvazaŭ amatino de la eminenta historiisto kaj verkisto, kiu atestis sian

1. S-ro Ch. Brunet (Francoj).

amon al ĝi per donaco de la artega kaj enviinda, per lia propra nomo konita, Muzeo-Biblioteko Balaguer, la plej riĉa juvelo de via urbo. Al ĉiuj, do, saluton, dankon kaj gratulon!

Post la V<sup>a</sup> Universala Kongreso ĉe Barcelono, estis la industriema Sabadell, nia kataluna Manchester, la unua urbo en nia lando, kiu gastigis la partoprenintojn de la unua kongreso de K. E. F.

Dum la sekvantaj jaroj la ciklopaj muregoj de Tarragono; la industria lernejo de Terrasa, la vulkanaĵoj rokoj kaj la freŝaj fontoj de Olot, kaj la mara promenejo de Sant Feliu de Guixols aŭdis la kantojn de la novaj internaciaj poetoj, kaj fidele konstatadis la noblecon de la ideoj, kiuj allogas la tutmondan esperantistaron. De nun viaj aleoj, viaj placoj kaj monumentoj ĉe ripetados la belan kaj fratigan himnon, kiu estas ĝermo de nova amo, burĝono de nova vivo, kiu, greftita sur la malnovan trunkon de la latinlingvaj popoloj; interplektita kun la fortika branĉaro de la anglo-saksaj gentoj; kaj isokulante vigecon al la dekadencia slavismo, interrilatigos kaj kunfratigos la rasojn kaj la diversajn civilizaciojn, tiamaniere ke, helpante unu la alian, la popoloj efektivigos fine la belan sonĝon de l'homaro, konforme al la penso de nia lingva Majstro:

La popoloj faros en konsento  
Unu grandan rondon familion

D-RO JOSEF CASANOVAS, pastro

Nova aplaŭdado sonas post la parolado de la prezidanto, kaj sinjoro Urbestro eldiras la ritan frazon: La festo estas finita.

La Reĝino kaj la Ama Kortego forlasis la scenejon, kaj la samideanaro adiaŭnas ilin per kantado de «La Esperas, kiu sonas kiel triumfa himno, bele kronante la tre ĉarman feston, kiu efikas profunde, favore al nia ideo.

Post la Floraj Ludoj, la Reĝino regalís per lunĉo ĉe la Ateneo siajn korteganinojn, la laŭreatojn kaj la aŭtoritatulojn. Per sia afableco legis ĉiujn familioj Macià kaj Morera, kiuj tiel sciis honori siajn invititojn. Estu ĉi tie esprimata al ili la plej grandan dankoĉ, ne nur por tiu malavara regalo, sed ankaŭ kaj ĉefe por la helpo, kiun ili liveris al ni per la reputacio de siaj nomoj, kiuj restos kune kun la memoro de ĉiuj niaj festoj kongresaj.

## FERMA KUNSIDO

Je la sepa vespere ĝi komenciĝas en la Ateneo. Prezidas S-ro Grau, kiu donas la parolon al S-ro Josep Vidal, kiu nome de *Tarragono Esperanta* salutas la Kongreson.

Oni decidis unuanime sendi dokumenton de simpatio al D-ro Zamenhof.

La Kongreso elektas por la venonta la urbon Reus, kie samtempe kun la

VII<sup>a</sup> Kongreso de la K. E. F. okazos la 1<sup>a</sup> de la Hispana Konfederacio. S-ro Aguadé, prezidanto de la grupo *Nova Semo*, de Reus, dankas por tiu elekto kaj esprimas sian esperon, ke lia urbo gastigos festaron tiel sukcesan kiel la okazintaĵ. Per aplaŭdoj oni premias liajn vortojn.

S-ro Grau prezentas al la Kongreso resumon de la tasko farita de la Komitato kaj elokvente laŭdas ĝiajn membrojn, petante la kongresanojn, ke ili reelektu por la venonta jaro la saman komitaton, kiel justa premio al ĝia klopodo. Per aplaŭdoj entuziasma estas reelektita la antaŭa komitato, nome de kiu S-ro Balsells sincere dankas.

S-ro Puigali faras la peton, ke oni dediĉu al la prezidanto de la Kongreso varman aplaŭdadojn por lia lerta gvidado de la kongresaj taskoj, kiu tiel sukcesis, ke oni povis alpreni ĉiujn decidojn unuanime.

Post la ovacio, kiam starante la kongresanoj al li faras, S-ro Grau kortuŝite dankas, kaj petas ke oni ne forgesu la helpon, kiun la Kongreso ricevis de la parlamenta kaj provinca deputitoj por tiu distrikto, de la aŭtoritatuloj, de la diversaj societoj kaj gazetoj enurbaj, kaj ke oni danku ilin, esperante antaŭ saman senton al la organiza komitato, kiu tiel bone ĉion aranĝis sub prezido de S-ro Escofet por pli granda sukceso.

Kaj meze de grandaj aplaŭdoj oni fermas la Kongreson.

## SOLENA BALO

Post la vespermanĝo, je la deka horo komenciĝis en la societo «Fomento» la koncerto kaj balo organizitaj de tiu societo honore al la kongresanoj. Kvankam kelkaj el tiuj ĉi estis jam forveturintaj, restis sufiĉa nombro, kiu partoprenis en la brila festo. La plej distingindaj personoj de la urbo volis per sia ĉeesto montri kiom ili bedaŭras ke la kongresaj horoj tiel rapide forpasis, kaj pri tiu temo oni ĉie babiladis. La balo daŭris ĝis la dua nokte kaj ĝi lasis en ĉiuj neforgeseblan rememoron.

## Lundo, 18<sup>a</sup>

## LA POSTKONGRESO

Kvindeko da esperantistoj restis ankoraŭ en Vilanova: kelkaj el ili, Terrassa'anoj, veturis al Sitges per velboato kaj tial ne ĉeestis la interesajn vizitojn, kiujn oni faris matene al la Industria Lernejo, kie S-roj Crusat, Mestres kaj Suñé, la afablaj profesoroj, montris ĉion detale, kaj al la Biblioteko Muzeo Balaguer, kies riĉaĵojn oni admiris.

Je la dua posttagmeze oni forveturis vagonare al Sitges, kie ni renkontis la samideanojn boate veturintajn, kun kiuj ni faris viziton al la Urbodomo (kie ni lasis salutkarton al la Urbestro), kaj al la kurioza muzeo «Cau Ferrat». Promeninte tra la urbo kaj pozinte antaŭ nia

samideano Ullar, fotografisto, oni iris al la stacidomo, sur kies kajo adiaŭtis sin reciproke la samideanoj laste restantaj.

Al la ĝojo pri la sukceso, miksiĝis en ĉiu koro, ĉagreno forlasi la karajn amikojn, kun kiuj oni travivis belegajn momentojn, kaj tial ĉiu buŝo malfermiĝis en unu sola diro: «Adiaŭ! Ĝis la proksima en Reus».

Kaj pli ol unu ni vidis, kiuj ĉe rando de palpebroj kaŝis emocian perlon.

## RESUMO

La preparo de la Kongreso, eldono de propagandiloj, programoj, k. t. p., la paroladoj propagandaj okazintaj en la urbo, ne sukcesis tamen vekti la tutan loĝantaron al nia ideo. Ni renkontis nenium baron, sed la metio restis malvarma. Ĉe kelkaj personoj eĉ malfavora.

Sed, alvenis la unuaj vagonaroj, vidiĝis ĉiuloke nia verda stelo, plenigis la stratojn la kongresanoj, sciigis la urbo pri ilia nombro, kaj ŝajnis kvazaŭ varmigi la indiferenteco kaj degelus la glacio de malfavoro. Kiam la urbo sciis ke pli ol 300 gekongresanoj (*sen ia trograndiĝo*) el ĉiuj partoj de Katalunujo, kaj eĉ alilandaj, estis veturintaj al Vilanova, oni komprenis ke movado, kies celo ne estas la akiro de tuja materia profito, kondukanta al unu loko tiom da personoj, estas grava movado. Kaj ĉio estis al ni proponita kaj ĉiuj facilajoj estis al ni donitaj.

Oni ekvidis la Ekspozicion, oni sciis pri la ĉeesto de oficiala delegito de la Ministro de Instruado, oni ĉeestis la Florajn Ludojn, kie la sonoreco de nia lingvo konvinkis eĉ la plej skeptikajn, kaj la urbo estis jam gajnita al nia afero. La gazetoj publikigis vastajn raportojn, konataj personoj publike esprimis sian simpatian al nia ideo, multaj konfesis sian eraran antaŭjuĝon, kaj la organizintoj de la Kongreso, kiuj ifoje devis vole-nevole toleri neplaĉajn aludojn, ricevis la ĝeneralajn gratulojn.

Jen la efiko de la Kongresoj: ĉu la almito de unu urbo ĉiujare estus ebla sen la sindona kunagado ĉies, sen la kunigo de la individuaj fortoj? Per niaj kunvenoj ni preparas la kampon; per niaj entuziasmo kaj kuraĝo ni pretigas la semojn. Ĉu tiuj ĉi povos neflori, se ĉie oni profunde ellaborus la teron, kiel ĉe la urboj atestintaj pri nia forto? Ĝoju ni, katalunaj samideanoj! Ĝoju ni, ke, se ĝis nun nur en Katalunujo okazis similaj festoj, de post hodiaŭ per la kunigo de la ĉies fortoj en la Konfederacio, kiun ni ĵus starigis, ni povos helpi la almiton de aliaj urboj, kie ankoraŭ la sankta lukto por nia idealo ne povis venki la muregojn de indiferenteco.

Ĝoju ni! Ĝoju... kaj laboru! Vivu la helpa lingvo!

## SCIIGO PRI NIA MAJSTRO

El la oktobra numero de «La Holanda Pioniro» ni kopias:

«D-ro L. L. Zamenhof. — Kun ĝojo, ni fine povas ion komuniki pri la sorto de nia majstro kun sia familio. En Aŭgusto, kaj Septembro, nia administranto spertis ke tuta antaŭa Rusa Polujo, ne plu havas poŝttrafikon. Sendoj tra Ruslando kaj Germanujo por Polujo ambaŭ revenis kun la surskribo : neliverebla.

Lasta numero de «Germana Esperantisto» informas, ke D-ro Zamenhof kun sia edzino, malgraŭ la malfaciloj rezultintaj el la sieĝo kaj okupo de Varsovio, per la germanaj trupoj, restis en tiu urbo (nuna adreso ul. Krolewska 41) kaj troviĝas en bona sanstato. Kelkaj esperantistoj el la germana armeo vizitis ilin. Oni esperas, ke rekta interkomunikado baldaŭ realiĝos.

Esperu ni, ke D-ro Zamenhof ankoraŭ ĝisvivu plibonajn tempojn, en kiuj la popoloj por ĉiam interpaĉiĝos, al kio Esperanto multe povos kontribui. — J. L. BRUIJN.»



## GARANTIA KAPITALO DE K. E. F.

## LISTO DE GARANTIAŬTOJ

S-roj Josep Serrat, 50 ptoj.; Gaietà Balsells, 100; Antoni Cadorniu, 100; Josep Grau, 25; Josep Buyé, 5; Gustau Galceràn, 25; Josep Puiggali, 5; Artur Casas, 5; Mariàn Solà, 5; Manuel Bordas, 5; Pere Navas, 5; Antoni Viñals, 5; Jaume Grau, 5; Artur Torné, 10; Frederic Mensa, 10; Josep Boireu, 5; Daniel Martí, 5; Francisco Terradell, 5; Andreu Terradell, 5; J. Julivert, 10; J. Sole i Granell, 50; Jacinto Bremón, 50; pastro Josep Planas, 30; pastro Josep Casanovas, 15; Jacinto Figueras, 5; Josep Ventura, 10; Magi Soler 5; David Llop, 25; F-inoj Amalia Gili, 5; Mercè Gili, 5; pastro Antoni Ribas, 25.

Ĉiuj federacianoj estas invitataj subskribi la garantian kapitalon, kiu nur estos elspeszata en okazo de defcito.

## ENLANDA MOVADO

**BARCELONA.** — La 14<sup>ta</sup> de Aŭgusto okazis en la *Barcelona Hejmo de la K. E. F.* publika interdiskutado pri la temo «Ĉu la grupoj povus plintensigi sian propagandon?»; partoprenis en tiu interdiskutado anoj de la grupoj *Ĉiam Antaŭen*, *Barcelona Stelo*, *Supren*, k. a.

S-ro Joseph Vannier, franca esperantisto parolis la 21<sup>an</sup> de la sama monato pri la temo «Miaj spertoj pri la utileco de Esperanto en vojaĝo. De Germanujo Barcelonon». Li pruvis ankoraŭ unu fojon, kiom utila estas nia lingvo en ĉiu okazo.

La 28<sup>an</sup> de Aŭgusto oni faris specialan eksperimenton, kiu montris ke Esperanto estas vere literatura lingvo. Paragrafon en kastila lingvo tradukis france kaj germane S-ro Ledergerber, esperante kaj katalune S-ro Doménech. Tiujn kvar tradukojn retradukis al kastila lingvo, nekonante la originalan frazon, S-ro Soriano la francan, S-ro Berghänel la germanan, S-roj Guilleumot kaj Navas la katalunan kaj S-roj Guixá kaj Grau (Jaume) la esperantan. La rezultatoj estis tre bonaj, pro kio ĉiuj tradukintoj ricevis merititan aplaŭdon.

Nia svisa samideano S-ro Willy Ledergerber parolis la 18<sup>an</sup> de Septembro pri «La verkoj de Heine tradukitaj esperante. La parolado estis tre interesa kaj S-ro Ledergerber multe gratulata.

— La 25<sup>an</sup> de Septembro okazis festo en la teatro de «Escuela Práctica de Declamación» profite de la Hejmo. La amatoroj, lernantoj de la «Escuela» F-inoj Gimenez kaj Ruiz kaj S-roj Viñas, Giménez, Ociás, Gabandé, Rodríguez, Poch kaj Pradell bone ludis la komediojn «Sirena» kaj «Las dos joyas de la casa» inter kiuj estis bone prezentata, de niaj geamikoj F-inoj C. Leonor kaj M. Grau kaj S-roj J. Viñas, J. Delclós kaj W. Ledergerber, la bela komedio de S-ro W. van der Biest traduko de S-ro Gil «Amors esperantistes».

La festo finiĝis per dancado je la unuaj horoj matene. Ni dankas ĉiujn partoprenintojn, kiuj tiel sukcesigis la feston kaj speciale S-ran Viñas, kiu tiel bone aranĝis ĝin.

— Dum ilia restado en Barcelona vizitis la *Hejmon*, la entuziasma pioniro de Bilbao, S-ro Victor O. de Allende kaj lia distinginda edzino. Ankaŭ ni ricevis la viziton de S-ro Andrés Piñó, el Valencia, prezidanto de «*Federación Esperantista Leonés*». Estis por ni granda plezuro akcepti ilin kaj ni esperas ke ilia vojaĝo estos fruktodona por la organizo de l' esperantistoj hispanaj.

— La barcelonaj K. E. F.-anoj atente invititaj de la Urbeŝtaro ĉestis la 19<sup>an</sup> de Septembro la feston por la starigo de la unua ŝtono de la monumento al Pi i Margall. Sub la standardo de *Ĉiam Antaŭen* kuniris granda nombro da samideanoj, kiuj volis honori la eminentan viro, kiu antaŭ multaj jaroj laŭde parolis pri Esperanto. Dum la manifestacio, en kiu pli ol cent standardoj fliris en vento, nia verda altiris la ĝeneralan atenton.

— La kurso kiu klarigas D-ro Coll en la Universitato estas granda sukceso; ĉeestas en ĝi 45 lernantoj. Diversaj societoj neesperantistaj dankis la sendon de la afiŝo anoncanta tiun kurson.

— En la grupejo de *La Roso* S-ro Josep Grau parolis la 24<sup>ta</sup> de Oktobro pri la «Utileco de la internacia lingvo Esperanto» antaŭ kvindek da personoj. En tiu grupo estas malfermita kurso, kiu okazas lunde, merkrede kaj vendrede de post 9<sup>a</sup> vespere.

— La saman tagon vespere en la sidejo de *Nova Senŝo* S-ro Josep Grau faris paroladon antaŭ pli ol 300 laboristoj kaj lia laboro rezultis fruktodona, tial ke en la kurso malfermita en tiu grupo ĉeestas 40 lernantoj. Alparolis ankaŭ la ĉeestantojn S-ro Allende, el Bilbao, kiu resumis ĉion diritan de S-ro Grau. S-ro Guitart en nomo de la grupo dankis la parolintojn.

— Ankaŭ la 24<sup>ta</sup> de Oktobro D-ro Joaquim Coll parolis en la grupo *Paco kaj Amo* pri la temo «Al la homa frateco per Esperanto»; multajaj gratulojn ricevis la parolinto. Du kursoj estas klarigataj en la dirita grupo.

— En la grupo *Libera Stelo* parolis S-ro Josep Grau la 31<sup>a</sup> de Oktobro en la festo inaŭguranta la kursojn kaj antaŭ multenombra ĉeestantaro.

La sama grupo faris ekskurson la 19<sup>ta</sup> de Septembro, dum kiu oni vizitis la belajn ĝardenojn de Marti Codolar, kaj alian la 10<sup>ta</sup> de Oktobro por viziti la monaĥejon de St. Cugat del Vallés. Ili ankaŭ estis sukcesplenaj.

— La grupo *Barcelona Stelo* publikigis foliojn, kiuj certe multe helpos nian propagandon en ĝia kvartalo.

En tiu grupo, la 14<sup>ta</sup> de oktobro okazis la kursofinaj ekzamenoj. Tribunalon konsistigis S-roj Amades, Domenech, Guilleumot kaj Pellicer, profesoroj diplomitaj de K. E. F. Post brilaj pruvoj akiris ateston en la unua kurso: 1, F-ino Cinta Navas; 2, S-ro Manuel Sorolla; 3, S-ro Francisco Alfonso; F-inoj E. Pascual, Concepción Leonor, S-ro A. Coma. En la dua kurso: 1, S-ro Jaume Grau; 2, S-ro Enric Alba; 3, F-ino Rosa Cortés; 4, F-ino Angelina Leonor; S-roj Joan Coca, Bernabé Mira, Pere Llisteras.

La sama grupo organizis lunĉon, kiu okazis la 13<sup>ta</sup> de Novembro, honore al S-ro Grau gajninto de la Natura Floro, kaj al S-roj Domenech, Navas kaj Guilleumot, laŭreatoj en la konkurso. 85 ĝeĉeestantoj briligis la feston, kiun S-ro Rey nome de la grupo dediĉis al S-ro Grau. Post li elokvente testis, jen esperante, jen katalune, S-roj Domenech, Serrat, Mesa, de *Nova Senŝo*; Salvat de *La Roso*; Blanch, de *Esperanto kaj Patrujo*; Navas; Bordas, de *Semo*; Campdelaereu, Sararach, Turón; Hoetas, de *Fervojistoj Stelo*; Piñó, de «*Federación Esperantista Levantina*»; kaj Grau. Estis legataj multaj versaĵoj esperantaj, kaj la festo finiĝis per balo.

— La 9<sup>ta</sup> de Oktobro, ĉe la «Unión Ferroviaria, S. C.» antaŭ pli ol 100 fervojistoj S-ro Josep Grau faris propagandan paroladon por prepari la malfermon de kurso de Esperanto, kiun tie klarigas S-ro Domenech ĉiutage. Estas granda entuziasmo inter la fervojistoj, al kio kontribuis multe la artikoloj aperintaj en la *Bulteno* de la dirita Asocio. La fervojistoj de «Unión Ferroviaria, Sección Norte» turnis sin al siaj kamaradoj de *Fervojistoj Stelo* petante de ili permeson ĉeesti iliajn kursojn.

**MIERAS.** — La ĉi-tiesaj samideanoj unuanime interkonsentis kaj fondis grupon *Esperanta Fervoro*, kies Komitato estas jene: *Prezidanto*, Jacinto Ribas; *Vicprezidanto*, S-ino Concepció Moret; *Sekretario*, Lluís J. Bover; *Vicsekretario*, S-ino Maria Ribas; *Kasisto*, F-ino Dolors Oliveras; *Kalendaristo*, Rafael Riera; *Bibliotekisto*, Tomás Ribas; *Bibliotekistino*, F-ino Nuria Teixidor; *Volondantinoj*, F-inoj Assumpta Busquets kaj Petronilla Riera. Tiu grupo aliĝis al K. E. F.

La 6<sup>ma</sup> de Oktobro en ĝia sidejo estis malfermata kurso kiun gvidas S-ro Lluís G. Bover. Aliĝis je la komenco 15 lernantoj, kaj nun la afero progresas. — *La Delegito*.

**PALMA DE MALLORCA.** — En la lasta kunsido okazinta ĉe *Esperantista Klubo Palma* oni elektis la jenan Direktantan Komitaton: *Prezidanto*: S-ro Narciso Bofill; *Vicprezidanto*, S-ro Juan Salom; *Sekretario*, S-ro Juan Mascaró; *Vicsekretario*, S-ro Juan Gil; *Kasisto*, S-ro Mateo A. Obrador; *Bibliotekisto*, S-ro Antonio Rámis; *Volondanto* 1.<sup>a</sup>, S-ro Juan Aguiló; *Volondanto* 2.<sup>a</sup>, S-ro Bernardo Rebassa; *Volondanto* 3.<sup>a</sup>, S-ro Francisco Barceló.

*Universala Esperanto Asocio* (U. E. A.) *Delegito*: S-ro Juan Aguiló, Mision, 4. *Vicdelegito*: S-ro Francisco Barceló, San Miguel, 142.

**TERRASA.** — La 12<sup>ma</sup> de Septembro okazis ĉe la kampodomo «Can Arnelles» granda ekskursifesto Esperantista organizita de la societoj *Aplec* kaj *Katolika Stelo* de Sabadell kaj *Lumon* de nia urbo.

Matene je la dekkuna horo, multaj veturiloj venis el ambaŭ urboj, plenaj de esperantistoj; ankaŭ venis kun ili samideanoj el Barbará del Vallés; la fiaro de la grupo *Aplec* kantis kelkajn esperantajn kantojn, kiujn ĝoje aplaudis la ĉeestantoj; poste oni dancis sardanojn kaj aliajn dancojn.

Je la unua posttagmeze, 91 kunmangantoj altablĝis, kaj dum la tuta tagmango regis eksterordinara gajeco.

Je la kvara, en bela kaj arta scenejo improvizita en la arbaro, samideanoj el la cititaj societoj ludis diversajn katalunajn kaj esperantajn komedietojn; dum la interaktoj oni faris multe da fotografajoj.

Poste oni forŝveligis aerostatojn, rice oni dancis kaj oni faris grupan fotografajon; je la sepa ĉiuj ekskursintoj disiris adiaŭhinte unuj la aliajn por reveturi hejmen kun granda kontenteco pro la sukceso de tia festo, kiu verŝajne okazos jam ĉiujare; oni kalkulas ke en ĝi ĉeestis pli ol 300 personoj.

«El Día Gráfico» kaj «Mundo Gráfico» publikigis klišojn el la festo kaj la urbaj ĵurnaloj longe raportis pri ĝi.

— La 2<sup>ma</sup> de Oktobro, je la deka vespere, en la salono de la societo «Juventud Terrasense» S-ro Josep Gran paroladis pri «La servoj faritaj de Esperanto dum la Granda Milito». La elokventa paroladinto estis tre multe aplaudata de la aŭskultantoj.

— La 5<sup>ma</sup> de Oktobro, oni malfermis en la grupo *Lumon* kurson de Esperanto, al kiu aliĝis 19 lernantoj, estontaj samideanoj. — *La Korespondanto*.

**VENDRELL.** — La nova komitato de *Fratesco* konsistas el la jenaj sinjoroj : *Prezidanto*, Antonio Julivert; *Sekretario*, Salvador Martorell; *Kasisto*, Josep Sanabre; *BilNietskisto*, Josep Vidal; *Voldonantoj*, F-inoj Beatriu Mercadé, Dolors Framon, Alberta Sanabre. En la lasta kunsido oni interkonsentis komenci la novajn klasojn por viroj dum la monato Oktobro, Oni klopodas ankaŭ aranĝi la novajn kursojn por fraŭlinoj. Nia diligenta samideano S-ro Francisko Guitart estis nomita Delegito de U. E. A. — *Korespondanto*.

**VICH.** — Por la malfermo de kursoj *Vika Esperantistaro* eldonis bone verkitajn propagandajn foliojn, kiujn oni dissendis en ĉiu ekzemplero de la du urbaj gazetoj.

La 7<sup>ma</sup> de Novembro, en la «Círcol Literari» antaŭ distinginda ĉeestantaro S-ro Josep Grau faris paroladon pri la nuna stato de Esperanto, kiu havigis al li multajn gratulojn, pro la efiko de la argumentoj montritaj.

**VILANOVA I GELTRÚ.** — Dum la preparo de la VI Kongreso okazis en nia urbo du propagandaj paroladoj en la sidejoj de la «Centro Democrático Federalista» kaj «Círcol Catòlic».

Faris la unuan S-ro Josep Grau la 26<sup>ma</sup> de Septembro kaj en la dua D-ro Joaquim Coll parolis la 3<sup>ma</sup> de Oktobro pri «Esperanto en la Sociologio» kaj li sciis interesi la tutan ĉeestantaron.

— La enurba literatura revuo «Themis» publikigis en du numeroj la unuan tradukon al kataluna lingvo de la verkoj de Rabindra Nath Tagore. La belan tradukon de «La Kabulano» oni ŝuldas al S-ro Josep Grau.

**GAZETARO KAJ ESPERANTO : VILANOVA I GELTRÚ.** — *Boletín del Ateneo* estas plene dediĉita al nia Kongreso. Ĝi publikigas ĝian programon, propagandan artikolon de S-ro Grau, opiniojn de Tolstoj, Reclus, Pi i Margall, kaj notetojn pri nia movado.

*Diario de Villanueva y Geltrú* aperigis multege da antaŭsciigoj pri la Kongreso, plenan raporton pri ĉiuj festoj, artikolon favoran al la enkonduko de Esp. inter la diplomatojn kaj sciigojn pri propaganda ekspozicio.

*La Defensa.* Aperigis detalan programon de la parolado, kiu faris D-ro Coll ĉe «Círcol Catòlic», multajn antaŭsciigojn kaj longan raporton pri la Kongreso.

*Democracia.* Publikigis artikolon favoran, raporton pri la parolado de S-ro Grau en la «C. Democrático Federalista» kaj vastan raporton kongresan.

**BARCELONA.** — *El Día Gráfico* publikigis du belajn fotografaĵojn el la Kongreso. *Ilustració Catalana* tutan grandan paĝon kun bildoj el la Kongreso. Raporton pri la Kongreso publikigis *La Nació*, *La Vanguardia*, *El Poble Català* kaj *Las Noticias*. Ankaŭ raportis *Foment* (Reus), kaj *El Norte* (Girona), kiu aperigis kvar artikolojn pri la Kongreso.

*El Faro del Llobregat* (Sant Feliu) aperigis artikolon propagandan de S-ro Pere Domènech.

La tutan verdikton de la Floraj Ludoj aperigis : *La Veu de Catalunya*, *El Poble Català* (Barcelona); *La Almudaina* (Palma de Mallorca); *La Reforma*, *Bages Ciutat* (Manresa); *Germanor* (Palafrugell); *Foment*, *Las Circunstancias* kaj *Diario de Reus*.

Raportoj pri propagandaj paroladoj aperis sur *La Unión Ferroviaria*, (Barcelona); *Ausetania* kaj *Gazeta de Vich*.



## OFICIALA PARTO

En la Barcelona Hejmo havis lokon, la 3<sup>ma</sup> Oktobro, Komitata kunsido.

Oni sciigis ke la fabrikisto de l' insigno de la K. E. F., S-ro Daniel Torrent, akceptis la proponon kiun la Komitato decidis fari en lasta kunsido.

Oni alprenis la jenajn decidojn:

Permesi ke en la ekzamenoj okazontaj en la grupo *Barcelona Stelo* la 14<sup>ma</sup> nunmonate, oni povu liveri diplomojn de Lernado de la K. E. F.; Sendi komunikaĵojn invitantajn la grupojn nealiĝintajn al nia organizacio, eniri en ĝin; Sendi komunikaĵojn ankaŭ al la ekzistantaj hispanaj federacioj kaj ĉefaj grupoj petante ilin sendi reprezentanton al nia proksima VI<sup>a</sup> Kongreso en Vilanova por pretrakti la aferon pri la Konfederacio; Aprobi la bilancon prezentitan de la Kasisto kaj Administristo; Aprobi la oficialan programon de la VI<sup>a</sup> Kongreso kaj la financon raporton, kiun prezentis la Komisiono tiucele elektita en la Kongreso de S. Feliu; Proponi en la Kongreso de Vilanova la transŝanĝon de la socia sidejo de la K. E. F., el Sabadell en la Barcelonan Hejmon pro internaj bezonoj; Aprobi la artikolon aperintan en n.<sup>o</sup> 9 de «K. E.» pri la Iberia Konfederacio, kiel normon por ĝia fondiĝo; Prezenti al la aprobo de la proksima Kongreso, formi Mutualan Esperantistan Asocion, kiel sekcion de la K. E. F., kies celo estas helpi ĉiujn federaciaĵojn asociiĝintajn, en okazo de malsano. — *La Sekretario*, JOSEF VENTURA.



## EL REDAKCIO

Niaj kunasocianoj, kiuj senpacience atendis la aperon de tiu numero, traleginte ĝin certe komprenos, kial ĝi ne aperis tuj post la Kongreso. La preparo kaj oedigo de ĝia materialo postulis grandan laboron. Ni esperas, ke oni bone ŝatos la klopodon de la Redakcio, ĝin bone prezenti kun kompletaj raportoj kaj diversaj ilustraĵoj.

La sekvanta numero aperos ĉirkaŭ la 20<sup>a</sup> de decembro : ĝi entenas krom la anoncitaĵojn, «Tabelon de enhavo» de la nuna jarkolekto.

Ĉiu membro de la *Kataluna Esperantista Federacio*, aŭ aboninto al KATALUNA ESPERANTISTO rajtos unufoje dum la jaro publikigi malgrandan anonceton, kiu senpage aperos ankaŭ sur *Amerika Esperantisto*

Deziras korespondadon :

- S-ro Rag Costelli Leone, Corso Vitt. Em. II, N. 3b, Padova (Italujo)  
D-ro A. A. Jones, 1810 Jefferson st., Philadelphia, Pa. (Usono).  
S-ro J. T. Garland, 125 No. 14th st., Omaha, Nebr. (Usono).  
S-ro F. W. Spencer, Blackloom, B. C. (Kanado).  
S-ro René Pitois, 162, rue Menilmontant, Paris (Francujo).  
S-ro H. M. Torrey, P. O. Flint, Mich. (Usono).  
S-ro P. At. Kolev, 46, str. Regentska, Sofia (Bulgario). Pri kulturado de abeloj, kokoj, kunikoj, k. t. p.  
S-ro Vicente Garcia, str. Valle, 9, Terrassa (Barcelono).  
S-ro Enric Alberich, str. Bastard, 3, Terrassa (Barcelono).  
S-ro F. Sagrera Cendra, Palafrugell (Gerona).  
S-ro J. Llavià, Padró Petit, 3, Palafrugell (Gerona).  
S-ro Jesús Ramírez, Martín de Vargas, 15, 2, Madrid.  
S-ro Josep Oró, Sant Vicens de Torelló (Barcelono).  
La grupanoj de Fervoĵista Stelo, Princessa, 50, Barcelono.  
S-ro Jaume Vilalta, Pl. Catalunya, 6, Reus (Tarragona).

Deziras interŝanĝi markojn :

- S-ro J. W. Andrews, 630 Moro st., Manhattan, Kans. (Usono).  
S-ro M. Sorolla Sánchez, str. Tantarantana, 11, 2.º, Barcelono.

# QVADERNS D'ESTVDI

Revista dedicada especialment a Mestres i Professors

Publicació mensual del Consell d'Investigació Pedagògica de la Diputació de Barcelona sota els auspicis de la MANCOMUNITAT DE CATALUNYA

Preus de subscripció anual

Catalunya, València i Mallorca.	4 pessetes
Reste d'Espanya . . . . .	5 " "
Estranger . . . . .	5 francs

Número solt : 50 cèntims

Se distribuiràn gratuïtament a tots els mestres oficials de Catalunya i a tots els professors de Centres d'Ensenyança sostinguts per la Diputació

---

## KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA OFICIALA PREDORGANO DE

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

KAJ DE BASKA ESPERANTA FEDERACIO

Redakcio kaj Administracio : Palla, 8. praĵ. : Barcelona

Unu el la plej elegantaj gazetoj. — Tute verkita per korekta Esperanto. — Kun la konstanta kunlaborado de membroj de la Lingva Komitato. — La sola aperanta en Hispanujo. — Kelke da numeroj ĉiujare kun ilustraĵoj

**Interesa enlande kaj eksterlande**

Propagandaj artikoloj. — Belaj literaturaĵoj. — Bonaj versaĵoj, originalaj aŭ tradukitaj. — Regularo, temoj kaj premioj de la ĉiujaraj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ (Literatura Konkurso) — Recenzoj pri novaj verkoj. — Sciigoj pri enlanda movado, k. t. p., k. t. p.

JARABONO : Enlande, 4 pesetoj; Eksterlande, 2,400 spesmitoj

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA PRESORGANO

DE LA



JARO VI<sup>a</sup> : DECEMBRO 1915

# REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO DE "KATALUNA ESPERANTISTO"

== PALLA, 8, PRINCIPAL : BARCELONA ==

*Honora Direktoro* : FRED. PUJULÀ

<i>Direktoro</i> . . . . .	JOSEP GRAU
<i>Redakcia sekretario</i> . . . . .	ESTANESLAU PELLICER
<i>Redaktoroj</i> . . . . .	ARTUR DOMENECH JOSEP VENTURA
<i>Administristo</i> . . . . .	JOSEP SERRAT
<i>Administracia sekretario</i> . . . . .	JOAN AMADES

## KUNLABORANTOJ

Narcís BOFILL (Palma de Mallorca).—Manuel BORDAS (Barcelona).—D-ro Jacinto BREMÓN (Barcelona).—D-ro Josep CASANOVAS (Girona).—D-ro Joaquim COLL (Barcelona).—Delfi DALMAU (Bahía Blanca, Rep. Argentina).—Victor O. DE ALLENDE (Bilbao).—Josep DOMENECH (Reus).—Gustau GALCERÁN (Vilanova i Geltrú).—Joan GILI (Barcelona).—A. NOVEJARQUE (Valencia).—Pastro Josep PLANAS (Barbarà del Vallès).—Joan ROSALS (Barcelona).—Eulalia ROSELL, Teresa ROSELL (Vilanova i Geltrú).—Josep ROSSELLÓ (Sant Joan, Mallorca).

## KORESPONDANTOJ

B. Castells (*Andrats, Mallorca*).—J. Feliu Sureda (*Anglès*).—A. Romagosa (*Arbós del Penadés*).—P. Avellana (*Argelaguer*).—P-tro M. Pamies (*Argenteva*).—J. Armengol (*Armentera*).—R. Teixidó (*Badalona*).—J. Aulina (*Banyoles*).—J. Carçona (*Berga*).—F. Rubinat (*Borges Blanques*).—J. Jané (*Calafell*).—F. Barberó (*Flaç*).—G. Menéndez (*Gijón*).—A. Mosella (*Igualada*).—B. Nogué (*Manlleu*).—J. Albagés (*Mauressa*).—P. Domenech (*Marbóvell*).—R. Riera (*Misras*).—Ll. Santacana (*Molins de Rei*).—J. Vilà (*Olar*).—F. Sagrera (*Palafregell*).—P-tro Tomás Alsina (*Prades*).—P. Llopart (*Queralt*).—E. Agudé (*Reus*).—P. Solanas (*Rubi*).—R. Martorell (*Sabadell*).—E. Pressas (*Sant Feliu de Guixols*).—J. Rosal (*Sant Joan Les Fonts*).—P. Costa (*Santa Coloma de Perxés*).—J. Girona (*Selva del Camp*).—J. Vidal (*Tarragona*).—M. Solà (*Terrassa*).—F. M. Brú (*Tivissa*).—F. Guitart (*Vendrell*).—R-do P. Plana (*Ventalló*).—P-tro Antòn Ribas (*Vich*).—A. Robreño (*Vilafraanca del Penadés*).

Nia devino: *Mars estas galara*

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

KAJ DE Baska Esperanta Federacio

Redakcio kaj Administracio:

Palla, 8, principal: Barcelono

## Kuraĝige

**S**UB la titolo *Likvidiĝo de la idista movado* la laste ricevita numero de nia kara kolego «La Ondo de Esperanto» kunigas du leterojn, kiujn ni estis legintaj sur la citotaj gazetoj. Ni publikigas tiujn leterojn, kvankam Ido ne progresis ĉe ni, por montri unu fojon ankoraŭ ke Esperanto estas la plej perfekta el la lingvosistemoj internacie *uzebĵaj*, kaj ke ĝi estas la sola internacie *uzata* malgraŭ la apero de multaj aliaj artaj lingvoj, trokuraĝe, se ne tronaive, proponitaj por solvi la problemon, praktike solvitan jam de Esperanto.

En la ĵurnalo «Brazila Esperantisto» estas presita jena letero:

«S. Feliciano (Rio Grande do Sul), 1-8-15.

Estimataj samideanoj de la Redakcio de «Brazila Esperantisto»!

Kiel vi scias, Ido altiris mian simpatian, kaj mi decidis propagandi ĝin, konjektante, ke tiel mi laboros por «la plej bona lingvo internacia».

La senĉesaj atakoj de la Idistaj ĉefoj kontraŭ la respektinda D-ro Zamenhof, la ĉiam plimultiĝantaj kaj praktike neutilaj ŝanĝoj, kiujn la Idista Akademio enkondukis en la sistemon, kaj la lingvistikaj laboroj de S-ro René de Saussure kaj aliaj scienculoj konvinkis min, tamen, ke mi estas en erara vojo, ke la plibonigoj, prezentitaj de Ido, estas nur ŝajnaj, kaj ke Esperanto taŭgas vere multe pli bone por la rolo de lingvo internacia. Tial mi detruis la restantajn ekzemplerojn de mia gramatiko kaj vortareto de Ido, kaj refariĝas ano de l'Esperantistaro, pri kio mi jam sciigis la malmultajn personojn, kiujn mi estis iginta simp-

tiaj por Ido. (Se vi volas, vi povas publikigi tiun ĉi mian deklaron). — Salutas vin kore, *Françisco Valdoswiro Lorenz.*

En la ĵurnalo «Amerika Esperantisto» estas presita letero de alia idistoj: «*Mia reiro al Esperanto.*» — En decembro 1908 (mi tiam estis la prezidanto de la *Pennsylvania Esperanto Association*, ankaŭ la prezidanto de la *Philadelphia Esperanto Society*) mi lasis la esperantan movadon, fariĝis idisto kaj forte batalis por reformoj. Ŝajnis al mi, ke la Akademio arbitre rifuzas atenti la fortajn demandojn pri la (laŭ mi) necesaj reformoj; kaj mi opiniis, ke la sola metodo por atingi tiajn reformojn estas per *Ido*.

Mia motivo estis tute sincera. Mi tute ne deziris detrui, ne deziris malhelpi, nur deziris progresigi la ĝeneralan movadon; ĉar mi forte opiniis, ke *Ido* estas nur *Esperanto* simpligita. Mi opiniis, ke la movado estas, plejparte, ia specimeno de «amuzajo», kaj ke la ĝusta tempo fari plibonigojn estas antaŭ ol la movado fariĝus serioza, prefere ol poste.

En la komenco mi malŝatis la (laŭ mi) meĥanikajn neperfektaĵojn, la literojn supersignitajn, kiuj ŝajnis malhelpi la propagadon, speciale per la gazetaro (la amerikanoj, simile al la angloj, ne tute estimas la supersignojn eĉ en la aliaj naciaj lingvoj). Aliaj laŭdiraj neperfektaĵoj, la finaloj -aj, -oj, -uj, alvenis al mi pro mia antaŭjuĝo. Kaj, se mi tiam ne tute ŝatis la esperantajn vortformadon, tio ne estas pro mia lingvistika scio, ĉar mi estas nek lingvisto, nek gramatikisto. Alivorte, mi akceptis la *Idan* vortformadon, ĉar ĝi ŝajnis al mi forigi multajn (mi ripetas «laŭ mi») Esperantajn neperfektaĵojn; ŝajnis montri logikan sistemon, dum Esperanto aperis kvazaŭ ĝi ne havas — almenaŭ, ne ekspluatatas — ian sistemon. Alivorte, mi tiam ne tute komprenis la esperantan vortformadon. Tamen, rilate al ĉi tiu lasta, mi ricevis en aŭgusto 1914, pro la boneco de s-ro Saussure, ekzempleron de «*La Vort-Teorio en Esperanto*», kiu forigis miajn malfacilaĵojn.

Sed, kio okazis?

Kelkfoje, kiam mi revenis provizore al Esperanto, mi trovis, je mia miro, ke mi povis legi kaj skribi multe pli facile ol per *Ido*. Kial? Estas pro la diferenco inter la teoria kaj la praktika metodo! Estas la diferenco inter la sistemo tro rigida kaj la sistemo elasta! Mi trovis, ke ĉiu reformemulo havas sian propran ideon pri la plibonigoj; ke, se la Akademio akceptis iajn reformproponojn, tio multe plaĉis al la proponantoj; sed, se la Akademio decidis kontraŭ la proponantoj, ili tuj ekoleriĝis kaj laŭte sciigis la nekompetentecon de la Akademio, kaj ili aŭ aligis sin al alia movado, aŭ ekspluatatis siajn proprajn lingvojn.

Unu fojon mi laboris por Volapük, poste mi laboradis por Esperanto, kaj dum sep jaroj mi laboradis por *Ido*. Nun, kion ni havas? Ni vidu! El la reformaj interdisputoj naskiĝis: *Reform neutral, Adjuvilo, Interlingua, Romanaŭ, Europal, Perfectlinguo, Simplilinguo, Omnez, Lingvo kosmopolita, Veitlang, Nepo, Homapar*, ktp.

Dume, nenio estis atingebla! Miajn okulojn mi komencis malfermi al mi!

Post longa, zorga konsidero mi atingis la decidon reveni al *Esperanto* kaj denove stari sub la verda standardo, fariĝi konservemulo.

Same kiel je la komenco de la nuna militego, la samlandanoj forgesis siajn

interdisputojn kaj unuigis sin por defendi la patrujojn, tiel ni, reformemuloj, Idistoj, ĉesigu niajn interdisputojn kaj laboru konservi la vivon de la lingvo *Esperanto*, kiu neneigeble, estas la sola vivanta lingvo internacia; la reformojn ni lasu al la lingvistoj, la gramatikistoj, la logikistoj!

De nun mi akceptas la esperantan lingvon tia, kia ĝi estas, kaj mi forte laboros por la esperanta propagando!

Kiam la nuna militego ĉesos, tio estos la plej oportuna tempo por montri al la tuta mondo, ke per la lingvo internacia *Esperanto* estas la plej bona vojo al vera, ĉiamdaŭra paco. Venu! Laboru! — *Ward Nichols*. — 1306, Fitzwater Street, *Philadelphia*, Penna.

Al ĉi tiuj leteroj ni povas aldoni, ke la idista literaturo nun estas reprezentata de malgranda ĉiumonata okpage faldita folieto, nomata «Mondo». Redaktoro de ĉi tiu folieto, hezitante, ĉu li devas presigi sian «Jurnalono» en *Ido de Beaufront-Couturat*, aŭ en *Ido de Jean Barral* (*Ido de Ido*), ne povas trovi pli bonajn argumentojn kontraŭ *Esperanto*, krom la mensogo, ke nun la esperantistoj havas maksimume ok jurnalojn.

Kaj ni aldonas, por montri la malverecon de tiu aserto la liston de la interŝanĝe ricevitaj ekzempleroj de esperantaj gazetoj, kiuj estas publike legeblaj en la Biblioteko de la *Barcelona Hejmo de la K. E. F.*, str. Palla, 8 (Principal), en Barcelona:

*Oriente Azio*, Nov. 1915 (Japanujo). — *Germana Esperantisto*, eldonoj A kaj B., Nov. 1915 (Germanujo). — *Vegetarano*, Nov. 1915 (Holando). — *Amerika Esperantisto*, Nov. 1915 (Usono). — *Internacia Bulleno*, Nov. 1915 (Germanujo). — *Le Monde Espérantiste*, Nov. 1915 (Francujo). — *Esperanto*, (Nov. 1915. (Svisujo). — *La Ondo de Esperanto*, Nov. 1915 (Rusujo). — *La Verda Standardo*, Okt. 1915 (Hungarujo). — *L'Esperanto*, Jul. 1915 (Italujo). — *The British Esperantist*, Dec. 1915 (Anglujo). — *Brazila Esperantisto*, Jun. 1915 (Brazilujo). — *La Espero*, Jul. 1915 (Svedujo, Norvegujo). — *La Holanda Pioniro*, Okt. 1915 (Holando). — *Japana Esperantisto*, Sept. 1915 (Japanujo).

Ni konstata do, ke malgraŭ ĉiuj malhelpoj ni bone vivas, kaj eĉ pli bone, ol ni povis ĉe la komenco de la milito esperi. Ĉu ni bezonas ankoraŭ ion por ne senkuraĝiĝi?

---

**TABELON DE ENHAVO** de la 1915-jarkolekto de  
KATALUNA ESPERANTISTO ni donos en proksima numero

---

## XI<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto

*San Francisko (Kalifornio), 22-29 Aŭgusto 1915*

**L**A malfavoraj nunaj cirkonstancoj ne tute malhelpis la okazadon de la Dekunua Universala Kongreso, kiun tamen ĉestis, kompreneble, preskaŭ nur Usonanoj, kiuj partoprenis ankaŭ la VIII<sup>aa</sup> Usonan kongreson, samtempe okazintan. La Kongreso efektive komenciĝis la 23<sup>aa</sup> de Aŭgusto matene; la antaŭan tagon okazis la akcepto de kongresanoj kaj vizitoj al la interesajoj enurbaj.

La Kongreso en la Solena malferma kunsido, kiu okazis matene elektis prezidanto S-ron Robert Colquhoun, oficiala delegito de la skotlandaj esperantistoj kaj de la Komitato de la kongreso, kiu devus okazi en Edinburgo, Skotujo. Post la elekto de ceteraj estraranoj salutas la Kongreson multaj personoj, kaj oni legas salutleterojn de samideanoj el ĉiuj mondpartoj. Posttagmeze okazis labora kunsido de la usona nacia kongreso kaj vespere oni faris interesajn vizitojn.

La 24<sup>aa</sup> oni ekskursis al la monto Tamalpais, tra la belega golfo; oni vizitis observatorion kaj pasigis tre agrable la tutan tagon.

La 25<sup>aa</sup> havis lokon matene dua kunsido de la usona kongreso, kaj vespere okazis koncerto kaj prezentado de bela komedio «La perfekta kuiristino». Poste, kvin gesinjoroj partoprenis en la Oratora Konkurso, kies laŭreato estis S-ro Baker.

La 26<sup>aa</sup> matene oni okazigis la unuan laboran kunsidon de la universala kongreso. Estas legataj diversaj telegramoj kaj kablogramoj; raporto de S-ro Boirac, prezidanto de la Lingva Komitato, pri ties tasko; kaj raporto de Generalo Sebert pri la Konstanta Komitato de Kongresoj. Oni decidas sendi salutleteron al D-ro Zamenhof. Estas diskutate pri la reorganizo de esperanta vivo post la milito, pri enkonduko de Esperanto en lernejoj, kaj pri la rezultatoj ĉe tio jam atingitaj.

Posttagmeze, okazis festeno kun multaj tre entuziasmaj tostoĵoj, kaj poste faka kunveno de U. E. A.

La 27<sup>aa</sup> matene okazis la dua laborkunsido. Oni parolas pri la temo de antaŭa kunsido, kaj fine oni elektas por la venonta kongreso la urbon Kopenhago, kiu jam proponis sin por 1915. Oni bedaŭras ne povi komplezi la inviton de Annapolis (Maryland). Estas esprimitaj

dankoj al multaj asocioj kaj personoj helpintaj al la sukceso de la Kongreso. Okazis ankaŭ matene la ferma kunsido de la nacia usona kongreso.

Vespere, havis lokon propaganda kunveno antaŭ multenombra personaro. Multaj oratoroj parolis esperante kaj angle, kaj estis varbitaj al nia ideo influaj, eminentaj personoj.

La 28<sup>aa</sup> okazis la solena ferma kunsido. Reprezentanto de la Organiza Komitato de la Universala Ekspozicio dankis la esperantistojn por la okazigo de la Kongreso Universala kaj Nacia en San Francisco kaj donacis tri bronzaĵajn medalojn por rememoro al Esperanta Asocio Nord-Amerika, al la XI Universala Kongreso kaj al U. E. A.

La sekretario legis la titolojn kaj kelkajn ekstraktojn el la verkoj ricevitaj por la literatura konkurso, kiujn oni sendos tuj post la Kongreso al kompetenta juĝantaro. La rezultato de la Konkurso laŭ novembra numero de *Amerika Esperantisto*, estas jena:

UNUA KATEGORIO. Beletristika aŭ scienca verko originala : Nur du verkoj ricevitis; nenia premio aljuĝita.

DUA KATEGORIO. Prozaĵo originala aŭ tradukita, juĝita ne pro traduka merito, sed pro valoro de la rezultanta verko : UNUA PREMIO : *La Betulo ĥaj la Stelo*, rakonto de Zacharias Topelius (1818-1898), finna aŭtoro. Tradukita de S-ino Hilma Hall, Aggelby apud Helsingfors, Finnlando.

DUA PREMIO : *Tri Demandoj*, rakonto de L. Tolstoj. Tradukita de F-ino Anna Sarapov, Onex, pres Genevo, Svislando. (Tiu premion donas la Kopenhagaj Esperantistoj.)

La jenaj verkoj en la Dua Kategorio meritis honoran mencion : *Sipperio*, rakonto el «Koro» de E. de Amicis, tradukita de Bruno Migliorini, Venezia, Italujo; *La Fantomo Ebria*, rakonto de Prof. Arlo Bates, tradukita de Herbert Harris, Chicago; *Fabelo Serena*, ritma prozaĵo de Victor Català, tradukita de Josep Grau Casas, Barcelona, Katalunujo.

TRIA KATEGORIO. Versaĵo en samaj kondiĉoj de antaŭa kategorio : UNUA PREMIO : *La Viole*, poemo de Goethe (das Veilchen), tradukita de F-ino H. Boucon, Annecy, Francujo.

La jenaj verkoj en la Tria Kategorio meritis honoran mencion : *Kvar Viroj*, poeziaĵo de Sam Walter Foss, tradukita de Farnsworth Wright, Ravalli, Montana, Usono; *La Morto de la Floroj*, poeziaĵo de William Cullen Bryant, tradukita de Farnsworth Wright, Montana, Usono.

La juĝintoj estas : D-rino Ivy Kellerman Reed, S-ro E. C. Reed, D-ro Jas. Underhill.

La premiitaj verkoj aperos en *Amerika Esperantisto*, la oficiala organo de la Dek-Unua Kongreso. — D. E. PARRISH, Sek.

La 28 estis la Esperanto-Tago ĉe la Universala Ekspozicio, kaj la kongresanoj vizitadis kaj admiris la tre belajn konstruaĵojn.

Dum la Kongreso okazis ankaŭ krom jam citita kunveno de U. E. A. ankaŭ fakaj kunvenoj de liberpensuloj kaj de socialistoj.

La kongresanoj estis relative malmultenombraj, sed vere entuziasmaj, kaj la tasko, kiun ili plenumis, estas tial despli dankinda.

## VI<sup>a</sup> Internaciaj Floraj Ludoj

La Komitato de la VI INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ salutas la esperantistajn verkistojn, invitante ilin partopreni en la jenaj konkursoj.

### ORDINARAJ TEMOJ

#### Originalaj tekstoj

- I. Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II. Originala *ama* verko en prozo.

#### Tradukitaj tekstoj

- I. Traduko de la jena versaĵo:

#### EL PI DE FORMENTOR

Mon cor estima un arbre! Més vell que l'olivera,  
 més poderós que'l roure, més verd que'l taronger,  
 conserva de ses fulles l'eterna primavera,  
 i lluita amb les ventades que assalten la ribera  
 com un gegant guerrier.

No guaita per ses fulles la flor enamorada,  
 no va la fontanella ses ombres a besar;  
 mes Déu ungi d'aroma sa testa consagrada  
 i li donà per trona l'esquerpa serralada,  
 per font l'immensa mar.

Quan lluny, damunt les ones, renaix la llum divina,  
 no canta per ses branques l'ocell que encativam:  
 el crit sublim escolta de l'àguila marina,  
 o del voŭtor que passa sent l'ala gegantina  
 remoure son fullam.

Del lim d'aquesta terra sa vida no sustenta:  
 revincla per les roques la poderosa rei,  
 té pluges i rosades i vents i llum ardenta,  
 i, com un vell profeta, reb vida i s'alimenta  
 de les amors del cel.

Arbre sublim! Del geni n'és ell la viva imatge:  
 domina les muntanyes i aguaita l'infinit;  
 per ell la terra és dura, mes besa son ramatge  
 el cel, qui l'enamora, i té el llamp i l'oratge  
 per gloria i per delit.

Oh sí!... que, quan allore bramulen les ventades  
 i sembla entre l'escuma que tombi el seu penyal,  
 llavors ell riu i canta més fort que les onades  
 i, vencedor, espolsa damunt les nuvolades  
 sa cabellera real.

Arbre! mon cor t'enveja. Sobre la terra impura,  
 com a penyora santa, daré jo el teu record.  
 Lluitar constant i vèncer, reinat sobre l'altura  
 i alimentar-se i viure de cel i de llum pura...  
 oh vida! oh noble sort!

Amunt, ànima forta! Traspassa la boirada  
 i arreja dins l'altura com l'arbre dels penyals!  
 Veuràs caure a tes plantes la mar del món airada,  
 i tes cançons tranquiles 'niràn per la ventada  
 com l'au dels temporals.

MIGUEL COSTA LLOBERA

## II. Traduko de la jena prozaĵo:

### LA CIUTAT

Cada any, passat la Candelera, En Llorenç baixava a Barcelona a cobrar els rēdits d'un diner que tenia empleat en accions d'aquell carril que passava pel mig de la seva hisenda, d'aquell carril que a ell li semblava un llaurador que li treballés els dineros. Les màquines anaven fent goret per damunt de la via, els vagons eren els sembradors, i ell arreplegava la cullita. La llàstima era que hi hagués tants parcers en aquell negoci: els obligacionistes s'ho enduien gaire-bé tot.

Ja ho sabia En Llorenç que el tenir accions d'un carril moltes vegades vol dir ésser amo de ço que s'ha de pagar, i no li haurien pas embolicat en paperots de qualsevol altra empresa carrilaira; però aquell carril era el seu, cada matí les màquines li donaven el bon dia, els viatgers que els trens duïen qui sab aon, s'abocaven a les finestres dels vagons a contemplar aquelles terres tan ben conrades que cren l'orgull d'En Llorenç, i ell duia afeçte als trens, que mirava com a uns entrants de casa, i agrafia als viatgers que treguessin el cap a la finestra.

Aneu a saber si tots aquells homes i dones que corrien engaviats, a l'arribar a terme, en parlaven — als parents i coneguts — de la hisenda d'En Llorens...

Era una gran heretat i l'amo no hi planyia res. Cada any, al baixar a Barcelona a cobrar cupons, deixava a ciutat bona cosa dels diners que hi rebia. Des que, cap allà a l'abril, sortia l'anunci de ço que pel juliol donarien per guany de cada acció, ell començava a barrinar quina màquina nova li fóra de més bon servei. I ho anava rumiant, rumiant, i, quan ja ho tenia decidit, tornava a pensar-s'ho, i, quan ja ho havia ben pensat, ne parlava a la seva muller. I ella ho trobava encertat, i, pel febrer, cap a Barcelona, a comprar l'eina.

I a En Llorenç l'acompanyava sa filla gran : la Rosa.

Aquell viatge a ciutat era la il·lusió de la pageseta rica, la il·lusió covada tot un any. Des que arribava al poble, tornant de Barcelona, cada dia s'encantava a mirar les anades i vingudes dels trens, sempre amb el mateix gran desig que se l'enduguessin cap allà baix, cap aquella ciutat tan hermosa, on tot era moviment i alegria. Cada cop que el tren la tornava a casa, ella deia « reveure » a la ciutat amb les mateixes paraules : fins l'any que ve! I ho deia tota trista, i per a ella transcorrien tristament les setmanes i els mesos. Que n'era de llarg l'estiu per a la Rosa! Tots aquells barcelonins que compareixien al poble no feien sinó recordar-li la ciutat anyorada, i, tenint-los a ells aprop, li semblava que Barcelona era més lluny, li semblava que, com aquells forasters, les màquines podrien anar al poble, i el pare de la Rosa s'estalviaria viatges, i ella no podria tornar allà baix, allà on sempre era festa major. Com trigava Nadall! Quin fret que hi feia al poble els mesos tristos! A Barcelona no devia fer-n'hi mai de fret amb tants llums cremant sempre, i amb tantes cases i més cases que no deixaven passar les ponentades : ningú devia estar-se arraulit vora del foc, tot-hom devia ésser pels carrers a parar el sol, aquell sol tan senyor que no ennegria com el del poble.

El sol! La Rosa el mirava sorruda al sol d'hivern, com si el renyés perquè es llevava tard. I així que ell anava essent més matiner, i la Rosa ja s'enlluernava mirant-lo, els ulls d'ella s'omplien d'alegrois, i tot era anar i venir del fruiterar i demanar als ametllers que cuïessin a florir.

I quan el ramatge dels ametllers semblava un pom de llessamins empeltats de rosa, la noia anava a passar estones sota els arbres florits; i mentre ella tot era somniar en la ciutat anyorada, el sol, joguinejant, s'encabia a rajolins per entremig de les branques. I una clapa de sol queia damunt la Rosa, i ella, enlluernada, tancava els ulls. Era pigada de cara i tenia els cabells rojos, la noia pagesa : amb els ulls clucs, amarada de sol, i al peu de l'ametller florit, semblava un idol d'aram sota dossier de flors, la Rosa.

I quan, dins del tren, En Llorenç i sa filla passaven per aquell solc que en la hisenda feia la màquina del carril, — la gran llauradora, — la noia ja no estava tan contenta com el dia abans, ja pensava en la tristesa del tornar. Però, a l'arribar a Barcelona, totes les tristors fugien, i el goig d'ésser a la gran ciutat esborrava fins el record de les anyorances passades.

Oh! La ciutat! Gran gentada per tot arreu, els carruatges corrent com uns esperitats, músiques pels carrers, repics de campanes a tot-hora, cridadiça aixordadora, un burgit que no deixava sentir la remor de la mar, d'aquella estesa d'ones que venien d'allà baix, lluny, de molt lluny, d'allà on el cel s'acotava a donar-li besades. No devia haver-hi tristora a ciutat, que tot-hom reia i tot-hom corria amb els ulls espurnejants i el caminar decidit; que per tot s'hi veien senyals de festes, i els arbres dels passeigs llagrimajaven manyocs de cintes de paper descolorit, — rebrec d'alegria d'un any enrera, — i per carrers i places hi havia nova alegria. Tot-hom devia ésser ric a ciutat: els diners anaven a doxo, el vellut i la seda es duïen per tot dia, i als aparadors dels argenters cap any s'hi veïen les mateixes joies de l'any abans. Tot-hom devia estimar a ciutat, que prou que ho deien les mirades d'aquelles grans dames que passejaven en carruatges descoberts, tirats per dos cavalls que duïen fiors als guarniments. Tot-hom devia ser-hi estimat a Barcelona, fins les noies pigades, fins les que tenen els cabells rojos.

I quan venia el vespre, i anava encenent-se tan bella lluminaria, i l'hora de tornar al poble ja era aprop, què hermoses les trobava la Rosa, les rialles de la gent, i les joies dels aparadors, i les dames que miraven amb ulls d'amor! Oh! Si ella hi hagués pogut passar una nit a ciutat, en aquella ciutat on devien somniar-se coses tan hermoses, coses d'aquelles que s'expliquen en els contes d'enamorats! Si ella pogués saber com parlen d'amor, a ciutat, els que estimen a les noies pigades que tenen els cabells rojos!

— Això de les ciutats, no és bo més que per a una estona; — deia En Llorenç a sa filla, boi tornant cap al poble.

ENRIC DE FUENTES

Inspiron al ĉiuj por la ĝloro de nia Literaturo!

Vicente INGLADA *DRS.*, *presidanto.* — Eulalia ROSELL. — Teresa ROSELL. — José PEROGORDO. — D-ro Josep M.<sup>a</sup> TERRICABRAS. — Josep VENTURA, *sekretario.*

Barcelona, Decembro 1915<sup>a</sup>

## NOTOJ

I. La aŭtoroj de la ordinaraĵaj premiitaj verkoj ricevos belan diplomon kaj enkadrigitan portreton de D-ro Zamenhof.

II. Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar premiitaj verkoj la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti Reĝinon de la Festo.

- III. La verkoj prezentotaj devas esti verkitaj en Esperanto.
- IV. La Festo de la VI<sup>o</sup> Floraj Ludoj okazos en Reus dum la VII<sup>a</sup> Kongreso de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO la 11<sup>o</sup> de Junio 1916.
- V. Al la manuskriptoj, — kiujn ĝis la 1<sup>a</sup> de Majo akceptos la Sekretario, S-ro Josep Ventura, str. Galileu, 165, Terrassa (Barcelona) — oni devas aldoni devizon, kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomon kaj adreson de la verkinto.
- VI. Manuskriptoj ne estos resendataj, eĉ se ili alvenis post la datolimo por akcepto de verkoj.
- VII. La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniuj konkurso.
- VIII. La Juĝintaro publikigos la verdikton per KATALUNA ESPERANTISTO kaj la barcelona gazetaro.
- IX. En la teksto de KATALUNA ESPERANTISTO aperadas listo de eksterordinaraj premioj kaj temoj.

### EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. De LIA EKSCLENCA MOŝTO S-RO ANTONÍN LOPEZ PELAEZ, arĥiepiskopo de Tarragona. TEMO : *La instruado de Esperanto ĉe la Seminarioj*. PREMIO : Arta objekto.
- II. De LIA MOŝTO S-RO ANTON DE VECIANA, parlamenta deputito. TEMO : *Grava rolo de Esperanto en la ĉiropa milito*. PREMIO : Arta objekto.
- III. De LIA MOŝTO S-RO ANTON ESTIVILL I DE LLORACH, provinca deputito. TEMO : *Esperanto kiel oficiala internacia lingvo*. PREMIO : Arta objekto.
- IV. De CENTRE DE LECTURA de Reus. — TEMO : *Al plej bona traduko de aro da «Arabescos» de Joaquim M.<sup>a</sup> Bartrina el lia verko «Algos»*. PREMIO : Arta objekto.
- V. De S-RO MARTORELL ODENA. — TEMO : *Al la plej bona bonhumora versafo*. PREMIO : Arta objekto.



La Organiza Komitato de la Kongreso invitas ĉiujn esperantistajn societojn klopodi al la sukceso de la Floraj Ludoj per donaco de premioj.

La temojn kaj premiojn proponotajn oni sendu al Prezidanto de la Komitato, S-ro E. Aguadè, str. Presó, 15, Reus, kiel eble plej baldaŭ.

## Unu letero al la plejamatino<sup>1</sup>

DEVIZO : *Amo superas morton*

**E**STAS vere, ke mi vidas pli klare en mia koro laŭmezure, kiel mi amas vin; kaj mi vidas interalie, ke mia amo, kiun mi kredis plenpersona, kaj ĉu mi diros, eĉ egoisma je la komenco, estas farita nur el sindonemo, kaj ŝajnas eliri el mi mem por serĉi apud vi pligrandiĝi.

Jes, la unuajn tagojn, mi amis vin por mi. Mi opiniis juste vin deziri kiel virinon; nevidante en tiu deziro ĉion malvastan kaj blindan, kion ĝi entenas, mi volis rikolti ĝin, kiel floron ĵus elburĝoniĝintan. Cetere tio estis por mi tute nova sento. Neniam mi gustis tiajn kisojn, en kiujn la tuta memestaĵo ŝajnas fandiĝi, neniam mi sentis koron moviĝantan tiel proksime de la mia; neniam mi estis tiagrade maltrankviligita per okuloj fiksitaj sur miaj, per karesaj manoj, per dolĉaj kaj amaj paroloj! Mi estis lokata subite, sen ia preparo kontraŭ tiu senlimaĵo; ĉu ne estas kompreneble, ke mi ekricevis kapturoniĝon? Poste vi estis evis, la amikino, kies koron mi divenis, kaj kelkajn suferojn duonvidis, kiun mi volus pli feliĉa; mi estis ankaŭ fiera kaj kontenta, ĉar mi povis kelke da interparoletaj horoj, dume verdire mi preskaŭ ĉiam silentis, forgesigi vin pri la aliaj malĝojigaj kaj longaj horoj, kiujn vi travivis apud viro tiel malsama ol vi. Ĉu tiu simpatio, kiun mi sentis ne estis igonta min pliami vin fatale? Ĉu ĝi ne estis eĉ la komenco de la Amo? Ĉiuj tiuj sentoj, kiujn mi distingas nun, puŝis min al vi, kaj la instinkto pli forta ol ĉiuj rezonoj, kaj ilin antaŭiranta ĉiam, min devigis serĉi en vi tian feliĉon, pri kiu oni kvazaŭhontas, kvankam ĝi estas eble la sola produkto de nia vivo, kiu gardis sian krudan kaj primitivan verecon, kaj ĉerpis en sia forto mem la malcedon kontraŭ ĉiuj falsaj teorioj de la homoj.

Sed tio ne malhelpas, ke ĝi estas egoisma feliĉo, kaj ke ĝin dezirante, pri mi kaj ne pri vi mi pensis.

Pro tio nun, dum mi subpremas, ĉar estas necese, miajn sentojn sub mia prudento, mi vidas en vi tute novan plejamatinton, tian, kia ŝi ekaperus al mi, se ni povus iam dividi reciproke nian vivon, tute amdone ankoraŭ, en miaj brakoj kaj sur mia koro. Tiam mi

eksentus al vi nur protekteman bezonon; ravite pro feliĉo oferi al vi mian bruston kiel al frostotima birdeto, mi sentus min plena de sindonemo, korpremata, ĉar mi ne povus doni ja pli grandan, pli ĝuegigan feliĉon. Mia tuta vivo, ĉiuj miaj fortoj, ĉiuj miaj pensoj estus ja nesufiĉaj por plenumi mian deziron vin plifeliĉigi.

Jes, tiel mi vin vidus tiaokaze, kaj tiel mi vin vidas nun, sed serĉante sub la pasia furiozo la tutan aman sumon, kiun mi sentas amasigita en mia koro, kreskantan senĉese, kaj kiun mi deziregas foruzi.

Kaj estas tiu ama bezono, mi nun komprenas, kiu fortiris min al senlima idealo, al nekonita celo.

Kial en mia koro tiu ŝatemo pri justeco, pri feliĉo kaj pri boneco? Kial tiu fervoro al la muziko, kiu tiel dolĉege plorigis min nokte, tutsolan en ĉambro, aŭskultantan malproksiman muzikilon? Kial tiu gustemo pri poezio, kiu estas kvazaŭ la parfumo de sentemaj kaj doloraj koroj? Kial tiu dezirego kompreni tion, kion verkis aliaj homoj? Kial, se ne pro tiu ama bezono, nesciita kaj latentaj, kiu eksplodas apud virino, kiel frukto, kiu nur atendis sunradion por maturiĝi kaj fali.

Ha! mi ja vidas, ke nenio superstaras la amon, ke la kompatinda imago de la homoj elvojiras en la mil artaj kreaĵoj, kie ili serĉas erarigi siajn sentojn aŭ humile konfesas sian senpovon por ilin tradukil

Nenio superstaras la amon tial, ke ĝi estas la sola forto eble, kiu nin superregas, kaj kiun ni ne povas kompreni, kiu estas samtempe en ni pro la senfinaj sentoj, kiujn ĝi naskas, kaj ekster ni pro sia necerta kaj nekaptebla potenco; tial, ke ĉiuj fortoj, kiuj konsistigas nian vivon, estas kvazaŭkreitaj speciale por ĝi, ĝin preparantaj unue, ĝin sklave helpantaj poste, kaj fine jam vivantaj nur per la bedaŭroj kaj la rememoroj, kiujn ĝi postlasis.

Pro tio ju pli mi pripensas pri tiu amo, kiun mi sentas al vi, pri tiu nova vivo, kiun vi senvualigis antaŭ mi, ju pli mi vidas ĝian profundon, des pli ŝajnas al mi neeble, ke ĝi ne disvolviĝos iam, kaj mi estus tentata diri al vi: «Vi estas mia, ĉar mi vin amas».

Tamen kontraŭ la ĉirkaŭantaj influoj de la ĉiutaga vivo, mi estas tuj senkuraĝigita; pensante pri la baroj, kiuj ĉiam kontraŭstaras la efektiviĝon de feliĉo, min ofte superŝutas la malallogeco de la vivo. Sed ĉiam renaskiĝas la espero, ĉar la amo havas tiun specialan kapablon, ke ĝi ĉerpas forton, ke ĝi plienergiigas en la doloro mem, rekonante en ĝi sian propran naturon momente forgesitan pro blindiĝo de deziro, ke tiam disradias pli alten kaj pli malproksimen.

En tiuj momentoj, mi vin vidas tian, kia vi estas. Kiom mi amas vin tiam, mia plejamatino, kiom mi volus komprenigi tion al vi! Ĉu neniam plu revenos tiu vespero tiel bela, kiam la ombro vin envolvis, kiam ni ambaŭ fariĝis havo de la sama revo, de la sama deziro! Kiom mi vin amas! Kiom ĉiuj realaĵoj malaperas for de tiu amo! Kiom oni rapide kaj volonte forgesas ĉiujn malhelpaĵojn, kiuj nin ĉirkaŭas kaj avide atendas! Ho! vin alpremi sur mian koron, fermi la okulojn, ensenti vian vivon, vin ami!...

Sed ĉu estas ebla tiel granda feliĉo? Ĉu ci ne vidas, ke la tagoj forfluas, kaj ke ŝi ankoraŭ ne venis? ke la tagoj forfluos ankoraŭ, ke tiu amo estos ĉiam nur brila, senmorgaŭa epoko en ĉia vivo?...

Ne, ne, malgraŭ ĉio mi esperas, mi estas certa pri ŝia amo: «Kaj longe, ja longe, post kiam tiu sento estos eknaskiĝinta en ŝi, ĝi regos kun la sama ardeco, de nenio malfortigita, nek de foresto, nek de perfido...»

Mi legas vian iaman leteron, kie vi parolas pri la amo ĉe virino, kaj tiu vortoj kantas en mia koro; ili en ĝi estos ĉiam engravuritaj. Mi vin amas, kiel mi sentas, ke neniam plu mi amos!

PAUL BLANC



## GARANTIA KAPITALO DE K. E. F.

### LISTO DE GARANTIAŬTOJ

*Dairigo* : S-roj Jĵan Amades, 50 ptoj.; David Llop (*dua fojo*), 75; Estanislau Pellicer, 25; Pere Navas (*dua fojo*), 5; Ĉiam Antaŭen, 25.

Tiuj ĉi subskribitaj 180 pesetoj aldoniĝas al la 615 pesetoj publikigitaj en nia lasta numero. Por kompletigi la sumon da 1000 por la garantia kapitalo fiksitan de la Kongreso, mankas 205 pesetoj.

La garantia kapitalo estos elspezata nur kiam la propagandaj elspezoj kaŭzus deficiton. Tial anstataŭ tuj pagi la monon, oni subskribas la sumon, kiun oni volas, kaj en okazo de deficito la subskribinto pagus ne la tutan sumon, sed *proportie* laŭ la mono de li subskribita kaj la deficito pagota.

Ni invitas, do, nian midecanaron alhelpi la perfektan funkcion de nia organizacio, garantianta ĝin per bonvolaj donacotaĵoj.

## Al neamanta amatino <sup>1</sup>

DEVIZO : *Kio estas la vivo sen amo?*

Aŭskultu, belulin' ĉarma,  
miajn malgajajn sopirojn,  
ne rikantu la dezirojn  
de tiu ĉi koro varma;  
kial vi la vivon larma  
igas mian senkompate,  
rigardante min malŝate  
per mieno malafabla,  
se nur mi estas kapabla  
amegi vin delikate?

Mi vin amas, knabin' bela,  
per la tuta mia koro,  
kiel abeeton floro,  
kiel floron ros' ĉiela,  
kiel la pura lun' hela  
lagon reflektantan ĝin,  
kiel pasero sur pin'  
sin lulanta neston sian,  
kiel papili' gracion  
florejon, tiel mi vin.

Mi vin amas kaj pro tio  
mi frenezas, mi konfuzas,  
mi malsanas, mi jaluzas  
kaj min mortigas envio.  
Ho kia jaluzpasio,

kiam venteto petola  
dum maten' povas ĝi sola  
kisi vin, sen permespeto!  
Se mi nur estus venteto!...  
Se vi nur estus bonvola!...

Sed, ho ve! viaj okuloj  
ne por mi karesaj estas  
kaj via rigardo restas  
akra por miaj postuloj.  
Kial pro l' ardantaj bruloj;  
kiuj tiel min konsumas,  
viaj okuloj ne lumas,  
kaj ne per rigard' karesa,  
ne per ridet' ampromesa  
vi l' ĝojoj' mian plenumas?

Amu min! diru la vorton,  
kies potenco magia  
povus de la koro mia  
en vivon ŝanĝi la morton.  
Ne pli dezirindan sorton  
revas mia ambici',  
ol bruligi de pasi'  
en via koro la flamon,  
por ke sentante vi amon  
estu l' am' via por mi.

ARTUR DOMENECH

1. Premiita en la V<sup>o</sup> Internaciaj Floraj Ludoj.

### EN PROKSIMA NUMERO

Raporto pri la preparaj laboroj, Organiza kaj Honora Komitatoj de la  
VII Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio  
kaj I Kongreso de Hispana Esperantista Konfederacio

sub la alta patronado de

LIA REĜA MOŝTO ALFONSO XIII

## ENLANDA MOVADO

**BARCELONA.** — Dum Decembro, okaze de sia restado en nia urbo, honoris per vizito la *Barcelonan Hejmon: de la K. E. F.* S-ro Benigno de Luna, distinginda samideano el Zaragoza, kaj S-ro R. W. F. Kiffenbelt, holanda esperantisto. Kun S-ro de Luna niaj pioniroj havis okazon paroli pri la ekstarigo de Aragon'a Federacio Esperantista kaj pri la partopreno de la samideanoj el Zaragoza en la I<sup>a</sup> Kongreso de Konfederacio. S-ro Kiffenbelt en sia tra nia urbo vojaĝo al Java estis salutita de multaj samideanoj, kiujn li allogis per sia afableco. Al la distingindaj gastoj nian koran saluton.

— Dum la preparada laboro de nia VI<sup>a</sup> Kongreso, dum la propagando por la malfermo de kursoj kaj okaze de la kristnaskaĵaj festoj, la movado ĉe la *Hejmo* ne estis tiel vigla kiel antaŭajn monatojn. Dum Februaro okazos en ĝi grava, soĝena festo (aŭguranta serion de paroladoj, kiujn faros eminentaj literaturistoj katalunaj pri temoj interesaj por la samideanaro; ankaŭ niaj pioniroj faros priesperantaĵajn paroladojn, certe altirontajn al la sidejo de nia Federacio multenombrian ĉeestontaron. Plu detale ni parolos pri tio en venontaj numeroj.

— En la nova *Libera Esperantista Grupo*, fondiĝinta en «Centro Obrero», str. Mercaders, 25, komenciĝos kurso de Esperanto dum venonta Januaro.

— En la societo «Germanor Barcelonina» danke al klopodoj de samideano Viñas, komencis kurson de Esperanto S-ro Rodriguez la 15<sup>ta</sup> de Decembro, 20 ĝeĉeestantoj.

— S-ro Artur Casas faris propagandan paroladon la 14<sup>ta</sup> de Decembro ĉe «Centro Liberal Romanonista» okaze de malfermo de esperanta kurso, kiun li gvidos.

— En *Esperanto kaj Patrujo* la 20<sup>ta</sup> de Novembro S-ro Josep Serrat faris interesan paroladon propagandan, por malfermi novan kurson, kiu komenciĝis la 22<sup>ta</sup> de tiu monato kaj ĉiŝiras sukcese.

La sama grupo okazigis la 28<sup>ta</sup> de Novembro ekskurson al Garral kaj Sitges, kies interesajojn la ekskursanoj vizitis.

— La 27<sup>ta</sup> de Novembro en la sidejo de *Ferrovista Stelo* S-ro Josep Grau faris propagandan paroladon antaŭ la multenombra ĉeestantaro, kiu plenigis la saloon. La kursoj ĉe tiu grupo bone daŭras.

— *Nova Sento* faris la 8<sup>ta</sup> de Decembro matene viziton ĉe Parko Güell. Vespere antaŭ tre multe da personoj S-ro Josep Serrat paroladis pri Esperanto, kaj invitis la virinojn ĉesti la kurson speciale por ili aranĝitan, kies malfermo okazis la 1<sup>ta</sup> de la nuna monato. La kurso okazas marĉe kaj vendrede de 7<sup>h</sup>30 ĝis 8<sup>h</sup>30 vespere.

— Por solenigi la datrevenon de sia starigo *Barcelona Stelo* okazigis la 4<sup>ta</sup> de Decembro solenan feston, dum kiu estis disdonitaj al la lernantoj de

la kursoj elementa kaj supera la premioj kaj diplomoj. La nomoj de la ekzamenitoj ni jam publikigis. F-inoj Pascual kaj Navas, S-roj Iduarte kaj Grau (Jaume) legis katalunajn kaj esperantajn versaĵojn. La sekretario S-ro Navas legis esperantan raporton, kaj post la disdono de la premioj la prezidanto de la grupo faris resuman paroladeton.

La gesamideanoj amuziĝis poste per balo.

— *Espero Kataluna* anoncis per bela afiŝo, desegnita de S-ro Urbez, lokita ĉe montrofenestro de la «Esperantista Bazar», la malfermon de nova kurso, kiun S-ro Segura klarigas al 25 lernantoj.

Pro kompetobezonoj kaj troa materialo restas por venonta numero la raportoj pri movado en Banyoles, Molins de Rei, Palma de Mallorca, Terragona, Valls, Terrassa, Vich, Bilbao kaj Sevilla.

**GAZETARO KAJ ESPERANTO.** — Krom diversaj barcelonaj ĵurnaloj, kiuj publikigis sciigojn pri novaj kursoj, ekskursoj kaj paroladoj, *La Vanguardia* aperigis notetojn pri la organizado de nia venonta kongreso. *La Unión Ferroviaria* amplekse raportis pri parolado de S-ro Josep Grau kaj publikigis sciigojn pri *Ferrovista Stelo*.

*El Baix Penadés* (Vendrell) publikigas esperantan rubrikon. *Gazeta de Vich* enhavis diversajn priesperantajn sciigojn, kaj en Reus, *La Veu del Camp*, *Foment* kaj *Diari de Reus* aperigis la liston de la Honora Komitato por nia venonta Kongreso.

La barcelonaj gazetoj, anoncante la prezentadon de parodio de *polica drama*, rekte tradukita el Esperanto, bone reklamis por ni. La aŭtoro de l' parodio intencis ŝerci per tia alnomo, kiun la publiko *neŝerce* komprenis, kaj tial li malaperigis ĝin post du tagoj, eble timante ke tio povas malutili al lia reputacio je originaleco. Al vi nian dankon, mokinto mokita, por via tute senvola propagando!

## KORESPONDADO

S-ro A. Santamaría, Zamora. Dankon por via de ni ricevita sendaĵo. — S-ro Bemaldo, Lisbono. Ni skribos al vi pli malfrue pri tia temo. — S-ro N. Bojill, Palma Mallorca. Dankon por viaj bondeziroj. Via sendaĵo bone alvenis. Ni gratulas vin por via agemeco. — M. L. G. Casmaño, Noya. «Quaderns d'Estudis» aperas en kataluna lingvo. Specimenon vi povas peti rekte, aŭ pere de mi, se vi tion preferas. — *Esperanto-Ligo, Lsipaig*. Kolekton de informaj folioj ni petis por «Biblioteka de Catalunya» kie estas zorge kolektataj ĉiuj primilitaj dokumentoj ĉiulandaj. Ni sendos tien ĉiujn esperantajn, kiujn ni posedas donace ricevatajn, sed bedaŭrinde estas al ni neeble dediĉi monon por aĉeto. Nisalutas vin. — S-ro V. Cimr, Ĉiĉago. Niajn bondezirojn al vi. Neble publikigi entute vian leteron por troa materialo. Vian saluton ni transdonos. — S-ro Ellersiek, Berlino. Dankon por via sendaĵo.

# QVADERNS D'ESTVDI

Revista dedicada especialment a Mestres i Professors

Publicació mensual del Consell d'Investigació Pedagògica de la Diputació de Barcelona sota els auspicis de la MANCOMUNITAT DE CATALUNYA

## Preus de subscripció anual

Catalunya, València i Mallorca . . . . .	4 pessetes
Reste d'Espanya . . . . .	5 " "
Estranger . . . . .	5 francs
Número solt : 50 cèntims	

Se distribuiràn gratuïtament a tots els mestres oficials de Catalunya i a tots els professors de Centres d'Ensenyança sostinguts per la Diputació

Çiu membro de la *Kataluna Esperantista Federacio*, aŭ aboninto al KATALUNA ESPERANTISTO rajtos unufoje dum la jaro publikigi malgrandan anonceton, kiu senpage aperos ankaŭ sur *Amerika Esperantisto*

S-ro Marián Solà, Pl. de D-ro Zamenhof, 1. Terrassa : deziras interŝangi hispanajn revuojn kontraŭ britaj aŭ usonaj.

Deziras korespondadon :

S-ro Miquel Perich, *de Libera Stelo*, Muntanya, 62. Clot, Barcelona : Ankaŭ interŝangos markojn, gazetojn, k. t. p.

S-ro Enric Alba, Molas, 19, enfl. 1.<sup>a</sup>, Barcelona.

La grupanoj de *Fervoĵista Stelo*, Princess, 50. Barcelona.

Deziras interŝangi markojn :

S-ro M. Sorolla Sánchez, str. Tantarantana, 11, 2.<sup>a</sup>, Barcelona.

S-ro Joan Amades, Peu de la Creu, 20. Barcelona.

## AL KUNFEDERACIANOJ

La Administracio de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO estis en antaŭaj jaroj tre tolerema rilate la akuratan pagon de la kotizaĵo. Tiu toleremo estis tiel vasta, ke ankoraŭ multaj federacianoj ŝuldas la 1915-jarkotizon kvankam ili regule ricevis *ĉiujn numerojn* de KATALUNA ESPERANTISTO. Kompreneble, el tiuj ŝuldantoj la plejmulto pagos la kotizaĵon; tamen tio ne malhelpas, ke la Administracio plendu unu fojon ankoraŭ pri tiu bedaŭrinda fakto kaj ke ĝi admonu ĉiujn samideanojn jene

Por la regula funkciado de la Federacio kaj sekva aperado de ĝia presorgano estas *tute necese*, ke ĉiu membro de la K. E. F. estu paginta sian kotizaĵon antaŭ la fino de venonta marto, aŭ antaŭe, ju pli baldaŭ, des pli bone, ĉu al delegito enurba, ĉu rekte al la Administracio, str. Palla, 8, principal, Barcelona, per poŝta ĝiro aŭ per poŝtmarkoj 10-centimaj. Ni insistas pri tio, ĉar la nunaj cirkonstancoj postulas de la Administracio la tujan pagon de la fakturoj. Niaj amikoj komprenos do, kiel multe ili malhelpos la agadon de la Federacio ne pagante akurate sian kotizon

Fine, ni atentigas, ke laŭ decido de nia VI<sup>a</sup> Kongreso, la kotizaĵo por 1916 estas fiksita

Por enlando, 4 pesetoj; Por eksterlando, 2'400 spesmiloj

De la entuziasmo de ĉiuj ni esperas bonvolan komplezon

La Administracio